

**REALIGAS LA MONDAN PACON
LA BAHAA KREDO KAJ ESPERANTO**



**MAKING WORLD PEACE REAL
THE BAHÁ'Í FAITH AND ESPERANTO**

Paul Desailly

La aŭtoro de “ Realigas la Mondan Pacon: la Bahaa Kredo kaj Esperanto”, Paul Desailly, kaj lia amiko-eldonisto, Howard Perkins, senpage provizas tiun ĉi libron interrete; temas pri ilia metodo fortigi ankoraŭ pli bonajn rilatojn inter Bahaanoj kaj Esperantistoj. Bahaanoj estas petataj konsideri senperan donacon al Bahaa Esperanto-Ligo kies sekretario estas Bernhard Westerhoff, oficisto de la Nacia Spirita Asembleo de Bahaanoj en Germanio kaj kies kasistino estas Anneke Schouten-Buys, sampan@tiscali.nl.

Esperantistoj povas sendi donacon al sinjoro Trevor Steele, Ĝenerala Direktoro de UEA (Bahaaĵ principoj kaj leĝoj kondiĉas ke nur konfesintaj adeptoj de la Bahaa Kredo rajtas finance subteni bahaaĵn instancojn.) UEA en Roterdamo kaj AEA en Sydney stokas anglajn kaj Esperanto-versiojn de la verko; legeblas anonco proksimume sur pagho 50 en Jarlibro 2002 kaj 2003.

ANTAŬPAROLO

Eĉ post supraĵa tralegado de ĉi tiu verko konstateblas, ke oni pli ĝuste priskribus ĝin kiel kompilon de la ĉefaj Skriboj Bahaaj kaj Zamenhof'aj pri demando de universala helplingvo kun kelkaj aldonaj komentoj de la aŭtoro. Simple mia misio estas plaĉmaniere ordigi ilin, por ke la leganto espereble inspiriĝu.

Aparte mi agnoskas al *Lidia* kaj ties aŭtorino Wendy Heller; mi dankegas al Errol Chick, Marcel Leereveld, Howard Perkins kaj Trevor Steele kaj dankas Jenny Bishop, Han Zuwu, Bernie Heinze, Jamsheed Janami, Fay kaj Herbert Koppel, Ali Milani, Vera Payne, Ken John Rolls, Shi Xueqin, Song Jingquan, Franciska Toubale, Linda Wang kaj ĉiujn instruantojn kaj instruistojn de la Internacia Lingvo nekalkuleblajn tra la mondo. Eĉ en mia propra teksto mi ŝuldas dankegon al BELano, Bernhard Westerhoff kiu estas la sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo.

Ĉapitroj

La Bahaa Kredo; ĝiaj historio kaj principoj:	p 6-18
D-ro. L. L. Zamenhof:	p19-28
La Bahaa Kredo kaj Esperanto:	p29-36
La Monda Paco kaj Esperanto:	p37-43, p54-55
Bahaanoj studu Esperanton:	p43-56
Plibonigu Esperanton:	p19-24, p49-53
La Angla, la Religio, la Scienco kaj la Politiko: (Dio Ekzistas?)	p56-62, aldonaĵo 6.
La Oriento:	p64-79
Instruado de la Kredo:	p79-95
(Bahaa Esperanto-Ligo / Universala E ^o -Asocio):	p88-93
Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá al Den Haag:	p99-107
La Promeso de Monda Paco:	p112-124
Preĝoj:	p125-133
Adresaro:	p138
Esperanto at a Glance:	p139-140
Specialaj Temoj:	p143-144
Indekso:	p145-146

REALIGAS LA MONDAN PACON LA BAHAA KREDO KAJ ESPERANTO

verkita de
Paul Joseph Desailly

"Se iu asertas, ke la vero estas per li kaj prezentas siajn pruvojn, tiuj kiuj volas refuti lin devas montri pruvojn same validajn kiel liaj. Se ili sukcesos, liaj vortoj montriĝos vanaj kaj ili venkos; alikaze liaj vortoj ne ĉesos kaj liaj pruvoj ne vaniĝos. Mi admonas vin, ricevintojn de *La Bayán*, se vi volas aserti vian pravecon, kontraŭstaru neniun se vi ne montras pruvojn similajn al liaj, ĉar la vero staros firme, dum ĉio alia certe pereos."

Báb *Kitáb-i-Asmá*. XV11.11.

Báb signifas Esperante "Pordo" aŭ "Heroldo." La religia misio de tiu Martira Profeto de Ŝiraz, kiu anoncis la alvenon de Bahá'u'lláh daŭris de 1844 ĝis 1850. *La Bayán* estas Lia libro de klarigado.

"... la agado, kiu celas establi solidarecon inter la nacioj kaj instigi la spiriton de l'universalismo en la koroj de la homoj, similas Diajn radiojn el la Suno de Realto, kaj la plej hela radio estas la veno de la universala lingvo. Ĝia realiĝo estos la plej granda atingado de la epoko ..."

‘Abdu’l-Bahá *Star of the West* vol 4. nro 2. p36. (Ekstera vol 3), Parizo 12 Feb 1913.

2003. (Bahaa erao 159)

REAGOJ

Post jaroj da konsultado kaj pacienca helpo revizianta multajn manuskriptojn de ĉi tiu novbakita verkisto, la Nacia Spirita Asembleo de Bahaanoj en Aŭstralio (Korp) pozitive komentis je 29 Julio 1996.

"Per iom pli da peno kaj nova titolo la verko estus tre konvena artikolo en la Asocio de Bahaaj Studoj aŭ la revuo *Herald of the South*."

Multaj esperantistoj memoras la julian 1986an eldonon de *Herald of the South*. Tiam s-ro Ralph Harry (1917 – 2002), iama aŭstralia ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj, publikigis siajn favorajn komentojn pri la Bahaa Kredo.

"Interesa kaj ege multlaborigita afero. Gratulojn."

Kep Enderby. Prezidanto. UEA.

"Mi nun deziras kore gratuli vin pro bone farita laboro! Laŭ mia scio ne ekzistas alia simile ampleksa prezento pri la rilatoj inter la Bahaa Kredo kaj Esperanto."

Osmo Buller. Ĝenerala Direktoro. UEA.

"Refoje dankon pro via aldono de tre valora titolo je la disono de niaj gestudentoj."

D-ro Duane Troxel. Direktoro de Universitataj Studoj. Akademio Landegg. Svisio.

"Refoje gratulon!!! Grandega tasko, koncize liverita sen eĉ unu teda guto."

Vera Payne, instruistino, verkistino, recenzistino. UEA delegito. Perth. Okcidentaŭstralio.

"Ĝi estas vere belega, bonega, unuaranga!"

Aja Smulders-Mulder. Direktorino. Bahaa Gasta Servo. Nederlando.

"La verko estas tre interesa kaj grava. Gratulon. ... ĝi estas tre bona verko."

Joel Brozovsky. Redaktoro de *Oomoto*.

"Tre bona ideo kaj tre bela stilo."

Mao Zifu. Poeto.

"..honesto, tempenetra kaj konsekvencema karaktero de la enhavo de ĉi tiu grava verko."

Marcel Leereveld . Ĉefekzamenisto de la ekzamena komisiono en Aŭstralio.

"Ekstudinte Esperanton en la pasinta jaro mi tutkore invitas bahaanojn ekstudi ĝin kaj ekzameni tiun ĉi libron, kies ideoj pli facile konfirmiĝas post periodo de sincera lingva studado."

Profesorino Anna Steffes. Japan. Anna.Steffes@ma3Seikyou.ne.jp

"Mi promesas al vi katenan legadon!"

Bernhard Westerhoff. Sekretario-Bahaa Esperanto Ligo. *La BELmonda Letero*. n-ro70 Dec 99.

"...la libro estas ĉarme neantaŭvidebla mikspoto da temoj iel tuŝantaj la kredon kaj antaŭ ĉio ĝiaj ligoj kun la zamenhofa lingvo."

Trevor Steele. Verkisto. Ĝenerala Direktoro UEA. Membro de la Akademio de Esperanto.

"Tre bela libro."

Doktoro Renato Corsetti. Prezidanto. UEA.

DEDIĈO

Dediĉo al tiuj, kiuj klopodas transformi sin; antaŭ ĉio al tiuj, kiuj fidele persistas lukti por la "artefarita" sed sendube belsona, bonstruktura, histoririĉa kaj justcela lingvo - Esperanto. Mia kunligo kun tiu ĉi "artefarita" lingvo estas ĉiamaniere ilumina honoro des pli hela pro vortara klarigo - "farita per arto, malnatura; reala aŭ ne reala, sed konscie farita per arto." La unua difino de arto temas pri lerteco, aparte pri homa lerteco anstataŭ la natura; t.e. lerteco aplikata ĉe imito kaj desegno.

Ni salutas vin - La majstro de la artoj.

Aparta dediĉo al bahaanoj partoprenintaj la unuan en Aŭstralio okazinta Universala Kongreso - Adelajdo, Julio 1997 kaj al tiuj, kiuj ĉeestis Montpelieron en la lando de miaj prapatroj. Jen la oficiala UK-plano por la estonteco: 2003 Gotenburgo; 2004 Pekino; 2005 Vilnius. Dio benu vin ĉiujn.

KOPIRAJTO

© Paul J. Desailly, Marto 2003. All rights reserved. Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj.


No part of this publication may be translated or reproduced in any form or by any means without the written permission of the copyright owner.

Por reprodukti Bahaajn Sanktajn Skribojn en ia ajn formato celante eldonon oni nepre bezonas aprobon de bahaa instanco. Temas pri tutmonda procedo por garantii kvalitaltecon.


Fakse kaj telefone: Melburno, Aŭstralio: 61 3 94368075

Retpoŝte : pauldesailly@hotmail.com aŭ pollyperkins59@hotmail.com


SIMBOLOJ



La naŭpinta stelo reprezentas la perfektecon de la Bahaa Revelacio. Naŭ, la plej alta cifero, simbolas ampleksojn kaj plenumon de la atendoj en ĉiuj religioj. Oni utiligas tiun ĉi stelon por montri bahaan emblemon de plenumo dum la kvinpinta stelo, kiun Báb iniciatis, koincide estas simbolo de kaj la Bahaa Kredo kaj Esperanto. "Parolante ĝuste la kvinpinta stelo, kiun Báb utiligis kaj klarigis, estas la simbolo de nia Kredo." (El letero skribita en la nomo de Shoghi Effendi en *Lights of Guidance* p110). Poste Shoghi Effendi permesis ambaŭ stelojn reprezenti nian Kredon.



La internacia Esperanto-emblemo ekde inaŭguro de la movado estas kvinpinta stelo, kiu simbolas la kvin kontinentojn harmonie gvidatajn de la lumo de neŭtrala lingvo. Verda koloro enhavas ideon de sana kreskado. La du kvinpintaj bahaaj steloj, gravuritaj en bahaajn ringojn, reprezentas Bahá'u'lláh-on kaj Lian Antaŭulon, Báb. La korpo de la homo kun la kapo, la du brakoj kaj la du kruroj estas simbole montrataj. (vidu p 5.)



Bildo 1

SIMBOLO DE BAHAAJ RINGOJ

La ringjuvela simbolo, desegnita de 'Abdu'l-Bahá, estas speco de la Plej Sankta Nomo, Bahá'u'lláh. Ĝi estas uzata sur bahaaj ringoj. Ne necesas ke bahaanoj surportu ringon kun tiu emblemo, ĉar neniuj specifa leĝoj de Bahá'u'lláh pri ringoj ekzistas. 'Abdu'l-Bahá informis okcidentajn bahaanojn, ke la ringo apartenas al la malgranda fingro de la dekstra mano, kio daŭrigas islaman leĝon. Tamen oni ne rajtas konsideri la Bahaan Kredon kiel branĉon de Islamo, samkiel Kristanismo ne estas konsiderata branĉo de Judaismo.

La simbolo havas du elementojn: la desegnaĵon mem kaj la literojn en ĝi. La tri horizontalaj strekoj reprezentas, de supre malsupren: la mondon de Dio, la Kreinton; la mondon de la Manifestiĝo, la Kaŭzon aŭ Ordonon; kaj la mondon de la homo, la kreaĵon. La vertikala linio ripetas la duan horizontalan linion, la mondon de la Manifestiĝo, tiel kunligante la mondon de la Kreinto al tiu de Lia kreitaro. La du steloj signifas la homan korpon kaj la du Manifestiĝojn de nia erao, t.e., Báb kaj Bahá'u'lláh.

MANIFESTIĜO DE DIO (MALKAŜANTO DE DIO)

La Manifestiĝoj de Dio estas la grandaj Profetoj de Dio, Liaj elektitaj Mesaĝistoj aperantaj en ĉiu epoko. Ili ne estas Dio malsupriĝinta surteren, tamen Ili estas perfektaj respegulaĵoj de Liaj atributoj en la sama maniero, kiel spegulo reflektas la sunon sen esti la suno mem. Ĉiuj el la Manifestiĝoj havas la saman spiriton kvankam Iliaj eksteraj aspektoj malsimilas. Ili malkaŝas diversajn Diajn ecojn rilate al la necesoj kaj cirkonstancoj de la epoko en kiu Ili aperas. Bahaanoj ofte aludas tiun ĉi koncepton kiel "progresivan revelacion."

La Bahaaj Skriboj identigas kelkajn Manifestiĝojn, inter Ili, Abrahamo, Kriŝno, Budho, Zoroastro, Moseo, Kristo, Mahometo, Báb kaj Bahá'u'lláh. Bahaanoj kredas ke aliaj Manifestiĝoj aperis, kies nomoj jam perdiĝis el la historiaj kronikoj. Bahá'u'lláh diris ke onta Manifestiĝo ne venos ĝis la paso de mil jaroj.¹

¹ Ĝenerale elĉerpita el *A Basic Bahá'í Dictionary* de Wendi Momen; paĝoj 143, 144, 186, 198. Eldonita de George Ronald 1989 Oxford.

LA BAHAA KREDO - ĜIAJ HISTORIO KAJ PRINCIPOJ

La ĉefaj eldiroj religiaj de tiu ĉi libro devenas de Bahá'u'lláh, la Profeto-Fondinto de la Bahaa Kredo. Lia nomo glate prononceblas kaj fonetike rekoneblas kvazaŭ la Esperanto-elparolo (Baha'ula') inklinas je la belsona kaj originala sed malproksima persa lingvo. Laŭ ĉiuj bahaanoj Li estas la plej eminenta instruanto kaj edukanto de la mondo en nia epoko. Aliaj eminentuloj cititaj estas 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi, kiuj respektive estas la filo kaj pranepo de Bahá'u'lláh. La Universala Domo de Justeco, la centra bahaa institucio, situas en Hajfo, Israelo. Tiu institucio kune kun la ampleksaj tekstoj de la Fondintoj, ofte verkitaj de liaj propraj manoj, malebligis ian ajn daŭran skismon. La senerara aŭtoritato de la naŭ anoj de la Universala Domo de Justeco estas severe limigita al la tempo kaj loko de iliaj komunaj kunsidoj. La bahaanaro elektas ilin per tutmonda baloto, kiu estas inspira nova tipo de demokratio. Lokaj, naciaj kaj internaciaj voĉdonoj laŭregule okazas, en kiuj elekton propagandi kaj kampanji politike estas absolute malpermesitaj.

"La Bahaa Kredo estas sendependa mondreligio, kies celo estas spirite revivigi la homaron, rompi la barilojn inter la popoloj kaj starigi la fundamenton de unueca mondsocio laŭ principoj de amo kaj justeco."²

"La Kredo starigita de Bahá'u'lláh naskiĝis en Persio ĉirkaŭ la mezo de la deknaŭa jarcento kaj, rezulte de la sinsekvaj elpeloj de ĝia Fondinto kulminis per Lia ekzilo al la turka puna kolonio 'Akká kaj Liaj postaj morto kaj enterigo en ties proksimo, starigis sian daŭran spiritan centron en la Sankta Lando, kaj nun konstruas la fundamenton de sia tutmonda administrejo en la urbo Hajfo."³

"Egale en la pretendoj klare asertitaj de sia Aŭtoro kaj la ĝenerala karaktero de la kreskado de la bahaa komunumo en ĉiu kontinento de la terglobo, ĝi povas esti konsiderata neniel alia ol kiel mondreligio destinita evolui en la daŭro de la tempo en mondĉirkaŭantan ŝtaton, kies alveno devos enkonduki la Oran Epokon de la homaro, la epokon, en kiu la unueco de la homaro estos fortike starigita, ĝia matureco atingita, kaj ĝia glora destino malkaŝita pere de la nasko kaj ekfloro de mondĉirkaŭanta civilizacio.

² Shoghi Effendi. Gravurita sur ŝildo ekster la bahaa adorejo ĉe Ingleside, Sydney, Aŭstralio.

³ Shoghi Effendi *La Kredo de Bahá'u'lláh*. (Deklaro verkita por la Speciala Komitato de la Unuiĝintaj Nacioj por Palestino, Julio, 1947. Esperantigita de Roan Orloff Stone. Bahá'í Publishing Trust Wilmette. Chicago. 1966.) La Bahaa Kredo estas finkonstruanta sian Mondan Centron sur Monto Karmelo, Hajfo, Israelo. Temante projekton pri konstruaĵo ĝi estas unu el la plej grandaj en la mondo nuntempe. Antaŭ la fino de la jaro 2000 ĝi estos finkonstruita. La Bahaa Kredo estas fame konata tra la mondo kun adeptoj en 187 landoj kaj 45 sendependaj teritorioj. Bahaanoj sin trovas en 116.000 lokoj. De post la jaro 1948 la Bahaa Kredo tenas konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kiel Ne-Registara Organizaĵo. Oni nombras 179 Naciajn Spiritajn Asembleojn, 18.232 Lokajn Spiritajn Asembleojn kaj 7 templojn en la Bahaa Komunumo. Homoj el pli ol 2.100 triboj, rasoj kaj etnologiaj grupoj jam bahaaniĝis. La Sanktaj Skriboj de Bahá'u'lláh estas tradukitaj en 800 lingvojn. Apartenas al la Bahaa Kredo 26 eldonejoj, 7 radiostacioj, 741 lernejoj, 873 diversaj projektoj inkluzive de 203 edukaj programoj. (laŭ bahaa raporto de 20 Majo 1998.)

"REESPRIMO DE ETERNAJ VEROJ

"Kvankam ĝi devenis de Islamo ŝijaisma, kaj kvankam en la fruaj tagoj de ĝia evoluado la sekvantoj de la Mahometana kaj Kristana Kredo konsideris ĝin malgrava sekto, azia kulto, aŭ ido de la Mahometana religio, tamen ĉi tiu Kredo nun montras pli kaj pli sian rajton esti akceptita, ne kiel unu plua religia sistemo aldoniĝinta al la batalantaj kredoj, kiuj dum tiom multaj generacioj apartigis la homaron kaj malklarigis ĝian sorton, sed prefere kiel reesprimo de la eternaj veroj, sur kiuj baziĝas ĉiuj antaŭaj religioj, kiel unuiganta potenco inspiranta la aliĝintojn de ĉi tiuj religioj per nova spirita forto, fervoriganta ilin per novaj espero kaj homamo, flamiganta ilin per nova vido de la fundamenta unueco de iliaj religiaj doktrinoj, kaj malkaŝanta antaŭ iliaj okuloj la gloran destinon, kiu estas preta por la homaro.

"La fundamenta principo proklamita de Bahá'u'lláh, la sekvantoj de Lia religio firme kredas, estas, ke la religia vero ne estas absoluta sed relativa, ke la Dia Revelacio estas konstanta kaj progresiva procedo, ke ĉiuj grandaj religioj de la mondo estas Di-devenaj, ke iliaj bazaj principoj plene harmonias, ke iliaj celoj kaj intencoj estas unusamaj, ke iliaj instruoj estas ja facetoj de unu vero, ke iliaj funkcioj estas komplementaj, ke ili diferencas nur en la negravaj aspektoj de siaj doktrinoj, kaj ke iliaj misioj reprezentas sinsekvajn stadiojn en la spirita evoluado de la homaro.

"AKORDIGI BATALANTAJN KREDOJN

"La celo de Bahá'u'lláh, la Profeto de ĉi tiu nova kaj granda epoko, kiun la homaro jam eniris – Tiu, kies alveno plenumas la profetaĵojn de la Malnova kaj Nova Testamento, kiel ankaŭ tiujn de la Korano, rilate al la veno de la Promesito je la fino de la mondaĝo, en la Tago de Juĝado – ne estas detruita, sed plenumi la Revelaciojn pasintajn, akordigi prefere ol akcenti la diferencojn de la batalantaj kredoj, kiuj disrompas la nuntempan socion.

"Lia celo tute ne estas malgrandigi la rangon de la antaŭaj Profetoj aŭ malgravigi iliajn instruojn; kontraŭe, Li celas reesprimi tiujn bazajn verojn, kiujn ĉi tiuj instruoj konservas, laŭ maniero, kiu konformiĝus al la bezonoj, kaj akordus kun la kapableco, kaj taŭgus por la problemoj, la malbonoj kaj la embarasoj, de la epoko, en kiu ni vivas. Estas Lia misio proklami, ke la infanaĝo de la homaro pasis for, ke la konvulsioj okazantaj en la nuna stadio de ĝia viriĝo malrapide kaj dolorige pretigas ĝin atingi la plenaĝecon, kaj proklamas la alproksimiĝon de tiu Epoko de Epokoj, kiam oni faros plugilojn el glavoj, kiam la Regno promesita de Jesuo Kristo estos starigita, kaj la paco de la planedo definitive kaj daŭre certigita. Nek pretendas Bahá'u'lláh tutplenecon por Sia Revelacio, sed plivole kondiĉas, ke pli plena grado de la vero, kiun la Ĉiopova komisiis al Li certigi al la homaro je tiom danĝera krizo en ĝia sorto, devas esti malkaŝota je estontaj stadioj en la konstanta kaj senlima evoluado de la homaro.

"UNUECO DE LA HOMARO

"La Bahaa Kredo subtenas la unuecon de Dio, akceptas la unuecon de Liaj Profetoj, kaj instruas la principon de la unueco tuthomara. Ĝi proklamas la neceson kaj la neeviteblecon de la unuiĝo de la homaro, deklaras, ke tio iom post iom alproksimiĝas kaj pretendas, ke nenio krom la alieciga spirito de Dio, kreanta pere de Lia elektita Interparolanto, povos finfine sukcesi efektiviĝi ĝin. Plue, ĝi ordonas al siaj sekvantoj la ĉefan devon senkatene serĉadi la veron, kondamnas ĉian antaŭjuĝon kaj superstiĉon, deklaras la celon de religio esti la antaŭenigo de amikeco kaj konkordo, proklamas ĝian esencan harmonion kun scienco, kaj akceptas tion ĉi kiel la ĉefan rimedon por la pacigo kaj la ordema progreso de la homa socio. Ĝi klare subtenas la principon de egalaj rajtoj, oportunoj kaj privilegioj por viroj kaj virinoj, insistas je deviga edukado, forigas ekstremaĵojn de malriĉeco kaj riĉeco, nuligas la pastraran oficon, malpermesas sklavecon, asketecon, almozetadon kaj monaĥecon, ordonas monogamion, malinstigas al eksedziĝo, emfazas la neceson precize obeadi al onia registaro kaj altigas ian laboron plenumitan en la spirito de servo al Diadoro, instigas aŭ la kreon aŭ la elekton de internacia helplingvo, kaj konturas tiujn instituciojn, kiuj devos starigi kaj eternigi la ĝeneralan pacon de la homaro.

Hodiaŭ la majesta konstruaĵo kun la ora kupolo, troviĝanta panorame de la golfo de Hajfo meze de belegaj ĝardenoj, estas la maŭzoleo kie la teraj relikvoj de Báb estas entombigitaj.



**Bildo 2 – La maŭzoleo de Báb,
Monto Karmelo, Hajfo, Israelo.**

BÁB 20 OKTOBRO 1819 – 9 JULIO 1850

"La Bahaa Kredo centras ĉirkaŭ tri centraj Figuroj, la unua el kiuj estis junulo, naskiĝinto de Shíráz, Persio, nomita Mirzá ‘Alí-Muhammad, konata kiel Báb (Pordo), Kiu en Majo, 1844, en la aĝo de dudek kvin jaroj, pretendis esti tiu Heroldo, Kiu, laŭ la

Sanktaj Skriboj de antaŭaj Diepokoĵoj, devos anonci kaj pretigi la vojon por la veno de Iu pli granda ol Li, Kies misio estus, laŭ tiuj samaj Skriboj, inaŭguri epokon de justeco kaj paco, epokon aklamitan kiel la kompletigo de ĉiuj antaŭaj Diepokoĵoj, kaj enkonduki novan ciklon en la religia historio de la homaro. Rapida kaj severa persekutado, inaŭgurita de la kuniĝintaj fortoj de Eklezio kaj Ŝtato en Lia patrujo, rapidigis sinsekve Lian areston, Lian ekzilon en la montojn de Adhírbayján, Lian malliberigon en la fortikaĵojn de Máh-Kú kaj Chiríq, kaj Lian ekzekuton, en Julio 1850, per pafroto en la publika placo de Tabriz. Ne malpli ol dudek mil sekvantoj Liaj estis mortigitaj kun tiom sovaĝa krueleco, ke tio elvokis la varman kompaton kaj la profundan admiron de pluraj Okcidentaj verkistoj, diplomatoj, vojaĝantoj kaj kleruloj, kelkaj el kiuj mem vidis tiujn abomenajn perfortojn, kaj estis instigitaj priskribi ilin en siaj verkoj kaj taglibroj.



Bildo 3 – Enirejo de la Sanktejo.


Sanktejo de Bahá'u'lláh "La Gloro de Dio" - Bahĝi, Israelo.

BAHÁ'U'LLÁH : 12 NOVEMBRO 1817 – 29 MAJO 1892

FONDINTO DE LA BAHAA KREDO

"Mírzá Husayn-'Alí, titolita Bahá'u'lláh, (la Gloro de Dio) naskiĝinto de Mazindaran, Kies venon antaŭdiris Báb, estis atakita de tiuj samaj fortoj de sensecieco kaj fanatikeco, estis enkarcerigita en Tihrán, estis ekzilita en 1852 el Sia patrujo al Bagħdad, kaj de tie

al Konstantinoplo kaj Adrianoplo, kaj fine al la mallibereja urbo 'Akka, kie Li restis enkarcerigita dum ne malpli ol dudek kvar jaroj, kaj en kies apudeco Li mortis en 1892. Dum Sia ekzilo, kaj precipe en Adrianoplo kaj 'Akká, Li formulis la leĝojn kaj ordonojn de Sia Epoko, klarigis en pli ol cent volumoj la principojn de Sia Kredo, proklamis Sian Revelacion al la reĝoj kaj regantoj Kristanaj kaj Mahometanaj, de la Oriento kaj la Okcidento, skribis al la Papo, la Kalifo de Islamo, la Ĉefaj Magistratanoj de la Respublikoj de la Amerika kontinento, la tuta Kristana pastraro, la ĉefoj de Islamo sunaisma kaj ŝijaisma, kaj la ĉefpastroj de la Zoroastra religio. En tiuj skriboj Li proklamis Sian Revelacion, alvokis tiujn, al kiuj Li skribis, atenti Lian vokon kaj aliĝi al Lia Kredo, avertis ilin pri la sekvoj de ilia rifuzo, kaj denunciis en kelkaj okazoj iliajn arogantecon kaj tiranecon.



Bildo 4

'ABDU'L-BAHÁ...23 Majo 1844 – 28 Novembro 1921
Kavaliro 'Abbas Effendi K.B.E.

Kavalirigita, Aprilo 1920, de la britoj pro servoj kiel batalanto kontraŭ malsatego en Palestino dum la Unua Mondmilito. Malgraŭ siaj multaj devoj 'Abdu'l-Bahá iom studis Esperanton en 1919. Lia instruisto estis D-ro J. Esslemont. (Bahaa Esperanto-Ligo *Bahaismo kaj Esperanto* p42 Frankfurt 1997.)

'ABDU'L-BAHÁ. 1844 – 1921

"Lia plej aĝa filo, 'Abbas Effendi, konata kiel 'Abdu'l-Bahá (la Servanto de Bahá),⁴ elektita de Li kiel Lia rajtigita posteulo kaj la aŭtoritata klariganto de Liaj instruoj, kiu de frua infaneco proksime kunestis kun sia Patro kaj partoprenis Liajn ekzilon kaj afliktadojn, restis malliberulo ĝis 1908, kiam, rezulte de la Revolucio de la Junaj Turkoj, li estis liberigita. Li ekloĝis en Hajfo, kaj baldaŭ poste li entreprenis sian

⁴ Bahá, persa vorto signifanta gloron.

trijaran vojaĝadon al Egiptio, Eŭropo kaj Nordameriko, dum kiu li klarigis antaŭ grandegaj aŭdantaroj la instruojn de sia Patro kaj antaŭdiris la alproksimiĝon de tiu katastrofo, kiu estis baldaŭ okazonta al la homaro. Li reiris hejmen ĵus antaŭ la Unua Mondmilito, dum kiu li estis en konstanta danĝero ĝis la liberigo de Palestino pere de la militistaro komandita de Generalo Allenby, kiu montris la plejan bonkorecon al li kaj al la malgranda anaro de liaj kunekzilitoj en 'Akká kaj Hajfo. En 1921 li mortis, kaj oni enterigis lin en ĉerkujon sur Monto Karmelo en la maŭzoleo, kiu, je la definitiva instruo de Bahá'u'lláh, estis konstruita por la kadavro de Báb, kiun oni estis jam translokiginta el Tabriz en la Sanktan Landon, post kiam ĝi estis konservita kaj kaŝita dum ne malpli ol sesdek jaroj.⁵

En la Sankta Lando la daŭra memorigaĵo pri la Gardanto estas la grandioza aranĝo de la tereno, kiun li kreis por la Mondcentro de la Bahaa Kredo.

La kompletigo de la tombo-monumento de Báb rezultas el lia laboro, same kiel la konstruo de la Internacia Bahaa Arkivejo.

Estis ankaŭ Shoghi Effendi, kiu konceptis kaj planis la belajn ĝardenojn en Bahĵi kaj sur la deklivoj de Monto Karmelo.



Bildo 5 – Shoghi Effendi – 1922

LA GARDANTO : 1 MARTO 1897 – 4 NOVEMBRO 1957

En sia testamento 'Abdu'l-Bahá nomumis sian nepon Shoghi Effendi Rabbani (pr.: Ŝogi Efendi Rabani) Gardanto de la Bahaa Kredo kaj interpretanto de ĝiaj instruoj. Shoghi Effendi deĵoris ĝis sia morto en 1957. Dum tiuj 36 jaroj la Gardanto tradukis multajn el la skriboj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá en la anglan lingvon, klarigis iliajn signifojn, akcelis la starigon de lokaj kaj naciaj bahaaj institucioj, kaj gvidis multajn planojn cele al la disvastigo de bahaaj idealoj tra la mondo. Diplomiĝinte el la American University en Beirut li studis ankaŭ ĉe Oxford University en Londono. Krom la angla li flue parolis la araban, la francan, la persan kaj la turkan lingvojn.

"ADMINISTRA ORGANIZO

"La Administra Organizo de la Kredo de Bahá'u'lláh, kiu estas destinita evolui en la Bahaan Mondŝtaton, kaj kiu jam travivis la atakojn lanĉitajn kontraŭ ĝiaj institucioj de

⁵ Shoghi Effendi *La Kredo de Bahá'u'lláh*. (Deklaro verkita por La Speciala Komitato de la Unuiĝintaj Nacioj por Palestino, Julio, 1947. Esperantigita de Roan Orloff Stone. Bahá'í Publishing Trust. Wilmette. Chicago 1966.)

tiaj timigaj malamikoj kiaj la reĝoj de la dinastio Qájár, la Kalifoj de Islamo, la ekleziaj ĉefoj de Egiptio, kaj la Nazia reĝimo en Germanio, jam etendis siajn disbranĉigojn al ĉiu kontinento de la terglobo, de Islando ĝis la ekstremaĵo de Ĉilio, estis starigita en ne malpli ol okdek ok landojn⁶ de la mondo, kunigis en sian anaron reprezentantojn de ne malpli ol tridek unu rasoj,⁷ kalkulas inter siaj subtenantoj Kristanojn el diversaj sektoj, Mahometanojn el la sunaisma kaj ŝijaisma sektoj, Judojn, Hindojn, Sikhojn, Zoroastranojn kaj Budhanojn. Ĝi eldonis kaj dissemis, pere de siaj difinitaj komitatoj, bahaan literaturon en kvardek ok lingvoj,⁸ jam firmigis sian fundamenton per la korporaciigo de kvin Naciaj Spiritaj Asembleoj⁹ kaj sepdek du lokaj Konsilantaroj,¹⁰ en landoj tiel disaj kiel Sudameriko, Hindio kaj la Antipodoj – korporaciigoj, kiuj leĝe rajtigas al siaj difinitaj reprezentantoj havi posedaĵojn kiel kuratoroj de la baha komunumo. Ĝi prizorgas la internaciajn, naciajn kaj lokajn havaĵojn, taksitajn je kelkmilionoj da pundoj kaj lokitajn en ĉiu kontinento de la terglobo;¹¹ havas en kelkaj landoj la privilegion de oficiala rajtigo flanke de la civilaj aŭtoritatuloj, kio ebligas al ĝi liberiĝi de impoŝtado por siaj havaĵoj kaj soleni bahaajn geedziĝojn, kaj kalkulas inter siaj majestaj konstruaĵoj du Templojn, unu en Rusa Turkeŝtano kaj la alia sur la bordo de la lago Michigan en Wilmette, en la apudaĵo de Chicago.¹²

"Ĉi tiu Administra Organizo, malsimila al la sistemoj, kiuj evoluis post la morto de la Fondintoj de la diversaj religioj, estas ĉi tiu origino, apogas sin sekure sur la leĝojn, la instruojn, la ordonojn kaj instituciojn, kiujn la Fondinto de la Kredo specife revelaciis kaj klare starigis, kaj funkcias en preciza akordo kun la klarigoj de la aŭtoritataj klarigantoj de siaj Sanktaj Skriboj. Kvankam furioze atakata ekde sia komenco, tamen, per sia karaktero, unika en la religia historio de la mondo, ĝi sukcesis konservi la unuecon de sia diverseca kaj disa subtenantaro, kaj ebligis al ili lanĉi, kune kaj sisteme, entreprenojn en ambaŭ duonsferoj difinitajn por vastigi siajn limojn kaj firmigi siajn administrajn instituciojn.

"En ĉi tiu rilato atentinde estas, ke la Kredo, kiun ĉi tiu organizo servas, gardas kaj antaŭenigas, estas esence supernatura, supernacia, tute senpolitika, senpartia, kaj diametre kontraŭ iu sistemo aŭ skolo, kiu strebas altigi iun ajn rason, klason aŭ nacion. Ĝi estas libera de iu ajn de eklezieco, havas nek pastraron nek ritojn kaj estas subtenata nur per libervolaj donacoj de siaj konfesintaj aliĝintoj. Kvankam lojalaj al siaj respektivaj registaroj, kvankam inspiritaj per la amo al siaj patrujoj kaj deziremaj ĉiam antaŭenigi ties plej bonajn interesojn, tamen la sekvantoj de la Bahaa Kredo, rigardantaj la homaron kiel unu enton, kaj profunde dediĉitaj al ĝiaj esencaj intereso, ne hezitos subigi ĉiajn interesojn, ĉu persona, regiona aŭ nacia, al la superaj intereso de la ĝeneraleco de la homaro, plene sciantaj, ke en mondo de interdependaj popoloj kaj

⁶ 1997; 187 landoj kaj 45 sendependaj teritorioj.

⁷ 1997; 2.100 triboj, rasoj kaj etnologiaj grupoj.

⁸ 1997; La Sanktaj Skriboj de la Bahaa Kredo estas tradukitaj en 800 lingvojn.

⁹ 1997; 179 Naciaj Spiritaj Asembleoj.

¹⁰ 1997; 18.232 Lokaj Spiritaj Asembleoj.

¹¹ 1998; Aktuala valoro ne estas havebla.

¹² 1998; 7 temploj en la baha mondo hodiaŭ staras.

nacioj, la profito de unu parto estas plej bone atingita per la profito de la tuto, kaj ke neniam daŭra rezulto povas esti atingata de unu el la elementaj partoj, se la ĝeneralaj interesoj de la ento estas malatentigitaj.

"Nek oni preterlasu la fakton, ke la Kredo jam pretendis kaj montris sian sendependan religian karakteron, estis liberigita el la katenoj de ortodokseco en iuj Islamaj landoj, akiris en unu el tiuj landoj nepetitan ateston pri sendependa stato, kaj sukcesis gajni al si la lojalecon de reĝino."¹³

LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO – FONDITA 21 APRILO 1963

La Universala Domo de Justeco, destinita de Bahá'u'lláh kiel leĝdona aŭtoritato de la Bahaa Kredo, fondiĝis en 1963. Ĝi konsistas el naŭ membroj, kiuj elektigas ĉiun kvinan jaron per la tuta membraro de la funkciaj naciaj institucioj de la bahaa mondo.

La Domo de Justeco gvidas la spiritajn kaj administrajn aferojn de la Bahaa Internacia Komunumo. Ĝi servas ankaŭ kiel gardanto de la sanktaj bahaaĵoj kaj aliaj posedaĵoj en la Sankta Lando. Dotita de Bahá'u'lláh per leĝdona aŭtoritato koncerne ĉiujn aferojn ne eksplicite difinitajn en la bahaaĵoj, la Domo de Justeco estas tiu institucio, kiu tenas la bahaan komunumon en intima kontakto kun konstante ŝanĝiĝanta mondo.

LA PRINCIPOJ

Tiuj ĉi principoj realiĝos nur per memstara esplorado de la vero tute sen ritoj, dogmoj kaj superstiĉoj. Ĉiuj el la principoj havas unuarangan gravecon.

Dio estas nesciebla esenco. "Dio sola kaj unika, troviĝas en sia propra loko, kiu estas ekster spaco kaj tempo, kiun oni povas nek nomi, nek klarigi, nek montri, nek priskribi, nek difini, nek mezuri." (*La Revuo* 1913-1914 p.264. Vortoj de 'Abdu'l-Bahá laŭ *La Revuo*.)

"La donaco de Dio al tiu ĉi klera tempo estas la scio de la homara unueco kaj la fundamenta unueco de religioj."¹⁴

Elradikigo de antaŭjuĝoj. "Religiaj antaŭjuĝoj kaŭzas detruigon inter la popoloj ekigante militadon kaj konflikton; ne eblas forigi ilin sen komuna lingvo."¹⁵

Egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj. "La nova epoko, estos epoko en kiu la viraj kaj virinaj elementoj de civilizacio estos en pli granda egalpovo."¹⁶

Forigo de ekstrecoj de riĉeco kaj malriĉeco.

Universala eduksistemo deviga.

Vera religio tute harmonias kun scienco kaj racio.

¹³ Shoghi Effendi *La Kredo de Bahá'u'lláh*. (Deklaro verkita por la Speciala Komitato de la Unuiĝintaj Nacioj por Palestino, Julio 1947.) Esperantigita de Roan Orloff Stone.

¹⁴ 'Abdu'l-Bahá *in London*. Paĝo 19 Bahá'í Publishing Trust. 1988 London.

¹⁵ 'Abdu'l-Bahá *Star of the West* vol 4. n-ro 2. p.37. 9 Aprilo 1913. (ekstera vol 3). George Ronald 1984 Oxford.


¹⁶ D-ro J.E. Esslemont *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko*. Paĝo 150 Bahaa Esperanto-Ligo, 1978. Usono. (El raporto pri rimarkoj de 'Abdu'l-Bahá sur la vaporŝipo Cedric, kiam ĝi alvenis en Nov-Jorkon, 1912.)

Agnosko de spirita solvo rilate al mondaj problemoj ekonomiaj. Tio estas atingebla nur per volonta disdonado de la propraj riĉaĵoj. (Vidu 'Abdu'l-Bahá *Mesaĝo al la Hago* aldonaĵo 2, paĝo 102, paragrafo 4.)

Universalaj sistemoj de mono, pezo, mezuro, arbitracio, registaro kaj juro.

La adopto de universala helpa lingvo. Efektive ĉi tiu principo tuŝas ĉiujn bahaajn principojn.

Vidu aldonaĵon du por eltrovi aŭtoritatan raporton de tiuj ĉi principoj kaj precizajn paŝojn laŭ longe de la vojo al mondpaco: 'Abdu'l-Bahá *Mesaĝo al la Hago* 17 Dec 1919. Responde al letero de s-ino Jane White de Edinburgo, Skotlando 'Abdu'l-Bahá verkis specialan epistolon en 1906 en kiu li resumis principojn de la Bahaa Kredo. La sekvanta eltiraĵo estas konata kiel lia prelego, La Sep Kandeloj de Unueco. Ĝi estas promeso anstataŭ ĉarto de mondpaco. La potenco kaj beleco kuŝas en ĝiaj koncizeco kaj simpleco. Se eblus per unu vorto priskribi la Bahaan Kredon kaj ĝiajn principojn tiu kvinlitera vorto estus: " UNUEC' "; la sama vorto beligas nian plej videblan miljaran kunlaboron, t.e. la internacia spacostacio.



Bildo 6 – Grava parto de la internacia spacostacio: " UNUEC' "



Bildo 7 – **La maŭzoleo de Báb.**




Bildo 8 – **Terasoj etendiĝantaj ĝis la maŭzoleo de Báb, Monto Karmelo.**

" Ho Karmelo...Ĝoju pro tio, ke Dio en tiu ĉi tago starigis sur vi Sian sidlokon."



Bildo 9 – Sidejo de la Universala Domo de Justeco.



Bildo 10 – Enirejo de la Universala Domo de Justeco, Monto Karmelo, Hajfo, Israelo.

Monto Karmelo laŭ la *Sankta Biblio* estas la Monto de Dio.



Bildo 11 – **Modelo de la Arko ĉe Monto Karmelo, Hajfo, Israelo.**

Maldekstre al dekstre: Internacia Librejo, Internacia Instrucentro,
Universala Domo de Justeco, Centro por studo de la Sanktaj Skriboj kaj Internacia Arĥivejo.



Bildo 12 - **Rigardo al la arĥiveja konstruaĵo kaj la maŭzoleo de Báb kun fone la golfo de Hajfo.**



Bildo 13 - **Al Hajfo rigardo dum konstruado de la supraj terasoj etendiĝantaj al la maŭzoleo de Báb.**

la sep kandeloj de unueco¹⁷

"Ho tre honorinda sinjorino. En la antikvaj epokoj, kvankam estis kelke da frateco inter la homoj, tamen oni ne sukcesis efektiviĝi la universalan interkonsenton, ĉar mankis rimedo kaj realigilo. Inter la kvin partoj de la mondo ne ekzistis komunikaĵoj: eĉ inter la diversaj nacioj de unu sama parto de la mondo, kunligo kaj interŝanĝoj de ideoj estis malfacilaj. Tial, la kunigo de ĉiuj rasoj de la mondo en unu punkton de unueco kaj solidareco, la interŝanĝo de pensoj estis tute ne eblaj.

"Male, en la nunaj tempoj, la komunikorimedo abundas, kaj vere la kvin partoj de la mondo estas nur unu. Ĉiu individuo povas plej facile vojaĝi en ĉiuj landoj vizitadi la individuojn kaj interparoli kun ili: Eĉ, dank' al la gazetaro, oni povas koni la staton, la kredojn, la opiniojn de ĉiuj popoloj. Tiel, ĉiuj partoj de la mondo, la nacioj, la registaroj, la urboj, la vilaĝoj estas interligitaj, kaj neniuj povas nebezoni la alian; ĉar la politikaj ligiloj ekzistas inter ĉiuj, kaj evidente estas ke komerco, industrio, terkulturo, sciencoj starigas ankaŭ la plej fortikajn interrilatojn. Do interkonsento universala kaj unuiĝo de ĉiuj popoloj fariĝis efektivegeblaj; kaj tio estas la mirindaĵo de ĉi tiu glora epoko, de la nuna belega jarcento, kion ne povis profiti la antaŭaj tempoj. Tial vi konstatos ĉiutage mirindaĵon novan, kaj fine en la kunsidantaro de la mondo la brilantaj lumoj ekflamiĝos.

"Vidu kiel ĝia lumo nune aŭroras super la malheligita horizonto de la mondo. La unua kandelo estas unueco en la politika sfero, kies unuajn glimojn jam eblas percepti. La dua kandelo estas unueco de pensado en mondaj entreprenoj, kies efektivigon post nelonge eblos atesti. La tria kandelo estas unueco en libereco, kiu certe efektiviĝos. La kvara kandelo estas unueco de la religio, kiu estas la angulŝtono de la fundamento mem, kaj kiu, per la potenco de Dio, videbliĝos en plena sia brilego. La kvina kandelo estas la unueco de la nacioj - unueco kiu dum tiu ĉi jarcento estos sekure establita, kaŭzante ke ĉiuj popoloj de la mondo sin konsideros kvazaŭ civitanoj de unu komuna patrujo. La sesa kandelo estas unueco de la rasoj, kiu faros ĉiujn kiuj vivas surtere homoj kaj anoj de unu sola raso. La sepa kandelo estas unueco de la lingvo,¹⁸ t.e. la elekto de universala lingvo kiu estos al ĉiuj homoj instruata kaj per kiu ĉiuj interkomunikos. Ĉio tio neeviteble efektiviĝos, ĉar la potenco de la Regno de Dio helpas kaj asistas je ĝia realigado."¹⁹

¹⁷ *La Revuo* 1913-1914 p.369. La tuta prelego de 'Abdu'l-Bahá troviĝas ĉe *La Revuo*, tamen mi elektis post la dua paragrafo la tradukon de Bahaa Esperanto-Ligo pro ĝiaj ekzakteco kaj moderna stilo. Notindas la redakcia piednoto en *La Revuo* jene ... "la belaj supraj paroloj klarigos nian celon diskonigi kelkajn el la pensoj de tiu altega Homkondukanto, 'Abdu'l-Bahá." (Majuskloj de *La Revuo*.)

¹⁸ La libro *The Seven Candles of Unity. The Story of 'Abdu'l-Bahá in Edinburgh* de A. Khurshed (p.169 B.P.T. 1991 Londono) klare montras, ke kvankam 'Abdu'l-Bahá lastvice menciis la unuecon de la lingvo kiel la finan kandelon, li ne kronologie registris la kandelojn. Pro mencio de la unueco de la nacioj kiel la kvina kandelo de unueco, okazonta antaŭ la turnopunkto de la jarmilo, 'Abdu'l-Bahá indikas, ke la kandeloj ne sekvas laŭ tempo.

¹⁹ La prelego de 'Abdu'l-Bahá *La Sep Kandeloj de Unueco* el la angla traduko de Shoghi Effendi en *World Order of Bahá'u'lláh. Selected Letters* p. 38, 39. Ne konfuzu tiun prelegon kun la libro de la sama titolo citita supre.

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, naskita 1859 en pogrominfestata Bialistoko, iniciatis Esperanton. El naŭ infanoj de Markus kaj Rosalia Zamenhof li estis la unua. D-ro Zamenhof kaj lia edzino Klara ĝuis feliĉan familian vivon ĉe 9 Dzika strato, Varsovio. Apude oni konstruis en 1926, naŭ jarojn post lia morto, mondfaman monumenton memore al li. Malriĉaj okulpacientoj de D-ro Zamenhof amase ĉeestis lian funebron en tiu historia jaro 1917, kiu koincidis kun la centa datreveno de la naskiĝo de Bahá'u'lláh. Lia unua eldono en 1874²⁰ de internacia lingvo diferencis de moderna Esperanto. Hodiaŭ lingve kleraj anoj de internacia akademio prizorgas la progreson de Esperanto.

Inter multaj antaŭaj lingvaj kreaĵoj D-ro Zamenhof sonde esploris Volapük-on (Mondparolon), iom pli fruan internacian lingvon kun multaj afiksoj.²¹ Ĝi estis elpensita de germana geniulo, Pastro Schleyer, kiu konis kvindek lingvojn. Iu obstina sinteno eĉ pri ŝanĝetoj de 'lia' lingvo kaj multaj malfaciloj por komencantoj detruis Volapük-on pro malunueco. Tial D-ro Zamenhof modeste proponis de la plej fruaj kongresoj allasi sendependan kaj demokratian instancon disvastigi la Internacian Lingvon.

Dum la fruaj jaroj multaj modifoj de Esperanto estis proponataj. D-ro Zamenhof jam konsideris plej multon el ili prudentaj nur laŭ teorio sed empirie nedefendebaj. Multaj proponoj kontraŭdiris sin reciproke. D-ro Zamenhof lerte, antaŭdire kaj diplomate respondis al la protagonistoj, ke post nelonge kaj pere de konsulta komitato, fariĝonta la Akademio de Esperanto, la lingvo nature evoluos kvazaŭ etna lingvo. D-ro Zamenhof efektive aprobis kelkajn proponojn modifi Esperanton tamen li portempe prokrastis ilin, por, ke unueco kaj stabileco efektiviĝu. Li diris:

"Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi *registaroj* per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la Fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo* la Fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia Fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. *Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!*"²²

Tiuj kondiĉoj jam sukcese protektis la junan Esperanton kaj nutris ĝin ĝis iom da universaleco, spite al la limigaj influoj de Ido dum ĝia junaĝa kresko. Ĝuste nun la rafinita matureco de Esperanto estas urĝe bezonata de malfeliĉa kaj elreviĝinta mondo peteganta unuecon.

Multaj erare opiniis, ke D-ro Zamenhof postuleme pretendis esti la posedanto de Esperanto kaj ke la lingvo ĝisoste estu neŝanĝebla. Eĉ dum la suĉinfaneco de Esperanto, naskita en 1887, li

²⁰ Vidu J.E. Esslemont. *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko .Aldonaĵo*, p.292 Bahaa Esperanto-Ligo 1978. Usono. "Estas, eble, nur stranga koincido, ke Zamenhof komencis sian laboron pri la internacia lingvo en la sama tempo (1873) en kiu Bahá'u'lláh verkis pri tiu ĉi temo en *La Plej Sankta Libro.(Kitáb-i-Aqdas)*

²¹ Pridisputataj komentoj pri la utiligado farita de D-ro Zamenhof de antaŭaj artefaritaj lingvoj kaj la neceso eviti neologismojn troveblas ĉe Petro Stojan *Deveno kaj Vivo de Esperanto* p. 34-40, 50-67. Flandra Esperanto-Instituto. 1953.

²² M. Boulton *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto* p.118. La Laguna 1962.

grandanime konsideris eksteran ŝanĝon je la Fundamento mem, farita de aŭtoritata komitato post oficiala agnosko kaj plenkreskeco de la Esperanto-infano. Arbitra (t.e. kaprica, senkontrola, despota) ŝanĝo, malmature enkondukita de iu ajn grupo aŭ individuo estis anatemo laŭ li. La bona kuracisto jam sciis la valoron de konsultado. La gamo da gazetoj, revuoj, poezio, prozo k.t.p. tra la mondo atestas pri la aktuala plenkreskiĝo se ne tuta matureco de la lingvo.



Bildo 14. D-ro. L. L. ZAMENHOF 1859 - 1917

Kavaliro de la Franca Honora Legio 1905

La antisemita kaj cenzurema cara registaro premis francajn aŭtoritatulojn nuligi ĝian premion al D-ro Zamenhof. Lia nomo estis forprenita de oficialaj dokumentoj, sed ne antaŭ ol aperis la medalo kiun li surportis malofte.

D-ro Zamenhof skribis en 1888:

"Mi ne volas eldoni aŭtore plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de la kapo ĝis la piedoj Kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas en mia broŝuro, devas perdi ĉian signifon, kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj de la plejmulto."²³

"Ĉio bonigebla estos bonigata per la konsiloj de la mondo. Mi ne volas esti kreinto de lingvo, mi volas nur esti iniciatoro."²⁴

"Kompetenta devas esti de nun, ne la aŭtoro aŭ ia alia persono; la solaj kompetentaj nun devas esti: talento, logiko, kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj la Lingvo Internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj."²⁵

²³ *Aldono al la Dua Libro* Varsovio 1888. Vidu Edmond Privat *Vivo de Zamenhof* p.95.

²⁴ *Aldono al la Dua Libro* Varsovio 1888. Vidu Edmond Privat *Vivo de Zamenhof* p.93.

²⁵ *Aldono al la Dua Libro* Varsovio 1888. Vidu Edmond Privat *Vivo de Zamenhof* p.93.

Eĉ la angla lingvo de Ŝekspiro submetiĝas al ŝanĝoj. D-ro Zamenhof tutklare konsciis, ke neniuj lingvoj restos neŝanĝitaj. Moderna teknologio kiel Interreto povus indiki neceson de pliaj pliboniĝoj, ekzemple pri la skribsistemo de Esperanto. Sciencistoj interesiĝas pri la skribmaniero de internacia lingvo. Ŝajnas necese, ke sciencistoj ĉiukampaj kaj ĉiulandaj devos kunlabori por solvi tiajn problemojn, kiaj varmigo/glaciigo/inundigo de la planedo kaj media polucio. Aŭtoritata komitato kiun D-ro Zamenhof proponis aŭ altgrada komisiono lastatempe rekomendita de la Bahaa Internacia Komunumo en *Turnopunkto por Ĉiuj Nacioj* devus esti nomumita. Ĝi ĵetus lumon sur la bezonon de universala helpa lingvo adoptota ĉe ĉiuj forumoj de UN.

Dum miaj vojaĝoj tra la mondo kvazaŭ Esperanto-vagabondo en Azio, Orienta kaj Okcidenta Eŭropo kaj landoj de la Pacifika Baseno mi iompostiole konkludis, ke nia trezora lingvo jam maturiĝis. Mankas nur ĉiutaga flua uzado en diversaj rondoj. Tamen, ĉar mi estas nek sciencisto nek akademiano, mi ne povas juĝi pri la grado de malfaciloj ene de moderna Esperanto rilate al iuj homoj. Malgraŭ tio mi certas pri la egalrajta kaj demokratia konsisto de kaj nia benita lingvo kaj ties subtenantoj. Ni neniam forbarus iun ajn homgrupon for de la ĝojo de internacia helpa lingvo. Se Esperanto lingve montriĝus esti tro malfacila por Neeŭropanoj, tial bezonante eĉ pli da pliboniĝoj rikoltitaj dum unu jarcento de tutmonda uzado, ni bonvenigus kaj la Neeŭropanojn kaj la ŝanĝojn. Gesamideanoj havas nenian timon pri iaj ajn potencialaj pliboniĝoj al Esperanto, sed ni ne toleras porokazan, malunuecigan aŭ superfluan ŝanĝon sen aŭtoritata, scienca kaj unuiginta pristudo. Ekzemple, mi malofte aŭdis plendojn interne de Ĉinio, Japanio aŭ Korea Respubliko, triangulo de aktivaj Esperanto-landoj, ke la neŭtrala lingvo estas tro malfacila aŭ ne reprezenta de Azianoj.

Kvankam profesiaj studoj jam montris la relativan facilecon de Esperanto, ni ne rajtas nei la eblecon, ke Esperanto ankoraŭ povus esti malfacila por iuj homoj – eble grupeto en ĉiu loĝantaro anstataŭ iu raso. Ĉar miaj travivaĵoj kaj spertoj ne sufiĉas por refuti tiun eblecon ni devus interkonsiliĝi. Bahá'u'lláh verkis, ke ni interkonsiliĝu en ĉiuj aferoj pro tio, ke interkonsultado estas gvidlampo, kiu montras la vojon kaj donas komprenon. Rezulte de kelkaj inteligentaj proponoj de liaj adeptoj modifi Esperanton D-ro Zamenhof mem en 1894^a jaro sugestis ŝanĝojn, kiujn la plimulto tamen ne akceptis.²⁶ Li rekomendis eĉ pli simplan gramatikon kaj pli internacian vortprovizon.²⁷ En 1907 granda modifaĵo de Esperanto, nome Ido, ĝuis nenian daŭran sukceson pro tio, ke la plimulto de esperantistoj opiniis, ke orgojlo anstataŭ aŭtenta reformmemo motivis la ĉefajn inventistojn. Posta propono, Esperanto 2, trafis similan sorton. Nek Ido nek Esperanto 2 inkluzivis konsultadon aŭ demokratian metodon. Ido prenis multenombrajn vortojn el latinidaj lingvoj. Pri siaj propraj laboroj D-ro Zamenhof konsciis kaj diris ke eĉ la plej granda geniulo ne estas libera je eraroj. Antaŭ pli ol

²⁶ Vidu Marjorie Boulton *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto*, (La Laguna p.77, 78) en kiu D-ro Zamenhof elmontris pruvon de sia justa reago en tiu ĉi afero.

²⁷ UNESCO *Scientific and Technical Translating and Other Aspects of the Language Problem* p.190. Atar. 1957. Ĝenevo.

jarcento li diris, "Granda estas la diferenco inter homo-infano kaj homo-viro; granda eble estos la diferenco inter la nuna Esperanto kaj la evoluinta Esperanto de post multaj jarcentoj."²⁸ Nur plenreprezenta konsilantaro aŭ komisiono povas juste solvi la gravan punkton, daŭre plibonigi Esperanton. Por legi pli profundan komprenon pri plibonigoj de Esperanto el baha perspektivo, vidu kvin paragrafojn sub la rubriko -:

" 'Protestoj' kontraŭ Esperanto " sur paĝo 49 de tiu ĉi libro.

Bahaanoj lastatempe ricevis kritikadon pro tio, ke ni sugestis, ke Esperanto povus ankoraŭ bezoni plibonigojn kaj pro tio, ke ni subtenas la koncepton de internacia helplingvo anstataŭ subteni la Esperanto-movadon mem per grandskala lernado de la lingvo. La supraj ekstraktoj el leteroj de D-ro Zamenhof pravas, ke li ne kontraŭis plibonigojn al Esperanto kaj lia suba letero al Pastro Schleyer montras sian subtenon super ĉio de la koncepto de internacia lingvo. Tial oni ĝuste konkludas, ke D-ro Zamenhof kondamnas tian kritikon de bahaanoj. La sintenon de 'Abdu'l-Bahá pri Esperanto kaj esperantistoj ni studos en alia ĉapitro.

kion d-ro zamenhof skribis al prelato johano schleyer!

"Varsovio, 27.XI.1887.

"Estimata kaj estiminda sinjoro!

"Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante la ridegon de la amaso. Mi mem plej bone komprenas kion Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon. Kiam mia laboro jam estis preta, mi kvar jarojn devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado - ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.

"Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük', mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük' ŝajnas al mi ne tute praktika; mi diris al mi, ke lingvo tutmonda devas esti antaŭ ĉio komprenebla kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis internacia, devas resti netuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutmonda, oni povas krei nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj, ĉio cetera devas resti netuŝita. Ĉar nenia persono estas tiel leĝdonanta por krei lingvon por la tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon de vortoj de lingvo, kun ĉiuj de la landoj kaj urboj, kun ĉiuj sennombraj nomoj teknikaj ktp.

"Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de Volapük', mi laboris ne kontraŭ la Volapük' sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutmonda, kaj en kiu ajn formo la homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi, ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo; se la juĝo de la mondo estas ne decida, la 'Lingvo internacia' restos kune kun la Volapük', kiel du amikoj, kiuj havas unu celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos

²⁸ D-ro Zamenhof. *Lingvaj Respondoj* citita de Edmond Privat en *Vivo de Zamenhof* p 96. Esperanto Publishing Co. Ltd. England 1946.

per si mem, aŭ la homaro havos du lingvojn kaj eĉ tio estas por la mondo multe pli bona ol resti tute sen lingvo tutmonda.

"Pardonu ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malĝentilo, sed por doni al Vi provon de mia lingvo.

"Kun la plej granda estimo. – Esperanto."

Je la fino de Januaro 1998, dum mi instruis Esperanton en la aŭstralia Somerlernejo, la oficiala vidpunkto de Bahaa Esperanto–Ligo rilate al ĝia subteno de la principo de universala helplingvo estis ricevita kaj disvastigita. BEL senpere raportas al la Universala Domo de Justeco. Parto de ĝia konstitucio, kiun la Universala Domo de Justeco iniciatis, transdonas al unuopaj kredantoj la respondecon varbi studentojn de Esperanto el inter la bahaanaro. La ĉefaj klopodoj de BEL kompreneble direktas sin al instruado de la Kredo en la internacia Esperanto–komunumo. Poste ni ekzamenos ĉi tiun gravan diferencon de roloj inter institucioj kaj anoj de la Kredo pri la studo de Esperanto. Parto de mia raporto al la Nacia Spirita Asembleo de Aŭstralio datita 26an Januaro '98 provizas aldonan fonan scion. "Lastatempe UEA ekigis sian "Kampanjon 2000" kies celo i.a. estas atingi, ke Esperanto estu uzata ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj similaj mondforumoj. Por efektivigi tion UEA oficiale plibonigis siajn konsultajn rilatojn kun la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO) kaj ĝi samtempe serĉas helpon de similaj Neregistaraj Organizaĵoj. Estante longtempa subtenanto de UEA, Bahaa Esperanto–Ligo ricevis proponon kunligi sin kun tiu ĉi nobla afero. BEL provizas tiel subtenon kiel eblas al UEA pro ties laŭdindaj penoj establi mondpacon pere de Esperanto kiel neŭtrala lingvo por ĉiuj. En ĝia sufiĉe ĵusa dankletero de kunlaboro BEL skribis jenan diferencigilon de kunlaboro ne nur kun la Esperanto–movado sed ankaŭ kun ĉiuj subtenantoj de la principo de universala helpa lingvo. Post formiĝo de tiu pli ampleksa anaro, kiu laŭ mi povus inkluzivi esperantistojn kaj protagonistojn por aliaj artefaritaj lingvoj kaj por organizaĵoj kiuj propagandas kaj utiligas Esperanton, sed kiuj konsideras sin ĉefe esti edukaj aŭ filantropaj grupoj antaŭ ol priskribi sin esperantistoj, BEL kredas ke grandega konsilantaro decidus la elekton de universala helpa lingvo instruota en ĉiuj lernejoj de la mondo. Mi opinias, ke nur tiam, kiam ĉi tia unueco manifestiĝos, ni bahaanoj grandskale eklernos Esperanton, la saman lingvon kiun 'Abdu'l-Bahá entuziasmege rekomendis al la bahaanaro, kvankam en plibonigota formo."

Por kompletigi la komprenon de kial bahaanoj ĝis nun inklinas subteni la koncepton de universala helpa lingvo anstataŭ iun specifan lingvon, jen estas 1985^a letero de la Universala Domo de Justeco.

"La Universala Domo de Justeco sentas ke, se ĝi elektus iun lingvon por la bahaanoj uzota kiel internacia helpa lingvo, tio kaŭzus pli da malfaciloj ol per tio estus solvataj nuntempe. La amikoj (t. e. bahaanoj), tamen, rememorante, ke tio estas unu el la tre gravaj principoj de la Kredo, farus bone, se ili subtenus la ideon ĉiam kiam eblas kaj preĝus, ke la tempo ne plu foras, kiam la registaroj de la nacioj adoptos unu solan

lingvon por esti instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel helpa al la gepatra lingvo de la lernantoj."²⁹

Multaj spertaj esperantistoj kompreneble ĉagreniĝas pro ŝajne eternaj proponoj, ĝenerale flanke de novbakitaj Verdstelanoj, "ripari" nian valoran lingvon. Kun respekto mi diras al ili jene. Kvankam ĉi tiu procezo povas esti ĝena, la rekompencoj de humila serĉado de la vero kaj toleremo pri la enketoj de novaj parolantoj reciproke mirigus. Agnoski la veron klare estas trajto de esperantistoj, kiel konfirmas multaj raportoj en la Esperanto-mondgazetaro pri la manko de akceptiĝo de nia lingvo; speciale fronte al la laŭmoda populareco de la angla inter gejunuloj. Ajna atento, eĉ se unue kritikema, informos kaj finfine inspiros generacion de gejunuloj kaj anojn de la amaskomunikiloj, kiuj grandparte ne scias aŭ malinteresiĝas pri nia lingvo, des pli pri nia movado.

Per memstara enketo de la vero kaj matura kontraŭstaro de malsimilaj opinioj laŭ la principo ke, se du amikoj akre disputas, ambaŭ el ili malpravas, ni frontu la tabuan demandon de "la interna ideo de Esperanto."

la interna ideo

La starpunkto de D-ro L. L. Zamenhof elstaras.

"Sinjorinoj kaj sinjoroj! Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian paroladon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tiam parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo.

"Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel privata homo ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multemiliona lando, tamen kiel esperantistojn tiu ĉi batalado ne povas vin tuŝi, kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun farata io, kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan batalon inter la gentoj. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando – tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado intergenta. Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusio. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!

"Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bjelostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj songoj mi ekvidis

²⁹ Bahaa Esperanto-Ligo *Bahaismo kaj Esperanto* p 50. Frankfurto 1997.

teruran efektivajon; en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bjelostoka buĉado; al vi kiel al esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

"Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bjelostok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj, arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute tiaj samaj homoj, kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.

"Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

"Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la Esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize."

D-ro Zamenhof klarigis la rajton de ĉiu esperantisto private uzi la lingvon nur por pratikaj celoj, se oni deziras.

"Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por sia utilo, tio ĉi kompreneble al neniuj donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: 'Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!' Ho, kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al

tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto!

"Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!"

"Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj....."³⁰ Bahá'u'lláh majeste esprimis la saman sentimenton:

"Ho Filo de la Spirito!

"Super ĉio plej amata de Mi estas Justeco; Ne deturnu vin for de ĝi, se vi Min deziras kaj ne malatentu ĝin por ke Mi konfidu je vi. Per ĝi vi ricevos la forton por vidi per la propraj okuloj kaj ne per okuloj de aliaj, por kompreni per la propra kompreno kaj ne per kompreno de via najbaro. Pripensu tion en via koro, kiel decas al vi esti. Vere, Justeco estas Mia donaco al vi kaj la signo de Mia korfavoro. Tenu ĝin antaŭ viaj okuloj."³¹

la ligiloj

Kaj la Bahaa Kredo kaj Esperanto naskiĝis samperiode. Ĝis antaŭ nelonge la kresko de la du estis simila. Ambaŭ organizaĵoj havas kelkmilionojn da adeptoj dise en la mondo en sama dissemiĝo sed sendepende organizitaj unu de la alia. Laŭ la 1988a eldono de *Encyclopaedia Britannica - Book of the Year* la Bahaa Kredo troviĝas en pli da landoj ol ĉiu alia religio krom Kristanismo.³² La koincidoj inter Bahaismo kaj Esperantismo notindas. D-ro Zamenhof estis senkonfesia kaj liberpensa Judo kiu energie okupiĝis pri inventado kaj dissendo de Homaranismo, sia teista filozofio; ĝi iĝis apogilo de la

³⁰ D-ro L.L. Zamenhof. Kongresa Parolado. Ĝenevo 28 Aŭgusto 1906. L.L. Zamenhof *Originala Verkaro* Ferdinand Hirt & Son en Leipzig - 1929. Kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle.

³¹ Bahá'u'lláh *Kaŝitaj Vortoj*; el la araba, n-ro 2.

³² *Britannica Book of the Year - 1988*. p 303 registras la Bahaan Kredon kun membroj en 205 landoj kompare kun 254 por Kristanismo kaj 172 por Islamo. Post la publikigo de tiu statistiko multaj aldonaj bahaaj komunumoj jam establiĝis en la eksa Sovet-Unio, Orienta Eŭropo, Afriko ktp.

humanisma movado. En rimarkinda letero li jene priskribis Homaranismon, "Ĝi estas ja la celo de mia tuta vivo. Por ĝi mi fordonus ĉion ofere"³³

La ĉefaj principoj de lia humana, eklektika, kvazaŭa religio, unue konata kiel Hilelismo, rimarkinde spegulas la Bahaan Kredon:

Dio estas la kreinto de ĉio kies esenco ĉiu individuo kapablas klarigi al si mem kiel diktas liaj saĝo kaj koro, se religion aŭ metafizikon oni pripensas sincere anstataŭ kiel nuran heredaĵon.

Unu homaro pace vivonta kiel unu granda homa familio. La unua internacia lingvo-himno verkita honore al la deknaŭa naskiĝtago de D-ro Zamenhof estis, "Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam temp' estas! La tuta homaro en familion kununuigi sin devas."³⁴


Spirita samesenco de la pasintaj Grandaj Instruantoj kun diferencoj nur pri tempo kaj loko, legendo kaj kutimo.

Nacia, rasa, socia kaj seksa egalecoj devas esti establitaj.

Konkordo inter racio kaj religio instruota en Homaranismo-temploj, kie ĉiuj religianoj estus bonvenaj.

Universala helpa lingvo; Esperanto.

D-ro Zamenhof difinis Homaranismon kiel nuran ponton kiu povus pace unuigi ĉiujn ekzistantajn religiojn kaj poste kunfandi ilin. Rabeno Hillel, klariganto de la Sanktaj Skriboj dum la unua jarcento antaŭ Kristo, tre influis Homaranismon. D-ro Zamenhof asertis, ke la unueco de la homaro estos atingebla nur per monda religio kaj mondlingvo. Ja estas malfacile imagi, kiel unu povus floradi sen la alia. "La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion."³⁵ Tiun vidpunkton simile esprimis multfoje lia reciproka admiranto, 'Abdu'l-Bahá. Mi uzas tiom fortan epiteton, ĉar D-ro Zamenhof skribis: "La personon de 'Abdu'l-Bahá kaj lian laboradon mi tre alte estimas: mi vidas en li unu el la plej grandaj bonfarantoj de la homaro."³⁶



Bildo 15 – D-ro Ludoviko Zamenhof laboras.
Eble la plej evidenta ligilo inter 'Abdu'l-Bahá kaj Doktoro Zamenhof estis ilia servema sinteno.

³³ Edmond Privat - *Vivo de Zamenhof* p.125.

³⁴ D-ro L.L. Zamenhof *Lingwe Uniwersala* kiu estis la unua internacilingva provo de D-ro Zamenhof, 1878; El lia letero al N. Borovko, Odessa. M. Boulton *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto* p.30.

³⁵ Edmond Privat. *Vivo de Zamenhof* p 109. (Vortoj de D-ro Zamenhof.)

³⁶ *Star of the West* vol.11, n-ro 18, 7 Feb 1921, p299, ekstera vol 6. G. Ronald 1984 Oxford.



Bildo 16 – Grafo L. Tolstoj 1828 - 1910.

Grafo L. Tolstoj kaj lia sekretario s-ro Valentin Bulgakov en 1910.
Tolstoj - Honora prezidanto de la unua Esperanto -Vegetarana Asocio en 1908.

pliaj koincidoj

La maniero fari demandojn kaj ricevi respondojn en Esperanto facile lerneblas. Tiu mirinde simpla formulo konsistas el 45 vortoj, du kolumnoj po 9 x 5 vortoj. L. Tolstoj, subtenanto de kaj 'Abdu'l-Bahá kaj D-ro Zamenhof, elkomprenis la 16 regulojn ene de kelkaj horoj; tamen pro lia pezega verka laborado, kiel 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi, li memkompreneble liveris nur moralan subtenon al la Esperanto-movado. L. Tolstoj vidis en la Skriboj de Bahá'u'lláh, "la ŝlosilon al la sekreto de la universo" kaj malkovris en ili, "la plej belan kaj puran formon de religia instruo."³⁷ Antaŭe tiu dise konata rusa verkisto komentis: "La lernado de Esperanto kaj ĝia disvastiĝo estas do sendube kristana afero, kiu helpas al kreo de Regno de Dio, kio estas la ĉefa kaj sola celo de la homa vivo."³⁸

Embarasis kaj 'Abdu'l-Bahá kaj D-ro Zamenhof, modestajn homojn, ke oni nomis ilin resp. la Mastro kaj la Majstro. Kaj la Bahaa Kredo kaj Esperanto estis malpermesitaj en nazia Germanio. En tiu faŝisma periodo bahaanoj inkluzive de Shoghi Effendi parolis de "movadoj" por priskribi kaj la Bahaan Kredon kaj Esperantismon. D-ro Zamenhof abunde verkis pri "La Verda Standardo" sen aludo al Báb, Kiu, estinte "Siyyid" (Posteulo de la Profeto Mahometo; pr.: sejjed) rajtis surhavi la verdan turbanon.

³⁷ Bahaa Esperanto-Ligo. *Perloj de l'Saĝo*. p 5. Frankfurto. 1994. (Vortoj de L. Tolstoj.)

³⁸ Edmond Privat. *La Vivo de Zamenhof* p.56.




Bildo 17 – **Lidia Zamenhof**...29 Jan 1904 - 5 Sep 1942

Inter la plej kortuŝaj ligoj de la Bahaa Kredo kaj la Esperanto-movado kompreneble estis Lidia Zamenhof, la plej juna infano de Klara kaj Ludoviko Zamenhof. Ŝi fariĝis elstara bahaanino, interkontinenta instruistino laŭ la metodo de Pastro Cseh kaj konfidenculino de la plej eminenta bahaa vojaĝanta instruanto, ĉu ina ĉu vira, Martha Root, kiu estis oratorino en Esperanto. Ambaŭ virinoj regule korespondis kun Shoghi Effendi. Ĝis la fino de la vivo en la Varsovia Geto kaj Treblinka koncentrejo Lidia fidele restis bahaa esperantistino. Ŝia historio jam estas inspire kaj multlingve registrita en la libro de Wendy Heller *Lidia*. Laŭ onidiroj Esperanto-eldonon Bahaa Esperanto-Ligo intencas aperigi.

Aparta mencio devus esti farita ĉi tie pri Martha Root kaj la eksterordinara rolo, kiun la Bahaa Kredo ĝuis ĉe Universalaj Kongresoj dum la 1920^{aj} kaj 1930^{aj} jaroj.

"La portretoj de 'Abdu'l-Bahá kaj D-ro Zamenhof pendis en la Esperanto-salonego..... Dum tiu ĉi Kongreso (1925 en Ĝenevo, la Urbo de la Nacioj) Martha Root renkontis Lidia Zamenhof. Tiam naskiĝis granda amikeco inter ili. Depost 1925, kiam la unua bahaa partopreno en Universalaj Kongresoj okazis, Martha aranĝis sian tutan vojaĝplanon kun la Kongresoj je la fokuso; je la fino de unu Kongreso ŝi ekplanis por la venonta."³⁹

³⁹ M.R. Garis. *Martha Root Lioness at the Threshold* pp 231, 304. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1983.



Bildo 18 – **Mano de la Afero de Dio, Martha Louise Root.**
10 Aŭgusto 1872 - 28 Septembro 1939.

Ŝiaj bahaaj instruklopodoj kaj raportoj estis plenplenaj de aludoj al la Internacia Lingvo, kiun ŝi regis kaj utiligis bonege. Martha aranĝis sian tutan vojaĝplanon kun la UKoj kiel fokuso en multaj jaroj inter la du mondmilitoj.

"Fiero de bahaaj instruantoj ĉu en la Oriento ĉu en la Okcidento, ĉu vira ĉu ina," estas la priskribo de Shoghi Effendi sur paĝo 386 de lia klasika verko *God Passes By* (Dio Preterpasas). Parafrazante paĝon 388 ni vidas, ke per kvar vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo dum dudek jaroj ŝi instruis la principojn de la Bahaa Kredo al gereĝoj, geprincoj, respublikestroj, ministroj kaj ŝtatistoj, publicistoj, profesoroj, ekleziuloj kaj poetoj kaj multnombraj personoj de diversaj profesioj. Martha oficiale kaj neformale kontaktis religiajn kongresojn, pacsocietojn, esperantistojn, socialistajn kongresojn, teozofiajn societojn, virinajn klubojn kaj similajn organizojn. Ŝiaj ok sinsekvaj aŭdiencoj kun reĝino Maria de Rumanio instigis tiun membron de reĝeco esti bahaanino - la unua reganta monarĥo kiu faris tion.

" 'Universala paco tiel atingeblas kiel milito universala. Ni devas instrui universalan pacon en ĉiuj publikaj lernejoj' estas la vortoj de Martha raportitaj en *Adelaide Saturday Journal* de 8 Novembro 1924. Ŝi rekomendis establi tutmondan komitaton de la plej bonaj lingvistoj, ĉar laŭ ŝi universala paco neniam eblos sen ia universala lingvo."

(Vidu M. R. Garis. *Martha Root Lioness at the Threshold* p.190 Bahá'í Publishing Trust 1983 Wilmette.)

"La du bahaaj kunsidoj okazis ĉe la Internacia Esperanto-Oficejo, 19 Bulvardo Georges Favon. Ambaŭ sesioj estis plenplenaj. Estis partoprenantoj el 25 landoj. La jenaj raportoj havas historian valoron pro la unua publika kunfandiĝo de la Bahaa Kredo kaj Esperantismo demonstrita en la sekvanta citaĵo, skribita de M. Root en la tria persono. 'Fraŭlino M. Root parolis pri la temo - **KIO ESTAS LA BAHAA MOVADO?** - skizante ties principojn, historion kaj disvastiĝon dum la pasintaj 80 jaroj..... Tuj poste fraŭlino Root respondis demandojn dum malferma forumo. Profesoro Petro Stojan de Petrograd, membro de la Internacia Esperanto-Komitato, komencis la diskutadon parolante pri la principo de harmonio inter la scienco kaj la religio. Iu delegitino rakontis pri sia intervjuo kun 'Abdu'l-Bahá en Parizo. Ofte du aŭ tri homoj samtempe ekstaris, penante fari demandojn... Eble neniam antaŭe okazis tia bahaaj ŝanco trafi je la sama momento la pensulojn el tiom da landoj kiel dum tiuj du sesioj - ĉar la **KOMUNA LINGVO** klarigis ĉiun penson al la reprezentantoj de ĉiu lando'."⁴⁰

Multaj elstaraj bahaaj geinstruantoj kaj "Manoj de la Afero de Dio"⁴¹ inkluzive parolantojn de la angla kaj la persa estis fluaj esperantistoj. La komentoj de Martha Root antaŭ 75 jaroj en Edinburgo amuze montris ŝian fidon je Esperanto. "La 18a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Edinburgo, Skotlando, 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926. Eble oni plej bone komencas priskribi tiun Kongreson per la vortoj de George Stephenson, kiu loĝis en Britio sufiĉe proksime al Edinburgo. Dum li cerbumis sian lokomotivon lia kara sed dubema patrino eĥe diradis, 'Ho George, ĝi neniam funkcios!' Kiam la maŝino estis preta kaj glate veturis, nia inventisto akompanis sian patrinon dum vojaĝo kaj tiam ŝi subite ekkriis. 'Ho George, ĝi neniam haltos!' " Martha daŭrigis. "En unu frazo, jen la sama situacio de Esperanto."⁴² Tiamaj 'spertuloj' rezonis je la propra kontentigo, ke eĉ se oni konstruus vaporlokomotivon, ĝi neniam ekirus pro manko de sufiĉe da froto inter ŝtalaj radoj kaj glataj ŝtalaj reloj. Cetere, la rapideco de la plej fortaj ĉevaloj sufiĉos por ni ĉiuj.

La fama svisa sciencisto kaj bahaaj esperantisto, D-ro Aŭguste Forel, kies vizaĝo honoras la milfrankan svisan monbileton, estis mondfama korespondanto de 'Abdu'l-Bahá. En 1926 li sendis telegramon al la 18a Universala Kongreso en Edinburgo, kie dek tri jarojn antaŭe 'Abdu'l-Bahá donis sian memorindan prelegon en la samaj kongresaj haloj de la Edinburga preĝejo, United Free Church. Lia telegramo koncize tekstis: "Vivu la universala religio de Bahá'u'lláh. Vivu Esperanto la universala helpa lingvo."⁴³

Bahaanoj komprenas paralelon inter la religia Interligo, kiun ili propravole entreprenas kiam ili bahaaniĝas kiel novalvenantoj aŭ plenkreskiĝas je la dekkvina jaro de la vivo


⁴⁰ M.R. Garis. *Martha Root Lioness at the Threshold* p 231, 232. Bahá'í Pub'g Trust Wilmette 1983. (M. Root. Raporto sen titolo de Universala Kongreso 27-8-1925 Ĝenevo. Nacia Bahaa Arĥivo Honolulu)

⁴¹ Honora bahaaj titoloj precipe de pasinta tempo.

⁴² *The Bahá'í World* p 265 vol 2. 1926-1928 Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980.

⁴³ *The Bahá'í World* p 268. vol 2. 1926-1928 Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980.

en bahaa familio, kaj la Fundamento de Esperanto kaj ĝia Interna Ideo. La celo de la Fundamento kompreneble estas protekti kaj propagandi Esperanton.



Bildo 19 - D-ro Aŭguste Forel. 1848 - 1931. - Bahaa esperantisto.

**Profesoro de psikiatrio, Zuriĥo. Direktisto de la Zuriĥa frenezulejo. Entomologo.
Kampanjisto kontraŭ la trouzo de alkoholo; famkonate verkis pri formikoj,
homa cerbo kaj hipnoto.**



Bildo 20

**La Framasona Salonego, Edinburgo, kie ‘Abdu’l-Bahá parolis je 7 Januaro
1913 sub aŭspicio de la Esperanto-societo.**

Estinte okulisto por malriĉuloj, familia viro, aŭtoro, poeto kaj lingvisto, la filantropo en D-ro Zamenhof ne bezonas komenton por klarigi liajn opiniojn pri la Bahaa Kredo. La leganto por si mem povas konkludi de kie ambaŭ Movadoj gajnis la inspiron de la interna ideo. En Aŭgusto 1913 dum la naŭa Universala Kongreso en Berno, Svislando, D-ro Zamenhof estis intervjuita de *The Christian Commonwealth*, kiu estis progresema revuo religia. Per la sagaco de retrorigardo ŝajnas, ke li tie prezentis specialan donacon al sia filino Lidia kiam ŝi havis naŭ kaj duonon jarojn.

Demando: "Ĉu vi opinias, ke la ordono lerni Esperanton lastatempe donita de 'Abdu'l-Bahá al siaj adeptoj efikos por disvastigi la lingvon en la Oriento?"

Respondo: "Mi multe interesiĝas pri la bahaa movado, ĉar ĝi estas unu el la grandaj mond-movadoj kiu, simile al la nia insistas pri la homara frateco kaj alvokas ĉiujn kompreni unu la alian kaj lerni ami sin reciproke. La bahaanoj komprenos la Internan Ideon de Esperanto pli bone ol multaj aliaj. Tiu ideo estas 'surbaze de neŭtrala lingvo rompi la murojn inter homoj kaj kutimigi ilin vidi en sia najbaro homon kaj fraton.' Tial mi opinias, ke kiam la bahaanoj lernos Esperanton ĝia Interna Ideo estos granda morala forto, kiu devigos ilin dissemi ĝin sendepende de iliaj apartaj kredoj. Mi ĉiam spertis, ke la plej fervoraj laborantoj por Esperanto estas la konvinkitoj pri la Interna Ideo, ne la homoj kiuj konsideras ĝin nura ilo de materia profito, kvankam kompreneble ĝia komerca valoro ne estas dubebla. Multaj homoj dubis, ĉu Esperanto estos akceptita de Orientaj popoloj; mi neniam opiniis tiel. Mi estas certa, ke bahaanoj portos la lingvon en multajn lokojn kien ordinaraĵoj eŭropaj propagandistoj neniam irus."

Kelkajn monatojn antaŭ tiu laŭdo de la bahaanaro farita de D-ro Zamenhof la sama revuo, *The Christian Commonwealth*, 15 Januaro 1913 publikigis raporton pri la vizito de 'Abdu'l-Bahá kun la rubriko, '**ABDU'L-BAHÁ EN EDINBURGO**, kaj kun la subtitolo, **ORDONAS AL BAHAAŬOJ LERNI ESPERANTON**. Jen precize ĝi tekstis.

"La unua publika apero de 'Abdu'l-Bahá okazis marde vespere 7 Januaro en la Framasona halego, unu el la plej grandaj kaj belaj salonoj en la urbo, kie li parolis nur pri la benoj de internacia helpa lingvo. La kunsido estis aranĝita de la Edinburga Esperanto-Societo. Inter tiuj kiuj ĝis la podio akompanis Pastron Doktoron Kelman, la prezidanton, estis Profesoro Patrick Geddes, la eminenta sciencisto, kaj D-ro Sarolea, eldonisto de *Everyman* kaj iniciatinto de la loka Esperanto-Societo antaŭ dek jaroj. La esperantistoj estis ege kontentaj pro la tuja aprobo de ilia lingvo farita de 'Abdu'l-Bahá kaj pro lia grava deklaro: 'Ni danku la Sinjoron ke la lingvo Esperanto estas kreita. Tial ni ordonis la bahaanaron de la Oriento tre atente studi ĉi tiun lingvon kaj post nelonge ĝi disvastiĝos tra la tuta Oriento!' La seriozeco de la ordono de 'Abdu'l-Bahá evidentiĝas pro lia mendo de Esperanto-libroj sendotaj al Hajfo, por ke liaj lernantoj studu ilin tie. Kvarcent belaj programekzempleroj de la renkontiĝo estas senditaj al Persio por disdonado inter tieaj bahaanoj. La broŝuro enhavas portreton de 'Abdu'l-Bahá, la fotokliŝaĵon *The Christian Commonwealth* pruntedonis. Ĝi entenas la E°-

poemon *Preĝo sub la Verda Standardo* de D-ro Zamenhof, *Gather Us In* de D-ro George Matheson kaj citaĵojn el la *Biblio*, Bahá'u'lláh kaj Burns."

Spite al la frosta vetero, sia granda aĝo, la manko de ripozo kaj la longa vojaĝo en antaŭdiluvaj transportiloj, 'Abdu'l-Bahá per siaj agoj montris la gravecon de la vizito kaj prelego en Edinburgo. Bahaa verkisto, Anjam Khursheed, registris ke 'Abdu'l-Bahá finis la unuan tagon en Skotlando per elstara parolado bazita pri la solvo de la mondlingva fiasko. Malgraŭ la malvarmo kaj la tempoperdo pro interpretado la halego estis tiom plena, ke 300 personoj devis aŭskulti ekstere. La Esperanto-eldono de lia prelego aperis kune kun la angla en la bahaa revuo *Star of the West*, Feb 1921.

Prelego de 'Abdu'l-Bahá en Edinburgo 7 Januaro 1913 sub aŭspicio de la Edinburga Esperanto-Societo.

"Ĉiu movado en la mondo de la homaro kiu portas kun si unuecon kaj konkordon, estas bona; kaj ĉiu afero, kiu kreas malkontenton kaj malharmonion, estas malbona. Ĉi tiu jarcento estas hela jarcento. Ĝiaj eltrovaĵoj estas multaj; ĝiaj elpensitaĵoj estas grandaj; ĝiaj entreprenoj estas multmultaj. Pro tio ĉi tiu jarcento superas ĉiujn aliajn jarcentojn. Sed la plej granda entrepreno estas la unuigo de lingvo; ĉar tio estas pli bonefika, kaj plezurdona, ol iu alia entrepreno de la epoko. La unuigo de lingvo efektivigas grandan kunecon inter koroj. La unuigo de lingvo estas kaŭzo de konkordo. Ĝi forbalaas ĉian malkomprenon inter la popoloj: ĝi starigas konkordon en la homidaro. Ĝi donas pli vastan konceptpovon kaj pli grandan vidpovon al la homa intelekto. Hodiaŭ la plej grava laboro en la mondo de la homaro estas, kompreni kaj kompreniĝi. Ĉiu individua membro de la komunumo, pro la disvastiĝo de helpa internacia lingvo, povos sciigi pri okazantaĵoj kaj rilatiĝi kun etikaj kaj sciencaj eltrovaĵoj de la epoko. Helpa universala lingvo donos al ni la ŝlosilon—la ĉefŝlosilon—por la kompreniĝo de la sekretoj de pasintaj tempoj. Per internacia lingvo ĉiu nacio en la estonteco povos elserĉi tre facile kaj senpene siajn sciencajn eltrovaĵojn.

"Estas bone sciite inter vi, ke Orientanoj, junuloj venantaj al la Okcidento, penegantaj studadi la eltrovitaĵojn de la Okcidento, devas dediĉi jarojn el sia vivo, por laborege akiri la lingvon de la lando al kiu ili iras, kaj nur poste ili povas sin turni al la studado de la speciala scienca fako, pri kiu ili interesiĝas. Ekzemple, ni supozu, ke junulo el Hindio aŭ Persio aŭ Turkeŝtano aŭ Arabio, deziranta studadi la medicinon, venas al ĉi tiu lando. Li devas lernadi dum kvar jaroj la anglan lingvon, kaj nenion alian; kaj poste li povas komenci la studadon pri medicino. Sed, se ĉi tiu internacia helpa lingvo estus parto de la programo de instruado en ĉiuj lernejoj, dum sia infaneco li lernus tiun lingvon en la propra lando; kaj poste en kiu ajn lando, al kiu li dezirus iri, li povus studadi sian specialan fakon de scienco tre facile, ne perdinte jarojn de sia vivo.

"Hodiaŭ, eĉ se ĉiuj el ni lernis lingvojn, tamen, se iu deziras vojaĝi alilanden, tiu povus esti grave malhelpata pro tio, ke li ne scias la specialan lingvon de unu lando. Mi tre profunde studadis orientajn lingvojn, kaj scias la araban lingvon pli bone ol la Araboj mem, kaj studadis la turkan, kaj la persan en mia propra nasklando; kaj tamen, sciante

ankaŭ aliajn lingvojn de la Oriento, kiam mi vojaĝis okcidenten, mi devis venigi kun mi tradukiston, kvazaŭ mi sciis neniun lingvon. Nu, se ekzistus internacia lingvo ĝenerale parolata, la persa lingvo kaj la internacia sufiĉus por mi en ĉiuj landoj de la mondo. Pensu, kiel la internacia lingvo faciligos interkomunikadon inter ĉiuj nacioj de la mondo! Duono de niaj vivoj eluziĝas en la akiro de lingvoj, ĉar en ĉi tiu epoko de klereco ĉiu homo devas lerni lingvojn, por ke, se li esperas vojaĝi en Azio kaj Afriko kaj Eŭropo, li povu interparoli kun la popolo; sed tuj, kiam li akiris unu lingvon, jen alia estas bezonata. La tuta vivo do forpasas en la akirado de tiuj lingvoj, kiuj estas malhelpo al internacia komunikado. Ĉi tiu internacia lingvo liberigos la homaron el ĉiuj ĉi tiuj problemoj. Mallonge, por kompreni kaj sin komprenigi, devas esti internacia ilo. La instruisto kaj la studento devas scii la lingvon unu de la alia, por ke la instruisto povu transdoni sian scion kaj la studento povu akiri tiun scion. En la mondo de la homaro estas nenio pli granda afero, ol vin komprenigi al viaj kunhomoj; ĉar la civilizacio mem, la progresado de la civilizacio, dependas de tiu ĉi procedo. Por akiri artojn kaj sciencojn, oni devas scii paroli, sin komprenigi, kaj kompreni samtempe.

"De ĉi tiu interkompreno dependas la akiro de sciencoj, kaj ĝi igos ĉiujn homojn kompreni pri ĉiuj aferoj de la vivo; kaj ĉi tiu procedo de kompreno kaj komprenigo dependas de la lingvo. Se do ĉi tiu helpa lingvo stariĝos, ĉiuj membroj de la homaro ricevos la eblon kompreni unu la alian.

"Dum mi parolas, venas en mian menson epizodo, kiu okazis en Bagdad. Estis tie du amikoj, kiuj ne sciis la lingvon unu de la alia. Unu malsaniĝis; la alia vizitis lin, sed ne povis parole esprimi sian simpatian, kaj do faris geston, volante diri: "Kiel vi fartas?" Per alia signo la malsanulo respondis: "Mi estas tuj mortonta"; kaj la vizitanto, kredante, ke li diris, ke li ekresaniĝas, diris: "Dank' al Dio!" El tiaj ilustraĵoj vi konstatos, ke la plej bona afero en la mondo estas, povi vin komprenigi al viaj amikoj, kaj ankaŭ ilin kompreni; kaj ke ne estas io pli malbona en la mondo, ol ne povi komuniki viajn pensojn al aliaj. Sed, se estus helpa lingvo, ĉiuj tiuj malfacilaĵoj estus forigitaj.

"Nu, Laŭdo estu al Dio! ĉi tiu lingvo Esperanto elpensiĝis. Tio estas unu el la specialaj donacoj de ĉi tiu brilega jarcento: unu el la plej grandaj entreprenoj de ĉi tiu granda epoko. Antaŭe la homaro malsukcesis efektiviĝi tian elpensadon. Ĉi tiu unuigo de lingvoj preskaŭ neniam prezentis sin al la pensuloj de pasintaj epokoj; kaj vere ĝi estis neeblaĵo en tiuj tempoj, ĉar tiam ne ekzistis libereco iri kaj reiri, kaj nenio intervojaĝado nek intertraktado inter la diversaj landoj. Jam nun, kiam la rimedoj por interkomunikado kaj transportado multe pligrandiĝis, estas nepre necese, kaj estas fareble, efektiviĝi la uzadon de internacia lingvo.

"Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh antaŭ multaj jaroj verkis libron, nomatan *La Plej Sankta Libro*, kaj en tiu libro unu el la fundamentaj principoj estas, ke devas esti elpensiĝo de helpa lingvo; kaj Li klarigas la bonon kaj profiton, kiuj venos per tia ilo. Nu, ni danku la Sinjoron pro tio, ke ĉi tiu lingvo Esperanto estas kreita. Ni do ordonis al ĉiuj bahaanoj en la Oriento studadi ĉi tiun lingvon tre zorge, kaj post nelonge ĝi disvastiĝos

tra la tuta Oriento. Mi petas ankaŭ al vi, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, energie klopodadi por la disvastigado kaj propagandado de ĉi tiu lingvo: ĉar ĝi akcelos la alvenon de tiu tago, tiu miljara tago, kiun antaŭdiris profetoj kaj viduloj, tiu tago en kiu, estas dirite, la lupo kaj la ŝafido trinkos el la sama fonto, la leono kaj la cervo sin paŝtos sur la sama herbejo. La signifo de ĉi tiu sankta Skribo estas, ke la batalantaj rasoj, militantaj nacioj, malamikaj religioj, alproksimiĝos unu al la alia en la spirito de amo, kaj kunligiĝos unu kun alia.

"Kiel ni jam diris, plej grava afero en ĉi tiu mondo estas la efektiviĝo de helpa internacia lingvo. La unuiĝo de lingvo aliformigos la homaron en unu mondon; forigos la malkomprenon inter la religioj; kaj kunigos la Orienton kaj la Okcidenton per la spirito de frateco kaj amo. La unuiĝo de lingvo ŝanĝos ĉi tiun mondon el multaj familioj en unu familion. Tiu ĉi helpa internacia lingvo kolektos la naciojn sub unu kovrilon, kvazaŭ la kvin kontinentoj de la mondo fariĝus unu kontinento; ĉar tiam ili povos interkomuniki siajn pensojn unu al la alia. La internacia helpa lingvo forigos nescion kaj superstiĉon, pro tio, ke ĉiu infano, el kiu ajn raso aŭ nacio, povos sekvi siajn studaĵojn pri la scienco kaj la arto, ĉar tiam li bezonos lerni nur du lingvojn—unu, lia nacia lingvo, kaj la alia la internacia helpa lingvo. Ni esperu ankaŭ al tiu tago kiam eĉ la limoj de la naciaj lingvoj foriĝos, kaj la tuta mondo ĝuos unu lingvon. Kia pli granda donaco povus esti, ol tio? Kia pli malavara bonfaro povus esti, ol tio? Tiam la mondo de la homaro fariĝos rava paradizo, ĝuste kiel estas dirite, ke en la ĉielo estas nur unu lingvo. La materia mondo fariĝos la esprimado de la interna mondo. Tiam eltrovaĵoj malkaŝiĝos; elpensaĵoj multobliĝos: la sciencoj antaŭeniros per salto; la scienca terkulturado disvolviĝos laŭ pli vasta grado; ĉar tiutempe la nacioj povos rapide asimili la pensojn esprimatajn, kaj ĉar ĉiuj tiuj pensoj esprimiĝos per la universala lingvo. Se ĉi tiu internacia lingvo estas faktoro por la estonteco, ĉiuj landoj en la Oriento povos rapide akiri la sciencojn de la Okcidento, ĉar iliaj loĝantoj povos legi la librojn kaj kompreni ilian signifon; kaj la Okcidentaj nacioj povos akiri la pensojn kaj ideojn de la Oriento; kaj per tio ambaŭ povos plibonigi sian staton. Mallonge, pro la starigo de ĉi tiu internacia lingvo, la mondo de la homaro fariĝos alia mondo kaj eksterordinara estos ĝia progreso. Ekzemple, pripensu pri familio, kies diversaj membroj parolas diversajn lingvojn; kiel malfacile estas por ili komuniki siajn pensojn unu al alia, kaj kiel mirinde estas, kiam ili povas facile kompreni reciproke siajn pensojn. Ĉar, se ili scias ĉi tiu lingvojn de la aliaj, ili progresos rapide. Do estas nia espero, ke la lingvo Esperanto disvastiĝos post nelonge tra la tuta mondo, por ke ĉiuj popoloj povu vivi kune en la spirito de amikeco kaj amo."⁴⁴

⁴⁴ Anjam Khursheed. *The Seven Candles of Unity* ĉapitro 9. p77. Bahá'í Publishing Trust. 1991. London: Vidu ankaŭ *Star of the West* vol. 11, n-ro 18 (Ekstera vol.6.) p. 299-306. 7 Feb 1921.

Tiu ĉi prelego de 'Abdu'l-Bahá ne estas aŭtentigita kvankam oni jam eldonis ĝin sen tia komento en kelkaj bonegaj bahaaj libroj, jam aprobitaj de diversaj bahaaj institucioj. Plue, la tiutaga gazetaro raportis lian prelegon kaj eĉ per rubriko atentigis, ke bahaanoj en la Oriento devas lerni Esperanton. Unuarigarde ŝajnas ke iu ajn prelego kiu ne estas aŭtentigita estus senvalora, tamen tio estus eraro. La koncerna prelego ne estas konsiderata falsa. Ties grado de aŭtenteco, kune kun tiuj de aliaj famaj

la monda paco kaj la rolo de lingvoj

Yá-Bahá'u'l-Abhá! estas persa esprimo, pr.: Ja-Baha'ula'-Abha, signifanta Ĉiun Laŭdon al la Tutglora. Laŭ la oksforda vortaro 'koincido' estas notinda samtempaĵo de eventoj aŭ cirkonstancoj sen evidenta kaŭza konektaĵo. Koincide, la bahaa supra saluto honore al La Gloro de Dio povas esti ies unua Esperanto-leciono pro memkomprenebla signifo de 'Ja' el la germana. Per uzo de 'Yes' el la angla, D-ro Zamenhof indikis, ke ĉi tiuj du pozitivaj vortoj, ofte aŭdataj kune, devus anonci reciprokan respekton, kiun nun montras tiuj du iamaj militantaj malamikoj. Jes, Ja! "Venu, ni havas multajn ekzamenotajn demandojn, por esplori la veron kaj vidi, kiuspeca kaj kiunatura ĝi estas." diris 'Abdu'l-Bahá . Tiam la vero sendube liberigos kaj sendependigos nin de ĉio en ĉio. "Petu, kaj estos donite al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi."⁴⁵ La decida gravegeco de la lingva demando el bahaa perspektivo taksigas per tralego de *La Sesa Iŝrak* t. e. *La Sesa Brilego* de Bahá'u'lláh:

"La Sesa Iŝrak estas Konkordo kaj Unueco inter la homaro. De la tempokomenco la lumo de unueco radiis sian Dian Brilegon sur la mondon, kaj la plej granda el ĉiuj porunuecaj rimedoj por la popoloj de la mondo estas interkompreniĝo en skribo kaj parolo. Pro tio, en Niaj antaŭaj Epistoloj, Ni ordonis al la Membroj de la Domo de Justeco, aŭ elekti unu el la ekzistantaj lingvoj, aŭ elpensi novan, kaj simile akcepti komunan skribmanieron, instruante ilin al infanoj en ĉiuj lernejoj de la mondo, por ke la mondo fariĝu kiel unu lando kaj unu hejmo. La plej glora frukto de la Arbo de Sciado estas la jena laŭdegata vorto : El unu arbo vi estas ĉiuj la fruktoj kaj el unu branĉo la folioj : Homo ne fieru pri tio, ke li amas la patrujon, prefere li fieru pri tio, ke li amas siajn kunhomojn. En tiu ĉi rilato Ni antaŭe revelaciis tion, kio estas la rimedo por la prospero de la mondo kaj la unuiĝo de la nacioj. Benitaj estas tiuj, kiuj atingas! Benitaj estas tiuj, kiuj praktikas!"⁴⁶

Multaj el la plej bone konataj sentencoj kaj profundaj aforismoj de la Bahaa Kredo troviĝas meze de prelegoj de bahaaj Gvidantoj pri la lingva problemoj:

prelegoj de 'Abdu'l-Bahá ankoraŭ ne estas konataj, ĉar la originalaj tekstoj en lia propra manskribo aŭ tekstoj kiujn li persone aprobis ankoraŭ ne estas en nia posedo. En grava noto de la Esplor-departemento de la Universala Domo de Justeco datita 29 Novembro 1995 tiu grupo de kleruloj klarigas: "Eĉ pri multaj el la (tre famaj) prelegoj de 'Abdu'l-Bahá en *The Promulgation of Universal Peace* kaj *Parizaj Paroladoj* ekzemple, aŭtentigitaj originalaj tekstoj ankoraŭ ne estas trovitaj... Tio ne signifas, ke ni ne rajtas uzi la neaŭtentigitajn prelegojn... Nuntempe, la prelegoj en *Respondoj kaj Demandoj* kaj kelkaj pluaj individuaj prelegoj sole estas tiuj, kiuj laŭ nia scio atingas la postulojn de aŭtenteco kaj do estas konsiderataj kiel parto de la Bahaaj Sanktaj Skriboj."

⁴⁵ El *La Sankta Biblio*, Mat 7:7 ('Abdu'l-Bahá jene priskribis *La Sanktan Biblion* : "Tiu ĉi libro estas la Sankta Libro de Dio de ĉiela Inspiro. Ĝi estas la Biblio de Savo, la Nobla Evangelio. Ĝi estas la mistero de la Regno, kaj ties lumo. Ĝi estas la Dia Benio, la signo de Dia Gvidado." *'Abdu'l-Bahá in London* p18. Bahá'í Publishing Trust Londono 1987.)

⁴⁶ *Tablets of Bahá'u'lláh* p.127. Bahá'í Publishing Trust. Wilmette 1988. (Tradukita el la angla de Lidia Zamenhof, BEL kaj T. Steele/P. Desailly.)

"La Granda Estaĵo, dezirante malkaŝi la postulojn por paco kaj trankvileco de la mondo kaj la antaŭeniĝo de la popoloj verkis: Devas alveni tempo kiam universale komprenita estos imperativa neceso kunvoki vastan, ĉioentenan kunvenon de homoj. La regantoj kaj reĝoj de la Tero devas nepre ĉeesti ĝin kaj partoprenante en ĝiaj interkonsiloj, devas konsideri tiajn vojojn kaj rimedojn, kiuj metos fundamentojn de la Plej Granda Mondpaco inter la homoj. Tia paco postulas, ke la Grandaj Potencoj decidu, pro la trankvileco de la popoloj sur la Tero, ke ili plene akordiĝu inter si. Se iu ajn reĝo prenus armilon kontraŭ alia, ĉiuj devas unuigite leviĝi kaj malebligi tion al li. Se tio estos plenumita, la nacioj de la mondo ne plu bezonos armilojn krom por konservi la sekurecon de siaj regnoj kaj por gardi internan ordon en siaj teritorioj. Tio certigos la pacon kaj trankvilecon de ĉiu popolo, registaro kaj nacio. Ni esperu ke la reĝoj kaj regantoj de la Tero, la speguloj de la moŝta kaj ĉiopotenca Nomo de Dio plenumos tiun celon, kaj ŝirmos la homaron kontraŭ la torentado de tiraneco... La tago alproksimiĝas, kiam ĉiuj popoloj de la mondo adoptos universalan lingvon kaj komunan skribon. Kiam tio estas atingita, ĉiu homo, kiun ajn urbon li vizitos, kvazaŭ eniros en sian propran domon. Tiuj aferoj estas devigaj kaj nepre necesaj. Ĉiu klarvida kaj saĝa homo devas klopodi starigi tion, kio estas skribita en efektivan agadon..... Tiu vere estas homo, kiu hodiaŭ dediĉas sin al la servo al la tuta homaro. La Granda Estaĵo diris : Benita kaj feliĉa estas tiu, kiu iras antaŭen por akceli la bonon de la homaro. Aliloke proklamis Li : Ne glori sin tiu, kiu amas sian propran landon, sed tiu, kiu amas la tutan homaron. La Tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj."⁴⁷

Estas interese legi la tutan enhavon de *Gleanings CXVII*, seninterrompe registrita ĉi tie en tuto laŭ la angla kaj persa eldonoj. La unua parto pritraktas de ĉia ampleksa asembleo de homoj kiuj devas konsideri praktikajn rimedojn establi mondpacon. Tiam Bahá'u'lláh skizas fundamenton de tia sistemo. Meze de tiu ĉi epistolo la Sinjoro de nia Epoko ŝajnas aludi tute alian temon, t.e. universala helpa lingvo. Ni esperantistoj jam konstatas la neceson de la lingva diskuto por organizi tian efikan kaj justan renkontiĝon, kies celo estas mondpacon kaj kies anoj estas el ĉiuj popoloj.

Por verki kontraŭmilitan ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, reprezentantoj de 50 nacioj amasiĝis en Usono 25 Aprilo 1945. La sperto ekigi tiun organizaĵon en San Francisko pensigas min pri du aferoj. Unue, se ekzistantaj internaciaj organizaĵoj kiel UN kaj Eŭropa Unio jam maloportune utiligas nur ses kaj dekunu lingvojn respektive, kiamaniere funkcias ampleksega kunveno inkluzive de mondaj regantoj sen komuna lingvo? Pro la aktualaj prestiĝo kaj graveco de Germanio kaj Japanio la lingvoj de UN probable kreskos ĝis ok. Ĉar la administraj kostoj por aldoni lingvon tie estas eksponenciale egaj kaj tial malebligas elspezojn sur kampoj de urĝaj homaj bezonoj, ni esperu, ke la naŭa lingvo de UN solvos la lingvan problemon per aldono en prudentaj stadioj de universala helpa lingvo. Due, eĉ se oni povus interkonsenti pri elekto de unu nacia lingvo por tiu rolo, kiuj, intence aŭ neintence, profitus el tio? En kies favoro inklinus konsultado, traktatoj kaj kontraktoj? Probable ankoraŭfoje la denaskaj

⁴⁷ *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh* CXV11 p249. Bahá'í Publishing Trust 1969. Wilmette : Tradukis Lidia Zamenhof, Bahaa Esperanto-Ligo, T. Steele, J. Dale kaj P. Desailly.

parolantoj de tiu nacia elektota lingvo. Sen neŭtrala lingvo tiuj decidigaj konsultadoj favorus almenaŭ unu el la ĉefaj mondpotencoj kiuj jam ĝuas egan avantaĝon pro siaj nombro kaj riĉeco. Miaopinie por eviti maljustaĵon Bahá'u'lláh prenis la nekutiman paŝon kunligi en la sama tabuleto du ege gravajn temojn, mondpacon man' en mane kun universala helpa lingvo.

El la propozicio de Bahá'u'lláh: "La tago alproksimiĝas, kiam ĉiuj popoloj de la mondo adoptos universalan lingvon..." mi unue supozas ion malproksiman kiel adoptitan infanon, kiu grade fariĝas plej amata per reciprokaj respekto kaj gajno aŭ simbiozo. Bahá'u'lláh per Sia propra mano jam difinis la gravegecon de universala helpa lingvo. Li faris tion en loko kaj tempo, kiam oni mokis tiajn ideojn. La historio jam pravigis Lin. Li absolute komprenis la perpleksan orgojlon en ni mem kaj en nia socio, kiu de tempo al tempo igas nin tiom ebrie fieraj, ke ni ne povas percepti nian propran avantaĝon. Diris Li :

"Unu tagon, en Konstantinoplo Kamál Paŝa⁴⁸ vizitis ĉi tiun Persekutiton. Nia konversacio temis al temoj profitodonaj al la homaro. Li diris, ke li lernis plurajn lingvojn. Responde Ni rimarkis : "Vi malŝparis vian vivon. Decas al vi kaj la aliaj registaraj altranguloj okazigi kunvenon kaj elekti unu el la diversaj lingvoj, kaj, ankaŭ, unu el la ekzistantaj skriboj, aŭ krei novan lingvon kaj novan skribon instruotaj al infanoj tra la mondo. Tiamaniere ili akirus nur du lingvojn, unue sian denaskan lingvon, la alia la lingvon en kiu ĉiuj popoloj de la mondo interparolus. Se homoj firme tenus tion kio estas menciita, la tutan Teron oni konsiderus kiel unu landon, kaj la popoloj estus senŝarĝitaj kaj liberigitaj for de la neceso akiri kaj instrui diversajn lingvojn." En Nia ĉeesto, li konsentis, kaj eĉ montris grandan ĝojon kaj tutan kontentiĝon. Ni tiam diris al li, meti ĉi tiun aferon antaŭ la altranguloj kaj ministroj de la registaro, por ke ĝi efektiviĝu tra la diversaj landoj. Tamen kvankam li ofte revenis por vidi Nin post tio, li neniam refoje aludis al ĉi tiu temo, kvankam tio kio estis sugestita, kondukas al la konkordo kaj la unueco de la popoloj de la mondo.

"Ni ja esperas ke la persa registaro adoptos kaj efektivigos ĝin. Nuntempe, nova lingvo kaj nova skribo estas elpensitaj. Se vi deziras, Ni komunikos ilin al vi. Nia celo estas, ke ĉiuj homoj aliĝu al tio, kio malpliigos nenecesajn laboron kaj penon por ke taŭge ili pasigu kaj finu siajn tagojn. Dio vere estas la Helpanto, la Scianto, la Ordonanto, la Ĉioscianto."⁴⁹

Laŭ mia scio neniuj registara funkciulo enketis pri tiuj novaj lingvo kaj alfabeto kiuj estis ĵus elpensitaj. Bahá'u'lláh mortis baldaŭ poste en 1892 kiam Esperanto, kies konatiĝo jam estis disabilita, estis kvinjara. Aprile 1890, post naskiĝo de Esperanto sed antaŭ aludo de Bahá'u'lláh pri nova lingvo kaj nova skribsistemo, la mondfama angla Orientalisto, Profesoro E. G. Browne, ricevis la honoron de kvar sinsekvaj aŭdiencoj kun Li. Dum tiuj intervjuoj en kvar sinsekvaj tagoj ili havis la eblecon

⁴⁸ Unu el la turkaj altranguloj ĉe la kortego de Sultano 'Abdu'l-Aziz.

⁴⁹ Bahá'u'lláh *The Epistle to the Son of the Wolf* (Epistolo al la Filo de la Lupo.) 1891 : p.137. Bahá'í Publishing Trust. 1953 Wilmette Usono.

diskuti Esperanton. "Ne estis necese demandi, en kies ĉeesto mi staras, kiam mi klinis min antaŭ tiu, kiu estas la objekto de sindonemo kaj amo, kiajn reĝoj povus envii kaj imperiestroj sopirus vane. Milda kaj digna voĉo petis min sidiĝi..."⁵⁰ estas la vortoj de Profesoro Edward Granville Browne de la Universitato de Cambridge en Anglio por priskribi Bahá'u'lláh-on. Admirantoj de Esperanto nomas ĝin "lingvo laŭplana" aŭ "elpensita", sed kelkaj malŝate priskribas tiun ĉi lingvon estimatan de 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi kiel artefaritan lingvon.

Malofte Bahá'u'lláh ripetas Siajn eldirojn. Eĉ pli malofte Li atentigas nin pri tio. "... Saĝuloj ne kutime ripetas Mian esprimon de atestimo sed tiu ĉi nova amo frakasas ĉiujn morojn kaj regulojn malnovajn."⁵¹ Tamen, pri la demando de mondlingvo kaj ties efiko je la monda paco kaj niaj geinfanoj Li jene esceptas. "Tiu ĉi dekreto antaŭe elfluis el la plumo de la Plej Alta: Estas la devo de la regantoj de la mondo - Dio helpu ilin - aŭ de la ministroj de la Tero kune interkonsiliĝi kaj adopti unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ novan lingvon instruotan al la infanoj en ĉiuj lernejoj de la mondo, kaj same unu alfabeton. Tiel la tuta tero estos fine konsiderata kiel ununura lando. Kontenta estas tiu kiu aŭskultas Lian vokon kaj obeas tion, kio estas preskribita de Dio, la Sinjoro de la Potenco Trono."⁵²

Letero datita 8 Junio 1980 de la Universala Domo de Justeco al kredanto sugestas pluan konsultadon inter bahaanoj kaj registaraj aŭtoritatuloj por efektivigi elekton de universala helpa lingvo.

"Via komento estas tute prava, ke du apartaj kondiĉoj ekzistas en la Bahaaj Sanktaj Skriboj pri elekto de Internacia Helpa Lingvo. Unuflanke, la tasko apartenas al la registaroj de la mondo. Aliflanke la Universala Domo de Justeco respondecas. Ne eblas antaŭvidi tiom precize, kio okazos. Tamen ĝusta supozo estas ke, jarojn antaŭ ol la bahaa komunumo estos sufiĉe granda aŭ sufiĉe forta por aŭtoritate realigi tian tutmondan ŝanĝon, eventoj devigos registarojn, aŭ individue aŭ kune, elekti Internacian Helpan Lingvon instruotan kiel duan lingvon en ĉiuj lernejoj kaj uzotan en ĉiu internacia komerca afero. Multe poste, eble dum la epoko de la Bahaa Tutmonda Komunumo, la Universala Domo de Justeco eventuale decidus pripensi la situacion kaj ĝi konfirmos la decidon de la registaroj aŭ ĝi ŝanĝos la elekton al pli taŭga lingvo.

"Kompreneble, estontaj kondiĉoj eble estigos tute alian rezulton. Unu trajto de la Bahaa administrado estas ĝia fleksebleco, kiu permesas al ĝi alfronti ne atenditajn problemojn kaj daŭre ŝanĝiĝantajn kondiĉojn. Tamen, la Universala Domo de Justeco estas tutcerta, ke ĝi ankoraŭ ne intencas agi pri la elekto de Universala Helpa Lingvo ĉar la cirkonstancoj ĝis nun malkonvenas."

⁵⁰ H.M. Balyuzi *Bahá'u'lláh the King of Glory* p.372. George Ronald 1980 Oxford.

⁵¹ Bahá'u'lláh *The Four Valleys* Antaŭparolo. Bahá'í Publishing Trust.

⁵² Bahá'u'lláh *Tablets of Bahá'u'lláh* p.22. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1988. (Tradukis BEL.)



Bildo 21 – 5.000 japanaj enoj. (D-ro Inazō Nitobe)

En la fruaj 1920aj jaroj reprezentantoj de la persa registaro kun subteno de multaj nacioj inkluzive ĉiujn ĉefajn aziajn anojn de la periodo (Ĉinio, Hindio kaj Japanio) proponis al la Ligo de Nacioj, ke Esperanto estu adoptita en la mondaj lernejoj.⁵³ La japana diplomato, Vicsekretario-ĝenerala de la Ligo de Nacioj kaj rektoro de la Universitato de Tokio, D-ro Inazō Nitobe, kies vizaĝo honoras la aktualan 5.000 enan bankbileton kaj D-ro Edmond Privat,⁵⁴ fame konata Esperanto-oratoro kaj konsilisto al la persa registaro, oficiale atentigis pri Esperanto al la konsilantaro de la Ligo de Nacioj. Sole la angla kaj la franca estis “oficiale” uzataj ĉe tiu embria mondforumo, kiu estis denaske kondamnita je malsukceso pro la manko de Sovet-Unio ĝis 1934 kaj ĉiama manko de Usono. La termino de la burokrataro estis “du kutimaj lingvoj” prefere ol “du oficialaj lingvoj”. Prezidento Woodrow Wilson en 1919 grave rolis por iniciati Ligon de Nacioj sed la usona senato en 1920 rifuzis ratifi lian faman 14 Punktan Pacplanon bazitan je bahaaj idealoj. Post malveraj akuzoj kontraŭ Esperanto, ke malantaŭ la lingvo kaŝiĝis internacia kaj revolucia mistikismo, la franca registaro antaŭvidis perdon de prestiĝo de sia lingvo kaj tial kasaciis tiun persan rezolucion, kiu rekomendis Esperanton.⁵⁵ Jam la hegemonio de la angla lingvo subite supersaltis tiujn okazaĵojn, sed multaj intelektuloj iam konsideris la francan esti la nur sola luktanto en mondlingva rolo. Ankoraŭ dum la Dua Mondmilito oni kredis tion en aristokrataj, diplomataj, filozofiaj, olimpikaj, poŝtaj kaj sciencaj rondoj. En la neevitebla forpaso de tempo kaj la fluso-malfluso de diversaj lingvoj Francio, nobla lando de miaj prapatroj, jam paradokse reĝis Esperanto-fortikaĵo. Francio en Aŭgusto 1998 okazigis la 83an UK-n ĉe Montpellier kun kvartaga simpozio kun la titolo - "La Propedeŭtika Valoro de Esperanto." Ĉu eblas lerni de tiu ĉi malfeliĉa rakonto de la historio pri la vetoa rajto senkonsulte uzata kaj simile pri opinio, ke nacia lingvo rajtas esti trudata al la nacioj? Ambaŭ sintenoj malpravas kaj tial ili vaporiĝos kun la tempopaso.

⁵³ Vidu *La Danĝera Lingvo* de D-ro Ulrich Lins p. 62, 63 por detaloj pri la pozitivaj penoj de la persa registaro en Decembro 1920 kaj Septembro 1921.

⁵⁴ D-ro Privat, kiel lia mentoro D-ro Zamenhof, skribis montris sian altan estimon de la Bahaa Kredo jene, "La praktika kaj spirita interkompreno de nacioj, la konstato de la unueco de la homaro super ĉiuj lingvaj kaj religiaj bariloj, la sinteno de respondeco al ĉiuj suferantaj afliktoj aŭ maljustecon, estas diversaj branĉoj de la sama centra instruo, kiu donas al la bahaa movado fidelan familion aktivan de laborantoj en tiom da landoj." Tradukita el letero angle skribita de D-ro E Privat datita 30 Septembro 1931 en *The Bahá'í World* vol 4. p 395.

⁵⁵ Por trovi tre interesan raporton pri la makiavelaj maŝinacioj obstrukcii Esperanton ĉe la Ligo de Nacioj vidu la supran fonton en *La Danĝera Lingvo*.

elstara graveco de la lingva demando

La Patrino Libro de la Bahaa Kredo estas *Kitáb-i-Aqdas* (pr. : Kitab-i-Akdas) (La Plej Sankta Libro de Bahá'u'lláh.) "Restarigi denove la tutan mondon estas la pretendo kaj la defio de Lia Mesaĝo kaj *Kitáb-i-Aqdas* estas la Ĉarto de la onta mondcivilizacio, kiun Bahá'u'lláh jam venis por establi."⁵⁶ La malfermata aserto de Lia Libro devigas nin sendepende serĉi la veron, liberigata de sociaj antaŭjuĝoj, kaj post fideklaro je Bahá'u'lláh ĝoje sekvi Lin en nia epoko de homa plenkreskiĝo.

EN LA NOMO DE TIU KIU ESTAS LA SUPEREGA REGANTO DE ĈIO ESTINTA KAJ ĈIO ESTONTA

"La unua devo ordonita de Dio al Liaj servantoj estas la agnosko de Li, Kiu estas la Peranto de Lia Revelacio kaj la Fonto de Liaj Leĝoj, Kiu reprezentas Dion kaj en la Regno de Dio kaj en la kreita mondo. Kiu ajn plenumas tiun devon, atingas ĉion bonan; kaj kiu maltrafas tion, perdas la vojon, eĉ se li estus la aŭtoro de ĉiu virta ago. Ĉiu, kiu atingas tiun grandiozan celon, tiun montopinton de transcenda gloro, devas obei ĉiun ordonon de Li Kiu estas la Sopiro de la mondo. Tiuj du devoj estas ne disigeblaj. Neniu el la du estas akceptebla sen la alia. Tiel ĉi ordonis Li Kiu estas la Fonto de la Dia inspiro."⁵⁷

La fina paĝo de Lia Plej Sankta Libro metas al niaj politikistoj respondecon, ĉar ili devas elekti mondan lingvon por havigi politikan mondpacon. En la onta citaĵo Bahá'u'lláh senkondiĉe garantias al niaj politikaj reprezentantoj tion, kio unuigos, profitigos kaj liberigos nin. Pri niaj komputiloj, lernado kaj riĉeco Li faras nenian promeson. Fakte, Li bone scias kiom malfacile estas al ni kredi, aparte por la intelektularo, tamen li pete konsilas, ke nia klereco ne forvualu nin de la vero. Li ripete petas nin kompreni ke ĉi tiu principo de la helpa lingvo estos la plej potenca ilo por igi antaŭen harmonion kaj civilizacion kaj ĝi estos eĉ la kaŭzo de unueco. Super ĉio religio temas pri fido. Ĉiu el ni respondecas, ke nia fido iĝu agado.

"Ho membroj de la Parlamentoj tra la mondo! Elektu vi unu lingvon por la uzo de ĉiuj surtere kaj adoptu vi same skribon komunan. Dio, vere, igas evidenta al vi el kio vi profitas kaj ebligas al vi esti sendependaj de aliaj. Li, vere, estas la Plej Malavara, la Ĉio-Scianta, la Ĉio-Konanta. Tio ĉi kaŭzos unuecon, se nur tion kapablu vi kompreni, kaj montriĝos la plej granda ilo por igi antaŭen harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu! Ni indikis du signojn de la plenkreskiĝo de la homa raso: la unuan, la plej

⁵⁶ Shoghi Effendi, Enkonduko al *Kitáb-i-Aqdas* p. 1. Universala Domo de Justeco 1993.

⁵⁷ Bahá'u'lláh : *Kitáb-i-Aqdas* unua paragrafo. (Provizore tradukis T. Steele kaj P. Desailly.)

firman fundamenton, Ni skribis sur alian el Niaj Tabuletoj, la dua estas rivelita en tiu ĉi mirinda Libro."⁵⁸

Vidu aldonajon 4 (p.111) kaj piednoton 92 por pliaj detaloj skribitaj de la Universala Domo de Justeco pri la plenkreskiĝo de la homaro kaj nia fina maturiĝo.

La ordono de Bahá'u'lláh ke la Universala Domo de Justeco kaj la parlamentoj de la mondo devos solvi la lingvajn demandojn pri elekto definitive malebligis al 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi anoncon pri kio precize estos la elektota helplingvo. Tamen Lia kondiĉo ne malhelpis al 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi urĝe instigi nin studi Esperanton. La lasta ofte faris tion, sen garantio, ke ĝi necese fariĝos la universala helpa lingvo de la estonteco. 'Abdu'l-Bahá, Centro de la Interkonsento, mem havis la rajton kuraĝigi ĉiujn bahaanojn elstudi iun ajn lingvon nekonsiderante niajn perceptojn de la potencialo de tiu lingvo aŭ la nuna influo de la angla aŭ la pasinta respekto al la franca aŭ la belsoneco de kaj la ĉina kaj la itala kaj la araba ktp.

Jen kelkaj parencaj punktoj de konsiderado pri la kolosa tasko por helpi aŭtoritatulojn starigi mondpacon. Krom nazia kaj similaj diktatoraj ŝtatoj bahaanoj devas esti subtenantoj kaj simpatiantoj de siaj registaroj. Ni devas bone kondukti je niaj registaroj kun fideleco, vereco kaj obeemo. Partopreno de bahaanoj en partiana politiko estas malpermesata. Voĉdonado kaj patriotismo estas rekomendataj. Bahaanoj kredas, ke jam estas firme starigita la kadro de politika paco konata kiel "La Malpligranda Paco" aŭ "La Minora Paco." Ĝi estos tiel forte establita, ke oni konsideros sin civitano de unu terglobo. "La monda paco estas ne nur atingebla sed neevitebla. Ĝi estas la venonta ŝtupo en la evoluo de tiu ĉi planedo - laŭ la vortoj de granda pensulo : 'La planediĝo de la homaro.' "⁵⁹

shoghi effendi konsilas bahaanojn studi esperanton ĝis la granda elekto

"Pri la temo Esperanto, oni devus igi klare al la kredantoj ke, kvankam 'Abdu'l-Bahá ripetfoje stimulis la instruadon de tiu lingvo por la bahaanaro, ne ekzistas aludo aŭ ĉe li aŭ ĉe Bahá'u'lláh kiu kredigas al ni, ke ĝi nepre fariĝos la estonta universala lingvo. Bahá'u'lláh specife skribis, ke tia lingvo devus esti elektita el inter la ekzistantaj lingvoj aŭ tute nova lingvo devus esti kreita por servi kiel komprenigilo inter la nacioj kaj popoloj de la mondo. Dum tiu elekto ankoraŭ ne okazis, estas konsilinde ke bahaanoj studu Esperanton nur pro la fakto, ke lernado de tiu lingvo povas faciligi komunikadon inter unuopuloj, grupoj kaj asembleoj tra la bahaa mondo en la nuna stadio de la evoluo de la Kredo."⁶⁰

Aserti ke la uzo de la vorto 'nur' en la fina frazo de tiu 1937^a dokumento liberigas bahaanojn, kiuj havas la rimedojn, lerni Esperanton el 'la emfazaj kaj ripetataj admonoj' de 'Abdu'l-Bahá' fari tion (vidu p.63) estas nebula kaj erarema argumento kontraŭ la spirito de la tuta letero. Argumenti ke la nuntempa uzado de kaj la angla kaj

⁵⁸ Bahá'u'lláh : *Kitáb-i-Aqdas* paragrafo 189. Universala Domo de Justeco. 1993. (Vidu ankaŭ PN 92.)

⁵⁹ Universala Domo de Justeco. *La Promeso de Monda Paco* p.1. Bahaa Monda Centro. 1985.

⁶⁰ Helen Hornby : *Lights of Guidance* p. 249. (XXX11) Bahá'í Publishing Trust, Nov-Delhio 1988. Skribita en la nomo de Shoghi Effendi far lia sekretario, al la Nacia Spirita Asembleo de Usono kaj Kanado, 4 Junio 1937.

la persa kiel administraj lingvoj ene de la Bahaa Kredo senvalidigas pro eksmodeco la alvokon de Shoghi Effendi studi Esperanton malpravas, ĉar la samaj lingvoj administre regis en 1937. Cetere, la fina elekto de la onta universala helpa lingvo estas pendanta. La elekto de kelkaj Lokaj Spiritaj Asembleoj tra la bahaa mondo pere de Esperanto pravas, ke ĝi ankoraŭ "faciligas komunikadon k.t.p." Dum 1995 estis mia privilegio vidi tian elekton en Katowice, Supra Silezio. Kiel prezidanto dum tiu voĉdonado en Pollando mi devas raporti, ke kvankam esperantistoj sukcesis en ĉiuj kvar oficialaj bahaaj postenoj, tio estis koincido. Nenio pli ol simpla koincido!

"Rilate la tutan demandon de Internacia Lingvo kaj ties rilato kun la Kredo : Ni, kiel bahaanoj, tre deziras la kiom eble rapidan adopton de universala helpa lingvo; ni tamen ne estas la protagonistoj de iu ajn specifa lingvo por plenumi tiun postenon. Se la registaroj de la mondo interkonsentos pri iu ekzistanta lingvo aŭ pri planita, nova lingvo por la internacia uzado, ni elkore subtenos ĝin, ĉar ni kiom eble rapide deziras vidi la efektivigon de tiu paŝo survoje al la unuigo de la homaro. Esperanto estas vaste uzita, pli ol iu ajn simila lingvo, tute tra la mondo, kaj al la bahaanoj la Mastro kaj la Gardanto instigis lerni ĝin kaj Esperantigi bahaan literaturon. Oni ne estas certa, ke ĝi estos la elektita lingvo estonteca; sed pro tio ke ĝi estas la plej disvastiĝinta lingvo kaj Oriente kaj Okcidente, ni certe daŭru kunlabori kun ĝiaj membroj, lernu paroli ĝin, kaj Esperantigu bahaan literaturon."⁶¹

Kaj la 1937^a kaj la 1944^a leteroj skribitaj de la sekretarioj de la Gardanto klare atestas favore al Esperanto ; speciale la pli nova letero, ĉar ĝi pli amplekse tuŝas la tutan temon de internacia lingvo kiel la unua frazo montras.

Bahá'u'lláh Mem ordonis, ke bahaanoj almenaŭ unufoje tage preĝu private. Temas pri ĉefa kolono de nia Kredo, sendepende de profunda studado de la multaj Sanktaj Skriboj. Por aniĝi al la Bahaa Kredo oni devas scii pri kaj konsenti al la preĝdevo. Juĝi ĉu oni devas studi Esperanton, estas alia demando, kiu bezonas sendependan pristudon de la multaj vortoj pri la temo. Jen grava temo, kiun ĉi tiu libro klopodas priatentigi.

En ankoraŭ unu laŭda letero de Esperanto datita 26 Decembro 1936 Shoghi Effendi diris per sia sekretario: "La instruado de Esperanto tial ne estas ordono aŭ devo en la sama senco kiel ekzemple preĝado." La letero nome de Shoghi Effendi neniel malpliigas la anoncon de 'Abdul-Bahá studi Esperanton en la malsupra citaĵo. Ili neniam kontraŭdiris unu la alian. Tiu 1936^a letero kaj ĝia enkonduko pri "la instruado de Esperanto" akcentas en mia opinio la vastan diferencon laŭ tempo kaj peno inter studado kaj instruado de lingvo, eĉ relative facila lingvo kiel Esperanto. La sama letero klarigas la multajn eblecojn por instrui la Bahaan Kredon pere de Esperanto. Bahaanoj jam konscias la diferencon de "Studado de la Kredo" kaj "Instruado de la Kredo."

Por ĝuste instrui studobjekton oni devas ĝisfunde studi ĝin. Instrui la Bahaan Kredon, la pinta celo de ĉiuj sinceraj bahaanoj, postulas rigoran fidelecon al la bahaa vivmaniero kune kun aŭtenta deziro plibonigi la vivon de aliaj. Tia instruado devas

⁶¹ Nacia Spiritaj Asembleoj de Britio. *Principles of Bahá'í Administration*, p.27. Bahá'í Publishing Trust. London 1973. Skribita en la nomo de la Gardanto al individua kredanto, 17 Oktobro 1944.

inkluzivi sinoferon, longdaŭran penadon kaj pli ol scio el libroj. Povus esti la rezigno pri unu persona malbona kutimo, por ke pli sana mondo evoluu. Necesas havi iom da spiritualeco. 'Abdu'l-Bahá diris ke "spiritualeco estas aganta amo." Pli da agado ol da vortoj.

Necesas ripeti, ke la rekomendoj de 'Abdu'l-Bahá studi Esperanton supozigas, ke oni havas sufiĉajn rimedojn. Tio devus esti mem evidenta kiel marŝado de la spirita vojo per utilaj kaj praktikaj piedoj. Tamen la lingva demando estas tiom centra, ke la sugesto de devo por bahaanoj studi Esperanton estas tre disputata. Eraro estas opinii ke mi intencas sugesti, ke bahaanoj, kiuj ne nune studas Esperanton, malobeas. Oni ne malobeas se oni ne komprenas aŭ ne konscias pri la ŝajne memkontraŭdira kuraĝigo de 'Abdu'l-Bahá studi Esperanton, nek se oni lernas lingvon de nova hejmlando, nek se oni estas jam tute okupita pro ia ajn bona kialo. Nur tiuj, kiuj havas la tempon kaj la rimedojn studi Esperanton, sed rifuzas enketi aŭ reagi al la deziro de 'Abdu'l-Bahá fari tion, riskas malkontentigi lin. Tia rifuzo estus privata afero inter la unuopulo kaj ties Kreinto ĉar Bahá'u'lláh jene klarigas : "Ho Filo de Esto! Kial vi forgesis viajn proprajn kulpojn kaj ekokupis vin per kulpoj de la aliaj? Kiu faras tion estas kondamnita de Mi."⁶²

Ju pli profunde ni fosas en la temon des pli rimarkinde elstaras la granda kvanto da aludoj pri Esperanto en la Bahaaj Sanktaj Skribaĵoj. Kombinantaj la faktojn ke 'Abdu'l-Bahá ne nur multfoje alparolis individuajn esperantistojn kaj ankaŭ prelegis en iliaj klubejoj, ni devus pridemandi al ni mem liajn kialojn. Dum Esperanto-bankedo en Parizo Februare 1913 'Abdu'l-Bahá kiel kutime koncentriĝis pri la benoj ricevotaj de universala helpa lingvo anstataŭ pri la ege kreskantaj problemoj pro ĝia manko. En la dua paragrafo de la onta citaĵo li kvarfoje rekte signas al Esperanto kaj unufoje oblikve mencias ĝin. Notu sep elstarajn promesojn en la unua paragrafo.

"La plej granda rimedo akcelante unuiĝon de la Oriento kaj la Okcidento estos komuna lingvo. Ĝi faros el la tuta mondo unu hejmon, kaj ĝi fariĝos la plej forta impulso por la homa antaŭeniĝo. Ĝi levos la standardon de la unueco de la homaro. Ĝi faros el la tero unu universalan komunajon. Ĝi estos kaŭzo de amo inter la homidoj. Ĝi kaŭzos bonan kunvivadon de diversaj rasoj.

"Dankon al Dio ke D-ro Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto. Ĝi posedas ĉiujn eblajn kvalitojn por fariĝi rimedo de internacia interkomunikiĝo. Ĉiuj el ni devas esti kontentaj kaj dankemaj al li por lia nobla penado, ĉar tiumaniere li faris bonan servon al siaj proksimuloj. Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo, por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj. Mi esperas ke Esperanto estos akceptita kiel lingvo de ĉiuj estontaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj, por ke ĉiuj homoj bezonos lerni nur du lingvojn : unue sian patrolingvon kaj due la lingvon internacian. Tiam perfekta harmonio estos starigita inter ĉiuj popoloj de la mondo. Konsideru kiel malfacile estas hodiaŭ interkomunikiĝi

⁶² Bahá'u'lláh : *La Kaŝitaj Vortoj de Bahá'u'lláh* n-ro 2 el la araba.

kun diversaj nacioj. Se oni studas eĉ 50 lingvojn oni ankoraŭ tamen povas vojaĝi tra lando kaj ne koni ĝian lingvon. Tial mi esperas ke ĉiu el vi streĉos ĉiujn siajn fortojn, por ke la lingvo Esperanto larĝe disvastiĝu."⁶³

Ekzameninte la frazojn en la ĵus antaŭa citaĵo, tuj antaŭ kaj post uzo de la vortgrupo de 'Abdu'l-Bahá, 'tial ĉiu el ni devas studi ĉi tiun lingvon', kaj lian unuan paragrafon, oni rivelas ĉu li aludis al la tuta homaro. Kelkaj personoj opinias, ke li direktis sian instrukcion nur al la Esperanto-mondo. Tiu hipotezo ŝajnas malkredebla, ĉar samideanoj jam studis kaj daŭre studas Esperanton. Dezirante akcepton de Esperanto de ĉiuj registaroj, nacioj kaj lernejoj de la mondo 'Abdu'l-Bahá apenaŭ limigis siajn komentojn je la tutmonda Esperanto-komunumo.

Bonvolu noti ke 'Abdu'l-Bahá havis la rajton peti de la bahaanaro lernadon de la sŭahila, inuita lingvo aŭ kiu ajn lingvo sen garantio pri ĝia universaleco. La senlima aŭtoritato de 'Abdu'l-Bahá fari tian proponon dependis nek de akademia aprobo de iu specifa lingvo, kvankam tio estus nun bonvena por antaŭenigi Esperanton, nek de la rango de pli popularaj lingvoj. Se mi ripetas nur unu punkton, ĝi estu ke 'Abdu'l-Bahá havis la aŭtoritaton peti min, pro mia pretendo esti bahaano, studi Esperanton ĉu aŭ ne ĝi universaliĝos. Se bahaanoj ricevas peton de siaj Nacia Spirita Asembleo aŭ Universala Domo de Justeco, ili ofte komparas tion kun reĝa dekreto kiun efektivigi estas honoro. Kiamaniere ili respondus en la ĉeesto de 'Abdu'l-Bahá, kiam li diris ke, "ĉiu el ni devas studi ĉi tiun lingvon (Esperanto) kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo" ? Mi opinias ke malmultaj el ili petus lin pli klarigi lian intencon.

⁶³ D-ro J.E. Esslemont *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* p.165. Bahaa Esperanto-Ligo Usono. 1978. Tradukis Lidia Zamenhof. D-ro Esslemont estis fame konata bahaa, skota esperantisto kaj 'Mano de la Afero de Dio'. Shoghi Effendi distingis lin per tiu honora titolo post lia morto. La supra prelego de 'Abdu'l-Bahá, simile al la plimulto de liaj eldonitaj prelegoj, ankoraŭ ne estas oficiale aŭtentigita. Piednoto 44 klarigas la staton de la prelego kies grado de aŭtentikeco ankoraŭ ne estas establita. Piednoto 66 klarigas ĝian aŭtoritatecon.



Bildo 22 **Mano de la Afero de Dio.**

D-ro John Esslemont... 19 Majo 1874 – 22 Novembro 1925.

Esperantisto kaj aŭtoro de *Bahá'u'lláh and the New Era*, (*Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko*) la unua ampleksa libro priskribanta la Bahaan Kredon. Shoghi Effendi jene priskribis lian libron: "Tiu belega, aŭtoritata kaj ampleksa enkonduko al bahaaj historio kaj instruoj verkita de tiu purkora kaj senmorta antaŭenigulo de la Kredo, D-ro John Esslemont." En 1937 la Gardanto de la Bahaa Kredo mem direktis la revizion de *Bahá'u'lláh and the New Era*. En 1950 la Bahaa Eldona Komitato kondiĉis, ke ajna estonta revizio de ĝia teksto okazos laŭ aprobo de Shoghi Effendi. En tiu grava verko 'Abdu'l-Bahá komentariis: "Ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon (Esperanto) kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo."

Al tiuj kiuj dubas la aŭtentikecon, aŭtoritatecon aŭ tradukon de la epopeo de D-ro Esslemont en kiu 'Abdu'l-Bahá petas nin studi Esperanton, mi citu el la *Bahaa Jarlibro* 1925. "Ne kontenta studi la bahaajn skribojn en traduko, D-ro Esslemont lernis la persan por legi ilin en la originala lingvo; D-ro Esslemont skribis por instrui aliajn homojn."⁶⁴ Mano de la Afero de Dio, Rúhiyyih Rabbání, la ĝis antaŭ nelonge tre aktiva kanada vidvino de Shoghi Effendi informis nin, ke la Gardanto laŭdis la klasikaĵon de D-ro Esslemont jene: "Ĝi inspiras generaciojn naskotajn."⁶⁵ Eĉ pli grave mi citas el la majstroverko de Shoghi Effendi *God Passes By* (Dio Preterpasas). "Neniu esploro de bahaa literaturo aperinta dum la finaj jardekoj de la unua bahaa jarcento estus kompleta sen speciala aludo al la pulikigo kaj daŭra influo de tiu belega, aŭtoritata kaj ampleksa enkonduko al bahaaj historio kaj instruoj verkita de tiu purkora kaj senmorta antaŭenigulo de la Kredo, J. E. Esslemont. Ĝi jam estas eldonita en ne malpli ol 37 lingvoj kaj baldaŭ aperos en 13 kromaj lingvoj. La angla eldono jam estas eldonita en

⁶⁴ *Bahá'í Year Book* 1925-1926. vol 1. p 135. Bahá'í Publishing Trust. Wilmette 1980.

⁶⁵ Rúhiyyih Rabbání *The Priceless Pearl* p.91. Bahá'í Publishing Trust. Londono. 1969.

dekoj da miloj kaj represita ne malpli ol naŭ fojojn en Usono. La Esperanta, japana kaj angla eldonoj jam estas Brajle transskribitaj. Reĝino rekomendis ĝin al ĉiuj kaj laŭdegis ĝin jene, ‘glora libro de amo kaj bono, forto kaj belo’, kaj ŝi aldonis, ‘neniu malsukcesus esti pli bona pro tiu libro.’”⁶⁶ Shoghi Effendi persone aprobis la ĉefan revizion de *Bahá'u'lláh and the New Era* faritan de la Usona Nacia Spirita Asembleo en 1937. En 1944 li priskribis la libron aŭtoritata, en 1950 la Bahaa Eldona Komitato kondiĉis, ke ajna estonta revizio de *Bahá'u'lláh and the New Era* bezonos la aprobon de la Gardanto. Ĉiuj eldonoj de *Bahá'u'lláh and the New Era* inkluzive la nunan kaj la originalan, citas la imperativan modon ‘devas’ de 'Abdu'l-Bahá rilate al la studado de Esperanto flanke de la bahaanaro.

Multnombros la Bahaaj Sanktaj Skriboj laŭdantaj Esperanton. Kelkaj gravaj citaĵoj estas registritaj ĉi tie sen multe da komentoj kun espero, ke ilia beleco gvidos vin al la Bahaa Esperanto-Ligo kaj Esperanto-lecionoj. Jen 'Abdu'l-Bahá eĉ superas siajn jam cititajn sep promesojn.

washington d.c. 25 aprilo 1912 dum prelego inter esperantistoj 'Abdu'l-Bahá diris:

"Nuntempe la plej granda bezono de la homa mondo estas ĉesigo de la ekzistantaj miskomprenoj inter nacioj. Tiu eblas per lingva unueco. Se la lingva unueco ne realiĝos, la Plej Granda Paco kaj la unuiĝo de la homa mondo ne povas esti efike organizita kaj establita, ĉar la funkcio de la lingvo estas prezenti la misterojn kaj sekretojn de homaj koroj. La koro similas al kesto kaj la lingvo estas ĝia ŝlosilo. Eblas malŝlosi la keston nur per turno de la ŝlosilo, kaj observi la gemojn en ĝi. Pro tio la temo de helpa internacia lingvo ege gravas. Per ĝi internacia edukado kaj trejnado

⁶⁶ *God Passes By* (Dio Preterpasas) 1944 p.382. Bahá'í Publishing Trust 1970 Wilmette USA.

La altega laŭdo farita de Shoghi Effendi en 1944 de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko*, aparte lia aprobo de ĝi kiel "aŭtoritata", signifas unikan gravecon de la prelego de 'Abdu'l-Bahá kun la esprimo "ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon." Unuflanke tiu parolado havas aŭtoritatecon pro tio ke la Gardanto priskribis la libron, en kiu kuŝas la koncerna prelego, kiel aŭtoritatan. Aliflanke, ĉar neniuj originala aŭ aprobita de li tekstoj de la prelego de 'Abdu'l-Bahá ĝis nun estas konata, oni ne povas aŭtentigi la prelegon. Mi kredas ke la Universala Domo de Justeco je la ĝusta momento refoje ekzamenos la pretendatan devon studi Esperanton ke iu interpreto de Bahaaj Skriboj faligas sur informitajn bahaanojn kun la rimedoj por studi ĝin. Mia aserto ke la plej alta tera aŭtoritato informos nin pri tio estas dukiala: La monda paco havas rektan ligan al tiu ĉi lingva demando kaj la kerno de la Bahaa Kredo estas unueco. Nuna konvinko surbaze de la Bahaaj Skriboj, ĉu por ĉu kontraŭ "ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon" teorie ŝajnas prava. Pro la paragrafoj tuj post la signifo-peza ‘devas’ de 'Abdu'l-Bahá ni scias, ke la Bahaa Kredo ne sankcias Esperanton nek iun ajn etnan aŭ artefaritan lingvon ĝis tiam kiam la Universala Domo de Justeco agos laŭ la instrukcioj de Bahá'u'lláh. 'Abdu'l-Bahá petis, ke bahaanoj "studu Esperanton." Li ne rajtis ordoni al la Bahaa Kredo aŭ bahaaj institucioj aŭ aliaj grupoj elekti Esperanton aŭ iun alian lingvon por ĉiuj surteranoj sen malobeo de la postulo de Bahá'u'lláh, ke la Universala Domo de Justeco kaj membroj de parlamentoj tra la tuta mondo faru la elekton de la lingvo instruota en la lernejoj de la mondo. Mia tezo klarigas aprobon de la 1937a teksto far Shoghi Effendi de tio, kio antaŭe ŝajnis esti kontraŭdiro sur p.166 de la aktuala eldono de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* t.e. Ĉu eblas, ke 'Abdu'l-Bahá admonis al preskaŭ ĉiuj bahaanoj studi Esperanton, eĉ uzante 'devas', tamen la teksto de la sama paĝo, ne skribitan de D-ro Esslemont sed kiun Shoghi Effendi aprobis, neniel ligas la Bahaan Kredon al Esperanto?

eblas; oni povas akiri informojn pri la historio de la pasintaĵo. La disvastiĝo de la konataj faktoj de la homa mondo dependas de lingvoj. La klarigo de Diaj instruoj eblas nur per tiu ĉi ilo. Dum diverseco de lingvoj kaj manko de kompreno de aliaj lingvoj daŭros, tiuj gloraj celoj ne povas realiĝi. Tial la plej grava servo al la homaro estos establi ĉi tiun internacian helpkomunikilon.

"Ĝi trankviligos la homan frataron. Pere de ĝi sciencoj kaj artoj disvastiĝos inter la nacioj kaj ĝi estos la ilo de progreso kaj evoluo de ĉiuj rasoj. Ni devas ĉiuforte klopodi establi tiun ĉi internacian helplingvon ĉie en la mondo. Mi esperas ke pro la benoj de Dio ĝi perfektigos kaj ke oni elektos inteligentulojn el la diversaj landoj por organizi internacian kongreson kies ĉefa celo estos la antaŭenigo de tiu ĉi universala interkomprenilo."⁶⁷

'protestoj' kontraŭ esperanto

La rezervoj de 'Abdu'l-Bahá pri Esperanto ĉiam estis pozitive esprimitaj kaj ĉiam entenis promesojn pri uzado. En la jena citaĵo li diskutas ĝiajn mankojn por universala uzo kiel oni parolis ĝin antaŭ tri generacioj. Kvankam li aludas al la iamaj aŭ eĉ nunaj nesufiĉoj de Esperanto 'Abdu'l-Bahá tute ne nuligas sian kuraĝigon lerni ĝin, se oni havas la ŝancon. Ni egale memoru, se ni ne estas parto de la lingva solvo ni estas parto de la problemo.

Responde al amiko kiu deziris scii, ĉu Esperanto estas la elektota universala lingvo, menciita en la profetaĵo de Bahá'u'lláh *Vortoj de Paradizo* pri venonta lingvo, 'Abdu'l-Bahá respondis :

"La amo kaj peno dediĉitaj al Esperanto ne estos perditaj, sed neniuj unuopuloj sola povas konstrui universalan lingvon. Ĝi devas esti farita de Konsilantaro reprezentanta ĉiujn landojn, kaj devas enhavi vortojn el diversaj lingvoj. Ĝi estos bazita sur la plej simplaj reguloj, kaj ne estos esceptoj, nek estos genro, nek ekstraj kaj silentaj literoj. Ĉio indikita havos nur unu nomon. En la araba lingvo estas centoj da nomoj por kamelo. En la lernejoj de ĉiu nacio la patrinolingvo estos instruita, kiel ankaŭ la reviziita universala lingvo."⁶⁸ (emfazo aldonita.)

Unu generacion antaŭe en 1888 D-ro Zamenhof modeste ripetis ke li estas nur la iniciatinto de Esperanto, ne la posedanto. Aliaj agnoskis la brile simplan gramatikon kaj bazan vortostokon kaj mem aldonis al ĝi. Per senĉesa rifuzo fari financan profiton el Esperanto, D-ro Zamenhof klopodis montri, ke la lingvo neniel apartenis al li. Malgraŭ la sincera nobleco kaj genio de D-ro Zamenhof ŝajnas al mi pro la fakto, ke 'Abdu'l-Bahá faris siajn komentojn pri Konsilantaro anstataŭ unuopulo, kiu devas konstrui universalan lingvon, 23 jarojn post la forneo pri posedo de Esperanto skribita de D-ro

⁶⁷ 'Abdu'l-Bahá *The Promulgation of Universal Peace* p.60. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1982. (Tradukis T. Steele kaj P. Desailly.)

⁶⁸ 'Abdu'l-Bahá *in London* p 95. (ĉirkaŭ 1911) Bahá'í Publishing Trust London 1988. (Tradukis. T. Steele kaj P. Desailly.)

Zamenhof kaj 6 jarojn post la formiĝo de la Akademio povas esti, ke Esperanto ankoraŭ bezonas pliajn plibonigojn.

La supra citaĵo de 'Abdu'l-Bahá estas menciata de iuj bahaanoj por ilustru la nuntempan maloportunecon de Esperanto kiel helpa mondlingvo. Se oni juĝus laŭ la samaj kriterioj la naciajn lingvojn estus tuj eliminataj ĉiuj el ili, krom se oni draste simpligus ilin. Tia radikala ŝanĝo de lingvo estis malsukcese aplikita dum la 1930^{aj} jaroj en la internacia instruado de la angla kiel dua lingvo en la kopirajta eksperimento "Basic English" t.e. "Baza angla." Tiu finfine montriĝis neakceptinda al studantoj, instruistoj kaj parolantoj de la angla. La simpligo de la angla al 850 bazaj vortoj estis modere efika sed malpopulara probable pro ĝia tedo. La kritikantoj de Basic English pretendas ke ĝi estas mallerta alternativo al la norma angla lingvo anstataŭ surogato de monda potencialo. La studanto de Basic English fine konkludis - kial ne lerni la realan anglan!

Tamen, la supraj rekomendoj de 'Abdu'l-Bahá, necesaj por justaj normoj havigi universalan lingvon, grandparte similas Esperanton. Liaj postuloj indikas, ke kiu ajn lingvo estos mondvaste adoptita, "Ĝi devas esti farita" en la stilo de Esperanto anstataŭ evolui dum jarcentoj kiel naciaj lingvoj. La Konsilantaro reprezentanta ĉiujn naciojn kies tasko estos konstrui la reviziitan universalan lingvon forte pensigas, ke la sukcesa kandidato jam ekzistas sed ĝi ankoraŭ ne estas perfekta. Igi ion perfekta ne supozigas drastan kirurgion. Povas esti io kosmetika kiel plasta ĥirurgio al Esperanto-supersignoj aŭ plibonigo de tro similaj pronomoj kaj literoj aŭ forigo de ne necesaj neologismoj. Mi ne scias sed oni devus resti larĝmensa, ĉar lingvoj estas vivantaj estaĵoj kiuj ŝanĝiĝas. Mia bona amiko kaj nuna sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo, Bernhard Westerhoff, klare spekulativas, ke la fina rezulto estos ia reformita Esperanto. Je tia solvo, interese samtempe estus elektita lingvo jam ekzistanta, artefarita kaj nove kreita.

Kvankam 'Abdu'l-Bahá ofte admonis nin studi Esperanton, Bahá'u'lláh ne permesis al li rektan respondon al lia amiko de jes aŭ ne pri la onta rolo de Esperanto kiel universala helpa lingvo, ĉar Bahá'u'lláh rezervis tiun distingon al la Universala Domo de Justeco kaj la parlamentoj de la mondo. La historiaj kaj decidigaj mondrenkontiĝoj, al kiuj la Bahaaj Sanktaj Skriboj aludas, kies celoj estos la stablo de mondpaco kaj la elekto de universala helpa lingvo, kompreneble inkluzivos la opiniojn de malplimultoj. "Por provizi kompletan interkomprenon inter la popoloj, universala helpa lingvo estos adoptata. En la lernejoj de la estonto du lingvoj estos instruataj - la gepatra lingvo kaj tiu ĉi internacia helpa lingvo, kiu estos aŭ unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ nova lingvo konstruita el vortoj de ĉiuj lingvoj - la afero estos decidata de koncilio (konsilantaro) renkontiĝanta por tiu celo kaj reprezentanta ĉiujn tribojn kaj naciojn."⁶⁹ Grava bahaa leĝo, foje konata kiel 'pozitiva rasismo', montras nian firmecon ke vidpunktoj de malplimultoj plene evidentiĝu. Se du homoj en bahaa balotado akiras voĉojn egalnombrajn, aŭtomate sukcesas tiu kiu reprezentas malplimulton.

Por soleni la 50^{an} datrevenon de Unuiĝintaj Nacioj, la Bahaa Internacia Komunumo publikigis historian deklaron titolitan *Turnopunkto por Ĉiuj Nacioj* en kiu estas konkretaj proponoj pri la kunvokado de tia konsilantaro menciita en la supraj citaĵoj.

⁶⁹ BEL *Bahaismo kaj Esperanto* p.30. Frankfurto 1997.(Vortoj de 'Abdu'l-Bahá.)

La tiutema lingva parto troviĝas sur paĝo 91 de tiu ĉi libro kaj la titolo de tiu impona verko de BIK indikas ĝian gravecon. Sampaĝe prezidanto Enderby de UEA laŭdas *Turnopunkto por Ĉiuj Nacioj*. Aparta kaj entuziasma aludo estis farita en ĝi al la Esperantistaro. Oni povas havigi la tuton de tiu dokumento, havebla en multaj lingvoj, ĉe bahaaj centrejoj tra la mondo. Bonvolu kontroli en via telefonlibro sub la rubriko "BAHÁ'Í."

Ekde la disfalo de la Berlina Muro en 1989 multaj fenestroj jam malfermiĝis el la eksa soveta bloko al la Okcidento. Por multaj homoj en la komunistaj landoj nur Esperanto donis ĝis lastatempe kontakton al moderna memstara pensmaniero. Post tiu tempo dum pliboniĝo de ĉiuj komunikiloj, multaj Verdstelanoj speciale de la iama soveta bloko amase spertis la influon de okcidentaj lingvoj, aparte la hegemonion de la angla. Rezulte de tio, bahaanoj kiuj deziras ŝtopi la truojn, estos bonvenigitaj de la malpli granda sed sincera kaj aktiva koro de la Esperanto-movado, kiun D-ro Zamenhof tiom sinofere establis. Ĉu la Sinjoro ne ĉiam altigas humilulojn laŭ Sia plaĉo! Siaflanke Esperantistoj ĝojos ree aŭdi la ridadon de multaj feliĉaj infanoj kaj Dio-timantaj kaj amantaj familioj, kiam ni kune lernos ĉi tiun unikan kaj trezoran lingvon. Nur tiu kuna penado revivigos Esperanton laŭ mia opinio. "Tiom forta estas la lumo de unueco, ke ĝi povas lumini la tutan Teron."⁷⁰

rolo de perfektigota komuna lingvo iganta pacon

Novembre 1911 'Abdu'l-Bahá kunligas mondpacon kun la lingva demando kaj Esperanto.

UNIVERSALA PACO

4 Avenuo de Camoens, Parizo.

"La popoloj kaj registaroj de ĉiuj nacioj devas fondi superan tribunalon, formitan el membroj, elektitaj el ĉiu lando kaj registaro. La membroj de tiu granda konsilantaro devas kunsidadi en harmonio. Ĉiuj disputoj, havantaj internacian karakteron, devas esti submetitaj al juĝo de tiu ĉi tribunalo, kies tasko estos decidi per arbitrado pri ĉio, kio aliokaze povus esti kaŭzo de milito. La misio de tiu ĉi tribunalo estos antaŭgardo kontraŭ militoj.

"Unu el la plej grandaj paŝoj al universala paco estus akcepto de universala lingvo. Bahá'u'lláh ordonas, ke la servantoj de la homaro kunvenu kaj aŭ elektu iun el la ekzistantaj lingvoj, aŭ kreu novan. Tio ĉi estis malkaŝita en *Kitáb-i-Aqdas* antaŭ kvardek jaroj. Estas tie montrite, ke la problemo de la diverseco de la lingvoj estas tre malfacila. Estas pli multe ol okcent lingvoj en la mondo, kaj neniuj homoj povus ellerni ilin ĉiujn.

"La nacioj de la homaro ne estas plu tiom apartigitaj, kiom en la pasintaj tempoj. Por esti en proksima rilato kun ĉiuj landoj, estas necese scii paroli iliajn lingvojn.

⁷⁰ *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh* p.288. Bahá'í Publishing Trust Londono 1978.

"Lingvo universala ebligis interkomunikiĝadon kun ĉiu nacio. Tiuokaze ni bezonus koni nur du lingvojn: la gepatran lingvon kaj la lingvon universalan. La lasta donus al homo la eblon komunikiĝi kun ĉiu homo en la tuta mondo!

"Tria lingvo ne estus bezonata. Havi la eblon paroli kun membro de ĉiu nacio kaj lando sen interpretisto — kia helpo kaj oportuneco por ĉiu!

"Esperanto estis kreita por tiu ĉi celo: ĝi estas bela elpenŝaĵo kaj bonega verko, sed ĝi bezonas perfektigon. Esperanto en sia nuna formo estas tre malfacila por kelkaj.

"Oni devas kunvoki internacian kongreson, konsistantan el delegitoj de ĉiuj nacioj de la mondo, tiel okcidentaj, kiel orientaj. Tiu ĉi kongreso devas formi lingvon, facile elerneblan por ĉiu, kaj ĉiu lando profitos per tio multe da bono.

"Antaŭ ol tia lingvo estos uzata, la mondo plue sentos grandegan bezonon de tiu interkomprenilo. La differenceco de lingvoj estas unu el la plej fruktodonaj kaŭzoj de malsimpatio kaj malfido, ekzistantaj inter la nacioj, kiuj tenas sin aparte unu de alia pli pro la neebleco kompreni la lingvojn unu de alia, ol pro iu ajn alia kaŭzo.

"Se ĉiu povus paroli unu lingvon, kiom pli facile estus servi al la homaro!

"Tial respektu Esperanton, ĉar ĝi estas la komenco de la efektivigo de unu el la plej gravaj leĝoj de Bahá'u'lláh, kaj ĝi devas daŭre pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi."⁷¹

Ni analizu tiujn "mankojn" de Esperanto menciitajn de 'Abdu'l-Bahá. Kial ĝi estas la sola lingvo, kiun li insiste petis nin perfektigi? Sub la titolo 'Universala Paco' li emfazis, kiel lia Glora Patro faris en *Gleanings CXVII* la ligon inter la fino de militoj kaj la principo de universala helpa lingvo. Li laŭdegis la motivon de la laboro de D-ro Zamenhof kaj liaj lastaj vortoj instigis agnoskon de tiu ĉi efika lingvo; alte estimi ion, esti sentema kaj dankema pri ĝi kaj kreskigi la valoron estas veraj difinoj de "respektu." Jen li inspiras nin studi Esperanton. La diro de 'Abdu'l-Bahá ke ni bezonus koni nur du lingvojn, la gepatran lingvon kaj la lingvon universalan, ŝajnas enhavi en si la ideon, ke la lingvo universala estos nenies gepatra lingvo.

Ĉu ni bahaanoj rajtas atendi, ke Esperantistoj tutsole senhelpe faru tian perfektigadon? Nur per konsultado kaj interna kunlaboro ni konstatos, por kiuj Esperanto estas tre malfacila kaj kiel ĝuste bonigi la problemon en tutrepresentanta konsilantaro. Takto, saĝo, amikeco, humileco kaj preĝeco nepre devos esti elmontritaj dum la nombro da parolantoj pligrandiĝas. Kaj la bahaanaro kaj la esperantistaro devus rememori la internan ideon de niaj Movadoj dum samtempa meditado pri niaj realaj geherooj, kiuj jam antaŭiris nin.

Tia monda komunumo diversa, forta kaj kreskanta kia la bahaa komunumo povas injekti en Esperanton spertojn el ĉiu lando kaj regiono de la Tero. Se ni estas en la Esperanto-movado kaj montras nian bahaan interkonsultmetodon, en kiu tabligitaj ideoj

⁷¹ 'Abdu'l-Bahá. *Parizaj Paroladoj* p. 87, 88. Tradukis Lidia Zamenhof.

tuj iĝas komuna posedaĵo, niaj kunaj penoj kaj sinoferoj estus la katalizilo por vigligi generacion de skeptikaj gejunuloj kaj por spirite veki cinikan mondgazetaron.

Nia kunligota, neŝancelebla kaj daŭra subteno de ambaŭ organizaĵoj havas perfektigantan kaj lumigontan potencialon.

"Tiu ĉi lingvo estas disvastigota kaj laŭgrade universaliĝos, sed poste pli kompleta lingvo aŭ la sama submetiĝos al modifoj kaj ŝanĝoj, kaj ĝi estos adoptita kaj fariĝos universala."⁷²

Niaj preĝoj kaj individua agado povas pliproksimigi tiun "poste", kiam altranga Internacia Kongreso aŭ Konsilantaro kun la helpo de la Sinjoro ĉi tiun pratempan kaj disigitan problemon finfine solvos. Bahaanoj opinias, ke baldaŭ terglobaj okazaĵoj plu montros la urĝecon de mondpolitika paco, kaj la principo de universala helpa lingvo ludos gravan rolon en tiu procezo. Kvankam neniu nacia lingvo ŝajne konformas al la deziroj de 'Abdu'l-Bahá pri universala helpa lingvo, oni devus kompreni, ke tiu Internacia Kongreso, kiun li rekomendis, havos la rimedojn kaj lertojn rapide enkonduki tute novan mondlingvon; speciale se oni konsideras la belegan ekzemplon jam starigitan danke al Esperanto. Estus tragedio se iuj obstinaj esperantistoj neniel konsiderus la eblecon, ke la Internacia Lingvo povus bezoni ŝanĝojn aŭ ŝanĝetojn. Laŭ miaj multaj travivaĵoj en Esperantujo tia malcedemo evidentiĝas en eta sed ekstermodere voĉa malplimulto de esperantistoj.

ĉu ni rajtas prokrasti?

Tiu ĉi emfaza demando pri prokrasto apud la supra citaĵo de 'Abdu'l-Bahá, en kiu li prezentas al ni gravan elekton, kuŝas en la propra konscienco. Ekster konsideroj de konscienco, kiajn ajn protestojn oni faru, temas pri demando, ne juĝo. Ĝis tiam kiam la Universala Domo de Justeco igas antaŭen la urĝecon de mondhelpe lingvo, la demando restu privata por ĉiu bahaano. Tio ne rajtigas al ni ignori la "lingvan bombon", ĉar ĝi estas fundamenta principo de la Bahaa Kredo. La principo de unueco kiu ampleksas la leĝon de universala kaj individua respondeco signifas, ke prokrasti kaj ŝanceliĝi rilate tiun temon prokrastas la tagon de unueco kaj verdiktas, ke multaj homoj restu en sia nuntempa stato de mankoj. Mia libro klopodas akceli diskutadon de la lingva problemo, reaktivigi la studadon de la Internacia Lingvo en la ĝenerala bahaa komunumo, kaj malkovri la efikecon de la Bahaaj Sanktaj Skriboj por la Esperantistaro. Per mia skizo de la agrablaj koincidoj ligantaj la Bahaan Kredon kaj Esperanton al la monda paco mi penas montri la gravecon de la demando. Ne eblas gajni rezultojn sen profunda sindemandado kaj sinekzamenado sekvata de neskuebla kaj persista agado laŭ la propraj kompetenteco kaj rimedoj. Pri miaj propraj motivoj mi kredas, ke avantaĝo de unuopulo estas plej bone certigita per avantaĝo kaj samtempa progreso de la tuta grupo.

⁷² *Tablets of 'Abdu'l-Bahá* vol 111, p. 692 (pri Esperanto) Tradukis. Steele kaj Desailly.



Bildo 23 – **Rúhíyyih Khánum.**

(Naskita Mary Sutherland Maxwell; nomumita Mano de la Afero de Dio en 1952.
Ŝi prezentis en 1985 *La Promeso de Monda Paco* al lia ekscelenco
Javier Perez de Cuellar, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

Rúhíyyih Khánum edziniĝis al Shoghi Effendi en 1937, kiam ŝi havis proksimume 25 jarojn. Ilia geedziĝo sigelis la unuecon de la Oriento kaj la Okcidento proklamitan de la Bahaa Kredo. Ŝi servis kiel lia sekretario kaj verkis en 1969 lian biografion *The Priceless Pearl*. Rúhíyyih Rabbani⁷³ ĝis antaŭ nelonge vojaĝis kaj ankoraŭ sinofere okupiĝas por la Bahaa Kredo. Inter ŝiaj faroj estis multaj malfacilaj ekskursoj al izolitaj lokoj por viziti indiĝenajn popolojn. Ŝi estas poligloto kiu agnoskas, ke la celo de esperantistoj estas monda paco. (Red. La 19an de januaro 2000 ŝi mortis en Hajfo.)

la Universala Domo de Justeco konfirmas la lingvan rolon por gajni mondpacon

Mesaĝo de la Universala Domo de Justeco, *La Promeso de Monda Paco*, dotita al la popoloj de la mondo, aperis en 1985. Ĝi emfazas ke ni atingis "tiun krizan tempon, kiam la gravaj problemoj sin trudantaj al la nacioj fariĝis komuna concernaĵo por la tuta mondo, ne kontraŭbatali la tajdon de konflikto kaj malordo estus senkonsciencie senrespondeca." Ĝi konfirmas ke "kiajn ajn suferojn kaj tumultojn la venontaj jaroj alportu, kiom ajn malhelaj estu la cirkonstancoj de la tuj proksima estonteco - la bahaa komunumo kredas, ke la homaro povas alfronti tiun ĉi severan juĝon kun fido je ĝia fina rezulto." Ĝi malkaŝas "la plej altan celon neeviteblan, la unuiĝon de ĉiuj homoj de la mondo en unu universala familio" kaj ke monda politika paco, la Minora Paco, inaŭguros tion. Tiu ĉi Minora Paco estos tiom firme establita inter la nacioj, ke ĉiu homo konsideros sin parto de unu sola mondo. Ĝi priskribas la necesajn principojn en tiu komplikita procezo. Al unu principo sur paĝo 12 de la sama dokumento ĝi koncize

⁷³ Oni ofte prezentas Rúhíyyih Rabbani kun respekto kiel Rúhíyyih Khánum.

kaj gravege transdonas la respondecan rolon jene – "Fundamenta manko de interkomunikado inter popoloj serioze subfosas la strebon al monda paco. Adopto de internacia helplingvo grandparte kontribuas al la solvo de tiu ĉi problemoj kaj postulas urĝegan priatenton." (Vidu p.119) Mi ĵus uzis la vorton gravege ĉar la Universala Domo de Justeco esprimas la plej altan gradon de urĝeco al neniu alia principo en sia mesaĝo *La Promeso de Monda Paco*.

Ĉu esperanto estas tro okcidenteca ?

Multaj kiuj malaprobas Esperanton tamen kapjesas la koncepton malantaŭ ĝi pri la neceso kaj benoj de universala helpa lingvo. Ilia malemo subteni aŭ pli serioze studi ĝin, kelkfoje registrita en diversaj bahaaj eldonaĵoj plejparte de bonega kvalito, bezonas plej profundan ekzamenon punkton post punkto. Ekzemple, kvankam el sinteno de egalrajteco ne malmultaj bahaaj kleruloj kritikis Esperanton pro ties troa Okcidenteco. "Tro" estas vorteto emocioplena. Ĉu la muziko de Mozart havas tro da notoj? Ĉu ekzistas tro da homoj sur la Tero ?⁷⁴ Tre logika refuto pri troa Okcidenteco kaj la nomoj de bahaaj libroj, al kiuj mankas eksciteco al Esperanto, legeblas en la aldonaĵo de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* sur paĝo 281. Ties aŭtoro lerte demonstras malkonsekvencecon de tro Okcidenteca atako kontraŭ Esperanto, se oni poste subtenas la anglan aŭ la hispanan kiel mondlingvon. Simila nedefendebleco evidentiĝas pri Orienta kandidato. BEL aldone klarigas, ke kelkaj kritikistoj de Esperanto havas rudimentan scion de la Internacia Lingvo. Priskribinte Esperanton aŭ iun ajn konatan lingvon ne sufiĉe afrikan, ne sufiĉe indiĝenan, ne sufiĉe orientan, ne sufiĉe persan ktp, ni povus senfine intermiksi la plendojn ĝis ni eliminus ĉiujn eblecojn. Profesoro Claude Piron respondas al similaj plendoj en sia libro *La Bona Lingvo* (Pro Esperanto. Vienna 1989) en ĉapitro ses kaj sur paĝo 85. Ne pravigeblas fari negativajn esprimojn kontraŭ altruismaj ideoj kiel Esperanto krom se oni inteligente proponas lertan alternativon. Neniu monda helplingvo estos egale lern-facila al ĉiuj homoj aŭ homgrupoj. La vera demando kiun oni devas fari estas, kompare kun aliaj lingvoj kiom facila estas lerni Esperanton? Bahaanoj malĝuste konsideras la tre Okcidentan anglan lingvon en la rolo de mondlingvo, se oni ne draste modifus ĝin. La ecoj de tia mondlingvo precizigitaj de 'Abdu'l-Bahá sur paĝo 49 de ĉi tiu teksto nepre malpermesas tian eblecon.

D-ro Zamenhof, sperta poligloto kiu flue legis kaj skribis ekde sia kvina naskiĝtago, komentis pri Esperanto. "Simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj

⁷⁴ La statistiko malkaŝas ĉirkaŭ 2.5 homojn po km² en Aŭstralio kaj Kanado; 25 homojn po km² en Usono; 125 homojn po km² en Ĉinio; 250 homojn aŭ pli po km² en Anglio, Japanio, Nederlando kaj aliaj landoj. El la multaj kiuj plendas pri la ĉiam kreskanta loĝantaro de la Tero, malmultaj el ili rezonas, ke tro da homoj situas en Anglio, Japanio aŭ Nederlando ktp pro la riĉeco tie, nek ili proponas, mi esperas, ke la "trouloj" devus iel estingiĝi. Je la kosto de malriĉaj kaj malfortaj landoj kaj per ekspluatado de ties indiĝenoj la historio pravas, ke multaj riĉaj landoj gajnis sian riĉecon. Kelke da niaj realaj etikaj problemoj nuntempe koncernas nian maljustan distribuadon de la abundaj teraj materialoj kaj la malmoralecon de tiaj varoj, (ekz. tro da aŭtoj kaj armiloj) kiajn ni nun produktas kaj ne reutiligas aŭ dividas. Plie, neniu scias kiom da senvortigitaj geniuloj kiel Einstein kaj Beethoven dormas latentaj inter la nehavuloj. Ili bezonas tiujn rimedojn por edukado kaj sanzorgado. Ili rajtas, ĉu ne!

popoloj."⁷⁵ Gramatike Esperanto estas sennacieca kaj havas similaĵojn al aglutinaj lingvoj kaj izolaj lingvoj respektive ekz. la turka kaj la ĉina. La tre fleksebla vortordo de Esperanto estas tute internacia kiel la rajto de la parolanto konstrui siajn proprajn vortojn ene de facile rekonebla kaj internacia aro da afiksoj, kombinaĵoj kaj reguloj. Tiuj prefiksoj kaj sufiksoj ktp donas gamon de artaj kaj sciencaj nuancoj al Esperanto sen la ŝarĝo de laciga vortaro. Oni ne rajtas imagi, ke la simpleco de Esperanto limigas ĝian esprimopovon. Havante nur 16 bazajn regulojn gramatikajn, Esperanto estas genie malkomplika, ne fuŝe simpla. Ek de 1905 Universalaj Kongresoj, en kiuj miriadoj da nacioj partoprenas, jam montris la kapablon de la lingvo proze aŭ poezie esprimi la tutan skalon de homaj pensoj kaj emocioj, de la banala ĝis la profunda. Konsentite, la Esperanto vortstoko ĉefe devenas el hind-eŭropaj lingvoj, sed Esperanto principe kaj fakte akceptas radikvortojn el ĉiu ajn lingvo. Moderna Esperanto enhavas specife afrikajn, aziajn, amerikajn kaj aŭstralaziajn vortojn. Kontraste al la hind-eŭropa grupo da lingvoj, elfosi komunan fonton el aziaj vortradikoj estas malfacile. Esperanto estis konstruita dum la koloniisma erao, kiam la eŭropaj potencoj regis la mondon, eĉ Ĉinion kaj Hindion. Laŭgrade Esperanto ja havas tergloban vortaron, kiu penas doni neniun avantaĝon al specifa grandpotenco.

Jen elstara punkto; afrikaj popoloj, aziaj popoloj, sud-amerikaj popoloj kaj indiĝenaj popoloj tute povas decidi por si mem pri la universalaj ecoj de Esperanto. Mi neniam aŭdis dum miaj multaj aziaj vojaĝoj la opinion en tiu kontinento, ke Esperanto estas tro okcidenteca. Male, tiun opinion mi aŭdis preskaŭ nur de okcidentanoj, kiuj asertas tion pro ilia senco por justeco por ĉiuj. Anstataŭ fari emociajn pledojn en la nomo de orientanoj kaj aliaj ni konsciu la malneceson de tiel nomata "advokato de la diablo"* en la aŭtentike demokrata Esperanto-movado. Regas en Esperantujo "konsultado kaj kompatado", kiujn priskribas Bahá'u'lláh - "la ĝemelaj brilegoj de saĝeco."⁷⁶

* (Laŭ anglalingvanoj kaj aliaj tiu kiu montras pekojn de homo, por ke la vero evidentiĝu.)

la angla, la religio, la scienco kaj la politiko

(vidu ald. 6: **Dio ekzistas?**)

Bahaanoj aksiome agnoskas, ke la hodiaŭa ordo baldaŭ estos envolvita kaj nova ordo disvolvita anstataŭe. Tio signifas ke nia tuta sistemo alfrontas nekredeblan ŝanĝon. Sekve, oni mallogike kredus ke la ĉefa lingvo de la malnova ordo venkos. Mi ne scias, kial multaj bahaanoj ne inklinas cedi ŝanĝojn al nia aktuala lingva ordo. Fortigante mian propran starpunkton, la Esplordepartemento de la Universala Domo de Justeco skribis en 1995: "Estas, tamen, nenio en la bahaaj instruoj kio sugestas, ke la angla fariĝos la Internacia Helpa Lingvo."⁷⁷

Nuntempe neniu lingvo ricevas aktivan subtenon de la institucioj de la Bahaa Kredo por iĝi la oficiala internacia helpa lingvo. Al la angla tute ne estas postulata ion pravi por defendi sin. Neniu gepatra lingvo estas minacata de neŭtrala helplingvo, ĉar

⁷⁵ D-ro L.L. Zamenhof. *Fundamenta Krestomatio* p. 248. 11a eldono. Esperantista Centra Librejo. 1927. Parizo.

⁷⁶ Bahá'u'lláh *Tablets of Bahá'u'lláh* p. 242. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1988.

⁷⁷ BEL *Bahaismo kaj Esperanto* p.50. Frankfurt 1997.

‘helpa’ estas la ŝlosila vorto. Tial la debato restu objektiva, eĉ se tiklaj demandoj leviĝas. Pli ol miliardo da homoj uzas la mandarenĉinan lingvon kaj centoj da milionoj parolas la anglan, hindan lingvon aŭ la hispanan, tial, ni devus reciproke rimarki la inversan proporcion sen tian scipovon. Elektinte unu el tiuj lingvoj, ni baldaŭ konscius, ke 80% - 90% de la mondcivitanoj kompreneble sentus sin diskriminaciaj ĉar iu grupego da nacirolantoj ricevis nepravigeblan favoron.

Pro la kolonia pasinteco kaj onidira financa rego ankoraŭ en la manoj de elito de angleparolantaj financistoj, multaj homoj forte kontraŭus la anglan kiel taŭgan kandidaton en la rolo de mondhelpla lingvo. Se eblus modifi la anglan laŭ la kriterio de 'Abdu'l-Bahá, tiel ke ĉiuj povu uzi ĝin, multaj denaskaj parolantoj refoje sentus negative pri la sensuka angla lingvo, kiu necese devus anstataŭi la neregulan, seksisman kaj idiotisman originalon. Neŭtrala, helpa, internacia lingvo kiel Esperanto aŭ simila, juste elpensita por egaluloj, evitus tian ostracismon. Eŭropanoj ofte aludas al Esperanto kiel 'la latina de la popolo' por montri ĝian egalecon.

Ĉu la angla vere universaligas preter la internaciaj kompanioj kaj fluglinioj kaj turistaj lokoj kaj riĉaj lernejoj kaj universitatoj? Por bahaanoj la vorto ‘universala’ signifas helpan lingvon por ĉiuj, por ke kamparanoj, malriĉuloj kaj indiĝenoj unufoje por ĉiam ricevos justan ŝanĉon. Proksimume du trionoj de la monda loĝantaro formas senprivilegian plimulton. Malkomplika mondhelpla lingvo donos al ili oportunon ricevi bonan edukadon. Laŭ la vortoj de tiu heroo esperantistino, Martha Root, kiu estis bahaa vojaĝanta instruanto kaj pioniro tra la tuta mondo: "Al vojaĝantoj renkontintaj la registrojn kaj amasojn en diversaj landoj estas evidente, ke ĉiu ajn nacia lingvo estas kaj ne akceptinda kiel universala helplingvo kaj ne taŭga. Krome ĝi ne konvenas al la internacia pensmaniero de nova universala ciklo."⁷⁸ Tio estas same evidenta al tiuj, kiuj instruas la anglan eĉ al privilegiitoj tra la mondo. Dum vizito al Japanio, kie la angla lingvo jam estas oficiale kaj devige instruata dum multaj jardekoj je mezlerneja nivelo, oni konstatas la malfacilaĵojn de instruistoj kaj la konsternon de gestudentoj. Kiel diplomita kaj sperta internacia instruisto de kaj la angla kiel fremda lingvo kaj Esperanto en lernejoj kaj universitatoj, laŭ mia takso instrui ĉi tiun estas kvinoble pli rekompence kaj relative facile por studento same kiel por instruisto.

La rimedoj, energio kaj tempo bezonataj por instrui kaj lerni komplikajn lingvon kiel la anglan estas egaj, speciale se oni troviĝas ekster angleparolanta lando. Estas evidente ke la plejmulto, escepte de riĉuloj, relative riĉaj homoj, internaciaj vojaĝantoj, profesiuloj kaj lingvistika inteligentaro, rezistas kaj malsukcesas lerni la senlimajn komplikaĵojn de ĝiaj prononco kaj ortografio. Antaŭ nelonge artikolo de profesoro Piron *La Valoro de Esperanto* atentigas, ke esplorado farita en okcidenta Eŭropo montras, ke nur 6% de la loĝantaro tie vere komprenas normalan tekston en la angla. Plue, nur 1% de ĵusaj mezlernejanoj povas ĝuste sin esprimi. Li montras la malĝustecon de la kredo, ke la angla solvas la lingvan problemon per simpla demando. Se la angla estas tia panaceo, kiel multaj asertas, kial UN kaj EU devas elspezi tiom da mono por traduki kaj interpreti, eĉ monsumon kiu pli dece estus uzata de iliaj

⁷⁸ Wendy Heller *Lidia* p. 64-65 George Ronald Oxford 1985. (tradukis: Steele/Desailly)

homhelpaj fakoj? Estas nek juste nek praktike instrui al miliardoj da malriĉuloj mondhelpan lingvon, kiu estas simile aŭ eĉ pli malfacile lernebla ol la propra lingvo, alie la vorto 'helpa' iĝas absurda. Nur edukado sole, kiu nepre levas la lingvan demandon, povas realigi ilian potencialon. Ĉar justeco estas la plej amata virto super ĉio en la okuloj de Bahá'u'lláh, ni devus demandi nin, kia maljusteco daŭrus por malriĉuloj, se oni subtenus la anglan kiel universalan helpan lingvon, kiam pli da homoj jam parolas la ĉinan kaj hispanan kiel unuan lingvon?

En la Bahaaj Sanktaj Skriboj ni legas, ke pere de universala helpa lingvo sciencoj kaj artoj disvastiĝos inter la nacioj kaj ke per ĝi ĉiu nacio en la estonteco povos elserĉi tre facile siajn sciencajn eltrovaĵojn kaj ke ĝi forigos nescion kaj superstiĉon, pro tio, ke ĉiu infano povos sekvi studaĵojn pri scienco kaj arto.

La scienco estas kampo, en kiu la skriba formo de la angla jam preskaŭ venkis. Eble pli ĝuste dirite, novaj eltrovoj kaj iliaj sekvoj estas raportataj kaj registrataj en la plej sukcesa lingvo de la mondo ĝis nun, la angla. Multaj sciencistoj kaj teknikistoj ekzemple en la Oriento povas angle verki, foje per helpo de lingvisto, sed ili ofte apenaŭ kapablas paroli koheran frazon en tiu lingvo, se ne temante sciencon. Ĉu tio estas akceptinda rolo por vere universala helpa lingvo?

Bahaanoj asertas, ke la nova teĥnologia scienco naskiĝis en la jaro 1844 en Baltimore kaj Washington D.C. Laŭ la volo de Samuel Morse la unua oficiala telegraf-mesaĝo estis elsendita en tiu neforgesebla Majo per citaĵo el *La Sankta Biblio*. Tiu unua frazo per la nova aparato estis - "Kion Dio estas farinta?" En Ŝiraz, Persio preskaŭ samtage Báb kvazaŭ per rekta respondo iniciatis novan Revelacion de Dio. (vidu p. 65)

Laŭ multaj la plej elstara scienca geniulo de abstrakta pensado en nia tempo estis Profesoro, kiu flue uzis la anglan kaj havis spriton egalan al liaj sciencaj kaj muzikaj scioj. Tion montras filozofiaj eldiroj kaj epigramoj liaj, ekzemple:

"La pleja nekompreneblaĵo pri la mondo estas ĝia komprenebleco." Dum fame konata intervjuo, en kiu gazetisto pridemandis lin, kiajn armilojn oni uzus en tria mondmilito, Einstein respondis, ke tion li ne certe scias, tamen li sciigis al la ĵurnalisto, ke dum kvara mondmilito oni batalos per klaboj kaj ŝtonoj. Jen kion li mem diris pri la valoro de mondlingvo. "Por la internacia komunikado la internacia interkompreniĝo helpe de la internacia lingvo ne estas nur neceso, sed memkomprenebla afero. Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de la lingvo internacia." (Vidu la duan eldonon de *Pri Internacia Lingvo Dum Jarcentoj* de Ysaj Dratwer sur p118, 1977, Tel Aviv.) Apud la fino de sia vivo, kiam oni akuzis lin de iuj ekstravagancoj, Profesoro Einstein skribis en 1950, laŭ esperantisto William Solzbacher, ke li neniam estis subtenanto de Esperanto. Tamen, en 1923 kiam okazis SAT-Kongreso en Kassel li estis ĝia Honora Prezidanto. SAT estas eduka kaj filantropa organizaĵo, kiu kontraŭstaras naciismon kaj subtenas internaciismon pere de Esperanto. La vortoj kaj agadoj de Profesoro Einstein dum preskaŭ sia tuta vivo montras, ke li admiris la samajn celojn. Per bela angla prozo en la ĉi suba eltiraĵo Profesoro Albert Einstein koncizigis siajn religiajn sentojn kaj tiujn de siaj elstaraj kolegoj kaj li samtempe eĥis tion kion bahaanoj amegas.

"Vi trovos apenaŭ unu inter la plej profundpensaj sciencistoj sen propra religia sento. La scienciston obsedas sento pri universala kaŭzado. Lia religia sento alprenas la formon de ekstaza mirego pri la harmonio de la natura leĝaro, kiu malkaŝas inteligenton de tia supereco, ke kompare kun ĝi la tutaj sistemaj pensado kaj agado de la homoj estas absolute sensignifa respegulaĵo. Tiu ĉi sento estas la gvida principo de liaj vivo kaj laboro. Ĝi sendube parencas al tio, kio animis la religiajn geniulojn de ĉiuj epokoj."⁷⁹

Tiel la profesoro parafrasis kelkajn bahaajn principojn inkluzive la harmonion de la scienco kaj vera religio. Lia lasta frazo aludas al tiu spirita interligo de ĉiuj Grandaj Fondintoj de religioj, kiun bahaanoj nomas "progresiva revelacio."

Dum kvaronjarcento mi estis obstina ateisto, ĉar mi opiniis tiel: Se amanta kaj potenca Dio dece zorgus pri ni, ekzistus nur unu religio kaj Liaj reprezentantoj neniam permesus senfinajn religiajn militojn kaj pedantajn religiajn argumentojn. Apenaŭ utilas fronti demandon de harmonio inter religio kaj scienco se oni tute neas la ekziston de Dio. Malsimile al la generacio de mia juneco el la 60^{aj} jaroj kiam plimulto de influhavaj sciencistoj estis ateistoj kaj agnostikuloj, multaj hodiaŭaj sciencistoj opinias, ke jes ja estas aŭ almenaŭ estis ia Dio kiu igis komenci la universon. Tamen, Li jam de longe forlasis la aferon kaj la tutan kreaĵaron al ties propraj problemoj, por ke Li atentu siajn nuntempajn interesojn. Bahaanoj kredas ke la nekonebla esenco de Dio estas ekster nia limigita scio de tempo kaj spaco. La Kreinto de eterne ĝis eterne estas atente direktanta ĉiujn aferojn eĉ antaŭ Genezo kaj la komenco de la universo.

Sciencistoj de ĉiuj fakoj aprezas nun la manon de Dio, kiu ĉion ekigis sed multaj el ili ankoraŭ opinias ke tiu mano nuntempe estas vanta aŭ ne plu gravas. Egale kaj ne arbitre estas malkaŝataj signoj de Lia povo al astronomoj, nukleo-fizikistoj, antropologoj, geologoj, biologoj ktp. Ĉiuj el ili en ĉiu generacio malkovras sciencajn verojn. Tiuj veroj priskribas diversajn aferojn kaj tempojn. Povas esti ke biologo konscias Dian fingron, kiam rampis el la maro vivantaj estaĵoj sur la teron. Dume antropologoj regule observas similan Dian rolon en la penoj de ĉiuj pratempaj socioj interrilati kun la supernatura. Oni do mallogike pretendus ekzemple, ke jes mi agnoskas Dian impulson en mia fako de la scienco je aŭ ĵus antaŭ kiam la universo naskiĝis, sed poste Dio iĝis fora aŭ vanta: Mallogika pro tio ke ĉiuj fakoj de la scienco diversmaniere vidas similan Lian ĉian potencon rilate al ĉiuj epokoj. Apenaŭ eblas, ke tia malproksima, fora kaj malvarma Dio, estis la inspiro pelinta Budhon, Jesuon, Mahometon ktp. La historio de la homaro estas nura momento kompare kun la epokoj ek de kiam Dio supoze forlasis nin kaj nian universon. 'Abdu'l-Bahá iam diris al ateisto, ke al la dio je kiu tiu ne kredas, ankaŭ li mem ne fidis.

Akceptinte ke ni ĵus ekiras la vojon senliman de la scienco, ni sen orgojlo rekonu ke ni scias preskaŭ nenion. Ju pli mi lernas des pli mi agnoskas mian sencion, des malpli mi pretendas scii Diajn misterojn. Ne ni sed Li estas la senerara Juĝisto. Nur tiu kiu estas la partnero de Dio insistus ekzemple, ke Dio ne havis rajton allasi naziajn ekstermejojn. Nia devo estas montri malbonegojn de la naziistoj, emociiĝi simpatie antaŭ la mizero

⁷⁹ A. Einstein. *Ideas and Opinions* p.40. New York. 1954. Bonanza Books. (tradukis : E. Chick)

de ĉiu viktimo kaj helpi ilin. Plie nia ĉefa tasko estas senĉese batali por malebligi similajn kaj aktualajn krimojn kontraŭ la homaro. Tamen, abomenaj faritaĵoj de homoj neniel pravas la foreston de Dio, same kiel ŝajne idilia vivo de riĉuloj en tropika paradizo ne pravas Lian proksimecon tie.

Multaj pensuloj nun opinias, ke la scienco sen la gvida mano de religio kondukas nian socion en abismon de materialismo laŭ ambaŭ signifoj de la vorto. Tiel malforta kaj malrespektata estas la lumo de religio hodiaŭ ke oni nomas etikon scienco. Inverse ni konstatas el la kronikoj de la historio, ke religio sen la lampo de scienco misgvidas nin al dogmoj, ritaro kaj superstiĉoj. Cetere, ĉu ne jam estas tro da religioj, do kiamaniere scii la ĝustan? La intrigo komplikiĝas per ĉi tio, ke ĉiu el ili postulas por si senerarecon. Do kion fari? Antaŭ ĉio oni devas fari enketojn pri la vero por si mem. La luma ekbrileto de la vero evidentiĝos el la kontraŭstaro de malsimilaj opinioj, same kiel sciencistoj devenigas konkludojn el eksperimentoj. Ĉiu homo unuope en si mem povas rekoni la veron, sed nur per konstanta esplorado kvazaŭ sciencisto.

Vera religio, substrekante la vorton vera, instruas, ke la interna ideo de amo kuŝanta ĉe la kerno de ĉiu religio pravas. Ĉiuj Fondintoj de veraj mondreligioj konfirmis la saman leĝon de amo, kiun Iliaj Antaŭuloj proklamis: "Amu proksimulon kiel cin mem." Ili pruvis per Sia plenumo de profetaĵoj kaj per Siaj vivoj, vortoj kaj fruktoj, ke efektive estas nur unu religio; religio de la unusola vera Dio. Atestis Ili, ke ankaŭ vero estas nur unu tamen ĝi ne estas absoluta, ĝi estas relativa al la epoko en kiu ĝi estis malkaŝita. Tiel nur sociaj reguloj de religio ŝanĝiĝas dum restas konstantaj tiuj temantaj amon al la najbaro. La eltrovoj de Profesoro Einstein klarigas, transformas kaj eĉ anstataŭigas la leĝaron de gravito de Isaac Newton. Tamen, ili nek nuligas nek senutiligas tiujn leĝojn; male ili estas kompletigaĵoj. Tiaj eltrovoj pli perfektigas en ĉiu generacio same kiel religiaj leĝoj estas laŭvice konataj aŭ alivorte ili estas progresive revelaciitaj. Newton estis sekreta adepto de Unitarianismo kiu simile al la Bahaa Kredo subtenas la unuecon de Dio kaj la gefratecon de la homaro; ambaŭ organizoj malagnoskas la Triunuon kaj la diecigon de Jesuo Kristo. Tiuj du lastaj punktoj bedaŭrinde kaŭzis la unuajn gravajn skismojn en la Kristanismo antaŭ proksimume 1.700 jaroj aŭ eĉ en la tempo de la apostolo Paŭlo. Per niaj propraj okuloj ni nun vidas, ke la scienco multe pli rapidas ol la etiko, ĉar vera religio hodiaŭ grandskale estas malatentata. La rezulto laŭ ĉiuj Sanktaj Libroj estas nenio alia ol ĥaoso fare de niaj propraj manoj kaj volo aŭ rezulte de nia apatio.

Galileo, tiu persekutito de eklezio kiu mortis en la naskiĝjaro de Newton (1642), jene diris aforismon: "Matematiko estas la alfabeto per kiu Dio kreis la universon." Tiel ni scias, ke tiu inventisto de la astronomia teleskopo ne neis la ekziston de Dio. Liaj vivo kaj eltrovaĵoj pri la suna planedsistemo estis protesto kontraŭ hipokrituloj religiemaj, kiuj estis fakte la malo de vera religio pro tio, ke ili strebadis altigi siajn proprajn potencon, privilegiojn, preferojn kaj prestiĝon. Simile fiagas fundamentalistaj fanatikuloj perfidante Islamon per buĉado de kamparanoj ekzemple en Alĝerio kaj viktimgado de virinoj tra la Mezoriento kaj puno de morto al bahaanoj en Irano - ankoraŭfoje kaj nuntempe nur pro tio, ke ili rifuzas fornei Bahá'u'lláh-on. Por gajni kaj

reteni politikan regon la krimuloj vokas la nomon de Dio. Vera religio hodiaŭ ne enmiksiĝas en la politiko de nacio. Malĝuste do kelkaj aludas al Galileo, sen atento al liaj vortoj, por flanken ŝovi religion kvazaŭ ĝi anstataŭ multaj el ties tiel nomataj adeptoj kaj estroj maldecas. Analoga al tio estus la sensencaĵo ignori la sciencan profrezejon, kruelajn kaj danĝerajn eksperimentojn kelkfoje faritajn en ĝia nomo. Turnu vin al ĉapitro deklari de *Bahá'u'lláh* preparita en 1992 de la Bahaa Internacia Komunumo kaj eldonita de Bahaa Esperanto—Ligo por legi (1) raporton de la malbonoj faritaj en la nomo de religio (11) pri nuligo farita de Bahá'u'lláh de la pastrara aŭtoritato (111) pri Lia samtempa amo de la kardonemaj laboroj faritaj de sinceraj pastroj kiujn Li nomis "okuloj al la nacioj." Koincide en 1992 la Vatikano senkulpigis Galileoⁿ. Vidu ĉapitron XII de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* por ekzemploj de religio kaj scienco en harmonio kaj malharmonio, klarigo pri la deveno de homo kaj bahaaj tezoj pri la korpo kaj la animo kaj kono pri Dio.

La historio de la scienco, inkluzive la rakonton pri George Stephenson, montras, ke vera scienco dum multaj jaroj nepre batalu kontraŭ neado kaj mokado de t.n. spertuloj. Tiaj "spertuloj" ofte spegulas la opinion de la plejmulto, tamen la vero ĉiam venkas en la pleneco de tempo, ĉar "Dio estas subtila sed Li ne estas malica" laŭ Profesoro Einstein. Timeginda sed ne malica. Jenaj vortoj de Albert Einstein tre similas al principo de la Bahaa Kredo: "Blinda estas la scienco sen religio. Sen la scienco lamas religio." Paraleloj inter vera religio kaj vera scienco estas kristalklaraj. Vera religio kaj vera scienco, laŭ 'Abdu'l-Bahá, similas al du flugiloj de la sama birdo harmonie moviĝantaj por antaŭen igi la civilizacion.

Kvankam la angla estas nuntempe uzata kiel internacia lingvo de aeronautika kaj mara navigacio kaj komunikado, multaj mortigaj akcidentoj atestas pri ĝia dialekta divido, ĝia diverseco kaj la malfacilo lerni kaj retenigi ĝin. Ekzemple, ni aŭstralianoj foje ne klare prononcas la anglan, kio kaŭzas problemetojn por britaj kaj usonaj gastoj. Imagu skotan aertrafikan kontroliston, kiu voĉgvidas pakistanan piloton kies aviadilo paneas. Tamen, ĉiuj el la menciitaj nacioj jam oficiale utiligis la anglan dum jarcentoj.

Lastatempaj teĥnologijaj progresadoj ekz. tuttera teksaĵo kaj interreto ktp, jam montris en senskrupulaj manieroj kiel malnobligi la belan anglan lingvon. Preskaŭ ne eblas por infanoj eviti fivortojn sur la "tutmonda datuma ekspresvojo." Esperanto kompreneble havas kelkajn maldelikatajn vortojn, tamen ili ĝenerale estas naivaj kompare kun la ĉieaj insultvortoj de la ĉiutaga angla. La multaj malestimigaj vortoj en la angla, ĉu ĝentila ĉu malĝentila angla, malrespektante virinojn de ĉiuj aĝoj kaj sen egalaj vortoj por insulti virojn, estas diskriminaciaj abomenoj.

Regi iun ajn lingvon neniel estas bagatelo, tamen multaj lingvistikaj spertuloj skribe asertas, ke Esperanto lerneblas ene de kvinono de la tempo bezonata por lerni lingvojn kiel la araban, la ĉinan, la rusan aŭ la anglan. Ili samtempe pruvigis, ke Esperanto plibonigas la lernadon de diversaj triaj lingvoj. Tiu ĉi pretendo jam estas bone dokumentita pri eŭropaj lingvoj. Profesoro Alan Bishop kaj lia teamo ĉe Monash Universitato en Melburno, Aŭstralio, nuntempe pli kontrolas tiun pretendon specife pri la lernakcelado de orientaj lingvoj per la propedeŭtika valoro de Esperanto. La unuaj taksoj de tiu profesia laboro en registaraj lernejoj bone aŭguras.

"Diverseco de lingvoj abunde kaŭzas malkonkordon. La funkcio de lingvo estas transigi la pensojn kaj celojn al aliaj homoj. Do ne gravas, kiun lingvon oni parolas aŭ uzas. Antaŭ 60 jaroj, en 1852, Bahá'u'lláh argumentis por unu sola lingvo kiel la plej efika rimedo por unueco kaj la fundamento de internacia intertraktado. Li skribis al la reĝoj kaj registoj de la diversaj nacioj rekomendante, ke unu lingvo estu sankciita kaj adoptita de ĉiuj registaroj. Sekve ĉiu nacio devus alproprigi la universalan lingvon aldone al la sia. Tiam la homoj bone komunikus inter si, interkonsultado estus rutina kaj streĉitecoj pro lingva diverseco estus forigitaj."⁸⁰

Malfacile imageblas, ke ĉiuj registaroj sankcios kaj adoptos la anglan eĉ en Eŭropo. Ili ŝajnas neniel pli proksimaj al tia entrepreno eĉ post la terura kaj puriga aflikto de du mondmilitoj kaj senfina debatado de la demando. La eŭropaj gvidantoj estas serioze konsiderantaj la anglan kiel tuteŭropan lingvon nur por la altaj kaj privilegiaj socitavoloj, ĉar la plejparto de la voĉrajtuloj kompreneble preferas sian propran lingvon. Aktualaj kaj konkurencaj politikistoj inklinas preferi miopajn solvojn ĝis la dato de la onta balotado kaj ili emas daŭrigi la antaŭstaton.

En la "nova mondordo" kaj lingva unueco kaj lingva diverseco devas esti samtempe konservataj. La diverseco estas politika neceso, ĉar politikistoj ne povas ne priatenti la naciajn plejgravaĵojn kaj la kulturan heredon de siaj elektantaroj. Aliflanke, kreskanta ekonomia prospero dependas de la internacia fluo de informado. Por akiri unuecon sen forferi diversecon, la tutmonda komunumo devas uzi neŭtralan, neetnan, lingvon kiel duan lingvon por ĉiu, lingvon kiu nek fordonas diversecon nek provokas lingvajn disputojn inter nacioj. Esperanto ne povas sola inspiri ordon en la naciaran ĥaoson, sed ĝi povas antaŭenigi en la tuta mondo informplenajn kaj malfermajn interdiskutadon kaj interrilatadon sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. (Tiu ĉi paragrafon angle skribis Sara Su Jones en 1992.)

'Abdu'l-Bahá elektis angleparolantan landon por diri en 1912. "Ĉie en Usono mi stimulis la bahaanojn studi Esperanton; kaj mi laŭeble penos disvastigi kaj antaŭen igi ĝin."⁸¹

kial 'abdu'l-bahá kaj shoghi effendi ne studis esperanton ?

Observinte la supran citaĵon kaj memorante la Esperanto-lecionon de 'Abdu'l-Bahá danke al D-ro Esslemont kaj iom da studo de la Internacia Lingvo kiun faris Shoghi Effendi (laŭ aldoniĝo al *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* sur p. 294) ni konsideru iliajn pezajn devojn. Kelkaj bahaanoj leginte la instigojn de Shoghi Effendi studi Esperanton vidis, ke ĝi ne nepre estos adpotita en estonta universala rolo kaj pro tio ili ignoris lian konsilon. Cetere li sciis ke la decido de la Universala Domo de Justeco kaj la parlamentoj de la mondo elekti universalan helpan lingvon estos farita post lia morto. Memorante lian eventoplenan vivon oni komprenas, ke ne malmultaj valoregaj verkoj ne estus atingintaj, se li estus devinta studi aldonan lingvon. Jen la ĉefa afero. "Shoghi

⁸⁰ 'Abdu'l-Bahá *The Promulgation of Universal Peace* p.232. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1982. El prelego de 'Abdu'l-Bahá en All Soul's Unitarian Church, Novjorko 14 Julio 1912. Tr. Steele/Desailly.
⁸¹ *Bahá'í Year Book*. 1925 – 1926 vol.1. p 155. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980. (B. Westerhoff sciigis al mi ke la Esplor-departamento ne povas trovi ĝis nun konfirmon de tiu ĉi citaĵo.)

Effendi mem lernintus ĝin, sed liaj okupoj estas tiom multnombraj kaj pezegaj, ke li neniel povas trovi la tempon por fari tion."⁸² Malmultaj demandas sin, kial ege okupitaj homoj kiel Mahatma Gandhi ("Mi estas por samforma kalendaro por la tuta mondo, kiel mi estas por samforma valuto por ĉiuj landoj kaj por la mondhelplingvo kiel Esperanto por ĉiuj popoloj." 1931.), Papoj Johano XXIII kaj Johano Paŭlo II, Reĝinoj Beatrix (Nederlando), Elisabeth kaj Marie (Rumanio), Reĝoj Alfons XI¹¹ (Hispanio) kaj Edward VII (Britio), Barono Baden-Powell, Rudolf Diesel, Albert Einstein, Louis Lumiere, Guglielmo Marconi, Alfred Whitehead, Bakin, Thor Heyerdahl, Otto Jespersen, Helen Keller, Sakyo Komatu, Jack London, Lu Xun, Mao Dun, Bertrand Russell, Upton Sinclair, Rabindranath Tagore, Lev Tolstoj, Jules Verne, H. G. Wells, Prezidentoj Bengtsson, Benes, Buttigieg, Castro ("Mi estas soldato por Esperanto." 1990), Einaudi, Havel, Jonas, Kirchschrager, Mao, Radhakrishnan, Stalin (maldaŭre), Sun Yat Sen, Tito kaj Pak Heon Yeong, kiuj ĉiuj parolis aŭ subtenis Esperanton, ne pli dediĉis sin al la lingvo. La sekvantaj linioj en kontinueco el *The Priceless Pearl* de Rúhíyyih Rabbání malkaŝas la estimon de Shoghi Effendi al esperantistoj, kiuj de li estis arde kaj distinge priskribitaj en la sama libro. Lia deziro vidi pli proksimajn ligojn inter niaj du movadoj mem evidentiĝas.

"Krom tiuj personaj rilatoj Shoghi Effendi havis multe pli da kontaktoj kun kelkaj nebahaaj organizaĵoj ol oni kutime supozas. Tio pravas specife pri esperantistoj, kies tuta celo estas realigi la plenumon de la bahaaj principoj, ke universala lingvo devas esti adoptita por gajni mondpacon. Ni havas kopiojn de liaj personaj mesaĝoj al la Universalaj Kongresoj de 1927, 1928, 1929, 1930 kaj 1931 kaj li sendube sendis similajn mesaĝojn alitempe. Shoghi Effendi ne nur varme reagis se oni petis lin, sed ofte mem iniciatis sendi reprezentantojn de li mem elektitajn al diversaj konferencoj, kies celoj kongruas kun la bahaaj. Tial li letere informis la Universalan Esperanto-Kongreson en 1927, ke Martha Root kaj Julia Goldman partoprenos en la Danziga (Gdansk) Kongreso kiel oficialaj bahaaj reprezentantoj kaj ke li esperas, ke tio pli fortigos la fratajn ligojn inter la esperantistoj kaj la adeptoj de Bahá'u'lláh, kiuj havas unu el siaj principoj la adopton de internacia lingvo por la tuta homaro."⁸³

La Gardanto jene skribis en sia letero al partoprenantoj de la 19a Universala Kongreso de Esperanto, okaze de la kvardek jara jubileo.

"Miaj karaj kunlaborantoj en la servo al la homaro; Mi tre ĝojas alparoli vin kaj etendi al vi el mia tuta koro plenan sukceson de via granda laboro por akceli la homaran profiton. Interesos vin ekscii mi estas certa, ke rezulte de la emfazaj kaj ripetataj admonoj de 'Abdu'l-Bahá, liaj multaj sekvantoj eĉ en la foraj vilaĝoj kaj vilaĝetoj de Persio, kien la lumo de la Okcidenta civilizacio ĝis nun apenaŭ penetris, same kiel en aliaj Orientaj landoj, energie kaj entuziasme penas studi kaj instrui Esperanton, pri kies estontaĵo ili havas plej altajn esperojn. Mi esprimas la sentimentojn de la sennombraj disĉiploj de la Kredo tra la mondo, elkore dezirante per ĉi tiu letero kaj per niaj preĝoj, sukceson al via nobla celo. Fidele via. Shoghi."⁸⁴

⁸² W. Heller *Lidia* p.179. G. Ronald 1985. El letero pri Esperanto en la nomo de Shoghi Effendi al George Winthrop Lee de Boston, Usono.

⁸³ Rúhíyyih Rabbání, *The Priceless Pearl* p.271. Bahá'í Publishing Trust London. 1969 (tradukis Steele/Desailly)

⁸⁴ *The Bahá'í World* vol.2. 1926-1928 p.269. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980. (tradukis BEL, Steele/Desailly)

Tiun leteron datitan 17 Aprilo 1927 kaj adresitan al la delegitoj ĉe la 19a Universala Kongreso de esperantistoj laŭtlegis Martha Root al la 905 partoprenantoj de la oficiala inaŭguro en Danzig. Ŝi diris ke lia letero gajnis pli altan respekton ol tiuj de registaraj kaj reĝaj reprezentantoj, kiel ajn elokventaj ili estu.⁸⁵ Notindas ke Shoghi Effendi interpretas la instigojn de 'Abdu'l-Bahá al la bahaanaro studi Esperanton kiel "emfazajn kaj ripetatajn admonojn." Facile kompreneblaj kaj fortaj liaj vortoj estas. Konscia pri la diligenteco necesa por instrui lingvon Shoghi Effendi dise mencias 'studi' kaj 'instrui'.

La leteroj pri Esperanto, kiujn skribis la sekretarioj de Shoghi Effendi, ĉiam enhavis respekton kaj pozitivan sintenon al Esperanto. Tamen, ŝajnas al mi ke la leteroj de la Gardanto mem ne nur vidigas lian senparelelan verktalenton, sed montras tutkoran amon al la esperantistoj kaj profetan vizion de nia komuna sukceso. Eble tio plej bele evidentiĝas en lia letero de 4 Majo 1928 el Hajfo, en kiu li alskribas al la delegitoj de la Antverpena UK en Belgio.

"Okaze de la malfermo de la 20^a UK, mi deziras rekonfirmi, nome de la bahaanoj en kaj la Oriento kaj la Okcidento, la sentojn de bonvolo, kamaradeco kaj ama simpatio kiuj animas la adeptojn de Bahá'u'lláh en ilia sinteno rilate la laboron, en kiu vi tiom noble kaj sindediĉe aktivis.

"Mi povas certigi al vi, ke la membroj de la tutmonda bahaa komunumo sekvas kun kreskanta interesiĝo kaj aŭtentika espero la progreson de viaj laboroj kaj sentas, ke pere de viaj noblaj klopodoj vi antaŭen igas unu el la elstaraj principoj proklamitaj de Bahá'u'lláh.

"Ili dividas kun mi la fervoran esperon, ke en la venontaj tagoj pli intimaj ligoj de amikeco kaj kamaradeco ligos la esperantistojn de la mondo kun nia amata Kredo, kaj ke la establiĝo kaj daŭrigo de intimaj rilatoj inter bahaanoj kaj esperantistoj kontribuos al la plibonigo de la homaro.

"La Ĉiopova gvidu kaj benu viajn konsiliĝojn kaj bongrace asistu vin por konduki la diversajn popolojn kaj naciojn de dolore afliktita mondo al pli intima interkompreniĝo kaj komunio.

"Via vera frato kaj bondeziranto. Shoghi."⁸⁶

la oriento

Dum esperantista bankedo, ankoraŭfoje honore al 'Abdu'l-Bahá, okazinta en Parizo en 1913 li diris:

"Hodiaŭ unu el la ĉefaj kaŭzoj de diferencoj en Eŭropo estas la diverseco de la lingvoj. Ni diras ke tiu ĉi homo estas germano, kaj tiu italo, jen ni renkontas anglon kaj poste francon. Kvankam ili ĉiuj apartenas al la sama raso, tamen la lingvo estas plej granda barilo inter ili. Se oni uzus universalan helplingvon, ĉiuj estus konsiderataj kiel unu.

"Lia Sankteco Bahá'u'lláh skribis pri tiu ĉi internacia lingvo antaŭ pli ol kvardek jaroj. Li diras ke tiom longe kiom internacia lingvo ne estos akceptita, kompleta unueco inter

⁸⁵ *The Bahá'í World* vol.2. 1926-1928 p.265. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980. (tradukis Steele/Desailly)

⁸⁶ *Star of the West*, vol 19. n-ro 8. p.347. (Tradukis BEL, Trevor Steele kaj Paul Desailly.)

diversaj grupoj de la mondo estos neefektivebla, ĉar ni vidas, ke miskomprenoj detenas la popolojn for de reciproka kuniĝo, kaj tiujn ĉi miskomprenojn oni povas dispeli nur per internacia helplingvo.

"Parolante ĝenerale, la tuta loĝantaro de la Oriento ne estas plene informita pri la okazoj en la Okcidento; nek ankaŭ la Okcidentanoj povas starigi simpatian kontakton inter si kaj la Orientanoj. Iliaj pensoj estas fermitaj en kesto - la lingvo internacia estos ŝlosilo malfermanta la keston. Se ni havus universalan lingvon, la okcidentaj libroj povus esti facile tradukataj en tiun lingvon, kaj la Orientanoj sciigus pri ilia enhavo. Sammaniere la libroj de la Oriento povus esti tradukitaj en tiun lingvon por la utilo de la loĝantoj de la Okcidento."⁸⁷

La antikva historio de la romia kaj greka imperioj subtenas la ideon ke nur malrapide venis ŝanĝoj al lingva ordo. Tamen, mi jam rimarkigis pri kiom rapide la franca lingvo perdis sian internacian influon. La moderna historio de Azio montras similan tendencon. Se mi en Ĉinio aŭ Sovet-unio eĉ ĝis la Balta Maro antaŭ nur kelkaj jaroj estus instruinta la anglan anstataŭ la rusa lingvo eble mi estus instruinta ĝin en malliberejo por spionoj. Per du apartaj kaj subitaj renversoj kaj pro politikaj kialoj Ĉinio jam formetis la rusan kaj multaj iamaj sovetaj respublikoj ekalprenas la anglan. Kiu estus kredinta tion? Ankoraŭ unu fojon la antaŭdiroj de politikaj kaj lingvistikaj komentariistoj estis kvazaŭ vortoj skribitaj sur akvo. Pro tiaj okazintaĵoj ni rajtas pridubi la opinion de tiu hodiaŭa spertulo kiu mokas kaj ignoras Esperanton. El Israelo en la sud-okcidenta angulo de Azio venas moderna ekzemplo de unuiginta popolo rapide kaj sukcese enkondukinta lingvan revolucion simple per malatento de skeptikuloj. Ĝis 1948 la hebrea restis lingvo nur de Sanktaj Skriboj kaj preĝoj kaj nun ĝi estas la nacia lingvo de teknikistoj, sciencistoj, rabenoj kaj familianoj.




Galileo Galilei
1564 – 1642



Sir Isaac Newton
1642 – 1727



Samuel F.B. Morse
1791 – 1872



Albert Einstein
1879 – 1955

⁸⁷ D-ro Esslemont. *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* paĝoj 164, 165. BEL 1978. (Tradukis Lidia Zamenhof.)




**Agnes Baldwin Alexander
(1875 – 1971)**

fariĝis Mano de la Afero de Dio en
1957. Kiel Martha Root ŝi ofte uzis
Esperanton por diskonigi la Bahaan
Kredon en la Oriento.

Bildo 24 - Agnes Alexander.



**Bildo 25 – Gestudentoj de Esperanto, Tokio, Japanio.
Fraŭlino Agnes Alexander sidas en la mezo.
*Bahá'í World Year Book 1925-1926 p. 156.***



Bildo 26 –

**La elektitaj membroj de la unua Universala Domo de Justeco 1963.
Lutfu'lláh Hakím portas la lambastonon.**



Bildo 27 - D-ro Lutfu'lláh Hakím 1888 – 1968.

**D-ro Lutfu'lláh Hakim interpretis en 1913 la faman Edinburgan
prelegon de 'Abdu'l-Bahá pri la lingva fiasko en la mondo.**

Elstaraj bahaaj esperantistoj Mirzá Muhammad Labib kaj Lutfu'lláh Hakim grave rolis en la okazigo de eble la plej grandaj Esperanto-kursoj en la mondo - Kazvin kaj Teheran - almenaŭ ĝis nova renaskiĝo de la Internacia Lingvo en tiu sama lando dum la fruaj okdekaj jaroj.

La 9^{an} de Decembro 1939 Mao Tse-tung skribis al Esperanto-ekspozicio okazigita en Yan'an Ĉinio. "Mi dirus ankoraŭ la samon. Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devus esti lernata." Eĉ ĝis nun en la Popola Respubliko de Ĉinio oni priskribas Esperanton jene: Shì Jiè Yǔ, t.e. la monda lingvo. La pozitivaj vortoj de Prezidento Mao pri Esperanto postlasis sintenon de respekto por la lingvo en la tuta Ĉinio sed ne vastan uzadon. En Aŭgusto 1992 mi spertis anekdotan konfirmon de tio dum mia revena vagonarvojaĝo al Beijing de Qingdao, kie la konegata Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto ĵus okazis. (vidu p.96,97.) Mi klarigis al miaj kunvojaĝantoj per mia aĉa prononco de la ĉina lingvo, ke mi estas studanto de Shì Jiè Yǔ. Iliaj antaŭaj mienoj de malafableco, pro la devo akompani senvoĉan alilandulon dum longa vojaĝo, tuj transformiĝis kaj ili akompanis min al mia seĝo kaj dividis siajn manĝetojn kun nova amiko. La plej kolora Esperanto-magazino en la mondo, *El Popola Ĉinio*, devenas el Ĉinio, legebla nun nur per interreto. La latina alfabeto jam estas instruata tra Ĉinio, Hinda Unio, Japanio kaj aliaj aziaj landoj dum jardekoj, tial unu baro jam nuliĝas. La ampleksa uzo de konstantaj afiksoj en Esperanto plaĉas al multaj Orientanoj pro simila evidenta konstruo en iliaj propraj skribsistemoj. La utiligado de afiksoj ankaŭ ebligas al Esperanto precizan teknikan uzon kaj vastajn nuancojn, ambaŭ el tiuj ege simpatias japanojn, en kies lando aparte forta Esperanto-movado jam estas establita ekde 1906 laŭ *Encyclopedia Americana*.⁸⁸ En letero de 25 Novembro 1987, en kiu estis rekomendo, ke bahaaj esperantistoj faru instruvojaĝojn al Japanio, la Universala Domo de Justeco diris: "La Esperanto-Movado estas tre forta en Japanio."

Vidu volumon 13, numeron 9 (eksteran vol. 5) paĝon 249 de *Star of the West* por legi kortuŝan rakonton, kiu montras kiel gejunuloj el multaj landoj praktike profitis de Esperanto en la Oriento kaj kiom glate ili interkompreniĝis inter si.

Agnes Alexander, flua Esperantistino kaj Mano de la Afero de Dio, proklamis en sia libro *History of the Bahá'í Faith in Japan* en ĉapitro kun la titolo *La Bahaa Mesaĝo Vojaĝas de Japanio al Ĉinio*: "Kiom grandioza estis la beno elveninta el la Esperanto-kurso." Ŝi aludis al la komplikaj detaloj, kiuj interplektiĝis de ĉinaj kaj japanaj gesamideanoj por propagandi la Bahaan Kredon en la Ekstrema Oriento. Du libroj de Barbara Sims *Traces that Remain* kaj *Japan Will Turn Ablaze* vive ilustras tion.

Aŭguste 1996 dum ferma parolado al la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ŝanhajo estis mia honoro kaj plezuro kiel aŭstralia LKKano oficiale inviti ĉiujn delegitojn al la onta Universala Kongreso. Proksimume 500 esperantistoj el 18 landoj aŭskultis ĉarmojn de Adelajdo kaj ses stimulajn sed ne religiemajn frazojn de 'Abdu'l-Bahá laŭde al Esperanto sur paĝo 165 de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* kaj paĝo 45 de tiu ĉi libro.

Vaste vojaĝis mi antaŭ nelonge preter la Huhehot-montetoj de Interna Mongolio, multe okcidenten de Xian en la internan parton de Ĉinio kaj sudokcidenten en la

⁸⁸ *Encyclopedia Americana* vol. 10. p. 583.

profundon de Sichuan–provinco. Tute sen problemoj krom bagatelaj esceptoj de tinio, litcimoj, moskitoj kaj migrenoj, ĉar ĉe ĉiu stadio ĉinaj esperantistoj renkontis kaj akompanis ĉi tiun solan vojaĝanton.

Por bonvenigi min la motoro de la regiona Esperanto–movado, sinjoro Li Sen, aranĝis delegitaron ĉe la stacidomo. Li organizis serion da paroladoj inkluzive lekcion ĉe la plej influhava universitato de Interna Mongolio. Tie dum du horoj mi dulingve parolis, iom per Esperanto sed ĉefe uzante mian patrinan lingvon al gestudentoj kaj fakultatanoj inkluzive akademianoj. Ni kune ekzamenis principojn kaj punktojn – (I) La egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj. (Kiam virinoj estas proporcie reprezentataj en la parlamentoj, ili grave helpas efektivigi la mondan pacon pro tio, ke ili serĉos ĉiujn justajn rimedojn eviti militon ĉar ili jam multe oferis por naski kaj eduki siajn filojn.) (II) La harmonio inter la scienco kaj vera religio. (III) La monda paco pere de universala helpa lingvo. (IV) Ĉu "artefarita" lingvo povas superi belecon de la patrina lingvo rilate poezion? (V) Mondestroj kaj Esperanto. (VI) La prospero kaj malprospero de potencaj lingvoj.

Kunlaboro de la nacia kaj provinca registaroj tie efektivigis la principon de lingvaj rajtoj al nacimalplimultanoj. Por gajni universitatan lokon mongola aŭ huja k.a. nacimalplimultanoj devas sukcesi iom malpli rigoran ekzamenon. Se ĉino de la hana raso, kiu konsistigas pli ol 85% de la loĝantaro, konkuras kun egale klera ano de nacimalplimulto por havigi registaran postenon, la sukceso aŭtomate apartenas laŭleĝe al la lasta. Nacimalplimultanoj rajtas havi du infanojn en Ĉinio.

Celante Lhasan kaj la "Tegmenton de la mondo" mi trapasis la pratempan ĉefurbon Xian kaj rigardis entombigitajn terakotajn soldatojn. Samideano Wei Chi, en kies dometo mi ripozis, akompanis min per aŭtobuso pli ol tri horojn okcidenten de Xian. En lia vilaĝo mi spertis almenaŭ gusteton de senespero kaj tradaŭrado afliktantaj multajn malriĉajn kamparanojn. Tio kio konfuzas ilin estas la troa riĉeco de iuj bienistoj bonŝancaj kaj aliaj laboremaj. Ironiaj restaĵoj de la ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco ekzistintaj antaŭ la revolucio ĝenas sincerajn komunistojn.

Post ordigo de kofretoj en la hejmo de mia amiko en tiu jaro de inundegoj, mi kaj juna gvidantino tramarŝis rizkampojn al rapida rivereto, kiu preskaŭ faligis min. Longe poste ni venis al bela kaj grandega katolika preĝejo ŝajne en tuta izoleco. "Kaj ĉi tiu Evangelio de la Regno estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj; kaj tiam venos la fino." (Mateo 24:14. *La Sankta Biblio*.) Bahaanoj kredas ke la fino aludita estas la fino de nia fido je "la hodiaŭa ordo" kiu "baldaŭ estos envolvita kaj nova ordo estos disvolvita anstataŭe." (Bahá'u'lláh. paĝoj 6-7 *The Gleanings*.)

Sendube tio jam estas okazanta, se oni konsideras, ke la supraj citaĵoj aludas al la jaroj de post 1844 kiam la nobla Evangelio estis atinginta la koron de Afriko kaj al Judoj per la Edikto de Toleremo la Otomana registaro promesis protekton en sia imperio, edikto kiu allasis ilian revenon al la Sankta Lando. (Vidu *Thief in the Night*, W. Sears p11-14) Por multaj studantoj de *La Sankta Biblio*, aparte Adventistoj, tio signifis nenion alian ol la Alvenon de la Mesio. En tiu sama jaro, 1844, Báb deklaris Sian mision. Deĵoranta

sacerdoto ĉi tie estis afabla, sed ne eblis konversacii, ĉar mia nova gvidantino studas la anglan nur per ripetado en sia ĉina lerneĵeto. Malpli ol unu horon piedirante alian direkton mi surpriziĝis foti duan kristanan preĝejon en tiu fora angulo de la mondo.



**Bildo 28. Mia gvidantino en rizkampoj tri horojn okcidenten de Xian.
Unu el du najbaraj kristanaj preĝejoj en fora parto de Ĉinio.
Somero de inundoj kaj suferoj por multaj ĉinoj, 1998.**

Malproksime kaj lastatempe en Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco, mi lernis iomete pri humiliĝo. Apuda Chongqing multe pli granda estas, sed ĝi (same kiel Beijing, Shanghai kaj Tianjin) estas municipo de la nacia registaro pro sia proksimeco al la projekto de la Tri River–Ravinegoj, kiu siavice estas la plej granda inĝeniera projekto en la mondo. Tiel la rapidega disvolviĝo de Chongqing en la plej grandan metropolon de Ĉinio; proksimume tridek milionoj da homoj laŭ *Lonely Planet* kaj *Time Almanac 1999*, paĝo 191. Multaj esperantistoj konstatas, ke mi instruas, ne prozelitas, la Bahaan Kredon pere de Esperanto kaj ke la Sinjoro dotis sur min talenton deklami bahaajn versojn. En Esperanto–klubejo de Chengdu mi unuafoje vidis post naŭ jaroj da sola veturado ĉirkaŭ la mondo, kion mi opinias, estis rekono de Bahá'u'lláh, la Promesito, de ĉiuj partoprenintoj. Amuze al mi, mia potenco de elokventeco ne necesis. La presita vorto sufiĉis. Mi min konsolis per penso, ke mi helpis Esperantigi almenaŭ unu el tiuj faldfolioj.

Laŭ esperantistoj de Chengdu, ĉina enirpunkto por okcidentanoj al Tibeto, la movado stagnas en Lhasa. Eble oksigeno mankas ne nur pro la alteco. Kiel ajn tio estas, mi kaptis mirindan disaŭdigon de the Voice of America en Majo 1998 pri laŭdo de Ĉinio dirita de la Dalai–Lamao. Surprize al mi tiu usona propagandilo pretendis surbendigi

liajn vortojn favore al ĉinaj eduksistemo, malsanulejoj kaj strukturilataro (infrastrukturo) en Tibeto. Laŭ tiu lastatempa intervjuo en Novjorko plaĉis al li ankaŭ la daŭra instruado de la tibeta lingvo. Li klarigis, ke oni ne ŝvebas kvazaŭ en nirvano sub la ĉina jugo, tamen multaj aferoj farintaj de la Jiang Zemin registaro estas bonaj. Se mi ne mallongonde aŭdis la vortojn per miaj propraj oreloj, mi ne kredus, do mi intencas enketi pri la vero por mi mem, laŭ la unua principo de la Bahaa Kredo, dum vizito al Tibeto. Kiel kutime la vero tie, kiel ĉie probable, estas tre komplika afero. Mi supozas ke la ĉinoj bone lernis de la plej potencaj kaj ruzaj imperiistoj en la historio – niaj anglaj kuzoj. Paraleloj de reĝimeco kaj sinoferemo vidalvide kunekzistas; ĉifoje en la nomo de la Revolucio kaj diecigo de la ŝtato, anstataŭ en la nomo de Reĝino Viktorio aŭ eĉ pli honte, en la nomo de la Kruco kristana aŭ la Lunarko islama.

Okulfrappe estas la ŝanĝiĝoj en Ĉinio ne nur rilate konstantan konstruon, sed ankaŭ en la politiko de mia universitato de dek miloj da homoj, Tianjin–Universitato de Komerco. Ekzemple, baldaŭ post mia alveno en Februaro 1998 oni ĝentile devigis min subskribi kontrakton kun rigoraj klaŭzoj de neenmiksiĝo en politikaj kaj religiaj aferoj en la klasĉambro. Mi ne tro grumblis, ĉar ĉiuj kontraktoj havas kondiĉojn. Cetere, bahaanoj obeu la leĝojn de la lando kaj estu bondezirantoj al la registaro. La ĉefa kondiĉo estas, ke mi ne rajtas elbuŝigi malveraĵojn aŭ personajn atakojn kontraŭ ĉinaj estroj. (Koncerne kondiĉojn rimarkindas, ke mi instruu Esperanton en la universitato pere de la angla, kvankam mi havas Cseh–diplomon.) Tamen, tuj post la atombombaj eksplodoj en Hinda Unio kaj Pakistano en Majo 1998 kaj ĵus antaŭ la rimarkinda vizito de prezidento Clinton mia dunganto petis min surbendigi BBC kaj VOA politikajn programerojn por konversaciigi la gestudentojn. Ĉiuj alte taksis la iniciaton efektiviganta viglan interdiskuton en ĉinaj universitatoj, kie la angla lingvo estas reĝo senprecedenta, almenaŭ ĝis la tragedia NATO-atako kontraŭ la ĉina ambasadorejo en Beograd. Per manifestacio ekster mia fenestro 3.000 koleraj studentoj montris fortan senton kontraŭ la Okcidento. Tiu sento rapide malvolviĝis ĉiudirekten ĉirkaŭ la nacio; ĝi ankoraŭ ŝvebas. Por gajni diplomojn miaj studentoj ree lernas la anglan sed multaj el ili admiras nur la potencon de la angla; temas ĉefe pri devo kaj tial mankas al ili multe da beleco de la lingvo. Post tiu timiga afero oni klarigis al mi ke mi neniam fakte estis en danĝero, male al la situacio por multaj okcidentanoj, pro mia amo de Ŝi Jiè Yǔ.

Financaj limoj miaj devigis min elekti inter Lhasa kaj la 17^a Komuna Seminario en Pekino por gejunuloj de Ĉinio, Japanio kaj Sud-Koreio. Bahá'u'lláh jam elvokis ĉiujn pastrojn, lamaojn k.t.p. eliri el siaj klostroj, do mi elektis Esperantujon en Pekino. Je la fino de printempo 1998 du raportistoj intervjuis min pri mia Esperanto–kurso universitata en Tianjin. Ili apartenas al la Esperanto–teamo de dek unu salajrataj dungitoj de Ĉina Radio Internacia. Ili interesiĝis ne nur pri instruado de Esperanto tie al ege okupitaj gestudentoj kaj kolegaj geprofesoroj sed ankaŭ pro tio, ke miaj ĉinaj kaj japanaj studentoj neniel restas apartigitaj kaj malamikemaj kiel bedaŭrinde pro la milito antaŭ 60 jaroj ofte ankoraŭ okazas en Ĉinio eĉ inter gejunuloj. En la unua semajno de Julio 1998 oni ree intervjuis min en la ege moderna ĈRI–ĉefoficejo kaj studio. La 26^{an} de Julio mi emociiĝis aŭskultinte vortojn de 'Abdu'l-Bahá el *Bahá'u'lláh kaj la Nova*

Epoko kvarfoje elsenditajn de ĈRI al la mondo. Precize la samaj ses bahaaj frazoj honore al d-ro Zamenhof estis elektitaj, kiujn mi alparolis al la aŭskultantaro je la solena fermo de la Unua Azia Kongreso de Esperanto, Shanghai 1996. Tiam la oficiala reprezentanto de Aŭstralio, juĝisto Kep Enderby, kiu estis la nova prezidanto de UEA, petis min anstataŭi lin pro siaj urĝaj taskoj en Sydney. Mi ofte pripensas lian rolon kiel parlamentanon kaj poste kiel Nacian Prokuroron en la nove elektita aŭstralia laborista registaro, kiu tuj finis nian parton en la armita konfliktego en Vjetnamio en 1972, kiam mi dudekjariĝis kaj ricevis la vokon batali en la nomo de mia lando.



Bildo 29. Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia, somero 1998.

Mi kompletigis la 1998^{an} someran paŭzon per ekskurso al esperantistoj en la nordĉinaj urboj de Changchun, Dalian, Dandong, Shenyang ktp. Dandong, lokita ĉe la Yalu rivero kaj la nordkoreia landlimo, estas agrabla urbo kiu energie moderniĝas ĉefe per komercado diversspeca. Tamen, tuj trans la riverbordo ĉio neniel simile prezentas sin laŭ mia tre proksima rigardo el turisma pramo. Malviglaj laboristoj kaj severaj soldatoj malvolonte salutis aŭ rifuzis saluti gajajn ĉinajn turistojn kaj unu el ili eĉ ŝajnis celi sian pafilon je nia direkto. Tiu neforgesebla aventuro kun Samideanoj Li Liang kaj Ma Fengcheng inkluzivis kontrastojn de kvinaklasa tranokta ŝipveturo iganta centojn da gevoj kaj geknaboj kune vojaĝi en la sama "kajuto". Ni travivis kelkajn malmulte kostajn vagonarvojaĝojn en homamasoj tiom densaj, ke oni preskaŭ sufokiĝis kaj la zenitan ekstremojn de bonvenigoj far ĉinaj esperantistoj frate traktante min kaj dorlotante nin kiel princojn. Tiamaniere la maron Bohai ni rondiris kaj transveturis, vojaĝo kiun mi komencis en Qingdao en 1992 dum mia unua internacia kongreso ĵus 18 monatojn post mia Esperantistiĝo. Tiam same kiel hodiaŭ mi estas tute ravita kiam multnombraj homoj el kelkdekoj da landoj interparolas pri ĉiaj aferoj en unu forumo sen neceso de interpretisto.



Bildo 30. Esperantistoj, Tianjin-marhaveno, la maro Bohá'í, Aŭgusto 1998.

Tuj post tiuj semajnoj de malfacilaj vojaĝoj mi bedaŭrinde serioze malsaniĝis. Kapdolarego de media polucio, naŭzo, lakso, gripo kaj inerteco samtempe atakis min, tamen dank' al Dio mia forto neniel cedis ĝis mia alveno al la komforto kaj sekureco de la universitato. Pensante ke tio kio ne detruas nin fortigas nin, mi opinias, ke tiaj malfacilaĵoj jam estas preparintaj nian grupeton de bahaanoj kaj esperantistoj por dorna vojo antaŭ ni. Laŭlonge de tiu vojo ŝajnas, ke la kvar rajdistoj de la Apokalipso* ree ekkaptos la homaron pro nia obstina malatento al Dio kaj Liaj vivreguloj. Dekdu monatojn poste en belega Guilin dum la Kvara Ĉina Kongreso prezentis kaj vendis bahaajn librojn en la oficiala libroservo ĉinaj LKK-anoj. En granda karavano de ĉinaj esperantistoj mi tiam aŭtobuse veturis al la Dua Azia Kongreso en ekzotika Hanojo.

- (Alegorie prenita el la lasta libro de la Nova Testamento, ĉapitro 6 –: (I) konkero (II) milito (III) plago (IV) morto.)

Tute sen averto kaj nur kelkajn minutojn antaŭ ol ekkongresi miaj gesamlاندanoj, inkluzive de la prezidanto de UEA, distingis min per la honoro kaj plezuro reprezenti Aŭstralion en la solena inaŭguro de la 2AK. Jen laŭ mia memoro estas la vortoj de mia salutmesaĝo al pli ol 400 gesamideanoj el 16 landoj: "Karaj, estimataj kaj koraj gekamaradoj enlandaj kaj eksterlandaj. Aparte en tagoj de krizo en mia propra vivo, mia koro neeviteble flugas al mia amata lando. Tamen, Ĉinio kaj Japanio ludis kaj ankoraŭ ludas gravan rolon en mia historio. Ekzemple, mi kiel instruisto de la angla kaj Esperanto, en pasintaj kelkaj jaroj feliĉe vivtenis min en diversaj ĉinaj universitatoj kaj dank' al malavareco de Oomoto-geamikoj mi toleras la elspezon esti ĉi tie en Hanojo hodiaŭ. Vi tiel konstatu ke same kiel multaj el vi mi efektive estas civitano de la mondo. Laŭ parafrazitaj vortoj de iu persa Saĝulo: 'La Tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.' Vivu Esperanto!"

Pensanta pri mia unua Internacia Junulara Kongreso en Sankta Peterburgo mi kun ĝojo veturis al Hong Kong por la 56a IJK. El persona kaj bahaa vidpunktoj la afero

sukcesis. Ĉiun tagon mi instruis la zamenhofan lingvon al aziaj gekomencantoj kaj kadre de la Kongreso eĉ prelegis pri brita poeto, Lordo Tennyson. La bahaa fak-kunsido estis gaja evento kaj disdonitaj estis ĉiuj miaj faldfolioj kaj broŝuroj. Bedaŭrinde mi estis la sola Esperantisto el la tuta Oceanio kaj duono el la 200 gekongresanoj antaŭ multaj jaroj estis junuloj. Ankoraŭfoje en grava Kongreso ne malmultaj ĉinoj ne rajtis transpasi ĉe la “landlimo”, ĉi foje de la propra lando. Imagu ilian ĉagrenon! Kiu raportos pri tiuj ĉi problemoj se eĉ ni Esperantistoj ignoras ilin?

iu konkludo

En la *Bahaa Jarlibro* de 1925 James. F. Morton junior, bonega bahaa verkisto kiu persone ricevis tabuleton de 'Abdu'l-Bahá pri la Bahaa Kredo kaj Esperanto verkis: "Ĉar ĉiuj inteligentuloj de bonvolo devas helpi antaŭen igi tiun gravegan faktoron por akceli konscion de unueco inter la homaro, portas pezan ŝarĝon adeptoj de la bahaaj instruoj, ĉar por ili la ofte ripetata deziro de 'Abdu'l-Bahá devus montri vojon de devo nenia pretekste evitebla. Li, kies vortoj neniam estis indiferente elbuŝigitaj, deklaris: "Ĉiu el ni devas studi ĉi tiun lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo." Vera fideleco kaj ĝia beno konsistas ne en nura konsento, sed en plena kaj aktiva obeado. La esperantistoj, kiuj laboras tage kaj nokte por afero tiel efektivigante la instruojn de Bahá'u'lláh kaj pri kio 'Abdu'l-Bahá specife ordonis, ke la homoj kiuj deklaras sin adeptoj de la Revelacio de nia epoko partoprenu, atente rigardas la agadon de homoj laŭnome bahaanoj kaj sin demandas, kial tiel malmultaj reagis al tiu ĉi ordono de 'Abdu'l-Bahá.

"Universala obeado de tiu Dia ordono okazigos pli profundan spiritan konscion en la Esperanto-movado, kaj la intensivan disvastiĝon, per tiu nobla komunikilo, de la Diaj instruoj tra la plej progresema grupoj de homamantoj en ĉiu lando de la tero. Ĝi ankaŭ akcelos la rapidan plenumon de tiu originala principo anoncita je la komenco mem de la Granda Revelacio. Kiam la mondo adoptos kaj praktikos eĉ unu el la principoj de la Promesito, la vojo al la akcepto de la ceteraj veroj estos ebenigita."⁸⁹

Kiel diplomito de ‘La Skolo de Bilardo kaj Pokero’ mi konis la arton misuzi tempon; tial tiu ĉi libro neniel riproĉas iun ajn unuopulon aŭ liajn penojn akceli aŭ ignori helpi lingvon, ĉar mi konscias ke multaj bahaanoj alvenis en mian landegon preskaŭ tute sen rego de la angla. Malgraŭ tio la kroniko de aŭstralia enmigrada historio atestas, ke ili vagis kvazaŭ vagabondoj tra la tuta kontinento por disvastigi sian fidon je la Bahaa Kredo. Por marŝi la ĉielan vojeton per utilaj kaj praktikaj piedoj multaj bahaanoj, aparte pioniroj, vojaĝantaj-instruantoj, edukantoj, studantoj kaj komercistoj, devas lerni la lingvojn de siaj gastigantaj landoj simple por vivteni sin krom instrui siajn religiajn principojn. Aliaj povus esti tre streĉataj por gajni la vivrimedojn. Tiaj relativaj demandoj apartenas private al ĉiu individua konscienco ekster niaj enketoj pri la kulpoj aŭ supozaj kulpoj de aliaj. Post nelonge la Universala Domo de Justeco kiel unuiĝinta institucio anoncos definitivan deklaron por bahaanoj, tiel malaperos ĉiuj duboj. Ĝis tiam ni ĉiuj saĝe elektu kiujn lingvojn studi, por ke miliardoj da problemoj solviĝu. Pri

⁸⁹*Bahá'í Year Book 1925–1926* vol.1. p157. Bahá'í Publishing Trust Wilmette 1980 Tr: Steele/Desailly

la edukado de niaj infanoj la graveco de tiu ĉi elekto akcentiĝas ĉar 'Abdu'l-Bahá klarigis, ke la plej bona afero en la mondo hodiaŭ estas povi vin komprenigi al viaj amikoj kaj ankaŭ ilin kompreni.

kunestado kun esperantistoj

La sekva tabuleto de 'Abdu'l-Bahá direktita al la Komitato de Daŭra Paco ĉe la Hago estas komplete presita ĉi tie, ĉar li ankoraŭ unufoje ligas universalan pacon kun Esperanto. Rimarkinte la precizecon kaj fruan daton de lia antaŭdiraĵo pri la Dua Mondmilito, oni rajtas atendi kreskantan eminentan rolon por Esperanto, malgraŭ la nuna manko de subteno, ĉar ĉiuj liaj profetaĵoj nepre plenumiĝas: "Ho servanto de la sojlo de Bahá'u'lláh ! Via letero de 14 Junio 1920 alvenis. Ankaŭ letero de kelkaj anoj de la Packomitato alvenis kaj respondo al ĝi estas skribita. Liveru ĝin al ili.

"Estas evidente ke ĉi tiu renkontiĝo ne estas tia, kia oni opinias, kaj ne povas decidi aferojn en maniero deca kaj necesa. Kiel ajn tio estu, tamen la temo pritraktata estas plej grava. La Haga renkontiĝo devus havi tian aŭtoritaton kaj tian influon, ke ĝiaj decidoj efikos sur la registarojn kaj naciojn. Atentigu la altestimatajn reprezentantojn tie ĉeestantajn ke la Hagan Konferencon antaŭ la Mondmilito prezidis la Caro de Ruslando, kaj ke ĝiaj partoprenintoj estis plej eminentaj homoj. Tamen tio ne malebligis tiom teruran militon. Kiel estos nun ? Estonte nova milito, pli feroca ol la ĵusa, certe eksplodos; vere pri tio estas neniam dubo. Kion povas atingi la haga renkontiĝo?

"Sed la fundamentaj principoj de Bahá'u'lláh metitaj, tagon post tago disvastiĝas. Respondu al ilia letero kaj esprimu plej grandan amon kaj bonvolon kaj lasu ilin ĉe la propraj aferoj. Ĉiukaze ili devus esti kontentaj pri vi kaj se ili aprobas, vi rajtas presigi kaj disdoni tiun detalan epistolon mian jam tradukitan anglan.(vidu aldoniĝon 2)

"Koncerne la esperantistojn: restu en rilatoj kun ili. Se vi renkontos akceptopretan personon inter ili, sciigu lin pri la aromoj de la Vivo. Ĉe ĉiu kunsido parolu pri la instruoj de Bahá'u'lláh, ĉar tio efikos en la Okcidentaj landoj hodiaŭ. Kaj se ili demandas pri via kredo je Bahá'u'lláh respondu, ke ni rigardas lin kiel la plej elstaran Instruanton kaj Edukanton de la mondo en ĉi tiu epoko kaj klarigu detale, ke tiuj instruoj pri universala paco kaj aliaj temoj estis revelaciitaj de la plumo de Bahá'u'lláh antaŭ 50 jaroj kaj estas jam publikigitaj en Persio kaj Hindio kaj disanoncitaj tra la tuta mondo. Komence neniu emis kredi la ideon de universala paco; ĉiu rigardis ĝin ne ebla. Plue, parolu pri la grandeco de Bahá'u'lláh, pri la eventoj okazintaj en Persio kaj Turkio, pri Lia mirinda influo, pri la enhavo de Liaj epistoloj adresitaj al ĉiuj ŝtatestroj kaj pri ilia plenumiĝo. Parolu ankaŭ pri la disvastiĝo de la Bahaa Kredo. Kontakti kiom eble plej ofte la Komitaton de Universala Paco ĉe la Hago kaj estu plej afabla al ili.

"Evidente la esperantistoj estas spirite malfermitaj kaj vi konas kaj lerte uzas ilian lingvon. Kontakti ankaŭ la esperantistojn de Germanio kaj aliaj lokoj. La literaturo

dissendata de vi temu nur pri la instruoj. Dissendi aliajn skribaĵojn estas aktuale ne konsilinde. Mi esperas ke la Diaj konfirmoj daŭre helpu vin.

"Ne lamentu pro la apatio kaj kormalvarmo de la haga renkontiĝo. Fidu je Dio. Estas nia espero, ke inter la homoj Esperanto forte influos. La semojn vi jam disĵetis. Sendube ĝi kreskos. Ĝia kreskado dependas de Dio."⁹⁰

"Estas mia espero, ke tiuj ĉi epistoloj allogos la esperantistojn kaj ke ili pripensos, kiel forta estas la konfirmo donata al la lingvo Esperanto kaj provos traduki kelkajn el la gravaj Tabuletoj de Lia Sankteco Bahá'u'lláh kaj ĉien disvastigi ilin."⁹¹

la klarega araba lingvo, la luma persa lingvo; unu mondlingvo

"Bahá'u'lláh preskribas la adopton de universalaj lingvo kaj skribo. Liaj skriboj antaŭvidas du ŝtupojn en tiu procezo. La unua ŝtupo konsistas en la elekto de ekzistanta aŭ inventita lingvo, kiu tiam estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel helpa apud la gepatraj lingvoj. La registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektivigi tiun ĉi gravegan leĝon. La dua ŝtupo, en la malproksima estonteco, estos la fina adopto de unu sola lingvo kaj komuna skribo por ĉiuj surtere."⁹²

"Iam Ni ordonis ke la homoj parolu du lingvojn, sed oni devas peni, ke ili fariĝu unu; sammaniere ke la alfabetoj de la mondo fariĝu unu, ke la homoj ne perdu kaj malŝparu tempon per lernado de diversaj lingvoj. Tiel la tutan Teron oni rigardus unu urbo kaj unu lando."⁹³

"Kion Bahá'u'lláh aludas en la Oka Folio de la Glora Paradizo estas tre fora tempo, kiam la Tero vere estos unu lando kaj unu lingvo estus realisma ebleco. Tio ne kontraŭdiras Liajn instrukciojn pri la tuja bezono de helpa lingvo."⁹⁴

"Plaĉus al Dio ke ĉiuj parolu la araban, la plej riĉa kaj vasta de ĉiuj lingvoj. Se iu konscius la riĉecon kaj vastecon de tiu klarega lingvo, li elektus ĝin kiel universalan lingvon de komunikado. La persa estas bela lingvo kaj Dio elektis paroli dulingve en ĉi tiu Ciklo: arabe kaj perse. Tamen, la persa ne estas same riĉa kiel la araba; ĉiuj lingvoj de la mondo ŝajnas mankaj kompare kun la araba. Tio, kion Ni menciis ĉi tie estas nur preferinda. Tamen, Nia intenco estas ke la popoloj de la Tero elektu universalan lingvon el inter la lingvoj parolataj de la homaro. Tion ordonis Dio, kaj tio bonfaros al ĉiuj homoj, se ili nur scius."⁹⁵

⁹⁰ *Selections from the Writings of 'Abdu'l-Bahá (Esperanto and the Hague)* n-ro 228, p 307. Universala Domo de Justeco. 1978. Esperantigita de T. Steele kaj P. Desailly.

⁹¹ *Star of the West* vol 11. n-ro 17 (ekster vol 6) p.291. Eltiraĵo el Tabuleto 10 Jan 1919. G. Ronald. Oxford. 1984. (Tradukis T. Steele kaj P. Desailly.)

⁹² Universala Domo de Justeco-noto 193 klariganta paragrafon 189 de *Kitáb-i-Aqdas* sur paĝoj 42, 43 de tiu ĉi libro. (Tradukis: T. Steele kaj P. Desailly.)

⁹³ *Tablets of Bahá'u'lláh - Eighth Leaf of the Exalted Paradise* (Oka Folio de la Glora Paradizo). p.68. Bahá'í Publishing Trust Wilmette Usono 1988. (Tradukis: T. Steele kaj P. Desailly.)

⁹⁴ El letero en la nomo de Shoghi Effendi al individua kredanto. 16 Marto 1946. (Tradukis : T. Steele kaj P. Desailly.)

⁹⁵ Suheil Bushrui parafrasis Bahá'u'lláh-on en *The Style of the Kitáb-i-Aqdas. Aspects of the Sublime* p32. University Press of Maryland Usono 1995. (Tradukis : T. Steele kaj P. Desailly.)

La Bahaaj Sanktaj Skriboj klare malkaŝas la neceson de facila kaj helpa lingvo, uzota kun la naciaj lingvoj antaŭ ol sola universala lingvo estos utiligita. La tempopaso inter la du okazaĵoj dependas de niaj propraj klopodoj kaj oferoj por gajni justecon. Spekulativi daŭre pri elekto de unu universala lingvo, tasko por ontaj generacioj, ŝajnas al mi esti senutila afero nuntempe. La belega araba lingvo en sia hodiaŭa formo jam estas specife menciita de 'Abdu'l-Bahá en ĉi tiu dokumento sur paĝo 49 kiel nekonvena pro seriozaj problemoj en la rolo de universala helpa lingvo. La angla lingvo, la persa lingvo kaj ĉiuj gepatraj lingvoj havas similajn mankojn. Eĉ pere de la plej bonaj motivoj oni malsukcese subtenus mondhelpan lingvon kiu malakordas kun la proponoj de 'Abdu'l-Bahá; simile oni vane apogus la tro fruan ideon de sola planeda lingvo. Analoga al tio estus konstrui belan duetaĝan domon sen unue kaj neskueble starigi la fundamenton de la enireja etaĝo.

"Ho vi servantino de Dio. Akiru la persan lingvon por lerni la signifon de la Diaj vortoj kaj ekkoni la Diajn misterojn, evoluigi elokventan parolon kaj traduki la Sanktajn Tabuletojn de Bahá'u'lláh. La persa lingvo iĝos rimarkinda en ĉi tiu ciklo; ne, eĉ en la tuta mondo oni studos ĝin."⁹⁶

La ĉi-supra Tabuleto, adresita al individuo, imputas gloran erudician signifon al la persa kiel aliro al la Sanktaj Tekstoj, ne kiel universala helpa lingvo. Estas skribite ke la lumo de la bahaa epoko daŭros 500.000 jarojn. En la malproksima estonteco, kiam la plejmalriĉuloj de Afriko havos komunikad-rimedojn por interdiskuti kun lertegaj profesoroj ĉie, oni ne plu bezonos helpan lingvon aŭ eĉ multajn naciajn lingvojn. Je tiu fora tempo la unika beleco de lingvo kiel la persa aŭ la araba, ambaŭ el kiuj Bahá'u'lláh Mem perfekte regis, eble iĝos superega kaj uzata en la tuta mondo. Ne eblas konsideri rektan salton al planeda lingvo, kiel la araba aŭ la angla k.t.p, antaŭ ol efektivigi neŭtralan logikan universalan helplingvon, ĉar mankas al la homaro la matureco kaj unueco fari tian elekton des pli la rimedoj. Jam estas bone konataj la relativa facileco de Esperanto kaj la monoŝparo havebla per adopto de ĝi ĉe ĉiuj internaciaj forumoj.

'Abdu'l-Bahá en la onta citaĵo rakontas tre konkretan ekzemplon de la unueciga potenco de la araba lingvo estigi pacon kaj religian harmonion malgraŭ ke homoj poste misuzis tiun potencon kaj malunuiĝis. Imagu la rezulton, se oni mondscale ripetus similan penadon celante la mondan pacon. Mi citas ĉi tie du apartajn prelegojn de 'Abdu'l-Bahá simple pro tio, ke lia pariza prelego ankoraŭ ne estas Esperantigita kaj laŭ mia scio lia stutgarta prelego ne haveblas en la angla. Ne tro gravas ĉar la kerno de la prelegoj spegulas unu la alian. Li staris antaŭ esperantistoj ambaŭfoje. Notindas ke lia stutgarta parolado estis publikigita en *La Nova Tago*, bonkvalita bahaa revuo presita Esperante ĉirkaŭ 1930, preskaŭ same kiel ankaŭ en *Germana Esperantisto* de Majo 1913. En artikolo sur paĝo 72 de la lasta revuo legeblas: " 'Abdu'l-Bahá parolis perse kaj du tradukantoj pene tradukis lian paroladon anglan kaj poste en germanan lingvon." Tiel la Esperanto-skribtraduko probable estas la tria kaj tial probable ĉiam restos ne aŭtentigita malgraŭ ĝia apero en konata bahaa revuo. Ĝis nun oni konsideras nek la stutgartan prelegon de 'Abdu'l-Bahá nek la plimulton de liaj publikigitaj prelegoj esti

⁹⁶ *Tablets of 'Abdu'l-Bahá* vol 2. p 306. (Tradukis : T. Steele kaj P. Desailly.)

aŭtentigitaj bahaaj skribaĵoj. Tamen la stutgarta teksto interesas pro tio, ke ĝi estas aldona ekzemplo de bahaa kaj nebahaa literaturoj, en kiuj la diroj de 'Abdu'l-Bahá samas pri la efikoj de komuna lingvo kaj de lia uzo de imperativo kaj superlativo koncerne la propagandon, la lernadon kaj la instruadon de Esperanto en ĉiuj publikaj lernejoj de la mondo.

Parolado de 'Abdu'l-Bahá en kunveno de esperantistoj en Stuttgart, Germanio, 5 Aprilo 1913.

"En la Dia afero ne ekzistas io pli granda, ol kunigi la homojn al unueco, ĉar unueco kaj harmonio inter la homoj ĉiam alportas unuavice progreson. Se ni pririgardas la homaron, tiam ni trovos, ke la opinioj estas tre diversaj koncerne la rezulton de la unueco.

"Patriotismo estas unu el la rimedoj, kiu iom unuigas la homojn. Sed patriotismo ne sufiĉas, por unuigi la tutan homaron. Ni scias de pasinta tempo, ke inter la diversaj popoloj estis multaj internaj militoj.

"Alia speco de unueco estas la raso. Ĝi sola ankaŭ ne povas efektivigi la solidarecon de la homaro, ĉar ni scias el la estinteco, ke ĉiam regis malpaco inter samrasanoj.

"Aparta speco de unueco konsistas en la sameco de la lingvo. Ĝia efiko estas pli ampleksa. Ofte lingvo fariĝas la rimedo, unuigi diversajn naciojn kaj rasojn. Tion oni spertis precipe en la orientaj landoj. Ekzemple la egiptoj estis aparta nacio. Ankaŭ la asiroj fondis grandan regnon. La civilizacio de la kaldeanoj estis eminenta en la malnova kulturmondo. Unu lingvo fine superis la aliajn kaj unuigis la kaldeanojn, asirianojn kaj egiptanojn, ke ili eĉ forgesis siajn gentnomojn kaj unuiĝis. Hodiaŭ ili estas nomataj araboj. Kial? Ĉar la araba lingvo fariĝis reganta lingvo super la aliaj. Se ni hodiaŭ demandas egiptanon, al kia nacio li apartenas, li respondas: Mi estas arabo! Same ni trovus tion ĉe la kaldeanoj kaj asirianoj. Ili respondas: Ni estas araboj! Tio ĉi pruvas al ni, ke la lingvo estas kapabla, unuigi la popolojn.

"La modernaj nacioj havas tre multajn malpacojn kaj konfliktojn inter si, kies kaŭzoj plej ofte devenas de malkompreno pro diverseco de lingvo. El tio naskiĝis la ideo de la internacia lingvo. Tiu ĉi efikus pli forte ol patriotismo aŭ rasa sento. Bahá'u'lláh, kiu aperis en la Oriento, deklaris, ke estas necese serĉi unuecan lingvon, por ke tiu ĉi internacia helplingvo fariĝu la plej forta kunligilo inter la diversaj nacioj, forigante la malkomprenojn inter la popoloj. Ekzistas nun tiom da lingvoj, ke se ni lernus nur dek da ili, ni tamen renkontus popolojn, kiuj ne komprenas tiujn lingvojn. Supozu: germano lernas la germanan lingvon; se li vizitas Francion, li bezonas francan lingvon, male en Anglio li devas uzi la anglan lingvon, vojaĝante Italion, li devas scii la italan lingvon. Kiu nun konas ĉiujn okcidentajn lingvojn, tiu ne povas uzi ilin en la Oriento. Se iu homo estus nun tiel inteligenta, ke li scius ĉiujn lingvojn de la mondo, kian eminentan profiton li havus de tio? Tial estas la plej bona solvo, fondi unu helplingvon, uzebla por ĉiuj popoloj.

"D-ro Zamenhof estas la fondinto de tia lingvo. Kiam nun tiu ĉi lingvo estas instruata en ĉiuj publikaj lernejoj de la mondo, tiam la popoloj atingos la superan kulturstaton, tiam ĉiu devas lerni nur du lingvojn, la gepatran lingvon kaj la internacian lingvon. Se

estas disvastigata la helplingvo sur la tuta mondo, malaperos multe da malkomprenoj, ĉar malkomprenoj, kiel jam dirite, kaŭzas la plej fortan malbonon, kaj la kaŭzo de ĉiuj tiuj malkomprenoj ja estas manko de tia lingvo. Mi donas al vi plej proksiman ekzemplon: Mi staras antaŭ vi kaj tamen estas tute ne eble al mi, komuniki al vi miajn plej internajn sentojn kaj ideojn. Se mi scius Esperanton kaj se Esperanto jam estus pli disvastigita, mi povus paroli kun vi sen tiuj ĉi du tradukantoj. Do internacia helplingvo estas certe la fundamento por la kunligo de la popoloj kaj granda potenco por unuigi la religiojn. En la Oriento estas multaj Hebreoj, Kristanoj kaj Mahometanoj. Sed ĝis nun ne intermilitis la kristanaj araboj kaj mahometanaj araboj, ĉar ili povis interkompreniĝi; ili povas interŝanĝi reciproke siajn pensojn. Sed ĉiam interbatalis turkoj, bulgaroj kaj grekoj, ĉar ili neniam povis atingi la fundamenton de komuna lingvo. Tiuj ĉi estas ekzemploj, certaj pruvoj, ke internacia helplingvo unuigos la homaron. Se mi komprenus vian lingvon, mi povus paroli kun vi sen malfacilaĵoj. Ĉar nun tiu ĉi internacia helplingvo ne estas sufiĉe disvastigita, mi bezonas du tradukantojn. Ho, kiel malagrabla estas tio! Kiel bela kaj mirinda estus interkompreniĝo per unu lingvo. Tiam la Oriento kaj Okcidento povas unuiĝi kaj ni estus kvazaŭ kiel unu nacio.

"Tial ni ĉiuj propagandu Esperanton, por ke venu granda amikeco inter la homoj. Ĉiu universala afero estas Dia. La sunradioj brilas por ĉiuj same, tial ili estas Diaj. La bonon de la pluvo ĝuas ĉiuj, tial ĝi estas Dia. Ĉiu estas partoprenanto de Diaj benoj, tial ili estas Diaj. Ĉiu entrepreno celanta la unuigon de l' homaro estas Dia. Tial ni povas certigi, ke la efikoj de l' universala helplingvo estas Diaj, se ni konsideras ĝiajn rezultojn.

"Ni devas labori kaj klopodi, ke tiu ĉi lingvo fariĝu parto de la instruado en ĉiuj publikaj lernejoj. Estas absoluta devo de ĉiu nuntempano, ke li akcelu la ellernadon de la ĝenerala helplingvo. Ĉar tiu lingvo estos la rimedo por altigi la signon de l' paco kaj de l' frateco inter ĉiuj."⁹⁷

instruado de la Kredo

"Koncerne la fundamentojn de instruado de la Kredo: sciu, ke eblas transdoni la Mesaĝon nur per bonaj faroj kaj spiritaĵoj kaj kristalklara parolo kaj feliĉo spegulata sur la vizaĝo de la homo kiu klarigas la Instruojn. Nepre necesas, ke la faroj de la instruanto atestu la veron de liaj vortoj. Tia estas la stato de tiu, kiu disanoncas la dolĉajn gustojn de Dio, kaj tia la eco de tiu kiu estas sincera en sia kredo."⁹⁸

Nur la Sanktaj Skriboj de la Sinjoro havas la potencon kaj la efikon daŭre kaj ameme konvinki la anti-utopian skeptikulon ke universala helplingvo, kiu ajn ĝi estos, havos dum nia vivdaŭro ian utilan rezulton. Oni senĉese povus vane paroli al tiaj homoj. Nur preĝemaj kaj humilaj agoj, adoptante kaj montrante la belon kaj neceson de monda helpa lingvo, iom post iom pozitive kontentigos ilin. Buŝe konvinki aliajn kaj eĉ aperigi la benojn de universala helpa lingvo ne garantios, ke ili reciproke reagos aŭ ja

⁹⁷ *La Nova Tago* vol.2. 1930/31 p. 17-20: kaj *Germana Esperantisto* n-ro 5A, Majo 1913.

⁹⁸ 'Abdu'l-Bahá *Selections From The Writings of 'Abdu'l-Bahá* p.175. Universala Domo de Justeco. 1978. (Tradukis: T. Steele kaj P. Desailly.)

ĉu ili posedas la rimedojn, tempon, volon aŭ sindonadon fari ion. Mia simpla konsilo estas mem puŝi ĉiam antaŭen, plena de varbinstrua spirito, certigita de la Ĉielanara helpo, ĝis neksta akceptema aŭskultantaro ie en la mondo. Estas tempo-malŝparo peni nur per vortoj konvinki negativan animon, ke la homo flugos, la luno atingeblas, la Fera Kurteno falos, ne nur la francoj uzos la metran sistemon ktp.

Bahá'u'lláh, malpermesinte bahaanojn prozeliti, donis al ni tiklan problemon ekzerci niajn principojn. Nur tiam, kiam niaj agadoj stimulas aliajn enketi pri la fonto de niaj feliĉo kaj scio, ni rajtas uzi nian potencon de eldirado por esprimi la veron de la Promesito. Feliĉe tian limigon Li ne postulas pri la parola reklamo de universala helpa lingvo; nek pri ĝia utileco nek pri ĝia beleco. Lerninte kaj disvastiginte Esperanton ankaŭ vi konstatos ke kaj admirantoj kaj malestimantoj de la Internacia Lingvo iam ege scivolos pri via intereso de tia altruisma ideo. Tiu scivolo estas malferma invito voĉliveri viajn religiajn laŭdojn de Bahá'u'lláh.

La Bahaa Gasta Servo establiĝis kun amo antaŭ nelonge en Nederlando por helpi internaciajn bahaajn vojaĝinstruantojn. Ĝi posedas kapablan Esperanto-sekcion, pri kio mi atestas. Ja tiom kapabla, ke ties personaro malgraŭ la tiraneco de distanco, superis miajn enlandajn penojn trovi tranoktejojn inter bahaaj amikoj eĉ en najbara Novzelando, kie mia patrino lingvo regegas.

Mia raporto ĉi malsupra al la Nacia Spirita Asembleo de Aŭstralio kaj la Bahaa Esperanto-Ligo, datita 3 Aŭgusto 1997 tuj post la unua Universala Kongreso en Aŭstralazio kaj okaze de mia 45a naskiĝtago, celas montri la potencon de Esperanto instrui la Kredon.

adelajdaj bahaanoj malavare helpas 82^{an} universalan kongreson 1997

"Eble estas la vero ke (relative) malmultaj bahaanoj lernas aŭ lernos Esperanton, sed per siaj lastatempaj agadoj en Adelajdo ili pruvis subtenon de la universala helplingva principo. Tiom aktiva helpo estis disponigita de la sudaŭstralia bahaa komunumo, ke pli ol 1.200 gesamideanoj el 60 landoj sendube komprenis, ke iliaj hejmaj bahaaj komunumoj havas la spiritajn armilojn por daŭrigi la lukton.

"Fortigite per subtenletero de la amata Nacia Spirita Asembleo de Aŭstralio, letero potenca en kiu estis petata la loka bahaanaro doni prioritaton al la Esperanto-Kongreso, vojaĝema Paŭlo Desailly povis galvanizi la bahaan fronton. Lia tasko instrui Esperanton al 45 studentoj en 5 apartaj grupoj simpliĝis danke al malavara transporta subteno proponita de kelkaj adelajdaj bahaanoj, kiuj eĉ insistis pagi por siaj lecionoj. Iu ina grandanimulo el ili senpage transformis sian modernan komercejon, meze de la urbo, en lernejon dufoje semajne monaton post monato. Tiuj imponaj kaj konvenaj kondiĉoj tiom ĝojigis eksterlandajn estrojn de Esperantujo, ke ili prelegis tie antaŭ ol la Kongreso komenciĝis.

"Junaj bahaaj studentoj de Esperanto ludis elstarajn partojn dum la Multkredo-Diservo. Proksimume 300 personoj ĉeestis en la plenplena Diservejo, Scots Uniting Church. En la belega Kongresa libro senprecedente estis agnoskita la helpo de la bahaa komunumo,

kaj de sole la bahaa komunumo, pro tio ke ni organizis la Diservon. Unuafoje en Universala Kongreso tiel diversaj grupoj kiel Bahaanoj, Framasonoj, Kristanoj, Kriŝnokonscianoj, Oomotanoj, Spiritistoj k.a. publike unuiĝis preĝe dum la oficiala religia servo kadre de Universala Kongreso. Melodia gitarludo kaj kantado de kuba samideano sekvis post 15 minutoj de pomeditinda silento je la fino de la Diservo. Poste oni interese rimarkis malsimilajn sintenojn pri la silento. Unu Okcidentano milde surpriziĝis, eĉ ete malstreĉiĝis, tamen Orientanoj estimis tiujn momentojn de trankvileco. La sagaco de retrorigardo sugestas kuniĝo de ambaŭ opinioj venontfoje per malpeza fonomuziko.

"Taĉmento de junaj bahaaj esperantistoj senmanke plenumis ĉiujn siajn devojn kiel enkondukantoj kaj gvidantoj dum la tuta Kongresa semajno. Multaj aŭstraliaj eminentuloj partoprenintaj la 82^{an} Universalan Kongreson rikoltis siajn unuajn impresojn de la movado per tiuj sinceraj bahaanoj. BEL-insignoj sur iliaj junaj brustoj montris al la mondo la pretecon de bahaanoj dediĉi sin al altruismaj organizoj kiel la Esperanto-movado. Kelkfoje mezvintre ili sindone ellitiĝis je la kvara horo matene por renkonti bahaanojn kaj esperantistojn ĉe la flughaveno kaj por akompani ilin al ĝustaj tranoktejoj. Ili rekompence ricevis ĝisdatigitan informon pri la Bahaa Monda Centro de BELano Ĥristo Metev kiu estis ĵus alveninta de tie. Allogis nin aŭskulti pri la tutmonda kreskado de la Kredo el la buŝoj de eksterlandaj BELanoj sen bezono de interpretisto.

"Bahaaj gejunuloj persistis en siaj klopodoj forĝi tiun ligon inter la Bahaa Kredo kaj Esperanto, kiun 'Abdu'l-Bahá amegis, per gardlaboro ĉe la Kongres-librejo, per deĵorado ĉe la bahaa budo en la prestiĝa Kongresejo, per veturigado de homoj kaj varoj diversloken en sia ĉarma urbo kaj super ĉio per diligenta studado de nia trezora lingvo.

"Kelkaj vortoj pri inaj kvalitoj de Adelajdo estas en ordo, ĉar ĝia beleco kaj la historio tie inspiris preskaŭ ĉiujn Verdstelanojn kiuj ade priskribis nian Kongreson kiel la plej malstreĉan kaj bone organizitan. Fondita en 1836 sur la fundamento de religia toleremo kaj tute sen punlaboruloj, male al la situacio en la aliaj ŝtatoj de Aŭstralio, Sudaŭstralio iĝis la unua loko en la mondo, kie virinoj rajtis voĉdoni kaj posteni en la parlamento. (Massachusetts faras similan pretendon. Kelkajn jarojn poste Nov-Zelando fariĝis la unua nacio ĝui tiun honoron.) Indiĝenaj aŭstralianoj gajnis ĉiujn federajn rajtojn en sia lando antaŭ nur generacio tamen, la ŝtatrajton voĉdoni ili ricevis en Sudaŭstralio jam antaŭ jarcento.

"Tiaj stimulaj faktoj de la historio pelis iun britan familion kreskigi sian infanon ĉi tie kaj samtempe establi ŝildopentristan firmaon. Ili estas la motoroj de *Ridvan*, (pro.:Rezvan; araba:Paradizo), bahaa revuo en tiu ĉi ŝtato seka de la insulkontinento. Estis ili, kiuj ofertis malmultekoste liveri 30 Esperanto-standardojn, kiuj gracie flirtis en la urbocentro kaj ili tiamaniere plue efikis kontaktojn inter bahaanoj kaj esperantistoj en la ĝenerala aŭstralia komunumo. Pro senbrida kosto la LKK nuligis la standardojn ĝis kiam bahaaj esperantistoj per siaj propraj manoj savis la situacion. Aldone ili aperigis per *Ridvan* anoncon, kiu varbis la helpon de malavaraj bahaanoj nemalmultaj, kiuj ne nur donacis senpagajn tranoktejojn por multaj senhavaj esperantistoj, sed ankaŭ

nutris ilin. Pro serio da komplikaj eventoj, inkluzive alvenon de senakompana blinda esperantisto kaj tute ne atenditaj esperantista familio el Vjetnamio kaj nepala bahaano, iu bahaa familio de Adelajdo igis sian hejmon Esperanto-dormejo. Ilia sinofero kaj tiu de nekalkuleblaj bahaaj geamikoj solvis multajn ĉiutagajn problemojn por UEA-estraro kaj pruve montris "amon en agado" kaj tiel efektivigis la vortojn de Bahá'u'lláh.

"La adelajda bahaanaro rajtu pretendi, ke ĝi organizis la plej sukcesan aranĝon bahaan ene de Esperantujo ekde la tagoj de Martha Root kaj Lidia Zamenhof en la jaroj inter la du mondmilitoj: la neformalan sed dignan akcepton honore al la unua UK en Aŭstralazio. La prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, juĝisto Keppel Enderby, tiom admiras la etikan pozicion de la enlandaj kaj eksterlandaj bahaanoj, ke li volonte malfermis ĝin. Malgraŭ nenia ligo al iu ajn religio, Kep kiel li preferas esti konata, per siaj vortoj kaj partopreno evidentigis, ke li havas profundan respekton por Bahá'u'lláh kaj la maniero, en kiu Ties adeptoj penas obei Liajn principojn.

"Loka bahaa psikiatro ricevis la honoron alparoli 200 ĉeestantajn homojn, ĉefe ne-bahaanoj, pri la principoj de la Bahaa Kredo. Li erudicie esploris la demandon de universala helpa lingvo. Liaj vortoj estis Esperantigitaj de Trevor Steele, kiu laŭ multaj aŭstralianoj estas la plej bona aŭtoro de romanoj aktualaj en Esperantujo. Poste, dum la sama vespero, filmdebuto reliefigis anekdotojn el la vivo de doktoro Zamenhof. Bahaa esperantisto kaj entreprenisto de Melburno ege streĉis sin per amlaboro por pagi kaj enscenigi la filmeton. SATano kaj samŝtatano mia de Viktorio, Bernie Heinze, lerte kaj brile aktoris la rolon de d-ro L. L. Zamenhof. Tiam kiam efemere aperis signoj de lingva baro, kiuj eble kondukintus al malunueco, la internaciaj lingvoj de muziko kaj danco danke al profesiaj bahaaj muzikistoj, kompletigis la akcepton.

"Kadre de la Universala Kongreso proksimume dudek homojn havis la oficiala prelego de BELanoj. Ni kune alfrontis malfacilajn demandojn pri samseksemo kaj la manko de inaj membroj ĉe la Sidejo de la Universala Domo de Justeco. Ampleksa gamo da bahaaj libroj haveblis de nia laboregema sekretario en Frankfurto kiu ĝojatendas pli da BELanoj post la Kongreso. Bahaa artisto ekspoziciis delikatan artaĵon de *Kaŝita Vorto de Bahá'u'lláh* en la Internacia Lingvo, kiu unuafoje videblis antaŭ publiko. (Du jarojn poste en Hanojo mi donacis ĝin al vjetnamaj samideanoj.) Radio Pollando surbendigis la impresojn de BELano por ilin tutmonde dissendi mallongonde. Aŭstraliaj kaj novzelandaj BELanoj respondecis pri la populara sed postula ekskursaj kaj gvidula laboro antaŭ, dum, kaj post la Kongreso. Ni havigis kaj portis meblegojn necesajn en kelkaj teatraĵoj. Ofte en malfacilaj cirkonstancoj bahaa filmteamo profesia kaptis okazintaĵojn kaj same faris bahaa fotografisto. Multaj diskutvesperoj en kiuj oni esploris detale la principon de universala helplingvo kaj ĝian rilaton al mondpaco okazis en Adelajdo. Bahaaj esperantistoj de Adelajdo kantis en la Esperanto-horo. Bahaa radioprogramo atentigis pri la rolo de nekompareblaj bahaaj esperantistoj ekz.: d-ro John Esslemont, Agnes Alexander, d-ro Hermann Grossmann, d-ro Adelbert Mühlischlegel, Lidia Zamenhof, Lutfu'lláh Hakim, Mirza Muhammad Labib, Marion Jack kaj kompreneble la plej elstara, Martha Root. Gvidantoj de la bahaa komunumo en Adelajdo per vortoj kaj agoj helpis malgraŭ multaj devoj aliaj.

"Ĉiuj senescepte memoras la aŭstralian Universalan Kongreson, kiu festis la 25^{an} datrevenon de la naskiĝo de Bahaa Esperanto-Ligo, kiel neforgeseblan kaj ĝojplenan aferon. Oni jam ĝuste ĝin priskribas 'bonega kunlaboro'".

postrikolto de adelajdo

La bahaa komunumo de Adelajdo jam ricevis privatan kaj publikan laŭdegon pro la ĉiuspeca subteno, kiun ĝi etendis al la Universala Kongreso, kaj pro tio ke la Multkredo-Diservo estis bone organizita kaj partoprenita. En letero de 11 Aŭgusto 1997 la ĝenerala sekretariino de UEA skribis: "Ankoraŭfoje dankon, sinceran, elkoran, nome de la tuta estraro kaj de mi aparte!" Kaj aldone ŝi skribis en la sama letero: "Mi aparte dankas pro via preteco helpi blindulojn kaj ĝenerale helpbezonajn samideanojn." La redakciestro de Pola Radio, Andreo Pettyn, kiu estas unu el la plej influaj ĵurnalistoj de Esperantujo, en sia letero de 3 Aŭgusto 1997 vortigis: "La akcepto, kiun aranĝis la Bahaa Organizaĵo en Adelajdo kadre de la 82^a Universala Kongreso - laŭ mi - faris pli da apogo por la Bahaa Kredo ol centoj da varbfolioj aŭ broŝuroj en Esperanto... La vespero donis al multaj Kongresanoj la eblon konatiĝi kun la ideoj de Bahá'u'lláh pri lingvo internacia... Mia dankletero al vi ne estus plena, sen mencio pri la diversaj bahaaj helpantoj en la Kongresejo kaj en la preĝejo dum la komuna preĝo, la unua ĉispeca kadre de Universalaj Kongresoj. Tre bone organizita."

En la Kriŝno-konscia revuo internacia *La Veda Lotuso* la redaktoro tuj post la UK pozitive komentis pri la Diservo kaj la bahaa partopreno en ĝi. *The Australian Bahá'í Bulletin*, kiun ricevas miloj da aŭstraliaj bahaanoj, en sia Septembra 1997 eldono amplekse raportis pri la UK inkluzive de unuapaĝa foto de ridetantaj BELanoj. En la Septembra/Oktobra 1997 eldono de *Esperanto sub la Suda Kruco*, kiu estas la ĉeforgano de la aŭstralazia Esperanto-gazetaro, raportistino Franciska Toubale, rimarkigis jene en sia fina frazo: "Mi aparte admiris la novajn esperantistojn, bahaanojn de Adelajdo, kiuj helpis kaj ankaŭ tranoktigis Kongresanojn el diversaj landoj." Kaj samloke la Prezidantino de la influhava Melburna Esperanto-Asocio kaj de la aŭstralia filio de ILEI skribis: "Bedaŭrinde, al la gazetara konferenco, por kiu estis preparitaj apartaj dosieroj por angleparolantaj ĵurnalistoj, venis nur unu el la enlandaj invititaj ĵurnalistoj, reprezentanto de la bahaa revuo." Eĉ pli laŭde legeblis en ŝia letero de 19 Aŭgusto 1997: "Mi vere ne scias kion ni farintus sen la mirinda gastamo kaj bonvola bonvenigado de niaj gastoj ĉe la Kongresejo far la bahaa komunumo." Sur paĝo 24 de *ESK* la prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio jene notis: "La ekskursoj glate okazis, kaj meritas dankojn iliaj organizintoj." Ĉiuj Kongresanoj de nia fora angulo en la suda duonsfero konscias, ke aŭstraliaj kaj novzelandaj BELanoj kune kun niaj Kristanaj geamikoj la ekskursojn glatigis. En la Decembra eldono de *ESK* la redaktoro gratulis kaj dankis la aŭstralian bahaan komunumon pro ĝia multspeca subteno. *The Chronicle* kiu estas altkvalita aŭstralia ĵurnalo kun centmiloj da legantoj publikigis plenpaĝan artikolon, 10 Februaro 1998. En sia letero de 20 Oktobro 1997 la Sekretariejo de la Universala Domo de Justeco skribis : "Evidente la bahaanoj

partoprenintaj en tiu ĉi evento plej efike kaptis la okazojn por proklami la Kredon." Ege kortuŝis min, ke niaj japanaj kaj sudamerikaj gesamideanoj, mi aparte aludas al niaj religiaj geamikoj de Oomoto kaj Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, aprezis la bahaan iniciaton. Koraj bahaaj ligoj kun Oomoto, japana religio de ŝintoa deveno, kies anoj nuntempe uzas Esperanton en siaj respektindaj skriboj kaj internaciaj institucioj, originis antaŭ tri generacioj en la tagoj de bahaaninoj, Agnes Alexander, Martha Root kaj Ida Finch. En Junio 1998 Oomoto en sia kolora revuo *Nova Vojo* amplekse raportis bahaajn aktivecojn eĉ citante vortojn de Bahá'u'lláh. En la eĉ pli impona *Oomoto* n-ro 440, kiu informis pri partopreno de dek unu religioj en Adelajdo, aperis rekomendo, ke ontaj Diservoj sekvu similan planon. Simile altnivela religia eldonaĵo *Asistilo* en printempo 1998 amplekse sciigis bahaajn aktivecojn. La koincidoj inter la Bahaa Kredo, Homaranismo kaj Oomoto farus ege interesan libron; kelkaj el tiuj koincidoj jam aperis en la bonega *The Great Deguchi Onisaburo*.

Inspirita de la Kongreseventoj iu bahaa adelajdanino donacis kompletan de 'Lingua phone' diskoj kaj multekostan gramofonon al la Esperanto-movado. Bonega kurslibro kun detalaj diagramoj akompanis tiujn donacojn. Ĉio en ordo spite de multaj jaroj. Krom la financa valoro de la donacoj elstaras la voĉo de Edmond Privat, kiu estis la plej bona oratoro de sia tempo.

Parto de mia raporto de 26 Januaro 1998 al la Nacia Spirita Asembleo de Aŭstralio kaj BEL pri la aŭstralia somerlernejo en Kvinslando provizas pliajn pruvojn de amikeco inter niaj du grupoj.

"Feliĉan Tagon de Aŭstralio. Tiuj ĉi festaj tagoj adoptas kortuŝan signifon, kiam oni intencas ĉiame foriri la hejmlandon; aparte hodiaŭ ĉar indiĝena aŭstralia bahaanino atingis la plej altan nacian premion.

"Nova bahaa esperantisto, pri kiu mi jam raportis dum la 82^a UK, sinjoro John Gallagher, faris modernan miraklon post la Kongreso en Adelajdo. En bela koincido antaŭ unu monato, la Bahaa Nacia Instrukonferenco sekvis la Universalan Kongreson en la sama ŝtato, Sudaŭstralio. Je la fino de la konferenco proksimume 1.200 bahaanoj atente aŭskultis la preĝojn kaj kantojn de siaj geidoj en la Internacia Lingvo. La spektaklo ravis ĉiujn. Ĝono al la infanoj donis Esperanto-kurson dum la bahaa konferenco. Ankoraŭ unufoje, Ĝono kiu estas profesia ŝildopentrismo, fabrikis grandegan bonkvalitan Esperanto-standardon, kiu fiere flirtis en la sceneja fono malantaŭ la kantantaj infanoj.

"Pro lia laboro de amo la vojo glatiĝis pri miaj taskoj dum la aŭstralia somerlernejo, ĉar multaj bahaanoj en ĉi tiu sudorienta angulo de Kvinslando nun interesiĝas pri Esperanto kaj inverse ok samideanoj ĝis nun, inkluzive de iama prezidanto, havigis librojn pri la Bahaa Kredo. La Aŭstralia Esperanto-Asocio ĵetis sur min la honoron instrui nian karan lingvon al 16 gekomencantoj dum 2 semajnoj de nia somerlernejo. Per tiu salajro gajnita mi aĉetis unudirektan flugbileton al Tianjin, la kvara urbego de Ĉinio, kie ironie atendas min posteno de angla instruado ĉe Universitato de Komercaj

Aferoj en "tiu lando de la estonteco." Tiu estimata posteno haveblis pere de senĉesaj penoj de esperantistoj en Tianjin, ĝemela urbo de mia hejmurbo, Melburno."

"Kiel vi scias, Shoghi Effendi, senĉese stimulis la bahaanojn, kaj en la Oriento kaj en la Okcidento, fari intensan studon de tiu lingvo (Esperanto) kaj konsideri ĝin kiel gravan perilon por disvastigi la Kredon en internaciaj rondoj. Li aparte urĝas la bahaanaron forte reprezenti la Kredon en ĉiuj Esperanto-Kongresoj kaj asocioj, tiamaniere kreskigi pli grandajn amikecon kaj kunlaboron inter si kaj la esperantistoj."⁹⁹

Kiam vi pripensas la malgrandan nombron da Esperanto-parolantoj en la mondo kaj ĉe la Bahaa Monda Centro, meditu pri la abundaj aludoj al Esperanto en la Bahaaj Sanktaj Skriboj kaj flankenŝovu la koncepton, troveblan ĉe kelkaj homoj, ke la sentempa saĝeco de 'Abdu'l-Bahá estas eksdata. Tiuj aludoj de 'Abdu'l-Bahá povas esti definitive klarigitaj nur de la anoj de la Universala Domo de Justeco, kiam ĝi kunsidas kiel unusola unuiginta aŭtoritato. Intertempe analizu mem la Skribojn kaj agu laŭ via konscienco. Memoru ankaŭ, ke plimultoj ne determinas kio estas ĝusta kaj kio estas malĝusta. La ĝusta estas ĝusta, eĉ se ĉiuj krom Dio ĝin malakceptas; kaj la malĝusta estas malĝusta, eĉ se ĉiuj krom Dio ĝin aprobas. Ĉiam Dio levas humilulojn kaj modestulojn je Sia senerara juĝo, kiam la tempo konvenas. Nia lukto kontraŭ la angla, aŭ parolante pli precize nia provo kompari ĝin kun Esperanto, eble ŝajnas moderna rakonto de la batalo inter Davido kaj Goliato. Davido sukcese instruis siajn religiajn principojn kaj Goliato pereis.

Ĉu via ŝtonĵetilo estas preta?



Bildo 31. **Davido kaj Goliato.**

⁹⁹ De letero en la nomo de Shoghi Effendi 3 Aŭgusto 1935.



Bildo 32 – Adelajda BELano, Ĝono Gallagher, bonvenige ŝildpentras unu el la tri bahaaj centroj de Adelajdo. El ĵurnalo *The Guardian Messenger* 30 Julio 1997.



Bildo 33. Esperantistoj ĝuas bahaan akcepton dum la 82^a Universala Kongreso en Adelajdo. Bahaa orkestro, Galimaufery, ludas en la fono. Trevor Steele bonvenigas samideanon, Julio Hernandez, el Kubo.

bahaa internacia komunumo kaj unuiĝintaj nacioj

La tutmonda bahaa komunumo rilatas kun la ekstera mondo per la oficoj de la Bahaa Internacia Komunumo. De post 1948 BIK estas agnoskata kiel internacia neregistara organizaĵo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ekde 1970 ĝi havas konsultajn rilatojn kun EKOSOK (Ekonomia kaj Socia Konsilio de UNO) same ankaŭ kun UNICEF (Porinfana Eduka Fonduso de UN.) Ĝi havas laborrilatojn ankaŭ kun WHO (Monda San-Organizaĵo) kaj kunlaboras kun UNEP (Mediprotekta Programo de UN). BIK publikigas vastan gamon da deklaroj kaj dokumentoj kiuj traktas praktike ĉiujn temojn okupantaj la internacian socian kaj politikan vivon.

La laboron de la Bahaa Internacia Komunumo kelkaj specialaj oficejoj prizorgas. Inter ili estas Sekretariejo, Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj, Oficejo de Publika Informado, Oficejo de la Mediprotektado kaj Oficejo por Antaŭenigi Virinajn Aferojn. Pere de reprezentantoj en la Bahaa Mond-centro (Hajfo) kaj en Novjorko, Ĝenevo, Parizo, Honkongo, Londono, Jerusalemo kaj Fiĝio tiuj ĉi oficejoj agadas multkampe, ekzemple provoj estigi pacon, homajn rajtojn, edukadon, sanon, medioprotektadon, daŭrecan evoluon, senperfortajn familiojn, UN-reformadon kaj egalecon por virinoj. Multaj el tiuj agadoj estas plenumataj kunlabore kun naciaj bahaaj komunumoj kaj filantropaj organizaĵoj. Internacia revuo *One Country* informas pri ĉi ĉio en la angla, ĉina, franca, germana, hispana kaj la rusa. 1country@bic.org <http://www.onecountry.org>

Bahaa Internacia Komunumo kunlaboras ankaŭ kun multaj neregistaraj organizaĵoj ekz. World Wide Fund for Nature Network on Conservation and Religion, Centre for our Common Future, Education for All Network, World Conference on Religion and Peace kaj Advocates for African Food Security. Opiniante ke la lingva demando devus kuŝi en la manoj de registaroj oni rimarku ke UNESKO, kiu pri multaj aferoj de komunikado inter landoj estas konsilantaro de nacioj, jam du foje adoptis rezoluciojn favore al Esperanto; Montevideo en 1954 kaj Sofio en 1985.



Bildo 34 Stabanoj de la Bahaa Internacia Komunumo en Novjorko fotitaj fronte de la konstruaĵo de la Ĝenerala Asembleo de UN.

Unu el miaj ĉefaj celoj estas inspiri bahaanojn pere de la Sanktaj Skriboj diligente eklerni Esperanton se eblas. Tiu ĉi libro estas sendependa iniciato de unuopuloj. Ĝi ne estas institucia klopodo de Bahaa Esperanto-Ligo. Kvankam BELanoj, inkluzive estraranojn, private provizis subtenon, ili apenaŭ povus aldoni sian prespermeson al mia verko pro jena letero de la Universala Domo de Justeco datita 10 Majo 1974: "Individuaj bahaaj esperantistoj kompreneble havas rajton kuraĝigi bahaanojn studi Esperanton, tamen la Bahaa Esperanto-Ligo mem ne rajtas fari tion." De tempo al tempo malfacilas obei aŭ tuj kompreni rekomendojn de la Universala Domo de Justeco, sed ĉiuj bahaanoj scias ke malantaŭ la dekretoj kuŝas la sagaco de la Sinjoro, kio kristalklare fariĝos videbla je la ĝusta momento.

Estas mia plezuro informi vin ke Bahaa Esperanto-Ligo estis aprobita de la Universala Domo de Justeco en Marto 1973. La sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo lokiĝas en la bahaia templa urbo, Frankfurto. Ĝia membraro kreskas mondvaste. Kvankam la adeptoj de kaj la Bahaa Kredo kaj la Esperanto-movado ankoraŭ estas relative malmultaj, estas ĉarma koincido, ke nia komuna tereno notindas. Nia unuiĝinta neŝancelebla kaj persistema subteno de ambaŭ organizoj prezentos elstaran ekzemplon en malfeliĉa kaj eliluziigita mondo, kies afliktoj pli serioze kreskas tagon post tago.

En 1972 dum la 57^a Universala Kongreso en Portland, Usono, komenciĝis la BELa ideo ĉefe pro senlacaj penoj de sinjorino Roan Orloff Stone de Usono kaj brazila profesoro, Paŭlo Amorim Cardoso. BEL estis aprobita kaj naskita la sekvantan Marton de la Universala Domo de Justeco al kiu ĝi senpere raportas. BEL posteuloj estis ravitaj vidi multajn gastojn soleni la jubilean jaron de Bahaa Esperanto-Ligo dum la Montpelliera Universala Kongreso en Aŭgusto 1998. La fama Internacia Kongresa Centro de Adelajdo en la koro de tiu kultura, verda kaj libera urbo en Sudaŭstralio fiere pruntedonis sian inan nomon al esperantistoj dum Kongres-semajno en 1997 kiam la 25a datreveno de la BEL-koncipo estis festita.

La ĉefaj funkcioj de Bahaa Esperanto-Ligo estas informi esperantistojn pri la Bahaa Kredo en nia neŭtrala lingvo kaj samtempe ĝisdatigi bahaanojn pri esperantistaj agadoj. Pligrandiĝanta kvanto da bahaia literaturo haveblas danke al kunordigo farita de Bahaa Esperanto-Ligo. Dufoje jare Bahaa Esperanto-Ligo eldonas revuon *La BELmonda Letero* kaj ĝi baldaŭ aperigos ampleksan kompilaĵon el la Bahaaj Skriboj temante la lingvan demandon. Profesie aranĝita kaj bele ilustrita 56-paĝa broŝuro eldonita de BEL en A4-formato ĵus publikiĝis. Ĝia plena titolo estas *Bahaismo kaj Esperanto - La rilatoj inter Bahaismo kaj Esperanto kaj la disvolviĝo de Bahaa Esperanto-Ligo*. Aparte dum ĉi tiu jardeko Bahaa Esperanto-Ligo kreskas en proksimume 70 landoj kaj vigle kunlaboras kun Universala Esperanto-Asocio.

Ĉi lasta organizo kaj la Bahaa Internacia Komunumo havas konsultajn rilatojn kiel neregistaraj organizoj en kategorio 'B' ĉe UN kaj ni kunagadas kun UNICEF kaj UNESKO. Bahaanoj kaj esperantistoj havas reprezentantojn ĉe UN en Novjorko kaj diversaj oficejoj dise en la mondo. En tiaj Esperantistaj lokoj oni ĉiutage rigardas kaj

aŭdas la glatan funkciadon de unu el la principoj de Bahá'u'lláh. Oni diskutas tie gamon da necesoj de laborsemajno ĝis la kortuŝaj raportoj de Universala Kongreso. Babelo estas tie enterigita.

Antaŭ nur generacio en 1966 tiu ĉi vere mondvasta organizo, UEA, prezentis al UNESKO petskribon, kiu entenis rimarkindan milionon da subskriboj petantaj ekutiligon de Esperanto sur oficialaj kampoj. Tiuj subskriboj, kadre de religiaj institucioj, karitataj fondaĵoj, laborgrupoj, politikistoj, akademianoj, instruistoj, artistoj ktp reprezentis sepdek milionojn da homoj.¹⁰⁰ Similajn historiajn incidentojn kaj obstinajn kontraŭstarojn, eĉ martirigon, kiujn samideanoj alfrontis dum pli ol jarcento, d-ro Ulrich Lins brile registris en sia libro *La Danĝera Lingvo*. Tralegado ŝanĝis mian opinion de la monda historio. Bahaa literatura kaj historia komparo haveblas en la majstra verko de Shoghi Effendi *God Passes By* - (Dio Preterpasas).

Universala Esperanto-Asocio, kies prezidanto estas Aziano (1995-1998) kaj kies vicprezidanto estas virino, havas spertan reton de 1959 delegitoj en 100 landoj. Ĝia profesie kaj kompakte prezentita *Jarlibro'99* provizas plej altkvalitan internacian interligilon por mondveturantoj kaj mondaj civitanoj igante la terglobo unu lando. Kun pli ol 90 jaroj de praktika travivado kaj pli ol 20.000 anoj en 120 landoj kaj multe pli da Esperanto-parolantoj, inkluzive aktivan junularan sekcion, tiu mirinda organizaĵo pretas por rapida kreskado. Anoncoj pri BEL kaj mia libro troveblas en *Jarlibro 2003*.



Bildo 35 –

Bahaanoj partoprenas la Jubilean Universalan Esperanto-Kongreson en Varsovio 1987.

En tiu 72^a UK partoprenis 5.946 gesamideanoj.

La ĉi-jara UK en Tel-Aviv alportis kelkajn brilajn sukcesojn por nia Kredo. Tri estraranoj de UEA interkonsiliĝis kun s-ro Ian Semple, membro de la Universala Domo de Justeco. Ili dankis bahaanojn precipe pro iliaj lastatempaj klopodoj disvastigi Esperanton en Oceanio. Entute kvin busoj da kongresanoj, inkluzive juĝiston Kep Enderby, vizitis lige kun la UK la bahaan mondcentron en Hajfo. Konsilanto s-ro Hartmut Grossmann, membro de la Internacia Instrucentro, renkontis ilin. La Universalan Domon de Justeco li reprezentis ĉe la oficiala inaŭguro de la Kongreso en kiu li faris paroladon en Esperanto. Je tiu ĉi okazo Kep Enderby ne povis sin deteni antaŭ la kompleta Kongresanaro laŭdi la bahaanojn kaj rekomendi *Turnopunkto por*

¹⁰⁰ Vidu J.E. Esslemont *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* p.280. Aldonaĵo de Bahaa E^o-Ligo 1978 Usono.

Ĉiuj Nacioj. BELanoj dumkongrese prezentiĝis precipe serve; simile al eventoj en Adelajdo, 1997. (El raporto de B. Westerhoff, Aŭgusto 2000.)



Oficiala vizito al la Bahaa Mondcentro dum la 85a UK. M. Karpanti, P. Chrdle, UEA; H. Grossmann, B. Westerhoff, BEL; R. Corsetti, K. Kniivila, U.E.A.

Aldone al lastatempaj kaj brilaj Esperanto-produktaĵoj de la propraj vortoj de Bahá'u'lláh, ekzemple *Perloj de l' Saĝo* en kiu Mahatma Gandhi laŭdegas la Bahaan Kredon (“la espero de la homaro”) oni aparte menciis la tradukojn de Bahaa Esperanto-Ligo bazitaj sur aktualaj dokumentoj el la Universala Domo de Justeco kaj la Bahaa Internacia Komunumo. Inter ili estas *Mondcivitaneco*, *Globala Etiko Por Daŭreca Evoluo*, *La Prospero de la Homaro* kaj *Turnopunkto Por Ĉiuj Nacioj*. Ĉi lasta kaj tre grava deklaro elstara de la Bahaa Internacia Komunumo je la okazo de la 50a datreveno de UN proponas konkretajn kaj inspirajn rekomendojn al tiu nobla mondinstanco por atingi mondpacon. La graveco de paragrafo 3A.4 kaj ĝiaj klarignotoj meritas profundan studadon kaj konsultadon en la hodiaŭa programo de studantoj de la lingva demando.

Marte 1996 Bahaa Esperanto-Ligo enpoŝtigis Esperanto-tradukaĵojn el *Turnopunkto Por Ĉiuj Nacioj* kaj *La Prospero de la Homaro* al Universala Esperanto-Asocio. BEL proponis pli intiman kunlaboron inter ambaŭ organizaĵoj pro niaj komunaj celoj de mondpaco kaj justeco. Responde la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario de Universala Esperanto-Asocio, inter renkontiĝoj de Neregistaraj Organizaĵoj, vizitis la direktoron de Bahaa Internacia Komunumo, Techeste Ahderom, en lia novjorka oficejo. Tiu renkontiĝo estas pozitive raportita en la Esperanto-mondgazetaro. La Prezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong, ankaŭ letere respondis al la Prezidanto de Bahaa Esperanto-Ligo, Heinz-Dieter Maas, pri la novjorka renkontiĝo. Prezidanto Lee kaj Ĝenerala Sekretario Fettes klarigis sian ĝojon legi la sekcion de *Turnopunkto Por Ĉiuj Nacioj* pri monda helpa lingvo samtempe aldonante siajn aprobon kaj subtenon. Ili saĝe proponis firme sed diskrete kune influi al UN por rapidigi la debaton pri la lingva problemo en tiu mondforumo.

TURNOPUNKTO POR ĈIUJ NACIOJ: DEKLARO DE BAHAA INTERNACIA KOMUNUMO OKAZE DE LA 50A DATREVENO DE LA UNUIGINTAJ NACIOJ.

3A. 4. "Devontigo al Universala Helpa Lingvo kaj Komuna Skribo." 'Paĝo 9'.

"Por la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj aktuale uzas ses oficialajn lingvojn, aŭ la elekto de unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ la kreo de nova por la uzado kiel helpa lingvo en ĉiuj ĝiaj forumoj, signifus konsiderindan avantaĝon. Tia paŝo jam delonge estas proponita de multaj grupoj, de la esperantistoj ĝis mem la Bahaa Internacia Komunumo. Krom al ŝparo de mono kaj simpligo de administraj procedoj, tia paŝo signife kontribuas al la antaŭenigo de spirito de unueco.

"Ni proponas la nomumon de altnivela komisiono kun membroj venantaj el diversaj regionoj kaj el rilataj terenoj, inkluzive de lingvistoj, ekonomiistoj, socisciencistoj kaj homoj el edukado kaj la amaskomunikiloj, por komenci zorgan studadon de la afero de internacia helpa lingvo kaj adopto de komuna skribo.

"Ni antaŭvidas, ke fine la mondo neeviteble devos adopti unu universalan agnoskitan helpan lingvon kaj skribon por instruiĝo en lernejoj tra la tuta mondo kiel suplementon al la lingvo aŭ lingvoj de ĉiu lando. La celo estas faciligi la transiron al globeca socio pere de plibonigita komunikado inter nacioj, reduktado de administraj kostoj por komercado, registaroj kaj aliaj envolvitaj en globecajn entreprenojn, kaj ĝenerala fortikigo de pli elkoraj rilatoj inter ĉiuj anoj de la homara familio.

"Tiu ĉi propono estu konsiderata laŭlitere. Ĝi neniel antaŭvidas la malfortiĝon de iu ajn vivanta lingvo aŭ kulturo." (*Bahaismo kaj Esperanto* p.32. 1997: Tradukis BEL.)

La graveco de la supra deklaro de la Bahaa Internacia Komunumo konstateblas pere de la jenaj vortoj de la Prezidanto de UEA okaze de la 25^a BELjariĝo, (19 marto 1998 - 18.19.154 bahaa erao.) "Estas mia plezuro saluti al la Bahaa Esperanto-Ligo okaze de ĝia 25-jariĝo."

"Esperanto estas ne nur unu lingvo, sed lingvo kun amo. La 'interna ideo' entenata en Esperanto estas 'neŭtraleco, justeco, frateco kaj amikeco surbaze de homamo.' 'Ni ŝatas Esperanton ne pro tio, ke ĝi similas al la cerbo de la homo, sed pro tio ke ĝi similas al la koro de la homo.' Pere de la internacia komuna lingvo ni serĉas unuecon en diverseco por pli justa kaj paca mondo, kaj finfine kreon de pli justa nova internacia lingva ordo. La fina celo de la Bahaa Kredo estas 'la kreo de unueco inter ĉiuj popoloj de la mondo,' pere de kreo de 'nova internacia ordo.' En tia senco la interna ideo de Esperanto kaj la Bahaa Kredo havas la komunan eron.

"Ĉiuj raciaj analizoj indikas, ke internacia komuna helplingvo estas utila kaj bezonata, sed al ni ankoraŭ mankas politika forto, kiu havas decidpovon. Unuiĝintaj Nacioj estas la plej interŝtata organizaĵo, kiu havas tian decidpovon. En tia senco mi tute subtenas, ke la Bahaa Internacia Komunumo koncentrigas siajn ĉefajn aktivecojn al UN. La propono de la Bahaa Internacia Komunumo rilate al 'universala helplingvo', en ĝia

deklaro *Turnopunkto por ĉiuj Nacioj*, okaze de la 50^a jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj, estas fame konata en la Esperanto-komunumo kaj ni ĉiuj apogas la bazan ideon.

"Universala Esperanto-Asocio eklanĉis 'Kampanjon 2.000' por prepari kreon de nova kaj pli justa internacia lingva ordo. Rekonante la rolon de la neregistraj organizoj por mobilizi politikajn fortojn, UEA kune kun Bahaa Internacia Komunumo kaj aliaj NROj de UN, fondis 'Koalicion de NROj por Internacia Helplingvo', celante enkondukon de internacia helplingvo por UN. Tie ni trovas vastan kaj esperplenan terenon por kunlaboro inter la Esperanto-komunumo kaj la bahaa komunumo.

"En la pasintaj 25 jaroj Bahaa Esperanto-Ligo montris, ke ĝi estas la plej taŭga kaj efika ligilo inter la du komunumoj por krei novan internacian lingvan ordon. Elkore gratulante la 25-jariĝon, mi esperas, ke Bahaa Esperanto-Ligo pli aktive kaj pli vigle agados por la komuna celo de la bahaa komunumo kaj de la Esperanto-komunumo." ¹⁰¹

Dum jaro de bahaa kaj Esperanto-servo en Supra Silezio, Pollando, la Departemento de la Sekretariejo de la Universala Domo de Justeco sendis al mi leteron, 4 Julio 1995. En ĝia unua paragrafo la potenco de la neŭtrala lingvo malfermi pordojn evidentiĝas: 'La Universala Domo de Justeco ricevis vian leteron de 23 Aprilo 1995 kaj notis kun estimo viajn sindonajn klopodojn jaron post jaro por antaŭen igi la favoran rilaton inter la Bahaa Kredo kaj la Esperanto-movado. Sendube la agadoj de la esperantistoj jam fariĝis esenca kanalo por proklami la Kredon en gravaj kaj ofte neatingeblaj rondoj.'

Baldaŭ post tiu signifoplena komunikaĵo, per humuraj cirkonstancoj kaj tute ne atendite, mi ricevis inviton Esperante alparoli diversan grupon da polaj civitanoj. Iu turisma firmao kun kontaktoj kun la aŭstralia registaro organizis renkontiĝon ĉe la arĥitektura donaco stalina en la urbocentro de Varsovio. Tiu ega konstruaĵo, la Palaco pri Scienco kaj Kulturo, kiu ne plaĉas al artemaj homoj kiel poloj pro ĝia edziĝkukstila arĥitekturo kaj ĝia rilato kun ateista soveta komunismo, surprize fariĝis ejo de improviza prelego pri la Bahaa Kredo. La oficiala parolisto, iu pola aŭstraliano, simile al multaj aŭstralianoj, estis iom lakona; tial oni alvokis iun ajn ĉeestantan aŭstralianon al la mikrofono. Akompananta pola bahaa esperantisto tiam propravole pridemandis la aŭskultantojn, ĉu plaĉus al ili aŭskulti Melburnanon, kiu loĝis inter ili dum la pasinta jaro, paroli pri siaj travivaĵoj kaj pensoj. Estis kvazaŭ oni invitus sian plej ŝatatan nevon aŭ nevinon akompani onin al kinejo. La pola gento, 95% el kiu estas romkatolikaj kristanoj, alte estimas kaj Esperanton kaj Aŭstralion pro niaj kontaktoj kun Kosciuszko kaj Strezlecki i.a. Eble la ejo estis ne tiel surpriza, ĉar la principoj se ne la agadoj de vera komunismo inspiris multajn inkluzive sincerajn geamikojn miajn, kiuj fine bahaaniĝis. Eŭropanoj kompreneble ne komprenas la hontosignon, kiun aŭstralia kulturo alfiksas al malferma kaj longa diskuto de la propraj politikaj kaj religiaj opinioj. Eble mia aĝo montriĝas en ĉi lasta komento, ĉar verdire ankaŭ ĉi tiu ŝiboleto velkas en mia amata lando!

fine la paco

¹⁰¹ Bahaa Esperanto-Ligo. *Bahaismo kaj Esperanto* p.5. Frankfurto. 1997. (Vortoj de UEA–Prezidanto Lee Chong-Yeong.)

Letero datita 17 Septembro 1986 de la Universala Domo de Justeco al Naciaj Spiritaj Asembleoj de Bahaanoj en Eŭropo koncize resumas multajn erojn de ĉi tiu libro pri kunlaboro kun esperantistoj kaj iliaj institucioj.

"La Bahaa Mondo-Centro ricevis inspirajn raportojn pri la sukceso de la pekina Universala Kongreso en Ĉinio kaj pri la partopreno en ĝi de BELanoj. La posta Kongreso okazos en Varsovio, la ĉefurbo de Pollando kaj la hejmo de Ludoviko Zamenhof, la inventinto de Esperanto, kies filino Lidia estis tiom sindona adeptino de Bahá'u'lláh.

"En la kadro de siaj penoj akceli pacon, ni opinias ke la eŭropa bahaanaro devus pligrandigi sian kunlaboron kun la Esperanto-movado. Ni konsilas tiujn bahaanojn, kiuj sentas la impulson helpi en tiu ĉi kadro, lerni Esperanton kaj aktiviĝi en la agadoj de la movado. Kiel vi scias, kvankam 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi klarigis, ke neniel certas ke Esperanto fine estos elektita kiel la internacia helplingvo de la mondo, 'Abdu'l-Bahá instigis la orientajn kaj okcidentajn bahaanojn lerni ĝin kiel praktikan paŝon por antaŭenigi la koncepton de la adopto de internacia helplingvo por rompi la barilojn de miskompreno inter la popoloj.


"Tiel, ĉar adeptoj de Bahá'u'lláh kunlaboras kun multaj diversaj unuopuloj kaj asocioj por akceli projektojn de ekonomia kaj socia evoluo kaj por establi mondpacon, kelkaj el ili strebus gajni ageman kunasocion kun la esperantistoj, kiuj, ili konstatos, dividas multajn idealojn kun ili. Vi estas petata dividi ĉi tiun leteron kun ĉiuj bahaanoj en viaj landoj."

Je la komenco de la dua paragrafo de ĉi tiu letero ni komprenas per detala ekzameno de komplika frazo speciale la propozicio, "En la kadro de siaj penoj akceli pacon", ke Bahaaj Skriboj ree substrekas la ligon inter paco kaj Esperanto. Kiel mi antaŭe menciis, 'Abdu'l-Bahá faris same en *Parizaj Paroladoj* kaj Bahá'u'lláh Mem ligis la principon de universala lingvo kun la fino de militoj en *The Gleanings CXVII* (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh). Interesas la propozicio de la Bahaa Mondo-Centro, "bahaanoj kiuj sentas la impulson helpi en tiu ĉi kadro" ĉar ni ĉiuj sentas la urĝan neceson de mondpaco en tiuj ĉi tumultaj tagoj. Mia kompreno de la sama propozicio sugestas, ke la Universala Domo de Justeco ne limigas al eŭropanoj sian rekomendon lerni Esperanton. Eŭropaj bahaanoj kaj bahaanoj alikontinentaj, kiuj sentas la impulson helpi akcelon de paco, bone reagus, se ili lernus Esperanton kaj aktiviĝus en la Esperanto-movado. La Universala Domo de Justeco decidis sendi samtempe kopion de sia letero al la Bahaa Internacia Instrua Centro kaj Naciaj Spiritaj Asembleoj de Aŭstralio, Kanado, Novzelando kaj Usono.

"La vortoj de homo rivelas lian koron. En kiu ajn mondo lia koro vojaĝas, liaj vortoj rondiras ĉirkaŭ tiu centro. Per liaj vortoj eblas kompreni en kiu mondo li vojaĝas, ĉu li rigardas supren al la luma regno ĉu malsupren al la suba mondo, ĉu aŭ ne li konscias, ĉu li dormas aŭ ne, ĉu aŭ ne li vivas. Pro tio lia sankta moŝto Ali diras: "La homo kaŝas sin malantaŭ sia lango. El la abundo de sia koro la homo parolas."¹⁰²

¹⁰² 'Abdu'l-Bahá *Star of the West* p.24, vol.8. nro 2. (ekster vol 5.) 25 Julio 1914. (Tradukis T.Steele/P.Desailly.)

'Abdu'l-Bahá jam garantiis al ni, ke la amo kaj peno dediĉitaj al Esperanto ne estos perditaj. "Li diras ke Esperanto disvastiĝos kaj eĉ rekomendis, ke, ĉiuj bahaanoj kiuj povas, studu ĝin."¹⁰³




Bildo 36. La unua bahaa templo – Aŝhabad, Turkmenio.


La unua bahaa templo, Aŝhabad en Turkmenio, estis konfiskita en 1928 dum la komunisma erao; baldaŭ poste ĝi estis parte detruita dum tertremo; tial oni devis malkonstrui ĝin. Ĉiu bahaa templo, pli ĝuste konata el la persa kiel Mashriqu'l-Adhkár (pr.: Maŝrekol-Askar) t.e. "Tagiĝloko de la Glorado al Dio", libere pruntas de lokaj tradicioj kaj havas naŭ identajn enirejojn, tra kiuj ĉiuj el la grandaj religioj de la mondo simbole povas eniri kaj renkontiĝi en unueco.



Bildo 37 – Wilmette, Illinois, Usono.



Bildo 38 – Sydney, Aŭstralio.




Bildo 39 – Frankfurt, Germanio.



Bildo 40 – Apia, Okcidenta Samoo.




Bildo 41 – Kampala, Ugando.



Bildo 42 – Panama, Panamo.

¹⁰³ El letero datita 30 Aŭgusto 1928 en la nomo de Shoghi Effendi citanta 'Abdu'l-Bahá-on.



Bildo 43 – **Multope Premiita Bahaa Adorejo – Novdelhio, Hinda Unio.**

La Lotusa Templo

La Sonĝo de Akbar estis verkita en la jaro 1892, la mortjaro de Bahá'u'lláh kaj Alfred Lord Tennyson. Ĉi lasta, la poeto laŭreata en la jaroj 1850-1892 de reĝino Viktorio de Britio, naskiĝis en 1809. Angleparolantaj esperantistoj faris la ravan pretendon, ke, la belecon de la originala poemo la Esperanto-traduko de Lidia Zamenhof egalas, eĉ superas.

<i>Well I dreamed That stone by stone I reared a sacred fane, A Temple, neither Pagod, Mosque nor Church, But loftier, simpler, Always open-doored To every breath from heaven, And Truth and Peace and Love and Justice Came and dwelt therein.</i>	Mi sonĝis, Ke ŝton-post-ŝton' mi konstruis sanktan Adorejon, Templon nek Pagodon, Moskeon nek Preĝejsimilan, Sed pli altan, pli simplan, ĉiam Malfermitan al ĉia spiro ĉiela, kaj ke Vero kaj Paco kaj Amo kaj Justeco venis kaj ekloĝis tie.
---	--

Ŝaho Jahan, nepo de Akbar la Granda (1542-1605), konstruigis Taj Mahal-on. Tamen, laŭgrade Akbar provizis la inspiron. Akbar, batalista reĝo, kvankam islamano, kalkulis hinduajn principojn inter siaj 300 edzinoj kaj li reduktis religiajn impostojn ĉe plejmulto de siaj regnantoj, hinduoj. Celante stimuli religian harmonion li starigis hinduajn templojn kaj en 1575 li estigis Din-i Llahi-on, eklektika kombinaĵo de Hinduismo, Islamo, Kristanismo kaj Zoroastrismo, kiu estis forkonfesita de liaj posteuloj. “Larmero sur la vango de tempo” estas maŭzoleo memore al la plej amata edzino de ŝaho Jahan. Ŝi mortis kvardek jaraĝa en 1631 dum akuŝo por la dekkvara fojo. Ĉirkaŭ 350 jarojn la Taj Mahal atestadas, kiel la plej populara konstruaĵo en la mondo, pri la dediĉo de la ŝaho al Mumtaz Mahal. Apud en Nov-Delhio troviĝas bahaa arkitektura belegaĵo, supozata esti nekonstruebla, kiu tamen spegulas vizion de Barono Tennyson.



Ekster Hotelo-Espero, kie granita statuego de D-ro Zamenhof estis ceremonie senvualigita kaj televide elsendita al la homoj de Ĉinio dum la 5^a Pacifika Kongreso de Esperanto. En tiu ĉi hotelo ĉiam deĵoras ĉinaj esperantistoj.

(1)




(2) La aŭtoro kaj lia longtempa korespondantino bonvenigas gesamideanojn al la Domego de la Popolo. Tiu ĉi elstara bonvenigo kun orkestro, kutime nur por politikistoj, montras kiom la ĉina popolo altestimas Esperanton.



(3) Florportantaj, himnkantantaj, Esperanto-geinfanoj
beligis kvar murojn de la Kongresa promensalono.

Fotoj 1,2 & 3. Qingdao, Ĉinio. Aŭgusto 1992. Turista urbo ĉefe por ĉinoj mem.
Ĝi havas germanan arĥitekturan influon kaj belegan havenon.



Bildo 44. Esperanto-klaso en Persio, Teherano, dum la unua mondmilito.

n-ro 1. Bahman Mirza, princo.

n-ro 2. Mohammad Yazdi.

n-ro 3. Maniehair Khan.

n-ro 4. Solem, juda Eo-instruisto kiu
renkontiĝis kun 'Abdu'l-
Baha en Parizo.

Jen refoje, kiel montras la fotografiaĵo, bahaaj virinoj
en Islama lando montras la vojon kaj lernas Esperanton.

ALDONAĴO 1. ADAMO, BABELO KAJ LA INUNDO.

"Kaj nun pri via demando, 'Kial nenia kroniko troviĝas pri la Profetoj antaŭ Adamo,* la Patro de la Homaro, aŭ pri la reĝoj vivintaj en la tagoj de tiuj Profetoj?' Sciuj ke la manko de aludo pri ili ne pruvas, ke ili efektive ne ekzistis. Oni devus atribui la nunan mankon de indikoj pri ili al ilia ekstrema malproksimeco kaj aldone al la vastaj ŝanĝiĝoj kiujn la tero travivis ekde tiam.

"Cetere tiaj formoj kaj manieroj skribi, kiaj nuntempe estas uzataj de la homoj, estis nekonataj de la generacioj antaŭ Adamo. Eĉ estis tempo, kiam la homaro tute ne sciis la skriban arton, kaj adoptis tute malsimilan sistemon ol tiu, kiun ni utiligas hodiaŭ. Por dece elmontri tion estus bezonata komplika klarigo.

"Konsideru la diferencojn, kiuj jam aperis de post la Adama tempo. La diversaj kaj vaste konataj lingvoj nun parolataj de la surteranoj estis origine ne konataj, same kiel la multaj regantaj leĝoj kaj moroj de la aktuala homaro. La popoloj de tiuj epokoj parolis lingvon malsaman ol tiuj nun konataj. Lingvaj diferencoj estiĝis dum malfrua tempo en lando kun la nomo Babelo. Ĝi ricevis la nomon Babelo ĉar la termino signifas 'La loko, kie la konfuzoj de lingvoj leviĝis'.

"Poste la siriaka iĝis elstara inter la ekzistantaj lingvoj. La Sanktaj Skriboj de antaŭaj tempoj revelaciigis en tiu lingvo. Post tio, Abrahamo la Amiko de Dio, aperis kaj ĵetis sur la mondon lumon de Dia Revelacio. La lingvo, kiun Li parolis transirante la Jordanon diskoniĝis kiel la hebrea, kio signifas 'la lingvo de la transiro'. La Libroj de Dio kaj la Sanktaj Skriboj estis poste revelaciitaj en tiu lingvo, nur longe poste la araba fariĝis la lingvo de Revelacio.

"Tial vidu kiel multnombraj kaj ampleksaj estis la ŝanĝiĝoj en lingvoj ĉu parola ĉu skriba ekde la tagoj de Adamo. Kiom des pli vastaj estis la ŝanĝiĝoj antaŭ Li !

"Nia celo en tio, ke Ni malkaŝas tiujn ĉi vortojn, estas montri ke la sola vera Dio, en Sia plej alta kaj superega rango, ĉiam estis kaj ĉiam daŭre estos ekzaltata preter la laŭdo kaj koncepto de ĉiu alia estaĵo krom Li. Lia kreo ekzistas de eterne, kaj la Manifestiĝoj de Lia Dia Gloro kaj la Fontoj de eterna sankteco estis pretermemore sendataj. Ilia misio estis alvoki la homaron al la sola vera Dio. Ke la nomoj de kelkaj el ili forgesiĝis kaj la kroniko de iliaj vivoj perdiĝis, estas pro la tumultoj kaj ŝanĝiĝoj kiuj jam skuis la mondon.

"Iuj libroj menciis inundon detruintan ĉiujn ekzistantajn estaĵojn sur la Tero, historiajn dokumentojn kaj ĉion alian. Plue multaj kataklismoj okazis, kiuj forviŝis la spurojn de multaj eventoj. Krome, inter ekzistantaj historiaj registroj malsimilaĵoj troviĝas, kaj ĉiu el la diversaj popoloj de la mondo havas sian propran kalkulon de la aĝo de la Tero kaj ĝia historio. Iuj skizas sian historion ĝis antaŭ 8.000 jaroj, aliaj eĉ ĝis 12.000 jaroj. Al leginto de la libro de Juk estas tre evidente, kiom diferencas la versioj de la diversaj libroj.

"Dio donu, ke vi turnu la okulojn al la Plej Granda Revelacio, kaj tute ignoru tiujn inter si malakordajn rakontojn kaj tradiciojn."¹⁰⁴

* Vidu ĉapitron XII kaj paĝon 299 de *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko* por trovi la bahaan klarigon pri Adamo kiel la unua al la historio konata Manifestiĝo de Dio. Li inaŭguris 6.000 jaran ciklon, kiu finiĝis per la Disistemo kaj kalendaro de Báb. La antikva rakonto pri Adamo kaj Eva devas esti akceptita simple kiel simbolo taŭga por pasinta tempo.

ALDONAĴO 2.

Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá la 17^{an} de decembro 1919 al la Centra Organizo por Daŭra Paco Den Haag, Nederlando.¹⁰⁵ (Tradukita el la persa en Frankfurt 1964.)

Ho vi altestimataj, kiuj vi estas pioniroj inter la bonvoluloj en la mondo de la homaro!

La leterojn, kiujn vi estis sendintaj dum la milito, mi ne ricevis, sed unu letero de la 11a de februaro 1916 ĵus atingis min kaj nun senprokraste sekvu la respondo. Via intenco indas miloblan laŭdon, ĉar vi servas al la homa mondo, kaj tio ĉi gvidas al feliĉo kaj bonfarto de ĉiuj. Tiu lastpasinta milito pruvis al la mondo kaj al la popoloj, ke milito estas detruo, sed mondpaco estas konstruo. Milito estas morto, sed paco estas vivo. Milito estas rabemo kaj sangavido, sed paco estas bonfarto kaj humaneco. Milito apartenas al la mondo de naturo, sed paco al la fundamentoj de la religio de Dio. Milito estas densa mallumo, sed paco estas ĉiela lumo. Milito estas detruanto de la homara strukturo, sed paco estas la eterna vivo de la homa mondo. Milito similas sovaĝan lupon, sed paco la anĝelojn de la ĉielo. Milito estas batalo por vivo, sed paco estas reciproka helpo kaj kunlaboro inter la popoloj de la mondo kaj kaŭzas plaĉon al la unusola vero en la ĉiela regno.

Ekzistas eĉ ne unu animo, kies konscio ne atestus, ke nuntempe ne ekzistas io pli grava en la mondo ol la mondpaco. Ĉiu justa homo konfirmas tion ĉi kaj alte taksas tiun ĉi honoratan societon, ĉar ĝi celas transformi tiun mallumon en lumon, tiun sangavidon en bonecon, tiun torturon en ĝojegon, tiun mizeron en bonstaton kaj tiujn malamikecon kaj malamon en kamaradecon kaj amon. Pro tio la klopodo de tiuj ĉi estimataj animoj indas premion kaj laŭdon.

Sed saĝaj animoj, perceptantaj la esencajn rilatojn inter la realaĵoj, scias ke io unuopa, unusola ne povas tiom influi la homan realaĵon, kiom tio estus necesa kaj devus esti, ĉar neniu grava afero estas atingebla antaŭ ol la opiniaro de la homoj estos unuigita. Hodiaŭ la mondpaco estas tre grava afero, sed esenca estas la unueco de la konscio pri tio, por ke la fundamento de tiu afero estu sekurita, ĝia fondaĵo solida kaj ĝia strukturo fortika.

¹⁰⁴ *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh* LXXXV11 p. 172 - Kolekto el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh. Bahá'í Publishing Trust 1969 Wilmette (Tradukis provizore : T. Steele kaj P. Desailly.)

¹⁰⁵ Fondinto de Internacia Esperanto-Instituto en Den Haag estis Pastro Andreo Cseh de Rumanio. Martha Root kaj li estis sinceraj geamikoj.

Tial Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh antaŭ kvindek jaroj klarigis tiun problemon de mondpaco, kiam Li vivis arestita, enkarcerigita, maljuste traktita en la fortikaĵo 'Akká. Li skribis pri tiu grava afero, la mondpaco, al ĉiuj grandaj regnestroj de la mondo kaj efektivigis la pacon en la rondo de siaj amikoj en la oriento. La oriento troviĝis en densa mallumo, nacioj reciproke kondukis malame kaj malamike, religioj soifegis je sango de alia, regis nepenetrebla mallumo. Ĝuste dum tiu tempo ekbrilis Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh kiel suno ĉe la horizonto de la oriento kaj heligis Persion per la radioj de ĉi tiuj instruoj.

Unu el Liaj instruoj estis la deklaro de la mondpaco. Homoj de diversaj nacioj, religioj kaj sektoj, kiuj sekvis Lin, tiom proksimiĝis, ke okazis rimarkindaj kunvenoj konsistantaj el homoj de diversaj popoloj kaj religioj en la oriento. Ĉiu animo partoprenanta tiajn kunvenojn vidis nur unu popolon, unu instruon, unu vojon, unu ordonon, ĉar la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh ne estis limigitaj nur al la konstruo de la mondpaco, kontraŭe ili enhavas multajn instruojn kompletigantajn kaj subtenantajn la instruon pri la mondpaco.

Inter tiaj instruoj estis: la sendependa esplorado de la vero, tiel ke la homara mondo estu savita el la mallumo de imito kaj atingu la veron, ke ĝi forigu kaj forĵetu la ĉifonitan kaj eluzitan vestaĵon de mil jaroj kaj surmetu robon teksitan en plej nobla pureco kaj sankteco per teksilo de realaĵo. Ĉar la realaĵo estas nur unusola, sed ne diversspeca, diversaj opinioj fine devas kuniĝi en unu.

Inter la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh troviĝas la unueco de la homaro, nome ke ĉiuj homaj kreitaĵoj estas la ŝafoj de Dio kaj Li la bonfara Paŝtisto. Tiu Paŝtisto estas bonfara al ĉiuj ŝafoj, ĉar Li kreis ilin ĉiujn, Li edukis ilin, Li prizorgis ilin kaj ŝirmis ilin. Dubo ne eblas, ke la Paŝtisto estas bonfara al ĉiuj ŝafoj. Se inter ili troviĝas sensciantoj, ili estu klerigataj; se troviĝas infanoj, ili estu edukataj ĝis ili atingos maturecon; se troviĝas malsanuloj, ili estu sanigataj. Sed estu nek malamo, nek malamikeco. Kiel bonfara kuracisto oni sin okupu pri tiuj sensciantoj kaj malsanuloj.

Inter la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh troviĝas alia instruo: religio estu la kaŭzo de kamaradeco kaj amo. Se pro religio estiĝas kaŭzo de reciproka fremdiĝo, oni ne parolu pri ĝi. Ĉar religio similas kuracilon; se ĝi malbonigas la suferon, ĝi estas netaŭga.

Inter la instruoj de Bahá'u'lláh plue troviĝas: la religio estu konforma kun scienco kaj racio tiel, ke ĝi enfluu en la homajn korojn. La fundamento devas esti solida, kaj ĝi ne konsistu el imitaĵoj.

Kaj alia el la instruoj de Bahá'u'lláh estas: religiaj, rasaj, politikaj kaj patriotaj antaŭjuĝoj detruas la strukturon de la homaro. Tiom longe kiom tiuj antaŭjuĝoj superregas, la homaro ne kvietiĝos. Pri sesmiljara ekzisto de la homaro la historio sciigas nin. Dum tiuj sesmil jaroj la homara mondo ne seniĝis de milito, batalo,

mortigo, sangavido. Dum ĉiu epoko en unu aŭ alia lando ekestis militoj, kaj tiuj militoj okazis pro religia, rasa, politika aŭ patriota antaŭjuĝoj. Tiel laŭsperte pruviĝis, ke ĉiuj antaŭjuĝoj rezultigas detruon de la homara strukturo. Tiel longe kiel tiaj antaŭjuĝoj plue ekzistos, la batalo pri vivo superregos, kaj sangavido kaj rabemo daŭros. Tial la homaro, kiel okazis en la pasinteco, ne povas esti savata el la mallumo de la tera naturo kaj akiri spiritan eklumiĝon, se ĝi ne forigos la antaŭjuĝojn kaj akiros la virtojn de la Dia regno.

Se tia antaŭjuĝo kaj malamikeco estiĝas pro religio, konsideru ke religio devus esti la kaŭzo de amikeco; alikaze ĝi estus senfrukta. Kaj se la antaŭjuĝo estas nacia, konsideru, ke ĉiuj homoj apartenas al unu nacio. Ĉiuj devenis de la arbo de Adamo, kaj Adamo estas la radiko de la arbo. Tiu arbo estas unusola kaj ĉiuj popoloj similas la branĉojn, dum la individuaj homoj similas la foliojn, florojn kaj fruktojn. La teritoria dispartigo inter diversaj popoloj kaj la sekvanta sangoverŝado kaj detruo de la homara strukturo devenas nur de homa senscio kaj de egoismaj emoj.

Koncerne la patriotan antaŭjuĝon: ankaŭ tio devenas de absoluta senscio, ĉar la supraĵo de la tero estas unusola hejmlando. Ĉiu homo povas vivi en ĉiu ajn loko de la terglobo. Tial la tuta mondo estas la nasklando de la homo. La landlimojn kaj ĉelimaĵn konstruaĵojn elpensis la homoj. Ĉe la kreo de la mondo tiaj limoj kaj teritorioj ne estis signifitaj. Eŭropo estas unu kontinento, Azio estas unu kontinento, Afriko estas unu kontinento, Aŭstralio estas unu kontinento, sed kelkaj animoj pro individuaj motivoj kaj egoismo dispartigis ĉiujn kontinentojn kaj konsideris certan parton kiel sian propran landon. Dio ne faris limojn inter Francio kaj Germanio; ili estas senlimaj. Vere, dum la unuaj jarcentoj egoistaj animoj pro siaj propraj profitoj faris limojn kaj teritoriojn kaj iom post iom pli akcentis tion, ĝis fine en sekvintaj jarcentoj tio gvidis al intensa malamikeco, sangoverŝo kaj rabemo. Tiamaniere tio daŭrados senfine, kaj se tiu koncepto pri patriotismo restus konservita en certa rondo, ĝi estos la ĉefa kaŭzo de mondodetruo. Neniu prudenta kaj justa homo agnoskos tiajn imagitajn diferencigojn. Ni nomas iun limigitan areon nia hejmlando kaj konsideras ĝin kiel patrujon, dum ne iu malvasta spaco, sed la terglobo estas la patrujo de ĉiuj. Konkize: nur kelkajn tagojn ni vivas sur ĉi tiu tero kaj fine ni estos entombigitaj ĉi tie, ĝi estas nia eterna tombo. Ĉu valoras sangoverŝi kaj disŝiri unu la alian pro tiu eterna tombo? Ne, tute ne – nek al Dio tia konduto plaĉus, nek iu ajn prudenta homo aprobus ĝin.

Pripensu: la feliĉaj bestoj neniam sin okupas pri patriotaj bataloj. Ili unuanime kune vivas en plej bona kamaradeco. Ekzemple: Se okaze renkontiĝas samtempe en unu loko kolombo el la oriento kaj kolombo el la okcidento, kolombo el la nordo kaj kolombo el la sudo, ili tuj harmonie sin asocias. Same okazas ĉe ĉiuj pacemaj bestoj kaj birdoj. Sed la sovaĝaj bestoj, tuj kiam ili renkontiĝas, atakas unu la alian, batalas unu kontraŭ la alia kaj disŝiras unu la alian, kaj ili ne povas pace kune vivi en la sama loko. Ili ĉiuj estas malsociemaj kaj ferocaj, sovaĝaj kaj batalemaj.

Rigardante la ekonomiajn antaŭjuĝojn klariĝas ke, kiam la rilatoj inter la popoloj estas firmigitaj kaj la komerca interŝanĝo estas akcelita kaj ĉiuj ekonomiaj principoj estas aranĝitaj en unu lando, tio sendube influas la aliajn landojn, kaj universala bonstato rezultos. Kial do tiu antaŭjuĝo?

Kaj koncerne la politikajn antaŭjuĝojn: la politiko de Dio devas esti obeata, kaj estas nerefuteble, ke la politiko de Dio estas pli granda ol la homa politiko. Ni devas sekvi la Dian politikon; kiu same estas aplikebla de ĉiuj individuoj. Li traktas ĉiujn individuojn egale, sen diferenco; kaj tio estas la fundamento de Diaj religioj.

Unu el la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas la kreo de unu lingvo, kiu estu disvastigata ĉie inter la popoloj. Tiu instruo estis manifestita per la plumo de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh por ke tiu mondlingvo forigu miskomprenojn inter la homoj.

Alia instruo de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas la egaleco de virino kaj viro. La homa mondo havas du flugilojn; la unu estas la virino, la alia la viro. Nur se ambaŭ flugiloj estas egale evoluigintaj, la birdo povas flugi. Se unu flugilo restas malforta, alta flugo ne eblas. Nur kiam la virinaro kaj la viraro en la akirado de kapableco kaj perfekteco estos samrajtaj, sukceso kaj bonstato povos esti realigataj kiel necesas.

Plua instruo de Bahá'u'lláh estas libervole dividi la posedaĵon inter aliaj homoj. Tiu libervola divido estas pli granda ol egaleco kaj konsistas en tio, ke la homo ne devas preferi sin mem pli multe ol la aliajn, sed kontraŭe, li devas oferi sian vivon kaj posedaĵon al aliaj. Sed tio ne devas esti realigata devige, ne tiamaniere ke ĝi estu deviga kiel leĝo, kiun necesas obei. Kontraŭe, la homo devas oferi posedaĵon kaj vivon laŭ libera impulso kaj propra decido kaj memvole donaci al la malriĉulo, kiel oni faras en Persio inter la bahaanoj.

Plua instruo de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas la libereco de la homo. Per la spirita forto li devas liberiĝi, el la katenoj de la natura mondo. Ĉar tiom longe, kiom la naturo katenas la homon, li estas sovaĝa besto; ĉar la batalo por la vivtenado estas unu el la necesoj de la natura mondo. Tiu fakto, la batalo por vivo, estas la origino de ĉiu mizero kaj ekstrema turmento.

Kaj plua instruo de Bahá'u'lláh klarigas, ke religio estas potenca bastiono. Kiam la strukturo de religio ekstrema kaj ŝanceliĝas, ribelo kaj ĥaoso sekvas kaj la ordo de la aferoj tute renversiĝas. Ĉar en la homara mondo ekzistas du gardistoj ŝirmantaj la homon kontraŭ fuŝagado: Unu estas la leĝo punanta la krimulon; sed la leĝo malhelpas nur evidentan krimon kaj ne la kaŝitajn pekojn. Male, la ideala gardisto, la religio de Dio, malebligas ambaŭ, kiel la evidentan, tiel la kaŝitan krimon, edukas la homon, evoluigas moralecon, devigas akiri virtojn kaj estas la universala potenco garantianta la feliĉon de la homara mondo. Sed "religio" signifas tion, kio per esplorado gvidas al la certiĝo, sed ne tion kio simple bazas sur imito; sekve – la bazo de Diaj religioj, ne la homaj imitaĵoj.

Plua instruo de Bahá'u'lláh diras, ke la materia civilizacio, kvankam ilo por progreso de la homara mondo, se ne ligita kun la Dia civilizacio, ne realigos la deziratan sukceson, la feliĉon de la homaro. Pripensu! Tiuj batalŝipoj aliformigantaj urbon dum unu horo en ruinaĵon estas la rezulto de materia civilizacio; egale la Krupp-kanonoj, la Mauser-pafiloj, la dinamito, la submaraj boatoj, torpedo-boatoj, la armitaj flugmaŝinoj, la bombaj flugmaŝinoj; ĉiuj tiuj militiloj estas danĝeraj fruktoj de materia civilizacio. Se materia civilizacio estus ligita kun Dia civilizacio, tiuj teruraj armiloj neniam estus inventitaj. Kontraŭe, la homa energio estus direktita tutplene al utilaj inventoj kaj estus koncentrita al laŭdindaj eltrovoj. Materia civilizacio similas la vitraĵon ĉirkaŭ la lampo, Dia civilizacio la lampon mem. La vitraĵo sen lumo estas malluma. Materia civilizacio similas la korpon. Ĝi eble estu eĉ ĉarma, eleganta kaj bela, tamen ĝi estas malviva. Dia civilizacio similas la spiriton. La korpo ricevas ĝian vivon pere de la spirito; alie ĝi estus kadavro. Tiel do estas klarigite, ke la homara mondo bezonas la spiron de la Sankta Spirito. Sen la spirito la homara mondo estus senviva, kaj sen tiu lumo la homara mondo restadus en plej profunda mallumo. La mondo de la naturo estas besta mondo. Antaŭ ol homo ree naskiĝas el la besta mondo, t. e. ĝis li liberiĝas el la mondo de la naturo, li esence estas besto, kaj estas la instruoj de Dio, kiuj transformas tiun beston en homan animon.

Plua instruo de Bahá'u'lláh estas la plibonigado de la edukado. Ĉiu infano estu instruata pri sciencoj, kiom necesas. Se la gepatroj ne eblas pagi la edukajn kotizojn, la komunumo devas liveri la rimedojn por la edukado de la infano.

Plua instruo de Bahá'u'lláh temas pri justeco kaj rajto. Antaŭ ol tiuj ne estas realigitaj en la kadro de ekzistado, ĉiuj aferoj restos senordaj kaj neperfektaj. La homara mondo estas mondo de subpremo kaj de krueleco, regno de atako kaj eraro.

Multaj pluaj tiaj instruoj ekzistas. Tiuj multspecaj principoj formas la plej vastan fundamenton por la feliĉo de la homaro kaj estas pruvoj de favoro de la Kompatemulo; ili devas esti aldonitaj al la problemo de la mondpaco kaj esti ligataj kun ĝi, por rezultigi sukcesojn. Alispece estas malfacile efektiviĝi la universalan pacon en la homara mondo. Tiel kiel la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas interligitaj kun la mondpaco, ili similas tablon, sur kiu troviĝas preta ĉiuspeca freŝa kaj delikata manĝaĵo. Ĉiu animo povas trovi kion ĝi deziregas, sur tia tablo de la nemezurebla bonfaro. Sed se la problemo restas limigita sole al la mondpaco, rimarkindajn rezultojn, atendatajn kaj deziratajn, oni ne atingos. La celo de la mondpaco devas esti tia, ke ĉiuj socioj kaj religioj trovu en ĝi la realigon de iliaj plej altaj deziroj. Do la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas tiaj, ke ĉiuj socioj de la mondo, ĉu religia, politika aŭ etika, ĉu malnovdevenaj, ĉu modernaj, trovu la esprimon de iliaj plej altaj deziroj en la instruoj de Bahá'u'lláh.

Ekzemple religia homo trovas en la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh la kreaĵon de universala religio, religio perfekte konforma kun la nuntempa situacio, reale alportanta tujan sanigon de nesanigebla malsano, kvietiganta ĉiujn dolorojn, ne erarebla rimedo kontraŭ ĉiu mortiga veneno. Ĉar se ni, provantaj ordigi la homaran mondon, volus organizi ĝin konforme kun la nuntempe regantaj imitaĵoj kaj sur tio konstrui la

feliĉon de la homaro, ni spertus, ke tio estas neebla kaj nefarebla. Tio validas ekzemple por klopodo efektiviĝi la leĝojn de la Malnova Testamento kaj same de la aliaj religioj, konforme kun la nunaj imitaĵoj. Sed la esenca fundamento de ĉiuj Diaj religioj, kiu koncernas homajn virtojn kaj same estas la fundamento de la bonstato, estas plej perfekte prezentita en la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh.

Simile estas rigarde homojn soifantajn pri libereco. La modera libereco garantianta la ĝeneralan bonstaton kaj subtenanta kaj konservanta kosmopolitajn interrilatojn plej potence kaj amplekse estas eksplikata en la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh.

Same estas rilate politikajn partiojn: tio, kio estas la plej granda politiko direktata al la estrado de la homaro, eĉ pli, la Dia politiko, ili estas eksplikitaj en la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh.

Same koncerne al la "partio por egaleco" studanta la solvon de ekonomiaj problemoj: ĝis nun ĉiuj proponitaj solvoj pruviĝis nepraktikeblaj, krom la ekonomiaj proponoj en la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh; ili estas praktikeblaj kaj ne kaŭzas mizeron al la societo.

Same rilate al aliaj partioj. Se vi volas interniĝi en tiujn problemojn, vi trovos la plej altajn celojn de tiuj partioj en la instruoj de Bahá'u'lláh. Tiuj instruoj konsistigas la plenampleksan potencon inter ĉiuj homoj kaj estas nepre praktikeblaj. Sed ekzistas kelkaj instruoj el la pasinteco, kiel tiuj el la Malnova Testamento, kiuj hodiaŭ ne plu estas aplikeblaj. Same estas rilate al la aliaj religioj, al la tezoj de la diversaj sektoj kaj partioj.

Tiel, ekzemple, la problemo de mondpaco. Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh diras, ke necesas establi la plej altan juĝejon. Kvankam la Ligo de Nacioj estas realigita, ĝi ne kapablas aranĝi la mondpacon. Sed la majesta tribunalo, kiun Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh priskribis, plenumos tiun sanktan taskon kun pleja potenco kaj forto. Lia plano celas, ke la Naciaj Konsilantaroj de ĉiu lando kaj ĉiu nacio – alie dirite, parlamentoj – elektu du aŭ tri personojn, la plej preferindajn virojn de ĉiu koncerna popolo, spertajn pri la internaciaj leĝoj kaj la rilatoj inter la registaroj, kaj kompetentajn pri esencaj bezonoj de la hodiaŭa homaro. La nombro de tiuj landaj delegitoj estu proporcia laŭ la loĝantaro de la lando. La elekto de tiuj personoj, elektotaj de la nacia konsilantaro, alie parlamento, devas esti aprobita de la supera parlamento, la kongreso, la kabineto, kaj ankaŭ de la prezidanto aŭ monarĥo; tiamaniere tiuj personoj estu la elektitoj de la tuta nacio, same kiel de la registaro. El tiu rondo estu elektotaj la membroj de la plej alta tribunalo. La tuta homaro partoprenos tion, ĉar ĉiu el tiuj delegitoj estas reprezentanto de sia popolo. Se la plej alta tribunalo leĝdonas pri iu internacia problemo, ĉu unuanime aŭ plimultvoĉe, neniuj preteksto por revizio restos, nek por la plendanto nek por la defendanto. En la okazo, se unu el la registaroj aŭ popoloj malzorgus aŭ prokrastus la plenumon de la nerefutebla decido de tiu tribunalo, la ceteraj nacioj kontraŭos, ĉar ĉiuj registaroj kaj nacioj de la mondo estas ja subtenantoj de tiu plej alta tribunalo. Konsideru, kia firma fundamento tio estas! Sed

per limigita kaj lokalizita Ligo de Nacioj la celo ne estos realigata kiel devas kaj necesas. Tio estas la vero pri la nuna situacio.

Konsideru la potencegajn instruojn de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh! Dum Li estis en la malliberejo en 'Akká sub la premejo kaj la minaco de du sangavidaj regantoj, spite tiun fakton, Liaj instruoj propagandiĝis tre potence en Persio kaj en aliaj landoj. Aliflanke, se iu instruoj aŭ principoj aŭ kredantoj estas minacataj de potenca sangavida monarĥo, ili kiel eble plej rapide estas ekstermataj. Hodiaŭ pasis kvindek jaroj, kiam la bahaanoj en multaj partoj de Persio estis severe minacataj kaj turmentataj per glavo kaj lanco. Miloj da animoj oferis sian vivon en la areno de viktimo kaj pereis kiel martiroj per glavoj de subpremo kaj krueleco. Miloj da estimataj familioj estis elradikigitaj kaj dissemataj. Miloj da infanoj sengepatrigis. Miloj da filoj estis rabitaj for de siaj patroj. Miloj da patrinoj ploris kaj plendis pri siaj knaboj, kiuj estis senkapigitaj. Ĉiu tiu subpremo kaj krueleco, rabemo kaj sangavido nek povis malebligi nek malhelpi la propagandon pri la instruoj de Bahá'u'lláh. Ili sin disvastigis ĉiutage pli kaj pli kaj ilia forto kaj potenco pli kaj pli evidentiĝis.

Eble iu malsaĝa persono inter la persoj almetos sian nomon al la enhavo de la leteroj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh aŭ al la klarigoj en la leteroj de 'Abdu'l-Bahá, kaj sendos ĝin al tiu estimata konsilantaro. Vi devas atenti pri tio, ĉar iu perso gloravida aŭ havanta alian intencon uzurpos la plenan enhavon de la leteroj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh kaj publikigos ĝin propranome aŭ laŭnome de sia societo, kiel okazis antaŭ la milito dum la universala kongreso de rasoj en Londono. Iu perso uzis la enhavon de la leteroj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh kaj enirinte la kongreson proklamis kaj publikigis ĝin propranome, kvankam la teksto ekzakte estis tiu de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh. Kelkaj tiaj personoj iris al Eŭropo, kie ili kaŭzis konfuzon inter la popoloj kaj maltrankviligis la pensojn de kelkaj orientalistoj. Konsideru tiun fakton, ĉar eĉ ne unu vorto el tiuj instruoj estis aŭdata en Persio antaŭ la alveno de Bahá'u'lláh. Esploru tiun fakton, por ke ĝi iĝu al vi klara kaj evidenta. Kelkaj homoj estas kiel papagoj. Ili lernas ie aŭditan melodion kaj kantas ĝin, sed ili mem ne konscias, kion ili parolas. Nuntempe en Persio troviĝas sekto de malmultaj animoj nomataj "Bábi." Ili pretendas esti anoj de Lia Sankta Moŝto Báb, sed tute konfuzas pri Lia Sankta Moŝto. Ili havas kelkajn esoterajn doktrinojn tute kontraŭajn al la instruoj de Bahá'u'lláh, kaj en Persio oni scias tion. Sed se tiuj personoj venas al Eŭropo, ili sekrete tenas siajn proprajn instruojn kaj parolas pri tiuj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh, ĉar ili scias ke la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh estas potencaj kaj tial ili propranome publike proklamas tiujn instruojn de Bahá'u'lláh. Rilate al siaj esoteraj doktrinoj ili diras, ke ili estas elprenitaj de la libro Bayán verkita de Lia Sankta Moŝto Báb. Se vi ricevas tradukon de la libro Bayán, faritan en Persio, vi eltrovos la veron, t. e. ke la instruoj de Bahá'u'lláh tute kontraŭas la instruojn de tiu sekto. Zorgu, ke vi ne ignoru tiun fakton! Se vi volas esplori la aferon pli detale, sin informu en Persio.

Fine, vojaĝante tra la mondo - ĉie ajn oni trovas konstruadon; tio rezultas de amikeco kaj amo; kontraŭe ĉiu ruinaĵo avertas pri la efiko de malamikeco kaj malamo. Malgraŭ

tio la homara mondo ne konscias pri tio kaj ankoraŭ ne vekigis el la dormo de senatentemo. Senĉese ĝi sin okupas pri malakordo, malkonsento kaj disputado; militistaj aroj ordiĝas kaj eble kuras tien kaj tien al la areno de bataloj kaj militoj.

Simile estas rilate al la universo kaj ĝia korupto, ĝiaj ekzisto kaj neekzisto. Ĉiu ebla estaĵo estas kunmetita el diversaj multnombraj elementoj, kaj la ekzisto de ĉiu aĵo rezultas el kompilado, kuniĝo. Oni povas diri: kiam simplaj elementoj kuniĝas, rezultas estaĵo. La kreado de estaĵoj realiĝas tiamaniere. Kaj kiam tiu konsistaĵo malordiĝas, rezultas disfalo: la elementoj ruiniĝas kaj tiu estaĵo neniĝas. Alivorte: la neniĝo de ĉiu estaĵo estas kaŭzata de la dispartigo kaj disiĝo de elementoj. Tial ĉiu uniĝo kaj koloro de folioj, floroj kaj fruktoj kune helpas al la beleco kaj ĉarmo de la tuto kaj formas admirindan ĝardenon, kiu aspektas plej aminde, freŝe kaj dolĉe. Same kiam diverseco kaj varieco de ideoj, formoj, opinioj, karakteroj kaj moroj de la homara mondo estas submetitaj sub la kontrolo de unu plej alta potenco, tiu influo al kuniĝo de elementoj kaŭzas vivon, dum disigo kaj disiĝo kaŭzas morton. Resume: altiro kaj harmonio kaŭzas la estiĝon de fruktoj kaj utilaj rezultoj, kontraŭe repuŝo kaj disharmonio inter la estaĵoj kaŭzas konfuzon kaj disiĝon. El harmonio kaj altiro ĉiuj eblaj organismoj kiel planto, besto kaj homo realiĝas, kaj el disharmonio kaj repuŝo ruiniĝo ekestas kaj neniĝo sekvas. Tial ĉio, kio kaŭzas harmonion, altiron kaj unuiĝon inter la homoj, estas la vivo de la homara mondo, kontraŭe ĉio, kio kaŭzas malkonsenton, repuŝon kaj disigon, kaŭzas la morton de la homaro. Kaj se vi preteriras ĝardenon, kies bedoj kaj plantoj, floroj kaj odorantaj herboj estas ĉie kunigitaj, tiel ke ili formas unu harmonian tuton, tio estas pruvo, ke tiu plantaĵo kaj tiu rozĝardeno estas prilaboritaj kaj aranĝitaj zorgeme de perfekta ĝardenisto, dum se vi vidas ĝardenon senordan, nearanĝitan kaj senkulturan, tio atestas ke tie mankas la prizorgo de kapabla ĝardenisto; ĝi eĉ ne estas pli ol herbaĉejo. Tial do evidentiĝis, ke kamaradeco kaj harmonio evidentigas la disciplinon de vera edukisto, dum kontraŭe disigo kaj dissemo pravas mankon de kulturo kaj de Dia edukado.

Se iu kontraŭdirus; ĉar la societoj, nacioj, rasoj kaj popoloj de tiu ĉi mondo havas diferencajn formojn, kutimojn, gustojn, temperamentojn kaj moralkonceptojn same kiel diferencajn ideojn, perspektivojn kaj opiniojn, kaj ke pro tio ideala unueco kaj plena unuiĝo inter la homoj ne estas ebla – ni respondos, ke diverseco estas duspeca: la unua gvidas al detruo, kaj tio similas la diversecon inter batalantaj personoj kaj konkurantaj nacioj detruantaj unu la alian, ekstermantaj la aliajn familiojn forigantaj kvieton kaj komforton kaj okupataj pri sangoverŝo kaj rabado. Tio estas mallaŭdinda. Sed la alia diverseco konsistas el varieco. Tio esence estas perfekteco kaj videbligas al ni Dian donacemon. Konsideru la florojn de rozĝardeno. Kvankam diversspecaj, diverskoloraj, diversformaj kaj diversaspektaj, tamen ili trinkas la saman akvon, balanciĝas per la sama vento kaj kreskas dank' al la varmo kaj la lumo de la sama suno; kaj tiu varieco kaj tiu diverseco igas, ke ĉiu ĝuas la belecon kaj la gloron de la alia. La diferencoj de moroj, kutimoj, ideoj, opinioj kaj temperamentoj ornamas la homaran mondon. Tio estas laŭdinda. Tiel do tiu diverseco kaj varieco, kiel la diverseco kaj varieco de la partoj kaj membroj de la homa korpo, servas al beleco kaj perfekteco. Ĉar

tiuj diversaj partoj kaj membroj troviĝas sub la kontrolo de la dominanta spirito, kaj la spirito trafenetras ĉiujn organojn kaj membrojn kaj regadas ĉiujn arteriojn kaj vejnojn, tiuj diverseco kaj alterneco fortigas amon kaj harmonion kaj tiu multeco estas la plej granda helpo por unueco. Se en iu ĝardeno la floroj kaj bonodoraj herboj, la fruktoj, folioj kaj branĉoj estus samspecaj, samformaj, samkoloraj kaj same aranĝitaj, nek beleco nek ĉarmo estiĝus, sed se varieco troviĝas en la mondo de unueco, ili aperas kaj montriĝas en plej ideala brilo, beleco, raviĝo kaj perfekteco.

Hodiaŭ nur la potenco de la parolo de Dio, ĉirkaŭanta la realecon de ĉiuj aĵoj, povas porti la ideojn, la menson, la koron kaj la spiriton sub la ombron de unu arbo. Li majstras ĉiujn aĵojn, vivigante animojn, ŝirmante kaj regante la homaran mondon. Laŭdata estu Dio! En nuna tago la lumo de la parolo de Dio radiis sur ĉiujn landojn, kaj el ĉiuj religioj, societoj, nacioj, gentoj, popoloj, sektoj kaj aliaj kategorioj kune venis animoj sub la ombro de "Vorto Unueco" kaj unuiĝis harmonie en intima rondo de samkredantoj.¹⁰⁶

"Estu serioze okupita pri la bezonoj de la epoko, en kiu vi vivas kaj koncentriĝu viaj intencoj je ties krizokazoj kaj postuloj."¹⁰⁷



Bildo 45. - La aŭtoro en Auckland, Januaro 1996 dum Bahaa Pacifika Konferenco. Nur unu tagon antaŭe en la sama urbo koincide okazis Aŭstralia kaj Novzelanda Esperanto-Kongreso.

¹⁰⁶ *Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá la 17-an decembro 1919 al la Centra Organizo por Daŭra Paco, Den Haag, Nederlando.* Tradukis La Nacia Spirita Asembleo de la Bahaanoj en Germanio, Der Nationale Geistige Rat der Bahá'í in Deutschland, Frankfurt am Main.

¹⁰⁷ *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh.* CVI. p 213. Bahá'í Publishing Trust. Wilmette 1976.

ALDONAĴO 3.

"Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. Kaj ili diris unu al alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero."

La Sankta Biblio Genezo 11 : 1 – 9

"Ĉi tiu eltiraĵo el plej malnova libro de la Biblio ŝajnas diri al ni, ke en originaj tempoj la homoj parolis en la sama lingvo, kaj ke Dio estis parte respondeca pri la procedo, laŭ kiu homa parolo fariĝis multlingva. La Kvakeroj de la 17^a jarcento malĝojis pri la "confusio linguarum" (lingva konfuzo) de Babelo kaj naive sed bonintence penis reestabli unu universalan kaj puran lingvon, starigante pronoman ŝiboleton. Tio konsistis en forigo de "vi" kaj anstataŭigo per "ci" kaj "cia." Ili kreis ankaŭ aliajn parolidiotismojn. Same je interna kiel je ekstera nivelo ili klopodis reiri al la stato, kiam lingvoj ankoraŭ ne ekzistis kaj rekapti la originan komencsituation. George Fox, la fondinto, priskribis sian estontecan antaŭvidon por lingva unueco jene: "...la homoj deklaras lingvojn kiel originalajn kaj degeneris el de la lingvoj nomataj de ili originalaj, sed kiuj ne estas la originalaj... Ĉar en la komenco estis la Vorto, kiu estis antaŭ la naturaj lingvoj..." " Antaŭparolo al *A Battle Door* (Batalpordo).¹⁰⁸

"En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per Li; kaj aparte de Li estiĝis nenio, kio estiĝis. En Li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis."

La Sankta Biblio. Sankta Johano 1 : 1 – 5

¹⁰⁸ Profesorino Anna M. Steffes 1996 *One WorldOne English*.

ALDONAĴO 4

LA PLEJ SANKTA LIBRO DE BAHÁ'U'LLÁH.

(*Kitáb-i-Aqdas*)

Paragrafo 175.

Ho Skribilo de la Plejalta! Moviĝu sur la Tabuleto laŭ la ordonoj de Via Sinjoro, la Kreinto de la Ĉielo, kaj rakontu pri la tempo, kiam Li, la Fonto de Dia Unueco, decidis direkti Siajn paŝojn al la Skolo de Transcenda Unueco: tiel estu, ke la korpuroj ekvidu, eĉ se nur tra aperturo ne pli granda ol kudriltrueto, la misterojn de Via Sinjoro, la Ĉiopotenca, la Ĉioscia kiuj kuŝas malantaŭ la vualoj. Diru: Ni ja enpaŝis la Skolon de internaj signifo kaj klarigo tiam, kiam ĉio kreita estis senkonscia. Ni vidis la vortojn skribitajn de Li, Kiu estas Ĉiokompata, kaj Ni akceptis la strofojn de Dio, la Helpanto en Danĝeroj, la Memsubtena, kiujn Li (Báb) prezentis al Ni; Ni atentis kaj obeis tion, kion Li solene proklamis sur la Tabuleto. Tion Ni ja vere observis. Kaj Ni konsentis al Lia deziro per Nia ordono, ĉar Ni estas ja rajtigitaj ordoni.

Paragrafo 176.

Ho popolo de *la Bayán*! Ni enpaŝis la Skolon de Dio, dum vi kuŝadis dormante; kaj Ni tralegis la Tabuleton, dum vi profunde dormis. Je la sola vera Dio! Ni legis la ankoraŭ ne revelaciitan Tabuleton, dum vi estis senkonscia, kaj Ni perfekte konis la Libron antaŭ via naskiĝo. Tiuj ĉi vortoj rilatas al via kapablo, ne la Senlima. Tion atestas la mesaĝo ene de Lia scio, se vi apartenas al la komprenantoj; kaj pri tio atestas la lango de la Ĉiopotenca, se vi apartenas al la komprenipovaj. Mi ĵuras je Dio: se Ni levus la vualon, vi senparolige miregus.

Paragrafo 177.

Atentu, ke vi ne vane disputu pri la Ĉiopotenca kaj Lia Afero ĉar jen! Li ja aperis inter vi portanta Revelacion tiel vastan, ke Ĝi ampleksas ĉion, ĉu de la pasintaĵo ĉu de la estontaĵo. Se Ni prezentus Nian temon uzante la lingvaĵon de la loĝantoj de la Regno, Ni dirus: "Vere, Dio kreis tiun Skolon antaŭ ol Li kreis la ĉielon kaj la teron, kaj Ni ĝin eniris, antaŭ ol la literoj E kaj S kaj T kuniĝis kaj unuiĝis."

Tia estas la lingvaĵo de Niaj servantoj en Nia Reglando; pripensu, kion esprimus la lango de la loĝantoj de Nia altega Regno, ĉar Ni instruis al ili Nian scion kaj vidigis al ili ĉion, kio restis kaŝita en la saĝeco de Dio.

Imagu do, kion esprimus la Potenca kaj Grandioza Lango en Sia Glorega Estejo!

Notoj eldonitaj de la Universala Domo de Justeco pri *Kitáb-i-Aqdas*.

Noto 188 pri
paragrafo 177.

La literoj E kaj S kaj T kuniĝis kaj unuiĝis.

En leteroj skribitaj de aliaj en lia nomo Shoghi Effendi klarigis la signifon de la "*literoj E kaj S kaj T*."

(En la angla eldono B kaj E; BE signifas estu.)
Tiuj literoj donas la vorton EST, kiu, li diras "signifas la krepotencon de Dio, Kiu per Sia ordono donas eston al ĉiuj aferoj", kaj ili signifas "la potencon de la Manifestiĝo de Dio, Lian grandan spiritan kreforton."

La imperativo "Estu" en la originala araba estas "kun", konsistanta el la du literoj "káf" kaj "nún."

(Esperanto tradukis ilin kiel ni legas ĉi supre.)
Tiu vorto estas uzita en la Korano por esprimi, kiel Dio estigis la kreon.

(Tradukis provizore : T. Steele kaj P. Desailly.)

Noto 194 pri
paragrafo 189
(vidu p.42,43)

Ni decidis du signojn por la plenkreskiĝo de la homa raso / 189.

La unua signo de la plenkreskiĝo de la homaro, aludita en la Skriboj de Bahá'u'lláh, estas la naskiĝo de scienco, kiu estas priskribita kiel '*dia filozofio*' havanta en si la eltrovon de radikala aliro al la aliigo de elementoj. Tio ĉi donas ekvidon de la onta brilo de sciado havanta gigantan etendecon.

Pri la '*dua*' signo indikita de Bahá'u'lláh kiel diskonigita en *Kitáb-i-Aqdas*, Shoghi Effendi deklaras, ke Bahá'u'lláh "...en Sia Plej Sankta Libro ordonis la elekton de unuopa lingvo kaj la adopton de komuna skribo por la uzo de ĉiuj surteranoj. La plenumo de tiu ordono estos, kiel Li Mem certigas en ĉi tiu Libro, unu el la signoj de la 'plenkreskiĝo de la homaro'."

Plian komprenon pri la procezo de la homara plenkreskiĝo kaj disvolviĝo al matureco havigas al ni la sekva deklaro de Bahá'u'lláh :

Unu el la indikoj de la matureco de la mondo estas, ke neniu akceptos porti la pezon de reĝeco. Neniu plu volos porti sola la pezon de reĝeco. Tiam estos alveninta la tago, je kiu manifestiĝos saĝeco inter la homaro.

La homaran plenkreskiĝon al unuiĝo de la tuta homaro Shoghi Effendi kunligas al la starigo de monda regno kaj ne antaŭe spertita stimulego al 'la intelekta, la morala, kaj la spirita vivo de la tuta homa raso'.¹⁰⁹

¹⁰⁹ Universala Domo de Justeco. *The Kitáb-i-Aqdas* Noto 194 pri paragrafo 189 p. 250-251. 1993. (Tradukis: Marcel Leereveld kaj Paul Desailly.)

ALDONAĴO 5

La PROMESO de MONDA PACO.

Mesaĝo de la Universala Domo de Justeco al la popoloj de la mondo.

Oktobro 1985 Bahaa Monda Centro.

La granda paco, al kiu la homoj de bona volo dum jarcentoj plenkore sopiris, kiun viziuloj kaj poetoj el sennombraj generacioj prirevis kaj kiun la sanktaj skriboj de la homaro promesis de epoko al epoko, finfine estas je la atingo de la nacioj. Unuafoje en la historio la homo havas la eblecon panorame superrigardi nian tutan planedon kun ĝiaj multaj diversaj popoloj. La monda paco estas ne nur ebla, sed neevitebla. Ĝi estas la venonta ŝtupo en la evoluo de tiu ĉi planedo – laŭ la vortoj de granda pensulo: "La planediĝo de la homaro."

Ĉu paco estu atingita nur post neimageblaj teruraĵoj kaŭzitaj de obstina persistado de la homaro ĉe arkaikaj kondutmanieroj, aŭ ĉu ĝi nun estu efektivigata per decidaj agoj surbaze de interkonsiliĝo – jen la du eblecoj, el kiuj la homoj devas elekti. En tiu kriza tempo, kiam la gravegaj problemoj sin trudantaj al la nacioj fariĝas komuna koncernaĵo por la tuta mondo, ne kontraŭbatali la tajdon de konflikto kaj malordo estus senkonscience nerespondeca.

Inter la pozitivaj signoj elstaras la ĉiam kreskanta forto de la paŝoj cele al mondordo entreprenitaj unuafoje komence de nia jarcento per la kreo de la Ligo de Nacioj, kiun sekvis sur pli larĝa bazo la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj; la akiro de sendependeco post la Dua Mondmilito atingita de la plimulto de ĉiuj nacioj sur la tero, kio indikas la finon de la procezo de formiĝo de nacioj, kaj la implikiĝo de tiuj junaj nacioj kune kun la jam establitaj en aferoj de komuna intereso; la sekvanta forta kresko de la kunlaboro inter ĝis tiam izolitaj kaj interkverelantaj popoloj kaj grupoj en internaciaj entreprenoj pri scienco, klerigo, juro, ekonomio kaj kulturo; la kreskado de senprecedence granda nombro da internaciaj humanecaj organizaĵoj dum la pasintaj jardekoj; la disvastiĝo de virinaj kaj junularaj movadoj postulantaj la ĉesigon de milito; kaj la spontanea ekesto de vastiĝantaj retoj de interligoj inter simplaj homoj, kiuj serĉas interkompreniĝon pere de persona interkomunikado.

La scienca kaj teĥnika progreso en tiu ĉi eksterordinare benita jarcento aŭspicias pri forta impeto al la socia disvolviĝo de nia planedo kaj indikas la rimedojn, per kiuj la praktikaj problemoj de la homaro povas esti solvitaj. Ili fakte provizas la rimedojn por majstri la multifacetan vivon de unuiĝinta mondo. Sed ankoraŭ ekzistas baroj. Duboj, miskomprenoj, antaŭjuĝoj, suspektemo kaj miopecaj meminteresoj turmentas naciojn kaj popolojn en iliaj interrilatoj.

Instigitaj de profunde sentata spirita kaj morala devo, ni volas atentigi vin en tiu ĉi favora tempo pri la profundaj ekkonoj, kiujn Bahá'u'lláh, la Fondinto de la Bahaa

Kredo, kies Sindikoj ni estas, komunikis unue antaŭ pli ol unu jarcento al la regantoj de la homaro.

"La ventoj de malespero", skribis Bahá'u'lláh, "blovas el ĉiu direkto, kaj la malpaco, kiu fendas kaj turmentas la homan rason, kreskadas de tago al tago. La signoj de minacaj skuoj kaj ĥaoso nun estas klare videblaj, des pli ke la nuna ordo aspektas mizere malperfekta." La komuna sperto de la homaro profunde konfirmis tiun ĉi profetan prijuĝon. La mankoj en la aktuala ordo evidentĝas en la nekapablo de la suverenaj ŝtatoj organizitaj en Unuiĝintaj Nacioj ekzorci la timigan fantomon de la milito, la minacanta kolapso de la internacia ekonomia ordo, la disvastigo de anarkio kaj terorismo kaj la nemezureblaj suferoj, kiuj tiuj ĉi kaj aliaj plagoj kaŭzas al multaj milionoj da homoj. Verdire, agresemo kaj konflikto tiagrade fariĝis karakterizaj trajtoj de niaj sociaj, ekonomiaj kaj religiaj sistemoj, ke multaj homoj estis kondukataj al la konvinkigo, ke tia konduto estas ennaskita en la homa naturo kaj tial neelradikebla.

El la fiksiĝo de tiu ĉi opinio rezultis paraliza kontraŭdiro en la homaj aferoj. Unuflanke, homoj el ĉiuj nacioj deklaras ne nur sian pretecon, sed eĉ sian sopiron al paco kaj harmonio, al ĉesigo de la turmentaj ĉagrenoj, kiuj maltrankviligas ilian ĉiutagan vivon. Aliflanke, senkritika konsento estas donita al la tezo, ke homoj estas neŝanĝeble egoismaj kaj agresemaj kaj tial nekapablaj starigi socian ordon samtempe progresan kaj pacan, dinamikan kaj harmonian – ordon, kiu donas liberecon al individua kreemo kaj iniciato, sed baziĝas sur kunlaboro kaj reciprokeco.

Dum la neceso de paco fariĝas pli kaj pli urĝa, tiu ĉi fundamenta kontraŭdiro, kiu malebligas ĝian realigon, necesigas skrupulan ekzamenadon de la hipotezoj, sur kiuj laŭ ĝenerala konvinko la historia dilemo de la homaro estas bazita. Senpasia esploro evidentigas, ke tiaj opinioj ne nur ne spegulas la veran karakteron de la homo, sed eĉ prezentas distordan bildon de la homa spirito. Kontentigo pri tiu ĉi punkto ebligas al ĉiuj homoj liberigi konstruajn sociajn fortojn, ĉar tiuj konformas al la homa naturo kaj akcelos harmonion kaj kunagadon anstataŭ milito kaj malpaco.

Elekti tian kurson ne signifas malkonfesi la pasintecon de la homaro, sed kompreni ĝin. La Bahaa Kredo konsideras la nuntempan konfuzon en la mondo kaj la fatalan staton de la homaj aferoj kiel naturan fazon en organika procezo kondukanta fine kaj nerezisteble al la unuiĝo de la homa raso en ununura socia ordo, kies limoj estas tiuj de nia planedo. La homaro, kiel difinita unueca organismo, transpaŝis evoluniveleojn analogajn al la aĝoj de infaneteco kaj infaneco en la vivoj de ĝiaj unuopaj membroj kaj nun troviĝas kulmine de sia impetema junaĝo proksimiĝante al sia longe atendata aĝo de matureco.

Honesta rekono, ke antaŭjuĝoj, milito kaj ekspluatado estis la esprimo de nematuraj ŝtupoj en longdaŭra historia procezo kaj ke la homaro nuntempe travivas la neeviteblan tumulton, kiu karakterizas ĝian kolektivian transiron en la aĝon de matureco, ne estas tialo por malespero, sed antaŭkondiĉo por la giganta entrepreno, konstrui pacan mondon. Ke tia entrepreno estas ebla, ke la necesaj konstruaj fortoj fakte ekzistas, ke

unuigaj sociaj strukturoj povas esti starigitaj, tio estas la tezoj, pri kies ekzamenado ni urĝe petas vin.

Kiajn ajn suferojn kaj tumultojn la venontaj jaroj alportu, kiel ajn malhelaj estu la cirkonstancoj de la tujproksima futuro – la bahaa komunumo kredas, ke la homaro povas alfronti tiun ĉi severan juĝon kun fido je ĝia fina rezulto. Anstataŭ signali la finon de civilizacio, la revoluciaj ŝanĝoj, al kiuj la homaro estas pelata pli kaj pli rapide, utilos por liberigi "la potencialon imanentan en la rango de la homo" kaj evidenti "la plenan mezuron de lia destino surtera, la ennaskitan grandiozon de lia realo."

I

La talentoj, kiuj distingas la homan rason for de ĉiuj aliaj vivospecoj, sumiĝas je tio, kio estas konata kiel la homa spirito; la racio estas ĝia esenca kvalito. Tiuj talentoj ebligis al la homaro konstrui civilizaciojn kaj prosperi materie. Sed tiaj atingoj solaj neniam kontentigis la homan spiriton, kies mistera naturo inklinigas ĝin al transcendeco, strebado al nevidebla sfero, al la fina realeco, la nesciebla esenco de esencoj nomita Dio. La religioj, alportitaj al la homaro de sinsekvo de spiritaj lumiloj, formis la ĉefan ligilon inter la homaro kaj tiu fina realeco, kaj ili stimulis kaj fajnigis la kapablon de la homaro, akiri spiritan sukceson kune kun socia progreso.

Neniu serioza klopodo pri ordigo de la homaj aferoj, pri atingo de monda paco, povas ignori religion. Ĝia perceptado kaj praktikado far la homo formas grandskale la teksaĵon de la historio. Eminentaj historiistoj priskribis la religion kiel "kapablon de la homa naturo." Ke la degenero de tiu kapablo konsiderinde kontribuis al la konfuzo en la socio kaj al la konfliktoj en kaj inter la homoj, ne povas esti kontestata. Sed objektiva observanto same ne povas kontesti la fortan influon de religio sur la esencajn esprimoformojn de civilizacio. Krom tio, ĝian nepran neceson por la socia ordo pruvis ĝia rekta efiko al juro kaj moralo.

Skribante pri religio kiel socia forto, Bahá'u'lláh diris: "Religio estas la plej grava rimedo por la starigo de ordo en la mondo kaj por la paca kontentigo de ĉiuj kiuj loĝas en ĝi." Rilate al la eklipso aŭ kadukiĝo de religio, Li skribis: "Se malheliĝus la lampo de religio, la sekvoj estus ĥaoso kaj konfuziĝo, kaj la lumoj de honesteco kaj justeco, de trankvilo kaj paco ĉesus brili." Elnombrante tiajn konsekvencojn, la bahaaj skriboj atentigas, ke "la perversiĝo de la homa naturo, la dekadenco de la homa konduto, la degeneriĝo kaj disfalo de homaj institucioj malkaŝiĝas en tiaj cirkonstancoj sub ĝiaj plej aĉaj kaj abomenaj aspektoj. La homa karaktero perdas sian dignon, ĉiu fido estas ŝancelita, la nervoj de disciplino malstreĉiĝas, la voĉo de la homa konscienco estas silentigata, la sento de deco kaj honto paliĝas, konceptoj de devo, solidareco, reciprokeco kaj lojaleco estas tordataj, kaj la sento mem de pacemo, ĝojo kaj espero iom post iom estingiĝas."

Se do la homaro alvenis al punkto de paraliza konflikto, ĝi devas rigardi sin mem, sian propran neglektemon, la logajn voĉojn, kiujn ĝi aŭskultis, por trovi la fonton de la

miskomprenoj kaj konfuziĝo praktikitaj en la nomo de religio. Tiuj, kiuj blinde kaj egoisme gluiĝis je siaj apartaj ortodoksismoj kaj kredigis al siaj adeptoj erarajn kaj kontraŭdirajn interpretaĵojn pri la eldiroj de la Profetoj de Dio, portas pezan respondecon por tiu ĉi konfuzo – konfuzo ĉarpentita el la artefaritaj bariloj starigitaj inter kredo kaj racio, scienco kaj religio. Ĉar ĉe objektiva ekzameno de la faktaj eldiroj de la Fondintoj de la grandaj religioj kaj de la cirkonstancoj, en kiuj Ili devis plenumi sian mision, troviĝas nenio, kio apogus la disputojn kaj antaŭjuĝojn, kiuj perturbas la religiajn komunumojn kaj tial ĉiujn homajn aferojn.

La instruo, ke ni traktu aliajn kiel ni mem ŝatus esti traktataj – etika principo, kiu varie ripetiĝas en ĉiuj grandaj religioj – donas forton al la ĉi-supra observo en du rilatoj: ĝi resumas la moralan sintenon, la pacigan aspekton, kiu etendiĝas tra tiuj ĉi religioj nedepende de la loko aŭ tempo de ilia ekesto; ĝi krome reliefigas aspekton de unueco, kiu estas ilia esenca virto – virto, kiun la homaro en sia senkohereca bildo pri historio fiaskis rekoni.

Se la homaro estus vidinta la Edukantojn de sia komuna infanaĝo en ilia vera karaktero, nome kiel agentojn de unusama civiliza procezo, tiam ĝi gajnus netakseble pli grandan utilon el la akumula efiko de iliaj sinsekvaj misioj. Sed, bedaŭrinde, ĝi malsukcesis en tio.

La reviviĝo de fanatika religia pasio en multaj landoj povas esti konsiderata nur kiel agonia barakto. La karaktero de la perfortaĵoj kaj detruaj agoj ĝin akompanantaj atestas ĝian spiritan bankroton. Fakte, unu el la plej strangaj kaj malĝojigaj faktoj de la nuntempa eksplodiĝo de religia fanatikismo estas la grado, ĝis kiu, en ĉiu kazo, ĝi subfosas ne nur la spiritajn valorojn, kiuj kondukas al la unueco de la homaro, sed ankaŭ tiujn unikajn moralajn venkojn, kiujn perbatalis la religio, kies servanto ĝi ŝajnigas esti.

Kia ajn esenca forto la religio estis en la historio de la homaro kaj kiel ajn drameca la nuntempa reviviĝo de la militema religia fanatikeco estas – religio kaj religiaj institucioj jam de multaj jardekoj estas konsiderataj de kreskanta nombro da homoj kiel sensignifaj por la ĉefaj problemoj kaj afliktoj de la moderna mondo. Anstataŭe, ili aŭ sin turnis al la hedonisma alstrebo de materia kontentigo aŭ sekvas memfaritajn ideologiojn elpensitajn por liberigi la socion el la evidentaj malbonoj, sub kiuj ĝi suferas. Tro multaj el tiuj ideologioj, bedaŭrinde, anstataŭ akcepti la koncepton de la unueco de la homaro kaj fortigi la harmonion inter diversaj popoloj, havis la tendencon, diecigi la ŝtaton, submeti la tutan homaron al unu nacio, raso aŭ klaso, subpremi ĉian diskuton kaj interŝanĝon de ideoj, aŭ senindulge elmeti milionojn da malsatantoj al merkataj mekanismoj, kiuj tro evidente pliakrigas la mizeron de la plimulto de la homaro, samtempe ebligante al malgrandaj grupoj vivon en abundo, pri kiu niaj praaŭoj apenaŭ povis revii.

Kiel tragikaj estas la rezultoj de la kvazaŭreligioj elpensitaj de la saĝemuloj de nia epoko! El la ĝisfunda eliluziĝo de tutaj enloĝantaroj, kiuj estis instruitaj kulti ĉe iliaj

altaroj, povas esti derivita la nerefutebla verdikto de la historio pri ilia valoro. La fruktoj de tiuj doktrinoj – post jardekoj de pli kaj pli senlima praktikado de potenco far tiuj, kiuj ŝuldas al ili sian promocion en homaj aferoj – estas la sociaj kaj ekonomiaj malsanoj, kiuj plagas ĉiun regionon de nia mondo en la finaj jaroj de la dudeka jarcento. Ĉiuj ĉi tiuj eksteraj afliktoj radikas en la spirita damaĝo, spegulita en la apatio, kiu ekposedis la amason de la popoloj de ĉiuj nacioj, kaj en la estingiĝo de la espero en la koroj de elrabitaj kaj timoplenaj milionoj.

Venis la tempo, ke tiuj, kiuj predikas la dogmojn de materialismo – ĉu en oriento aŭ okcidento, ĉu en kapitalismo aŭ socialismo – devas fari sian raporton pri la morala gvido, kiun ili ŝajnigis doni. Kie estas la "nova mondo" promesita de tiuj ideologioj? Kie estas la internacia paco, por kies idealoj ili proklamis sian sindonon? Kie estas la breĉaj trarompoj en novajn sferojn de kulturaj atingoj, faritaj per la glorigo de tiu raso, de jena nacio aŭ de iu difinita klaso? Kial la plejmulto de la popoloj de la tero pli kaj pli profundiĝas en malsaton kaj mizeron, kiam samtempe la nunaj arbitraciantoj en homaj aferoj disponas pri riĉaĵoj, pri kiuj la faraonoj kaj cezaroj aŭ eĉ la imperialismaj potencoj de la 19a jarcento ne povis revii?

Estas precipe en la glorigo de la strebo al materiaj riĉaĵoj – samtempe la prakaŭzo kaj la komuna trajto de ĉiuj tiaj ideologioj – kie troviĝas la radikoj, el kiuj kreskas la malvero, ke homoj estas neŝanĝeblaj egoismaj kaj agresemaj. Ĝuste ĉi tie la tereno devas esti ebenigita por la konstruado de nova mondo taŭga por niaj posteuloj.

Ke materialismaj idealoj, kiel montras la sperto, malsukcesis kontentigi la bezonojn de la homaro, kondukas al la honesta rekono, ke necesas nova energia fortostreĉo cele al solvo de la vivodecidaj problemoj de nia planedo. La netolereblaj cirkonstancoj regantaj en la socio atestas pri komuna malsukceso de ĉiuj – fakto, kiu tendencas plifortigi la abatisojn je ĉiu flanko anstataŭ malkonstrui ilin. Estas tute klare, ke urĝe necesas komuna kuraca fortostreĉo. Antaŭ ĉio, tio estas afero de sinteno. Ĉu la homaro daŭrigos sian obstinecon alkroĉante sin al eluzitaj konceptoj kaj sentaŭgaj dogmoj? Aŭ ĉu ĝiaj gvidantoj, senkonsidere al ideologio, elpaŝos kaj, kun decida volo, interkonsiliĝos en komuna serĉo de taŭgaj solvoj?

Tiuj, kiuj zorgas pri la estonteco de la homa raso, pripensu tiun ĉi konsilon: "Kiam longe flegitaj idealoj kaj de pratempaj honorataj institucioj, kiam sociaj principoj kaj religiaj formuloj ĉesis stimuli la bonfarton de la tuta homa komunumo, kiam ili ne plu servas la bezonojn de daŭre evoluanta homaro, tiam ili estu forbalaotaj kaj forĵetotaj en la rubujon de eluzitaj kaj forgesitaj doktrinoj. Kiel, en mondo submetita al la eterna leĝo de ŝanĝiĝo kaj kadukiĝo, ili povus esti indulgataj de degenero, kiu nepre trafos ĉiun homan institucion? Ĉar la juraj normoj, politikaj kaj ekonomiaj teorioj devas nur protekti la interesojn de la homaro kiel tuto, kaj la homaro ne devas esti krucumita pro la sendifekta konservado de iu leĝo aŭ doktrino."

II

La proskribo de atomaj armiloj, la malpermeso de aplikado de venena gaso aŭ la interdikto de bakteria milito ne forigos la fundamentajn kaŭzojn de milito. Kiel ajn gravaj tiaj praktikaj paŝoj evidente estas kiel elementoj de interpaciĝo, ili per si mem estas tamen tro supraĵaj por havi daŭran influon. La homoj estas sufiĉe inventemaj en la elpensado de novaj militformoj kaj en la utiligo de nutraĵoj, krudmaterialo, financoj, industrifortoj, ideologio kaj terorismo por renversi unu la alian en senfina strebo al supereco kaj povo. La totala diseriĝo de la homaj aferoj ankaŭ ne estas kuracebla per reguligo de apartaj konfliktoj aŭ malkonsentoj inter unuopaj nacioj. Vere universala kadro devas esti akceptita.

Certe, al naciaj gvidantoj ne mankas la konscio pri la mondskala karaktero de la problemo mem evidenta en la kreskantaj konfliktoj, kiujn ili ĉiutage devas fronti. Kaj ekzistas la sennombraj studoj kaj solvopropoj far multaj interesitaj kaj kleraj grupoj kaj de la instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj ekskludas ĉian eblecon, esti neinformita pri la defiaj bezonoj plenumendaj. Tamen, ekzistas paralizo de volo; kaj tiu ĉi devas esti zorge analizata kaj decide kuracata. Tiu ĉi paralizeco radikas – kiel ni konstatis – en la profunda konvinko pri la neevitebla malpacemo de la homoj, kio kondukis al la malemo, koncedi la submeton de naciaj memintereso sub la postulojn de la monda ordo, kaj al la malinklino, kuraĝe fronti la gravegajn konsekvencojn de la starigo de unuigita tutmonda aŭtoritato. Ĝi ankaŭ fontas el la nekapablo de grandskale sensciaj kaj subpremataj amasoj, klare esprimi sian sopiron al nova ordo, en kiu ili povos vivi en paco, harmonio kaj bonstato kun la tuta homaro.

La eksperimentaj paŝoj direkte al monda ordo, precipe depost la Dua Mondmilito, donas esperigajn signojn. La kreskanta tendenco de grupoj de nacioj al la formaligo de rilatoj, kiuj ebligas al ili kunlabori en aferoj de komuna intereso, indikas, ke fine ĉiuj nacioj povas venki tiun ĉi paralizon. La Asocio de Sudorientaj Aziaj Nacioj, la Karibia Komunaĵo kaj Komuna Merkato, la Centramerika Komuna Merkato, la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo, la Eŭropaj Komunaĵoj, la Ligo de Arabaj Ŝtatoj, la Organizaĵo por Afrika Unueco, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la Sudpacifika Forumo – ĉiuj komunaj klopodoj reprezentitaj de tiaj organizaĵoj preparas la vojon al mondordo.

La kreskanta atento fokusita al kelkaj el la plej profunde radikantaj problemoj de nia planedo estas plia esperiga signo. Spite al la evidentaj malperfektecoj de Unuiĝintaj Nacioj, la kvardeko da deklarioj kaj konvencioj akceptitaj de tiu ĉi organizaĵo, eĉ kiam registaroj ne estis tre entuziasmaj en sia sindevigo, donis al ordinara homoj senton pri nova vivimpulso. La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, la konvencio pri Prevento kaj Puno de la Krime de Genocido kaj la similaj rimedoj por malebligi ĉiajn formojn de diskriminacio pro raso, sekso aŭ religia kredo; respekti la rajtojn de infanoj; protekti ĉiujn personojn kontraŭ torturo; elradiki malsaton kaj subnutritecon; utiligi sciencan kaj teknikan progreson favore al paco kaj bonstato de

la homaro – ĉiuj ĉi tiuj entreprenoj, se kuraĝe realigataj kaj plilarĝigataj, venigos la tagon, kiam la fantomo de milito estos perdinta sian povon regi la internaciajn rilatojn. Ne estas necese emfazi la gravecon de la temoj pritraktitaj de tiuj deklarioj kaj konvencioj. Tamen, kelkaj el tiuj temoj pro sia rekta influo al la starigo de mondpaco meritas aldonan komenton.

Rasismo, unu el la plej ruinigaj kaj obstinaj malbonoj, estas ĉefa barilo kontraŭ la paco. Ĝia praktiko reprezentas ofendon al la homa digno tro kruela por esti subtenata sub iu ajn preteksto. La rasismo prokrastas la disvolviĝon de la senlimaj kapabloj de siaj viktimoj, koruptas siajn praktikantojn kaj malebligas homan progreson. La agnosko de la unueco de la homaro, efektivigota pere de taŭgaj juraj paŝoj, devas esti universale apogata, se oni volas solvi tiun ĉi problemon.

La troa malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kiu estas fonto de akuta suferado, konservas la mondon en stato de nestabileco, kvazaŭ ĉe la sojlo al milito. Malmultaj socioj pritraktis tiun ĉi situacion efike. La solvo postulas kombinitan aplikon de spiritaj, moralaj kaj praktikaj rimedoj. Nova rigardo al tiu ĉi problemo estas necesa, akompanata de konsultado ĉe specialistoj el larĝa spektro de fakoj, libera je ekonomia kaj ideologia polemiko kaj inkluzivanta la homojn rekte koncernatajn en la decidoj urĝe farendaj. Temas pri problemo, kiu estas ligita ne nur kun la neceso ĉesigi ekstreman riĉecon aŭ malriĉecon, sed ankaŭ kun tiuj spiritaj veroj, kies kompreno povas estigi novan universalisman sintenon. La fortikigo de tia sinteno estas en si mem unu el la ĉefaj partoj de la solvo.

Senbrida naciismo, distinge de sana kaj legitima patriotismo, devas cedi al pli larĝa lojaleco, al la amo al la homaro kiel tuto. Bahá'u'lláh deklaris: "La tero estas nur unu lando, kaj la homaro estas ĝiaj civitanoj." La koncepto de mondcivitaneco estas rekta rezulto de la ŝrumpado de la mondo, danke al scienca progreso, en ununuran najbarecon kaj de la nedisputebla interdependeco de la nacioj. Amo al ĉiuj popoloj de la mondo ne ekskludas amon al la propra lando. En mondskala socio la avantaĝo de parto estas plej bone certigita per progresigo de la avantaĝo de la tuto. Nunaj internaciaj aktivecoj en diversaj kampoj, kiuj kontribuas al reciproka simpatio kaj sento de solidareco inter la popoloj, bezonas vastan pliigon.

Religia kverelado estis, tra la tuta historio, kaŭzo de sennombraj militoj kaj konfliktoj, ĉefa malhelpilo al progreso, kaj ĝi ĉiam pli fariĝas naŭzaĵo por homoj el ĉiaj kredoj kaj por nekredantoj. La anoj de ĉiuj religioj devas akcepti fronti la fundamentajn demandojn, kiujn tiu ĉi malpaco starigas, kaj trovi klarajn respondojn. Kiel solviĝu la diferencoj inter ili en teorio kaj en praktiko? La religiaj gvidantoj de la homaro estas konfrontitaj kun la defio, konsideri, kun koroj plenaj de la spirito de kompato kaj deziro al la vero, la mizeron de la homaro kaj demandi sin, ĉu ne eblas, en humileco antaŭ ilia Ĉiopova Kreinto, submergi siajn teologiajn diferencojn en grandanima spirito de reciproka indulgo, kio permesos al ili kunagadi por la progresigo de homa interkompreniĝo kaj paco.

La emancipiĝo de la virino, atingo de plena samrajteco inter la seksoj, estas unu el la plej gravaj, kvankam malpli agnoskitaj, antaŭkondiĉoj por la paco. La rifuzo de tiu egaleco estas maljustaĵo kontraŭ unu duono de la homaro kaj estigas en viroj malutilajn sintenojn kaj kutimojn, kiuj estas portataj el la familio al la laborloko, en la politikan vivon kaj fine en la internaciajn rilatojn. Ekzistas neniam tialoj, nek moralaj, nek praktikaj aŭ biologiaj, kiuj povus pravigi tian rifuzon. Nur kiam la virinoj estos akceptitaj kiel plenrajtaj partneroj en ĉiuj kampoj de homa aktiveco, kreiĝos morala kaj psikologia klimato, en kiu internacia paco povas kreskadi.

Universala edukado, en kies servo staras jam armeo da sindediĉaj homoj el ĉiuj kredoj kaj nacioj, bezonas la plej grandan subtenon, kiun la registaroj de la mondo povas provizi. Ĉar nescio estas sendube la ĉefa kaŭzo de dekadenco kaj pere de popoloj kaj de pludaŭro de antaŭjuĝoj. Neniu nacio akiros sukceson, se ĝiaj civitanoj ne ricevas edukon. Manko de rimedoj limigas la eblecon de multaj nacioj plenumi tiun ĉi bezonon kaj devigas al starigo de plirajtecoj. La koncernaj decidohavaj instancoj agas saĝe, se ili donas ĉefan plirajtecon al la edukado de virinoj kaj knabinoj, ĉar ĝuste pere de kleraj patrinoj klareco povas disvastiĝi plej efike tra la socio. En akordo kun la postuloj de nia epoko, la instruado de la koncepto de mondcivitaneco devus esti konsiderata ankaŭ kiel elemento de la regula edukado de ĉiu infano.

Fundamenta manko de interkomunikado inter popoloj serioze subfosas la strebon al monda paco. Adopto de internacia helplingvo konsiderinde kontribuos al la solvo de tiu ĉi problemoj kaj postulas urĝegan priatenton.

Du ĉefaj punktoj devas esti emfazitaj en tiu ĉi kunteksto. Unu estas, ke la ĉesigo de milito ne simple estas afero de subskribo de traktatoj kaj protokoloj; ĝi estas kompleksa tasko, kiu necesigas novan nivelon de reciprokaj sindevigoj por solvi problemojn, kiuj kutime ne estas rilatigitaj al la klopodoj pri paco. Bazita sole sur politikaj interkonsentoj, la ideo de kolektiva sekureco estas ĥimero. La alia punkto estas, ke la ĉefa defio en la traktado de problemoj de paco estas levi la debaton al la nivelo de principoj kaj ne resti ĉe pura pragmatismo. Ĉar, esence, paco ekfloras el interna stato subtenata de spirita aŭ morala sinteno, kaj estas ĉefe pere de veko de tiu ĉi sinteno, ke eblos trovi daŭrajn solvojn.

Ekzistas spiritaj principoj, aŭ – kiel aliaj ŝatas diri – homaj valoroj, per kiuj eblas trovi solvojn por kiu ajn socia problemoj. Ĉiu bonintenca grupo povas ĝenerale elpensi praktikajn solvojn por siaj problemoj, sed bonaj intencoj kaj praktikaj scioj kutime ne sufiĉas. La esenca merito de spiritaj principoj estas, ke ili ne nur ofertas perspektivon harmoniantan kun la vera karaktero de la homo, sed ankaŭ havigas sintenon, impeton, volon kaj aspirojn, kiuj faciligas la malkovron kaj plenumon de praktikaj paŝoj. La ŝtatestroj kaj ĉiuj aŭtoritatuloj agas taŭge en siaj klopodoj al la solvo de la problemoj, se ili unue identigus la koncernajn principojn kaj akceptus ilin kiel gvidilojn.

III

La ĉefa demando solvenda estas, kiel la hodiaŭa mondo kun ĝiaj rigidaj konfliktostrukturoj povos ŝanĝiĝi en mondon, kie regas harmonio kaj kunlaboremo.

Tutmonda ordo povas esti fondita nur sur neskuebla konscio pri la unueco de la homaro, spirita vero konfirmita de ĉiuj homsciencoj. Antropologio, fiziologio kaj psikologio rekonas nur unu homan specon, kvankam senfine varian laŭ la malĉefaj fenomenoj de la vivo. La agnosko de tiu ĉi vero postulas forlason de antaŭjuĝoj – antaŭjuĝoj de ĉiuj specoj – pri raso, klaso, haŭtkoloro, kredo, nacio, sekso, grado de materia civilizacio, ĉio, kio ebligas al la homoj konsideri sin superaj al aliaj.

Rekono de la unueco de la homaro estas la ĉefa baza kondiĉo por la reordigo kaj administrado de la mondo kiel unu lando, kiel la hejmo de la homaro. Universala akcepto de tiu ĉi spirita principo estas esenca por ĉiu sukcesa klopodo pri starigo de mondpaco. Tial tiu ĉi principo devus esti proklamata mondscale, instruata en lernejoj kaj klarigata en ĉiu nacio kiel preparo por la organika ŝanĝiĝo en la socio, kiun ĝi enhavas.

El la bahaa vidpunkto, la agnosko de la unueco de la homaro "postulas ne malpli ol la rekonstruo kaj la malarmado de la tuta civilizita mondo – mondo, organike unuiĝinta en ĉiuj esencaj aspektoj de ĝia vivo, ĝia politika funkciado, ĝia spirita aspiro, ĝiaj komerco kaj financo, ĝiaj skribo kaj lingvo, kaj tamen senlima en la diverseco de la naciaj karakterizaĵoj de ĝiaj federaj unuoj."

En siaj klarigoj pri la konsekvencoj de tiu ĉi centra principo, Shoghi Effendi, la Gardanto de la Bahaa Kredo, komentis en la jaro 1931: "Neniel celante la renverson de la ekzistantaj fundamentoj de la socio, ĝi klopodas plilarĝigi ĝian bazon, aliformi ĝiajn instituciojn en maniero harmonianta kun la bezonoj de konstante ŝanĝiĝanta mondo. Ĝi ne povas konflikti kun legitimaj fidelecoj, nek subfosi fundamentajn lojalecojn. Ĝia intenco estas nek estingi la flamon de sana kaj inteligenta patriotismo en la koro de la homoj, nek aboli la principon de nacia aŭtonomio, tiom esenca, kiam la malbonoj de troa centralismo devas esti evitataj. Ĝi nek ignoras la diversecon de genta deveno, de klimato, de historio, de lingvo kaj tradicio, de pensado kaj kutimoj, kiuj diferencigas la popolojn kaj naciojn de la mondo, nek ĝi klopodas subpremi ĝin. Ĝi alvokas al pli granda lojaleco, al pli forta aspiro, ol iu ajn alia, kiu iam animinstigis la homan mondon. Ĝi insistas pri la submeto de naciaj impulsoj kaj interesoj sub la neprajn bezonojn de unuigita mondo. Ĝi rifuzas unuflanke la troan centralismon kaj aliflanke malaprobas ĉiujn strebojn al unuformeco. Ĝia moto estas unueco en diverseco."

La atingo de tiaj celoj necesigas diversajn ŝtupojn en la ĝustigo de naciaj politikaj sintenoj, kiuj nuntempe tuŝas anarĥion pro manko de klare difinitaj leĝoj aŭ ĝenerale akceptitaj kaj efektivegeblaj principoj por reguligo de la interpopolaj rilatoj. La Ligo de Nacioj, la Unuiĝintaj Nacioj kaj la multaj organizaĵoj kaj konvencioj kreitaj de ili

sendube kontribuis al mildigo de kelkaj negativaj konsekvencoj de internaciaj konfliktoj, sed ili montriĝis netaŭgaj malebligi militon. Fakte ekflamis dekoj da militoj post la Dua Mondmilito, kaj kelkaj ankoraŭ furiozas.

La ĉefaj aspektoj de tiu ĉi problemo ekaperis jam en la 19^a jarcento, kiam Bahá'u'lláh unuafoje prezentis siajn proponojn por starigo de mondpaco. La principon de kolektiva sekureco Li klarigis en siaj mesaĝoj al la regantoj de la mondo. Shoghi Effendi komentis Liajn proponojn jenmaniere: "Kion alian tiuj ĉi gravaj vortoj povas signifi ol la atentigo pri la neevitebla limigo de absoluta nacia suvereneco, kiel nepre necesa unua paŝo al la konstruo de la estonta Federacio de ĉiuj nacioj de la mondo? La formo de monda superŝtato devas esti disvolvita, je kies favoro ĉiuj nacioj de la mondo volonte cedos ĉian pretendon por militi, certajn rajtojn starigi impostojn kaj ĉiujn rajtojn teni armadon, krom tiuj por sekurigi internan ordon en siaj teritorioj. Tia ŝtato devos enteni en siaj kadroj Internacian Ekzekutivon adekvatan por trudi plejsuperan kaj nerezisteblan aŭtoritatecon al ĉiu kontraŭstarema membro de la komunumo; Mondparlamenton, kies membroj estos elektitaj de la popoloj de ties landoj kaj kies elekto estos konfirmita de la respektivaj registaroj; kaj Plejsuperan Kortumon, kies juĝdecidoj havos ligan validecon, eĉ en tiuj kazoj kiam la partioj ne konsentis libervole submeti sian kazon al ĝia supera juĝrajto.

Tutmonda komunumo, en kiu ĉiuj ekonomiaj bariloj estos por ĉiam disrompitaj kaj la interdependeco de kapitalo kaj laboro definitive rekonita; en kiu la brukriado de religia fanatikeco kaj disputado estos por ĉiam silentigita; en kiu la flamo de rasa malamikeco estos fine estingita; en kiu unu sola kodo de internacia juro – rezulto de saĝe pripensataj decidoj de la federaciaj reprezentantoj de la mondo – havos kiel sankcion tujan kaj devigan intervenon de la kunigitaj fortoj de la federacianoj; kaj fine mondkomunumo, en kiu la furiozo de kaprica kaj militema naciismo estos ŝanĝita en daŭran konscion pri mondcivitaneco – jen aspektas, en siaj ĉefaj linioj, la Ordo anticipita de Bahá'u'lláh, Ordo konsiderota kiel la plej nobla frukto de malrapide maturiĝanta epoko."

Pri la efektivigo de tiuj perspektivoj Bahá'u'lláh diris: "Devas veni la tempo, kiam la nepra neceso por okazigo de vasta, ĉioampleksa kunveno de homoj estos universale rekonita. La regantoj kaj reĝoj de la tero nepre devas ĉeesti ĝin kaj, partoprenante ĝiajn interkonsiliĝojn, ili devas preparoli tiajn vojojn kaj rimedojn, kiuj kondukos al la monda Plejgranda Paco inter la homoj."

La kuraĝo, la decidemo, la pura motivo, la senegoisma amo de unu popolo al la alia – ĉiuj spiritaj kaj etikaj kvalitoj necesaj por tiu grandega paŝo al paco fokusiĝas en la volo agi. Kaj por vekti la necesan volon, oni devas serioze konsideri la realecon de la homo, nome lian pensadon. Kompreni la gravecon de tiu ĉi potenca realeco signifas samtempe konscii pri la socia neceso efikigi ĝian unikan valoron pere de sincera, senpasia kaj amika interkonsiliĝo kaj agi surbaze de la rezultoj de tiu ĉi procezo. Bahá'u'lláh insiste atentigis pri la alta valoro kaj nepra neceso de interkonsiliĝo por la ordigo de la homaj aferoj. Li diris: "Interkonsiliĝo kreas pli profundan konscion kaj ŝanĝas konjekton en certecon. Ĝi estas brila lumo, kiu en obskura mondo montras la

vojon kaj donas gvidon. Por ĉio ekzistas kaj plu ekzistos nivelo de perfekteco kaj matureco. La matureco de la dono de kompreno manifestiĝas per interkonsiliĝo." Ĝuste la klopodo atingi pacon pere de la interkonsiliĝa agado, kiun li proponis, povas liberigi tiel sanigan spiriton inter la popoloj de la tero, ke nenia potenco sukcesu kontraŭstari la finan, triumfan rezulton.

Pri la agadmanieroj de tiu ĉi universala kunveno, 'Abdu'l-Bahá, la filo de Bahá'u'lláh kaj rajtigita interpretanto de liaj instruoj, proponis la jenon: "Ili devos fari el la Movado por Paco temon de ĝenerala interkonsiliĝo, kaj strebi per ĉiuj siaj fortoj starigi Unuiĝon de la nacioj de la mondo. Ili devos fari devigan traktaton kaj interligon, kies kondiĉoj estu saĝaj, nerompeblaj kaj firmaj. Ili devos proklami ĝin al la tuta mondo kaj akiri por ĝi la aprobon de la tuta homa raso. Tiu ĉi supera kaj nobla entrepreno – la vera fonto de paco kaj bonfarto de la tuta mondo – estu konsiderata kiel sankta de ĉiuj, kiuj loĝas surtere. Ĉiuj fortoj de la homaro devas esti mobilizitaj por certigi la stabilecon kaj daŭron de tiu ĉi Plejgranda Interligo. En tiu ĉi universala Pakto, la ekstremoj kaj limoj de ĉiu nacio estu klare fiksitaj, la principoj, sur kiuj baziĝas la interrilatoj de la registaroj, neŝanĝeble difinitaj, kaj ĉiuj internaciaj interkonsentoj kaj sindevigoj certigitaj. Same, la grandeco de la armado de ĉiu registaro estu strikte limigita, ĉar se oni permesus kreskadon de la militpreparoj kaj fortoj al iu nacio, tio kaŭzus la suspektojn de la aliaj. La fundamenta principo de tiu ĉi solena Pakto devus esti fiksita tiamaniere, ke, se iam iu registaro rompus ian ĝian kondiĉon, ĉiuj registaroj de la mondo devus elpaŝi kaj redukti ĝin al totala submetiĝo – ne, la tuta homa gento devus decidi detrui tiun registaron per ĉiuj disponeblaj fortoj. Se ĉi tiu plej granda el ĉiuj kuraciloj estus aplikita al la malsana korpo de la mondo, ĝi certe resaniĝus de siaj malsanoj kaj eterne restus bonfarta kaj sekura."

La okazigo de tiu potenca kunveno jam tro prokrastiĝis.

Tutkore ni alvokas la gvidantojn de ĉiuj nacioj eluzi tiun ĉi oportunan horon kaj neŝanceleble elpaŝi por aranĝi tiun ĉi universalan kunvenon. Ĉiuj fortoj de la historio urĝas la homan rason al tiu ĉi ago, kiu markos por ĉiam la aŭroron de ĝia delonge atendata matureco.

Ĉu ne Unuiĝintaj Nacioj, kun plena apogo de siaj ŝtatoj-membroj, strebu al la altaj celoj de tia glora evento?

Ke viroj kaj virinoj, gejunuloj kaj infanoj ĉie rekonu la eternan valoron de tiu necesega ago por ĉiuj popoloj kaj levu siajn voĉojn en plena konsento! Vere, estu la nuna generacio tiu, kiu malfermos tiun gloran etapon en la evoluo de la socia vivo sur nia planedo!

IV

La optimismo, kiun ni sentas, fontas el vizio, kiu transpasas la ĉesigon de milito kaj la kreon de instancoj por internacia kunlaboro. Daŭra paco inter la nacioj estas esenca stadio, sed ne, kiel Bahá'u'lláh konfirmas, la finfina celo en la socia evoluo de la homo. Super la armistico, al kiu la homaro estas perfortigita pro timo de la atoma infero, super la politika paco, pri kiu malvolonte konsentas suspektaj rivalantaj nacioj, super la pragmataj aranĝoj pri sekureco kaj konekzistado, super la multaj klopodoj de kunlaboro, kiun ebligas tiuj paŝoj, troviĝas la plej alta celo: la unuiĝo de ĉiuj homoj de la mondo en unu universalan familion.

Malkonkordo estas danĝero, kiun la nacioj kaj popoloj de la mondo ne povas elteni pli longe; la konsekvencoj estas tro teruraj por kontempladi, tro evidentaj por bezoni iun klarigon. "La bonfarto de la homaro", skribis Bahá'u'lláh antaŭ pli ol unu jarcento, "ĝia paco kaj sekureco estos neatingeblaj, se ĝia unueco ne estos firme establita." Observante ke "la tuta homaro ĝemas, sopiregas al gvido al unueco, kaj al la ĉesigo de sia jarcenta martireco", Shoghi Effendi plu komentis, ke: "Unuiĝo de la tuta homaro estas la karakterizaĵo de la nivelo, al kiu la homa socio nun proksimiĝas. La unueco de la familio, de la tribo, de la civito kaj de la nacio estis sukcese alstrebataj kaj plene atingitaj. Tutmonda unueco estas la celo, al kiu turmentegita homaro nun aspiras. La konstruado de nacioj atingis sian finon. La anarĥio, akompananta la ŝtatan suverenecon, proksimiĝas al kriza kulmino. Mondo maturiĝanta devas seniĝi je tiu fetiĉo, rekoni la unuecon kaj tutecon de la homaj interrilatoj kaj konstrui unufoje por ĉiam la organismon, kiu plej konvene reprezentas tiun ĉi fundamentan principon de ĝia vivo."

Ĉiuj hodiaŭaj fortoj de ŝanĝiĝo konfirmas tiun ĉi vidpunkton. La pruvoj estas ekkoneblaj je la multaj jam cititaj ekzemploj de favoraj signoj pri mondpaco el la nuntempaj internaciaj movadoj kaj disvolviĝoj. La armeo el viroj kaj virinoj el praktike ĉiu kulturo, raso kaj nacio de la tero, kiuj deĵoras en la diversaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, reprezentas tutmondan "Civilan Servon", kies impresaj faroj klare montras la altan gradon de kunlaboro, kiu estas atingebla eĉ en senkuraĝigaj cirkonstancoj. Deziro al unueco, kvazaŭ spirita printempo, strebas sin esprimi per nenombreblaj internaciaj kongresoj, kiuj kunvenigas homojn el plej diversaj fakoj. Ĝi animas la alvokojn por internaciaj projektoj rilate al infanoj kaj gejunuloj. Fakte ĝi estas la vera fonto de la rimarkinda ekumenisma movado, kiu ŝajne nerezisteble altiras la anojn de historie antagonismaj religioj kaj sektoj unuj al la aliaj. Kune kun la kontraŭa tendenco al milito kaj singlorigo, kiun ĝi senĉese kontraŭbatalas, la impulso al monda paco estas unu el la elstaraj karakterizaĵoj de la vivo sur nia planedo en la finaj jaroj de la 20^a jarcento.

La sperto de la bahaa komunumo povas esti konsiderata kiel ekzemplo por tiu ĉi ampleksiĝanta unueco. Ĝi estas komunumo de ĉirkaŭ tri aŭ kvar milionoj da homoj el multaj nacioj, kulturoj, klasoj kaj kredoj, kiuj okupiĝas pri en plej diversspecaj aktivecoj servantaj al la spiritaj, sociaj kaj ekonomiaj bezonoj de la popoloj en multaj

landoj. Ĝi estas unueca socia organismo, reprezentanta la diversecon de la homa familio, prizorganta siajn aferojn per sistemo de komune akceptitaj principoj de interkonsiliĝo kaj estimanta egale ĉiujn grandajn elverŝojn de la dia gvido en la homa historio. Ĝia ekzisto estas plua konvinka pruvo por la realigeblo de la vizio de ĝia Fondinto pri unuigita mondo, plua evidentigo, ke la homaro povas vivi kiel universala socio, indifera kiuj defioj akompanos ĝian maturiĝon. Se la sperto de la bahaanoj povas iel kontribui al la fortikigo de la espero pri la unueco de la homa raso, ni volonte ofertas ĝin kiel studindan modelon.

Pripensante la ekstreman gravecon de la tasko, kiu nun defias la tutan mondon, ni klinas niajn kapojn en humileco antaŭ la respektinda majesto de la dia Kreinto, Kiu en Sia senfina amo kreis la homaron el la sama radiko; nobligis la juvelan realecon de la homo; honorigis ĝin per intelekto kaj saĝo, nobleco kaj senmorteco; kaj donis al la homo "la unikan distingon kaj kapablon ekkoni Lin kaj ami Lin", kapablecon, kiu "devas esti konsiderata kiel la krea impulso kaj la ĉefa celo de la tuta kreado."

Ni estas firme konvinkitaj, ke ĉiuj homoj estis kreitaj por "antaŭen igi ĉiam progresantan kulturon"; ke "estas maldigne por la homo vivi kiel la bestoj sur la kampo"; ke la virtoj konvenantaj al la homa digno estas fideleco, indulgemo, amo, kompato kaj boneco al ĉiuj homoj. Ni rekonfirmas nian konvinkon, ke "la potencialoj, kiuj respondas al la homa ŝtupo, la plena mezuro de lia destino surtere, la enaskita aparteco de lia realo, devas senescepte malkaŝiĝi en tiu ĉi promesita Tago de Dio," Jen la motivoj por nia neŝancebla kredo, ke unueco kaj paco estas la atingebla celo, al kiu la homaro strebas.

Dum tio ĉi estas skribata, estas aŭdeblaj la atendoplenaj voĉoj de la bahaanoj, spite al la persekutoj, kiujn ili ankoraŭ suferas en la lando de la naskiĝo de sia kredo. Per sia ekzemplo de firma espero ili estas atestantoj por la kredo, ke la tuja realigo de tiu jarmila revo pri paco nun estas, kaŭze de la transformaj efikoj de la revelacio de Bahá'u'lláh, ornamita per la potenco de dia aŭtoritato. Tiel ni komunikas al vi ne nur vizion en vortoj: ni citas la potencon de la agoj de kredo kaj sinofero; ni diskonigas la urĝan pledon de niaj samreligianoj ĉie por paco kaj unueco. Ni ligiĝas kun ĉiuj, kiuj estas la viktimoj de agreso, ĉiuj, kiuj sopiras ĉesigon de batalado kaj malkonkordo, ĉiuj, kies sindediĉo je la principoj de paco kaj mondordo akcelas la noblajn celojn, por kiuj la homaro estis kreita de la ĉionama Kreinto.

Sincere dezirante al vi partoprenon en la fervoro de nia espero kaj en la profundeco de nia konfido, ni volas citi la emfazan promeson de Bahá'u'lláh: "Tiu teruraj bataloj, tiuj detruaj militoj ĉesos kaj la 'Plejgranda Paco' venos."

La Universala Domo de Justeco.

Tradukita de Bahaa Esperanto-Ligo (H.D. Maas).

ĈU DIO EKZISTAS ?

Ĉiu homo havas la kapablon

Disŝiru, en Mia Nomo, la vualojn, kiuj grave obstaklis vian vidon, kaj per la potenco de via kredo je la unueco de Dio, disŝetu la idolojn de vana imitado. Eniru do la sanktan paradizon de la graco de la Ĉiel-Kompata. Sanktigu viajn animojn per forigo de ĉio neapartenanta al Dio kaj spertu la dolĉecon de ripozo en la regno de Lia vasta kaj potencega Revelacio, kaj sub la ombro de Lia superega kaj neeraripova aŭtoritato. Ne permesu, ke vi estu volvita en la densa vualo de viaj egoismaj deziroj, ĉar Mi perfektigis en ĉiu el vi Mian kreaĵon, ke la boneco de Mia metiado estu plene rivelata al la homoj. Sekve do ĉiu homo povis kaj daŭre povos per si mem aprezi la Belon de Dio, la Glorata. Se li ne ricevintus tian fakulton, kiel oni povus juĝi lin pro lia neatingo ? Se, en tiu tago, kiam estos kunvokitaj ĉiuj popoloj de la tero, iu ajn homo staranta antaŭ sia Dio, devus respondi al: “Kial vi ne kredis je Mia Belo kaj forturnis vin de Mia Memo?” , kaj tiu homo responde dirus, “Ĉar ĉiuj homoj eraris, kaj neniuj troviĝis, kiu volis turni sian vizaĝon al la Vero, ankaŭ mi, sekvante ilian ekzemplon, same lamentinde ne rekonis la Belon de la Eternulo,” tia pledo certe ne estus akceptita. La fido de ĉiu homo dependas nur de li mem, neniuj aliaj.

Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh 75 - Postrikoltoj el la verkoj de Bahá'u'lláh

Rilate viajn asertojn pri la komenco de la Kreo, jen afero, pri kiu la konceptoj varias pro la diverseco de homaj pensoj kaj opinioj. Se vi asertus, ke ĝi de eterne ekzistis kaj daŭros ekzisti, tio pravus; aŭ se vi jesus la saman koncepton menciitan en la sanktaj Skriboj, ne estus dubo pri ĝi, ĉar ĝi estis rivelita de Dio, la Sinjoro de la mondoj. Li ja estis kaŝita trezoro. Jen afero neniel priskribebla aŭ eĉ prialudebla. Kaj rilate la demandon “Mi volis konigi Min”; ekzistis Dio, kaj Lia Kreo ekzistas sub Lia ŝirmo ekde la komenco, kiu ne estis komenco krom tio, ke antaŭis ĝin Unuaaĵo, kiun ni ne povas rigardi unuaaĵo, kaj origine el Kaŭzo neesplorebla eĉ de ĉiuj kleruloj.

Tio, kio ekzistis, ekzistis jam antaŭe, sed ne en la formo, kiun vi vidas hodiaŭ. La mondo de la ekzisto estiĝis pro la varmo generita de la interago de la aktiva agforto kaj tio, kio estas ĝia produkto. Tiuj du estas samaj, tamen diferencaj. Tiel la Granda Anonco informas vin pri tiu glora strukturo. Tiuj, kiuj komunikas la generan influon, kaj tiuj, kiuj ricevas ĝian efikon, estas ja kreitaj per la nerezistebla Vorto de Dio, kiu estas la Kaŭzo de la tuta Kreo; ĉio cetera krom Lia Vorto estas nur la kreitoj kaj iliaj efikoj. Vere via Sinjoro estas la Klariganto, la Ĉiel-saĝa.

Sciu krome, ke la Vorto de Dio – laŭdegata estu Lia gloro – estas pli alta kaj valore preter tio, kion la sensoj povas percepti, ĉar ĝi estas sankte aparta de ĉio materia kaj substanca. Ĝi superas la limojn de konataj elementoj kaj estas levita preter ĉiaj esencaj kaj agnoskataj substancoj. Ĝi manifestiĝis sen iu silabo aŭ sono, kaj estas nenio krom la Ordono de Dio, kiu trafluas ĉion kreitan. Ĝi neniam estis tenata for de la mondo de ekzisto. Ĝi estas la ĉio-traflua graco de Dio, el kiu ĉiu graco emanis. Ĝi estas esto alte supera al ĉio estinta kaj estonta.

Ni malvolonte pluparolos pri tiu ĉi temo, ĉar la nekredantoj klinis siajn orelojn en Ni por aŭdi tion, kio eventuale ebligos al ili moketi Dion, la Helpon en Danĝero, la Memkreanto. Kaj ĉar ili ne povas akiri misterojn pri la sciado kaj saĝo el tio, kion malvolviĝis el la Fonto de dia splendo, ili ekstaras protestante kaj furiozas. Sed estas vero diri, ke ili kontraŭas tion, kion ili komprenas, ne la klarigojn donatojn de la

Klariganto, nek la verojn transdonatajn de la Sola Vera Dio, la Konanto de nevidaĵoj. Iliaj protestoj senescepte revenas sur ilin, kaj mi ĵuras je via vivo, ke al ili mankas kompreno.

Ĉiu evento devas havi originon, kaj ĉiu domo konstruon. Vere, la Vorto de Dio estas la Kaŭzo, kiu antaŭis la dependan mondon – mondon, kiu estas ornamata de la splendo de la Praeternulo, sed konstante renoviĝas kaj regeneriĝas. Senmezure laŭdinda estas la Dio de Saĝeco, Kiu starigis tiun subliman strukturon.

Rigardu la mondon kaj dumtempe mediti pri ĝi. Ĝi senvualigas antaŭ viaj okuloj la libron pri si mem kaj rivelas tion, kion skribis sur ĝi la Skribilo de via Sinjoro, la Muldinto, la Ĉio-Sciinto. Ĝi konatigos vin kun tio, kio estas en ĝi kaj sur ĝi, kaj donos al vi tiel klarajn eksplikojn, ke ĝi faros vin sendependa de ĉiu elokventa klariganto.

Diru: la Naturo en sia esenco estas la realiĝo de Mia Nomo, la Farinto, la Kreinto. Ĝiaj manifestaĵoj estas diversigitaj de variaj kaŭzoj, kaj en tiu diverseco estas signoj kapteblaj de perceptipovaj homoj. La Naturo estas la volo de Dio kaj estas ĝia esprimo en kaj tra la dependa mondo. Ĝi estas Ordigo de la Providenco starigita de la Ordiganto, la Ĉiel-Saĝa. Se iu asertus, ke ĝi estas la volo de Dio manifestata en la mondo de ekzisto, neniu pridubu tiun aserton. En ĝi estas potenco, kies realon kleruloj ne kaptas mense. Efektive klarvida homo povas percepti en ĝi nenion krom la radiantan splendon de Nia Nomo, la Kreinto. Diru: jen ekzisto neniam putranta, kaj la Naturo mem senkomprene gapas antaŭ ĝiaj revelacioj, ĝiaj kredodevigaj pruvoj kaj ĝiaj radianta gloro, kiuj ĉirkaŭbrakas la universon.

Ne decas al vi rigardadi pasintajn aŭ pli proksimajn epokojn. Parolu pri la nuna tago kaj laŭdu tion, kio okazis en ĝi. Vere, tio sufiĉos por la tuta homaro. Fakte klarigoj kaj diskursoj pri tiaj aferoj frostigas la spiriton. Decas al vi tiel paroli, ke la koroj de veraj kredantoj ekflamas kaj iliaj korpoj eksoras.

Kiu firme kredas hodiaŭ je la renaskiĝo de la homo kaj plene konscias, ke Dio, la Plej Alta, tenas suverenan regadon kaj absolutan aŭtoritaton super tiu ĉi nova kreo, ja vere, tia homo same valoras kiel tiuj dotitaj per klarvido en tiu ĉi plej glora Revelacio. Pri tio atestas ĉiu perceptipova kredanto.

Paŝu alte super la mondo de la ekzisto per la potenco de la Plej Alta Nomo, ke vi konsci pri la praaj misteroj kaj ekkonu pri kiuj neniu scias. Vere, via Sinjoro estas la Helpanto, la Ĉio-Sciinto, la Pri-Ĉio-Informito. Vi simlu pulsantan arterion, pulsanta en la korpo de la tuta kreo, ke per la varmo generita de tiu movo aperu tio, kio batigos la korojn de la hezitantaj.

Tablets of Bahá'u'lláh - Tabuloj de Bahá'u'lláh, p.140-143

Ho Frato, se ni pripensas ĉiun kreitaĵon, ni atestas sennombrajn perfektajn saĝaĵojn kaj ekscias sennombrajn novajn kaj mirindajn verojn. Unu el la kreitaj fenomenoj estas la sonĝo. Pensu, kiom da sekretoj sonĝo enhavas, kiom da saĝaĵoj tie amasiĝas, kiom da mondoj kaŝiĝas. Observu, jen vi dormanta en via loĝloko, kaj la pordoj estas riglitaj; subite vi troviĝas en fora urbo, kiun vi eniris sen piedmovo, sen lacigo de via korpo; sen uzo de viaj okuloj vi vidas; sen streĉo de viaj oreloj vi aŭdas; senlange vi parolas. Kaj eble post paso de dek jaroj vi atestos en la ekstera mondo la samajn aferojn, pri kiuj vi sonĝis ĉi-nokte.

En sonĝo estas multaj saĝaĵoj pripensindaj, kiujn neniu krom la homoj de tiu ĉi Valo komprenas en iliaj veraj elementoj. Unue, kia estas tiu mondo, kie sen okulo aŭ orelo aŭ mano homo utiligas ĉiujn tiujn sensojn? Due, kiel estas, ke vi en la ekstera mondo vidas

la efikon de sonĝo vidita en la dormomondo antaŭ dek jaroj? Pripensu la diferencon inter tiuj du mondoj kaj la misteroj kaŝitaj en ili, ke vi atingu diajn konfirmojn kaj ĉielajn malkovrojn kaj eniru la regionoj de sankteco.

Dio, la Laŭdata, metis tiujn signojn en la homojn, por ke filozofoj ne povu nei la misterojn de la vivo transmonda nek moku tion, kio estas promesita al ili. Ĉar kelkaj bazas sin nur sur la rezonpovo kaj neas ĉion, kion la rezonpovo ne komprenas, sed malfortaj mensoj neniam povas kompreni la aferojn, kiujn ni rakontis; nur la Plejsupera, Dia Intelektio povas ilin kompreni:

Kiel febla racio komprenu la Koranon,

Aŭ araneo rete kaptu fenikson? [1]

[1 Persa mistika poemo.]

Bahá'u'lláh, *The Seven Valleys* - La Sep Valoj, p.32-33)

‘ABDU’L-BAHÁ: - TABULO AL D-RO AUGUSTE HENRI FOREL¹¹⁰

Ho respektigata persono, veramanto! Via letero datita la 28-an de julio 1921 estas ricevita. Ĝia enhavo estas altagrade plaĉa kaj indikis, ke, laŭdata estu Dio, vi estas ankoraŭ juna kaj serĉas la veron, ke via pensopovo estas forta kaj la rezultoj de via pensado manifestaj.

Multnombraj kopioj de la letero, kiun mi skribis al d-ro Fischer, dissendiĝis diversdirekten kaj ĉiuj scias, ke ĝi estis rivelita en la jaro 1910. Krom tio multaj leteroj estis skribitaj antaŭ la Milito pri la sama temo, kaj estas aludoj al tiuj ĉi demandoj en la Revuo de la Universitato Sanfrancisko, kies dato estas sendispute konata.¹¹¹ Sammaniere la filozofoj kun vasta vidkampo alte laŭdis la diskurson elokvente prezentitan en la supre nomita universitato.¹¹² Kopio de tiu teksto estas do kunsendota. Viaj skribaĵoj estas sendube tre utilaj; se ili estos publikigitaj, sendu al ni kopion de ambaŭ.

Per la vorto materiistoj, kies kredo rilate la dian estas klarigita, ni ne celas filozofojn ĝenerale, sed tiun grupon de mallarĝviziaj materiistoj, kiuj adoras la senseblan, kiuj dependas de nur la kvin sensoj, kaj kies kriterio de scio estas limigita al tio perceptebla de la sensoj. Ĉio sensebla estas por ili reala, dum ĉio ekster la potenco de la sensoj estas aŭ nereala aŭ pridubinda. La ekziston de Dio ili rigardas tute pridubinda.

Estas tiel, kiel vi skribis : ne filozofoj ĝenerale, sed mallarĝmensaj materiistoj. Deistaj filozofoj, ekzemple Sokrato, Platono kaj Aristotelo, ja meritas estimon kaj altan laŭdon,

¹¹⁰ Originala persa teksto unue publikiĝis en Kajro en 1922. Tiu ĉi traduko baziĝas sur traduko en *The Bahá'í World* vol XV. pp.37-43. D-ro Auguste Henri Forel de Zuriko naskiĝis en 1848 kaj iĝis bahaano en 1920. Liaj fakaj kampoj estis entomologio kaj psikologio. Dum multaj jaroj li estris la fakultaton de psikologio en Zuriko. “Per sia nelacigebla esplorado d-ro Forel grave aldonis al sciencaj scioj kaj nemezureble servis al la homaro.” (“In Memoriam”, *The Bahá'í World*, vol. V, p.420.) Tiu ĉi letero estis skribita en 1921. Vidu ankaŭ *Star of the West* (Outer vol 7.) vol 13. n-ro.8. p193-202.

¹¹¹ ‘Abdu’l-Bahá aludas al sia prelego en Stanford University, Palo Alto, Kalifornio, en 1912, kiu estis publikigita en loka ĵurnalo kaj aperas ankaŭ en la kolekto de liaj prelegoj en Usono, kun la titolo *The Promulgation of Universal Peace* (la disvastigado de universala paco).

¹¹² Tie ĉi ‘Abdu’l-Bahá distingas inter la materiisma-empiriisma filozofio de la moderna Okcidento kaj la norma raciisma filozofio de la grekoj kaj persoj, kaj li reliefigas la diferencon inter teorioj pri la esenco de la naturo kaj la origino de la homo.

ĉar ili faris grandiozan servon al la homaro. Simile ni rigardas la materiistajn, multatingintajn, moderaĵn filozofojn, kiuj servas al la homaro.

Ni rigardas scion kaj saĝon kiel la fundamenton de la progreso de la homaro kaj alte taksas filozofojn kun larĝa vizio. Zorge studu la San Francisco University Journal, ke la vero estu rivelita al vi.

Se temas pri mensaj kapabloj, ili vere estas denaskaj ecoj de la animo, same kiel la disradiado de lumo estas la esenca eco de la suno. La sunradioj renoviĝas, sed la suno mem daŭre restas la sama kaj neŝanĝita. Pripensu, kiel la homa intelekto evoluas kaj malfortiĝas, kaj povas foje neniigĝi, dum la animo ne ŝanĝiĝas. Ke la menso sin manifestu, la homa korpo devas esti integra; kaj sana menso ne povas esti krom en sana korpo, dum la animo ne dependas de la korpo. Per la potenco de la animo la menso komprenas, imagas, kaj influas, dum la animo estas potenco libera. La menso komprenas la abstraktan helpe de la konkreta, sed la animo havas senlimajn manifestaĵojn proprajn. La menso havas siajn limojn, la animo estas senlima. Helpe de tiaj sensoj, kiaj vido, aŭdo, gustumo, flaro kaj tuŝo, la menso komprenas, dum la animo estas libera je ĉiaj iloj. La animo, kiel vi observis, ĉu ĝi dormas aŭ ne, moviĝas kaj ĉiam aktivas. Eble ĝi, dum sonĝo, deĉifras kompleksan problemon nedeĉifreblan en la maldorma stato. Krome, la menso ne komprenas, kiam la sensoj ne plu funkcias, kaj en la embria stato kaj frua infanaĝo la potenco rezoni tute mankas, dum la animo ĉiam estas plene potenca. Mallonge, estas multaj pruvoj, kiuj montras, ke malgraŭ perdo de rezonkapablo la potenco de la animo daŭre ekzistas. Sed la spirito ekzistas en diversaj gradoj kaj statoj.

Pri la ekzisto de spirito en mineraloj: estas nedubeble, ke mineraloj havas spiriton kaj vivon laŭ la bezonoj de tiu ekzistoetapo. Tiu nekonata sekreto fariĝis sciata ankaŭ de materiistoj, kiuj nun asertas, ke ĉiuj estaĵoj havas vivon, ĝuste kiel Li diras en la Korano, “Ĉio vivas”.

Same en la regno de la vegetaĵoj estas kreskopotenco, kaj tiu kreskopotenco estas la spirito. En la besta mondo estas sentado, sed en la homa mondo estas ĉio-ampleksa potenco. En ĉiuj pli fruaj etapoj mankas la rezonpotenco, sed la animo ekzistas kaj sin rivelas. Sentado ne komprenas la animon, dum la rezonpovo de la menso provas ĝian ekziston.

Sammaniere la menso provas la ekziston de nevidebla Realo, kiu ampleksas ĉion kaj ekzistas kaj sin rivelas en ĉiuj etapo, kaj ĝia esenco superas la komprenpovon de la menso. Tial la minerala mondo komprenas nek la naturon nek la perfektaĵojn de la vegeta mondo; la vegeta mondo ne komprenas la naturon de la besta mondo, kaj la besta mondo ne komprenas la naturon de la realo de la homo, kiu malkovras kaj ampleksas ĉion.

Besto estas kaptito de la naturo kaj ne povas preteriri ĝiajn regulojn kaj leĝojn. En la homo tamen estas malkovra potenco, kiu superas la mondon de la naturo kaj regas kaj modifas ĝiajn leĝojn. Ĉiuj plantoj kaj bestoj, ekzemple, estas kaptitoj de la naturo. La suno mem, malgraŭ ĝia tuta splendo, estas tiel submetita al la naturo, ke ĝi ne havas propran volon kaj ne povas spiti eĉ en la plej eta grado ĝiajn leĝojn. Sammaniere ĉiuj aliaj estaĵoj, ĉu el la minerala, la vegeta aŭ la besta mondo, ne povas deflankiĝi de la naturleĝoj, ĉiuj estas ĝiaj sklavoj. La homo, kontraste, kvankam korpe kaptito de la naturo, estas libera en siaj menso kaj animo kaj regas super la naturo.

Pripensu: laŭ la naturleĝoj la homo vivas, moviĝas kaj restas sur la tero, sed liaj animo kaj menso modifas ĝiajn leĝojn, kaj kiel birdo li flugas en la aero, rapide velveturas sur

la maroj, kaj fiŝosimile li sondas la profundaĵon kaj malkovras ĝian enhavon. Vere, jen forta venko kontraŭ la naturleĝoj.

Same estas pri elektra energio: tiu dissalta violenta forto, kiu fendas montojn, tamen estas kaptata de homoj en globo! Jen evidenta trudo en la naturleĝojn. Similmaniere la homo malkovras la kaŝitajn natursekretojn, kiuj laŭ la leĝoj devus resti kaŝitaj, kaj li transigas ilin el la nevidebla al la videbla mondo. Ankaŭ tio signifas trudon en la naturleĝojn. Same li malkovras la internajn ecojn de aferoj, kiuj estas natursekretoj. Li ankaŭ ĵetas lumon sur pasintajn eventojn perditajn el la memoro, kaj per sia kapablo indukti antaŭvidas ankoraŭ ne konatajn estontaĵojn. Krom tio, komunikado kaj malkovrado estas limigitaj de la naturleĝoj al etdistanca efiko, sed la homo, pere tiu interna potenco sia, kiu malkovras la realon de ĉio, ligas Orienton kun Okcidento. Ankaŭ tio trudas en la naturleĝojn. Simile, laŭ la naturleĝoj ĉiuj ombroj estas efemeraj, sed la homo fiksas ilin sur plataĵon, kaj ankaŭ tio estas trudo en la naturleĝojn. Pripensu kaj kontemplu: ĉiuj sciencoj, artoj, metioj, inventoj kaj malkovroj iam estis natursekretoj kaj laŭ ties ĉi leĝoj devus resti kaŝitaj; sed la homo per sia malkovra potenco trudas sin en la naturleĝojn kaj transigas ilin el la nevidebla en la videblan mondon. Jen ankoraŭfoje okazas trudo en la naturleĝojn.

Mallonge oni povas diri, ke la interna kapablo de la homo, nevidata de la okulo, forŝiras la glavon el la manoj de la naturo kaj donas al ĝi severan baton. Al ĉiuj aliaj estaĵoj, kiel ajn grandaj, mankas tiuj perfektaj. La homo havas la kapablon voli kaj kompreni, sed la naturo ne havas ĝin. La naturo estas kaptita, la homo estas libera. Al la naturo mankas kompreno, la homo komprenas. La naturo ne scias pri pasintaj eventoj, la homo pri ili konscias. La naturo ne prognozas la estontaĵon; la homo per sia perceptopovo vidas tion, kio venos. La naturo ne konscias pri si mem, la homo scias pri ĉio.

Se iu supozas, ke la homo estas nura parto de la natura mondo, kaj, ĉar li havas tiujn perfektajn kapablojn, kiuj estas nur manifestaĵoj de la natura mondo, kaj ke do la naturo estas la origina fonto de tiuj perfektaĵoj kaj ili ne mankas al ĝi, ni respondas al tiu, dirante: la parto dependas de la tuto; parto ne povas posedi perfektaĵojn, kiuj mankas al la tuto.

Per la naturo ni celas nomi tiujn internajn ecojn kaj necesajn rilatojn estigitajn de la realo de la aferoj. Kaj tiuj realoj de la aferoj, kvankam ege diversaj, estas tamen intime ligitaj inter si. Por tiuj diversaj realoj estas bezonata ĉio-unuiga agento, kiu ligas ilin ĉiujn unu al aliaj. Ekzemple, la diversaj organoj kaj membroj, la partoj kaj elementoj, kiuj konstistigas la homan korpon, kvankam unuopaj, tamen estas ĉiuj ligitaj unu al la aliaj per tiu ĉio-unuiga agento konata kiel la homa animo, kiu kaŭzas, ke ili funkcii en perfekta harmonio kaj absoluta reguleco, tiel ebligante la daŭron de la vivo. Sed la homa korpo estas tute nekonscia pri tiu ĉio-unuiga agento, kaj tamen ĝi agas regule kaj plenumas siajn funkciojn laŭ ĝia volo.

Se temas pri filozofoj, ili apartenas al du skoloj. Ekzemple, Sokrato la saĝa kredis je la unueco de Dio kaj la postmorta ekzisto de la animo; ĉar lia opinio kontraŭis tiun de la mallarĝmensuloj de tiu epoko, tiu dia saĝulo estis venenita de ili. Ĉiuj diaj filozofoj kaj homoj saĝaj kaj komprenaj, kiam ili observis tiujn senfinajn estaĵojn, opiniis, ke en tiu ĉi granda kaj senfina universo ĉio komenciĝas en la minerala regno, ke el la minerala estiĝas la vegeta regno, el la vegeta estiĝas la besta regno, kaj el la besta regno estiĝas la homa. La apogeo de tiu ĉi senlima universo kun ĝia tuta grandiozo kaj gloro estas la homo mem, kiu en tiu ĉi mondo dumtempe laboras kaj suferas, kun diversaj malsanoj kaj doloroj, kaj fine disiĝas, postlasante neniun spuron kaj neniun frukton. Se estus tiel, ne povus esti dubo, ke tiu ĉi senlima universo kun ĉiuj siaj perfektaj finiĝis fraŭde kaj trompe kaj sen rezulto, sen frukto, sen atingo kaj sen efiko. Tute ne estus ia signifo. Ili

estis konvinkitaj do, ke tiu ĉi Granda Metiejo kun sia tuta potenco, sia kapturna splendo, ne povas finfine neniĝi. Ke ekzistas ankoraŭ alia vivo, estas do certe kaj, same kiel la vegeta regno ne konscias pri la homa regno, ankaŭ ni ne scias pri la Granda posta Vivo, kiu sekvas la vivon de la homo ĉi tie malsupre. Nia nekompreneo de tiu vivo estas tamen nenia pruvo, ke ĝi ne ekzistas. Multnombraj kaj konvinkaj pruvoj ekzistas, kiuj montras, ke la senfina mondo ne povas finiĝi je tiu ĉi homa vivo.

Pri la Dia Esenco : vere ĝi estas neniel determinita de io ekster ĝia propra naturo, kaj estas neniel komprenebla. Ĉar kion ajn la homo povas koncepti, estas realo kun limoj, ne senfina; ĝi estas limigita, ne ĉio-ampleksa. Ĝi povas esti komprenata de la homo kaj estas regata de li. Simile certas, ke ĉiuj homaj konceptoj estas dependaj, ne absolutaj ; ke ili havas mensan ekziston, ne materian. Krome, diferencigo de etapoj en la dependa mondo estas obstaklo al la kompreno. Do kiel la dependa konceptu la Realon de la absoluta ? Kiel jam dirite, diferencigo de etapoj estas obstaklo al la kompreno. Mineraloj, plantoj, kaj bestoj ne havas la mensajn kapablojn de la homo por malkovri la realon de ĉio, sed la homo mem komprenas ĉiujn etapojn sub si. Ĉiu supera etapo komprenas la malsuperan kaj malkovras ĝian realon, sed la malsupera ne konscias pri la supera kaj ne povas ĝin kompreni. Tial la homo ne povas kompreni la Esencon de la Dia sed povas, per sia rezonkapablo, per observado, per siaj intuiciaj kapabloj kaj la rivela potenco de sia fido kredi je Dio kaj malkovri la abundon de Lia graco. Li certigas ke, kvankam la Dia Esenco ne videblas per la okulo, kaj la ekzisto de Dio estas netuŝebla, tamen konvinkaj spiritaĵaj pruvoj indikas la ekziston de tiu nevidata Realo. Sed la Dia Esenco en si mem estas preter ĉia priskribo. Ekzemple, la naturon de etero oni ne konas, sed ke ĝi ekzistas, estas certe, pro la efikoj produktataj: varmo, lumo, kaj elektro estas ĝiaj ondoj. Per tiuj ondoj do la ekzisto de etero estas pruvita. Kaj kiam ni pripensas la elverŝadon de Dia Graco, ni certigas pri la ekzisto de Dio. Ekzemple, ni observas, ke la ekzisto de estaĵoj dependas de la kunmetado de diversaj elementoj kaj ilia neekzisto dependas de la apartiĝo de iliaj konstituaj elementoj. Ĉar apartiĝo kaŭzas la malligon de la diversaj elementoj. Tial, ĉar ni observas la kuniĝon de elementoj, kiu estigas la ekziston de estaĵoj, kaj ĉar ni scias, ke senlimaj estas la aferoj, la rezultoj, do kiel la Kaŭzo povas esti limigita?

Nu, formiĝo estas trispeca kaj nur trispece eblas: pro hazardo, pro neceso, kaj pro elekto. La kuniĝo de la diversaj konstituaj elementoj de estaĵoj ne povas esti hazarda, ĉar por ĉiu efiko devas esti kaŭzo. Ĝi ne povas esti pro neceso, ĉar tiukaze la formiĝo devus esti interna eco de la konstituaj partoj, kaj la interna eco de iu afero neniel povas esti aparta de ĝi, kiel lumo, kiu ĉion rivelas, varmo, kiu ekspansiigas elementojn, kaj la sunradioj, kiuj estas la esenca eco de la suno. En tiaj kondiĉoj la apartiĝo de iu ajn formiĝo ne eblas, ĉar la internaj ecoj de afero ne povas esti apartigitaj de ĝi. Restas la tria formiĝo, la laŭelekta, nevidata forto priskribita kiel la Prapotenco, kiu kunmetas tiujn elementojn ; kaj ĉiu formiĝo estigas apartan estaĵon.

La ecoj kaj perfektoj, kiaj volo, scio, potenco kaj aliaj praecoj, kiujn ni atribuas al la Dia Realo, estas la signoj reflektantaj la ekziston de estaĵoj en la videbla mondo kaj ne la absolutaj perfektoj de la Dia Esenco, kiuj ne estas kompreneblaj. Ekzemple, kiam ni pripensas kreitaĵojn, ni observas senlimajn perfektojn, kaj ĉar la kreitaĵoj estas en plena reguleco kaj perfekto, ni deduktas, ke la Prapotenco, de kiu dependas la ekzisto de tiuj aferoj, ne povas esti senscia; tial ni diras, ke Li estas Ĉio-scia. Ĉar estas certe, ke Li ne estas senpova, do Li devas esti ĉiel-potenca ; Li ne estas malriĉa, do Li devas esti Ĉio-poseda ; Li ne estas neekzistanta, Li devas esti Eterna. La celo estas montri, ke tiuj ecoj kaj perfektoj priparolataj koncerne tiun Universalan Realon, servas nur por nei malperfektojn, ne por aserti la perfektojn percepteblajn de la homa menso. Tial ni diras, ke Liaj ecoj estas nekoneblaj.

Konklude, tiu Universala Realo kun ĉiuj siaj kvalitoj kaj ecoj, pri kiuj ni rakontas, estas sankta kaj super ĉiuj mensoj kaj komprenpovoj. Sed kiam ni, kun malfermitaj mensoj meditas pri tiu ĉi senfina universo, ni observas, ke movo sen mova forto, kaj efiko sen kaŭzo estas same neeblaj; ke ĉiu estaĵo ekekestis pro diversaj influoj kaj daŭre submetiĝas al reagoj. Tiuj influoj formiĝas pro la agado de ankoraŭ aliaj influoj. Ekzemple, plantoj kreskas kaj floras pro la elverŝado de printempaj pluvoj, dum la nubo mem formiĝas pro diversaj aliaj agentoj, kaj tiuj agentoj siavice ricevas la reagon de ankoraŭ pluaj agentoj. Ekzemple, plantoj kaj bestoj kreskas kaj evoluas sub la influo de tio, kion la filozofoj de nia epoko nomas hidrogeno kaj oksigeno, kaj ricevas la efikon de tiuj du elementoj; kaj tiuj ĉi siavice formiĝas pro ankoraŭ pluaj influoj. Same oni povas paroli pri aliaj estaĵoj, ĉu ili efikas aliajn aferojn aŭ ricevas efikon. Tia kaŭzoprocezo daŭras, kaj aserti, ke tiu procezo estas senfina, estas klara absurdaĵo. Do tia kaŭzoĉeno devige kondukas fine al Li, kiu estas la Ĉiam-Vivanta, la Ĉiel-Potenco, kiu estas dependa nur de Si Mem kaj la lasta Kaŭzo. Tiu Universala Realo povas esti intuciata, ĝi ne povas esti vidata. Ĝi devas esti tia, ĉar ĝi estas Ĉio-Ampleksa, ne limigita, kaj tiaj ecoj atribueblas al la efiko sed ne al la kaŭzo.

Kaj dum ni meditas, ni observas, ke la homo similas etan organismon ene de frukto; tiu frukto evoluis el burĝono, la burĝono kreskis el arbo, la arbo estas nutrata de suko, kaj la suko estiĝis el tero kaj akvo. Do kiel tiu eta organismo povus kompreni la naturon de la ĝardeno, koncepti la ĝardeniston kaj kompreni lian eston? Klare tio ne eblas. Se tiu organismo komprenus kaj pripensus, ĝi observus, ke tiuj ĝardeno, arbo, burĝono, frukto neniel povis de si mem ekekesti en tia ordo kaj perfekto. Similmaniere saĝa kaj pensema animo scias certe, ke tiu ĉi senfina universo kun sia tuta grandiozo kaj perfekta ordo ne povintus per si mem ekekesti.

Similmaniere ekzistas en la estomondo fortoj nevideblaj de la okulo, kiaj la forto de etero jam menciita, nesensebla, nevidebla. Tamen per siaj efikoj, tio estas per siaj ondoj kaj vibradoj, aperas lumo, varmo, elektro kaj manifestiĝas. Simila estas la kreskopotenco, sentado, kompreno, pensado, memoro, imagado kaj perceptado; ĉiuj ĉi internaj kapabloj estas nevidataj de la okulo kaj nesenseblaj, sed ĉiuj evidentiĝas per siaj efikoj.

Pri la senfina Potenco, kiu ne havas limojn: limoj mem pruvas la ekziston de la senlima, ĉar la limigita estas konata pere de la senlima, same kiel malforto estas konata pere de la ekzisto de potenco, scio pere de scio, malriĉeco pere de riĉeco. Sen riĉeco ne estus malriĉeco, sen scio ne estus scio, sen lumo ne estus mallumo. Mallumo mem estas pruvo de la ekzisto de lumo, ĉar mallumo estas manko de lumo.

La naturo estas nur la esencaj ecoj kaj la necesaj rilatoj interne de la realo de aferoj. Kvankam tiuj sennombraj realaĵoj diversas laŭ sia karaktero, ili estas en absoluta harmonio kaj firme interplektitaj. Kiam onies vidpovo plilarĝiĝas kaj oni observas atente, oni scias certe, ke ĉiu realaĵo estas nur esenca bezonaĵo de aliaj realaĵoj. Tial interligi kaj harmoniigi tiujn diversajn kaj sennombrajn realaĵojn, ĉio-liga Potenco estas bezonata, por ke ĉiu parto de la ekzistanta esto plenumu sian funkcion en perfekta ordo. Pripensu la korpon de la homo, kaj permesu, ke parto estu indiko pri la tuto. Pripensu, kiel tiuj diversaj partoj kaj membroj de la homa korpo estas intime ligitaj kaj harmonie unuigitaj inter si. Ĉiu parto estas esenca bezonaĵo de ĉiuj aliaj partoj kaj havas propran funkcion. La menso estas la ĉio-liga agento, kiu tiel unuigas ĉiujn konsistajn partojn al aliaj, ke ĉiu plenumas sian specifan funkcion en perfekta ordo, kaj tiel kunlaboro kaj interago eblas. Ĉiuj partoj funkcias laŭ certaj leĝoj, kiuj esencas por la ekzisto. Se tiu ĉio-liga agento, kiu direktas ĉi ĉiujn partojn, iel difektiĝus, ne estas dubo, ke la konsistaj partoj kaj membroj ĉesos ĝuste funkcii; kaj kvankam la ĉio-liga agento en la

templo de homo estas nesentata kaj nevidata kaj ĝia realo nekonata, tamen per siaj efikoj ĝi montras sin en pleja potenco.

Estas do pruvite kaj evidentigite, ke tiuj sennombraj estaĵoj en tiu ĉi mirinda universo plenumas ĝuste sian funkcion nur se direktataj kaj regataj de tiu Universala Realo, por ke ordo estu establita en la mondo. Ekzemple, interagado kaj kunlaborado inter la konsistaj partoj de la homa korpo estas evidentaj kaj nepridisputeblaj, sed tio ne sufiĉas; necesas ĉio-liga agento, kiu direktas kaj regas la konsistajn partojn, ke tiuj ĉi per interagado kaj kunlaborado plenumu en perfekta ordo siajn necesajn kaj proprajn funkciojn.

Vi bone konscias, laŭdata estu la Sinjoro, ke kaj interagado kaj kunlaborado evidentiĝas kaj estas pruvitaj inter ĉiuj estaĵoj, kaj grandaj kaj etaj. Se temas pri grandaj korpoj, interagado same manifestiĝas kiel la suno; se temas pri malgrandaj, kvankam interagado estas nekonata, tamen la parto indikas pri la tuto. Ĉiuj ĉi interagadoj estas ligitaj per tiu ĉio-ampleksa potenco, kiu estas ilia pivoto, ilia centro, ilia fonto kaj ilia movpotenco.

Ekzemple, kiel ni observis, kunlaboro inter la konsistaj partoj de la homa korpo estas klare konstatita, kaj tiuj partoj kaj membroj plenumas servojn al ĉiuj konsistaj partoj de la korpo. Ekzemple, la mano, la piedo, la okulo, la orelo, la menso, la imagopovo ĉiuj helpas la diversajn partojn kaj membrojn de la homa korpo, sed ĉiuj ĉi interagadoj estas ligitaj de nevidata, ĉio-ampleksa potenco, kiu kaŭzas, ke tiuj interagadoj perfekte regule okazu. Tio ĉi estas la interna kapablo de la homo, tio estas, liaj spirito kaj menso, el kiuj ambaŭ estas nevideblaj.

Similmaniere pripensu maŝinojn kaj fabrikojn kaj la interagadon inter la diversaj konsistaj partoj kaj sekcioj, kaj kiel ili estas inter si kunligitaj. Ĉiuj ĉi rilatoj kaj interagadoj estas ligitaj al centra potenco, kiu estas ilia movpotenco, ilia pivoto kaj fonto. Tiu centra potenco estas aŭ la vaporpovo aŭ la lerto de mastromenso.

Estas do evidentigite kaj pruvite, ke interagado, kunlaborado kaj interrilatado inter aferoj estas sub la direktado kaj volo de motiviga Potenco, kiu estas la origino, la movpotenco kaj la pivoto de ĉiuj interagoj en la universo.

Similmaniere ĉiun aranĝon kaj formiĝon, kiuj ne estas perfektaj en sia ordo, ni nomas hazardaj; kaj tiun, kiu estas bonorda, regula, perfekta en siaj rilatoj kaj kies ĉiu parto estas en la ĝusta loko kaj estas la esenca bezonaĵo de la aliaj konsistaj partoj, ni nomas kunmetaĵo formita per volo kaj scio. Estas sen dubo, ke la sennombraj estaĵoj kaj kunestado de tiuj diversaj elementoj aranĝitaj en sennombraj formoj devis eliri el Realo, kiu ne povas iel ajn esti sen volo aŭ kompreno. Tio estas klara kaj pruvita al la menso, kaj neniu povas tion nei. Tio tamen ne pensigu, ke la Universala Realo aŭ Ĝiaj atributoj estas komprenitaj. Neniu iam komprenis aŭ Ĝiajn Esencon aŭ atributojn. Ni tamen asertas, ke tiuj sennombraj estaĵoj, tiuj necesaj interrilatoj, tiu perfekta ordo devige emanis el fonto, al kiu ne mankas volo kaj kompreno, kaj tiu senlima kunmeto en sennombrajn formojn devis esti kaŭzita de ĉio-ampleksa Saĝo. Tion oni povas neniu krom persista obstinulo, kiu neas klaran kaj nemiskompreneblan pruvon, kaj iĝas la temo de tiu ĉi sankta Frazo: “Ili estas surdaj, ili estas mutaj, ili estas blindaj, kaj ili ne plu revenos.”

Pri la demando, ĉu la kapabloj de la menso kaj la homa animo estas unusola afero : tiuj kapabloj estas nur la internaj ecoj de la animo, kiaj la imagopovo, pensado kaj kompreno; kapabloj estas la esencaj bezonaĵoj de la homa ekzisto, same kiel ĝiaj radioj estas la interna eco de la suno. La templo de la homo similas al spegulo, lia animo similas la sunon, kaj liaj mensaj kapabloj similas la radiojn emanantajn el tiu

lumofonto. La radio eble ĉesas fali sur la spegulon, sed ĝi estas neniel disigebla de la suno.

Mallonge, temas pri tio, ke la mondo de la homo estas supernatura en siaj rilatoj al la mondo de la vegetaĵoj, kvankam vere ĝi ne estas tia. Kompare kun planto, la realo de la homo, liaj aŭd- kaj vidpovoj, estas supernaturaj, kaj neblas, ke planto komprenu la realon kaj la potencojn de la homa menso. Similmaniere al homo neniel eblas kompreni la Dian Esencon kaj la naturon de la granda Postmorto. La kompatplenaj elverŝaĵoj de tiu Dia Esenco atingas tamen ĉiujn estaĵojn, kaj necesas, ke la homo pripensu en sia koro la emanaĵojn de Dia Graco, de kiuj la animo estas unu, pli ol pri la Dia Esenco mem. Jen la ekstrema limo de la homa komprenpovo. Kiel jam menciite, tiujn preparolatajn atributojn kaj perfektecojn de la Dia Esenco ni konkludis pro la ekzisto kaj observado de aferoj, kaj ne temas pri tio, ke ni komprenas la esencon kaj perfektecon de Dio. Kiam ni diras, ke la Dia Esenco komprenas kaj estas libera, ni ne celas diri, ke ni malkovris la Dian Volon kaj Celon, sed ke ni akiris scion pri ili pere de la Dia Graco rivelita kaj manifestata en la realo de la aferoj.

Pri niaj sociaj principoj, nome la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh, disvastigataj antaŭ kvindek jaroj: ili vere komprenas ĉiujn aliajn instruojn. Estas klare kaj evidente, ke sen tiuj instruoj progreso kaj evoluo de la homaro neniel eblas. Ĉiu komunumo de la mondo trovas en tiuj Diaj Instruoj la realigon de ĝiaj plej altaj aspiroj. Tiuj instruoj similas arbon, kiu portas la plej bonajn fruktojn de ĉiuj arboj. Filozofoj, ekzemple, trovas en tiuj ĉielaj instruoj la plej perfektan solvon de siaj sociaj problemoj, kaj same veran kaj noblan klarigon de filozofiaĵoj. Similmaniere kredantoj vidas la realon de la religio manifeste rivelita en tiuj ĉielaj instruoj, kaj klare kaj konvinke pravas, ke ili estas la reala kaj vera kuraco de la malsanoj kaj malfortaĵoj de la tuta homaro. Se tiuj grandiozaj instruoj disvastiĝos, la homaro estos liberigita de ĉiuj danĝeroj, de ĉiuj kronikaj malsanoj kaj perturboj. Similmaniere la ekonomikaj principoj de la Bahaa Kredo estas la enkorpiĝo de la plej altaj aspiroj de ĉiuj laborprenantoj kaj de ekonomikistoj de ĉiuj skoloj.

Mallonge, ĉiuj sekcioj kaj partioj vidas siajn aspirojn realigitaj en la instruoj de Bahá'u'lláh. Kiam tiuj instruoj estas deklarataj en kirkoj, en moskeoj kaj aliaj adorejoj, ĉu de la sekvantoj de Budho aŭ de Konfuceo, en politikaj rondoj aŭ inter materiistoj, ĉiuj atestos, ke tiuj instruoj donacas freŝan vivon al la homaro kaj konsistigas la tutan rimedon kontraŭ ĉiaj malsanoj de la socia vivo. Neniu trovas erarojn en iu el la instruoj, male, se jam deklaritaj, ili estos aklamitaj, kaj ĉiuj agnoskos ilian nepran neceson, dirante: “Ja vere, jen la vero, kaj krom la vero ekzistas nenio krom eraroj.”

Konklude: tiuj ĉi malmultaj vortoj estas skribitaj, kaj al ĉiuj ili estos klara kaj evidenta pruvo de la vero. Pripensu ilin en via koro. La volo de ĉiu reĝo validas dum lia regado, la volo de ĉiu filozofo esprimiĝas en kelke da adeptoj dum lia vivo, sed la Potenco de la Sankta Spirito radie brilas en la realaĵoj de la Mesaĝistoj de Dio kaj plifortigas Iliajn volon tiel, ke ĝi influos grandan nacion dum jarmiloj kaj revigligos la homan animon kaj revivigos la homaron. Pripensu la grandecon de tiu potenco! Ĝi estas eksterordinara Potenco, ĉiel-sufiĉa pruvo de la vero de la misio de la Profetoj de Dio, kaj konvinka pruvo de la potenco de Dia Inspiro.

La Gloro de Gloroj restu sur vi. Haifa, la 21-an de septembro, 1921.

‘Abdu'l-Bahá, *Tabulo al Doktoro Aŭgusto Forel*

Neniu videbla limo

Proksimume unu jaron antaŭ la Unua Mondmilito okazis memorinda renkontiĝo en Parizo. La fama filozofo Henri Bergson, kiu asertis la principon de la viv-elano (élan vital) en la evoluo, jam petis intervjuon kun ‘Abdu’l-Bahá en ties ĉi hotelo, kaj tio estis permesita. Bergson iris al la hotelo kun pluraj el siaj ‘disĉiploj’. Bonvenigis ilin ‘Abdu’l-Bahá, kiu mem verŝis la teon, kaj poste invitis Bergson ekkonversacii. Sed la filozofo diris, ke decas, ke la gastiganto ekigu ĝin. Do ‘Abdu’l-Bahá komencis per la rimarkigo, ke la diferenco inter materiistoj kaj la di-kredantoj estas tute ne same granda, kiel oni kutime supozas.

La materiistoj konfesas, ke la homo ankoraŭ ne komprenas la realon de la aferoj, ĉar se li tion farus, ne plu estus eblo progresi. Ekzemple, se la esenco de fero estus komprenita en sia tuta amplekso, maleblus ĉia plua progreso en la kampo de metalurgio. Sed efektive ni ĉiutage alfrontas novajn nekonataĵojn kaj devas akiri novan scion sur la kampo de nia sperto. La di-kredantoj asertas, ke estas ĉio-ampleksa realo nekomprenebla al la homo, forto nomata dia. Se oni postspurus tiujn du vidpunktojn ĝis ilia logika konkludo, oni vidus, ke ili ne malproksimas unu de la alia.

Bergson respondis ridetante ke, se ‘Abdu’l-Bahá deziras trovi tian komunan terenon de la du partioj, li ne protestas. ‘Abdu’l-Bahá diris ke, kiam oni juĝas iun diskuteron, oni permesu, ke justeco gajnu: Bergson imagu sin staranta ĉe la bordo de senlima oceano, nescianta ĉion, kio estas en la oceano, aŭ kiel granda ĝi estas; li prenu el ĝi glason da akvo, gustumu ĝin kaj konstatu, ke ĝi estas sala; ĉu li povus tiam aserti, senkonsidere de ĉio ekster lia sciopovo, ke en tiu vasta oceano ne estas salo? Bergson iom cerbumis kaj cedis, ke neniu povus fari tian aserton.

‘Abdu’l-Bahá daŭrigis, dirante, ke ni estas en mondo, kiu estas eta parto de la senlima universo, senpovaj ĉion esplori kaj nesciantaj, kiaj vivspecoj ekzistas. Se ni rigardas la homon parto de la neimageble granda Estoregno, ni trovas, ke li havas pensopovon kaj volon. Sed se ni trovas pensopovon kaj volon en homaj individuoj, ĉu estas valide nei la eblon, ke la Unua Kaŭzo, el kiu la homo devenas – ĉu ni nomu ĝin la Naturo aŭ Dio – ankaŭ posedas pensopovon kaj volon?

Valíyu’lláh Varqá*, bahaano, kiu ĉeestis tiun intervjuon, kiu rakontis pri ĝi al mi du fojojn, raportis, ke post tiuj vortoj de ‘Abdu’l-Bahá regis kompleta silento en la ĉambro dum kelkaj minutoj. Tiam Bergson, profunde impresate, diris, ke surprizas lin, ke estas tiel simpla klarigo de tiel malfacila demando. Li leviĝis, klinis sin, kaj kisis la manon de ‘Abdu’l-Bahá antaŭ ol ekiri. Liaj kamaradoj same agis.

The Heavens are Cleft Asunder (La ĉielo disfendiĝas) de Hushmand Sabet.

- Valíyu’lláh Varqá, kies patro kaj frato estis inter la plej bone konataj martiroj de la Bahaa Kredo, estis konfidenculo de ‘Abdu’l-Bahá kaj Shoghi Effendi, akompanis tiun dum pluraj vojaĝoj, kaj estis de tiu ĉi nomita Mano de Dio.

Tradukis: Trevor Steele. 25an de Februaro 2003.

BAHAAJ PREĜOJ

PREĜO 1.

Ĉiuj laŭdoj, ho mia Dio, estu al Vi, Kiu estas la Fonto de ĉia gloro kaj majesto, de grandeco kaj honoro, de suvereneco kaj regeco, de alteco kaj favoro, de sankta timo kaj potenco. Kiun ajn Vi volas, Vi altiras al la Plej Sankta Oceano, kaj al kiu ajn Vi deziras, Vi donacas la honoron konfesi Vian Eternan Nomon. El ĉiuj, kiuj estas en la ĉielo kaj sur la tero, neniuj povas rezisti la efikon de Via suverena volo. De eterne Vi regas la tutan kreitaron, kaj Vi ĉiam regados super ĉiuj kreitaĵoj. Ne estas alia Dio krom Vi, la Ĉiopova, la Plejlaŭdegata, la Plejpotenca, la Plejsaĝa.

Lumigu, ho Eternulo, la vizaĝojn de Viaj servantoj, por ke ili vidu Vin, kaj purigu iliajn korojn, por ke ili turnu sin al la kortego de Viaj ĉielaj favoroj kaj konfesu Tiun, Kiu estas Via Malkaŝanto kaj la Fonto de Via Esenco. Vere, Vi estas la Reganto de ĉiuj mondoj. Ne estas alia Dio krom Vi, la Senlima, la Ĉioenkanta.

Bahá'u'lláh : La Benita Belo.

PREĜO 2.

Mi vekiĝis sub Via ŝirmo, ho mia Dio, kaj decas al tiu, kiu serĉas tiun ŝirmon, restadi en la Sanktejo de Via protekto kaj la Fortikaĵo de Via defendo. Iluminu mian internan estaĵon, ho mia Eternulo, per la majesto de la Tagiĝo de Via Revelacio, samkiel Vi iluminis mian eksteran estaĵon per la matena lumo de Via favoro.

Bahá'u'lláh : La Plej Amatulo.

PREĜO 3.

Ho Dio! Gvidu min, protektu min, faru min lumanta lampo kaj stelo brila. Vi estas la Pova kaj la Potenca.

—'Abdu'l-Bahá.

PREĜO 4.

Mi ellitiĝis ĉimatene pro Via favoro, ho mia Dio, kaj iris for el mia hejmo, fidante tutplene je Vi kaj konfidante min al Via prizorgo. Donu al mi el la ĉielo de Via kompato benon Vian kaj ebligu al mi reveni hejmen tiel sekure, kiel Vi ebligis al mi foriri sub Via protekto, kun miaj pensoj konstante fiksitaĵoj al Vi.

Ne estas alia Dio krom Vi, la Unusola, la Nekomparebla, la Ĉioscia, la Plejsaĝa.

Bahá'u'lláh : La Oceano de Unueco.

PREĜO 5.

Ho mia Dio, mia Mastro, la Celo de mia deziro!

Ĉi tiu servanto Via sopiras dormon en la ŝirmejo de Via kompato kaj ripozon sub la baldakeno de Via favoro, petegante Viajn prizorgon kaj protektadon.

Mi petas Vin, ho mia Eternulo, je Via okulo nedorma, protekti miajn okulojn, ke ili vidu nenion krom Vi. Plifortigu, do, ilian vidpovon, por ke ili distingu Viajn signojn kaj ekvidu la Horizonton de Via Revelacio. Vi estas Tiu, antaŭ la signoj de Kies ĉiopotenco la kvintesenco de potenco tremas.

Ne estas alia Dio krom Vi, la Ĉiopova, la Ĉioenkanta, la Senkondiĉa.

Bahá'u'lláh : La Lumo de la Suno de Vero.

PREĜO 6.

Kreu en mi puran koron, ho mia Dio, kaj renovigu en mi trankvilan konsciencon, ho mia Espero! Per la spirito de potenco firmigu min en Via Kredo, ho mia Plejamata, kaj per la lumo de Via gloro revelaciu al mi Vian vojon, ho Vi, la Celo de mia deziro! Per la potenco de Via transcenda forto levu min en la ĉielon de Via sankteco, ho Fonto de mia ekzisto, kaj per la brizoj de Via eterneco ĝojigu min, ho Vi, Kiu estas mia Dio! Viaj ĉiamaj melodioj spiru trankvilon sur min, ho mia Akompananto, kaj la riĉoj de Via praa vizaĝo liberigu min de ĉio krom Vi, ho mia Mastro, kaj la sciigo de la revelacio de Via nepereonta Esenco alportu al mi ĝojon, ho Vi, Kiu estas la plej malkaŝita el la malkaŝitaĵoj kaj la plej kaŝita el la kaŝitaĵoj!

Bahá'u'lláh : La Plej Granda Nomo.

PREĜO 7.

Ho mia Dio! Ho mia Dio! Unuigu la korojn de Viaj servantoj kaj revelaciu al ili Vian grandan celon. Ili sekvu Viajn ordonojn kaj estu fidelaj al Via leĝo. Helpu ilin, ho Dio, en ilia penado kaj donu al ili forton por servi al Vi. Ho Dio! Ne lasu ilin solaj, sed gvidu iliajn paŝojn per la lumo de Via scio kaj ĝojigu iliajn korojn per Via amo. Vere, Vi estas ilia Helpanto kaj ilia Eternulo.

Bahá'u'lláh : La Lumo de la Mondo.

PREĜO 8.

Ho mia Dio! Ho Vi, pardonanto de pekoj, donacanto de bonoj, forpelanto de afliktoj!

Vere, mi petegas Vin pardoni la pekojn de tiuj, kiuj lasis sian fizikan veston kaj ascendis en la mondon spiritan.

Ho mia Eternulo! Purigu ilin de misfaroj, forpelu iliajn ĉagrenojn kaj ŝanĝu ilian sombron al lumo. Faru, ke ili eniru la ĝardenon de feliĉo, lavu ilin per la plej pura akvo kaj lasu ilin ekvidi Vian helegon sur la monto plej alta.

—'Abdu'l-Bahá. : Centro de la Sankta Interligo.

PREĜO 9.

Via nomo estas mia kuraco, ho mia Dio, kaj rememoro pri Vi mia medikamento. Proksimeco al Vi estas mia espero, kaj amo al Vi mia akompananto. Via mizerikordo al mi estas mia sanigo kaj mia helpo en tiu ĉi mondo kaj en la mondo venonta.

Vi vere estas la Ĉiodona, la Ĉioscia, la Plejsaĝa.

Bahá'u'lláh : La Suno de la Providenco.

PREĜO 10.

Ho mia Dio, la Dio de donacado kaj kompato! Vi estas la Reĝo, per kies ordona vorto la tuta kreitaro estis kreita; kaj Vi estas tiu Ĉiodonanto, la faroj de Kies servantoj neniam malebligas al Li montri Sian favoron, nek nuligas la signojn de Lia donacemo.

Permesu al ĉi tiu servanto, mi petegas al Vi, atingi tion, kio estas la kaŭzo de lia saviĝo en ĉiu mondo el Viaj mondoj. Vere, Vi estas la Ĉiopova, la Plej Potenca, la Ĉioscia, la Plejsaĝa.

Bahá'u'lláh : La Sapiro de la Mondo.

PREĜO 11

Multe da frostaj koroj, ho mia Dio, ekflamis per la fajro de Via Kredo, kaj multaj dormantoj vekigis per la dolĉeco de Via voĉo. Kiom da vaguloj serĉis rifuĝon sub la ombro de la arbo de Via unueco, kaj kiom da soifantoj anhele strebis al la fonto de Viaj vivigaj akvoj dum la tagoj Viaj! Benata estas tiu, kiu direktis sin al Vi kaj rapidis por atingi la Tagiĝon de la Lumoj de Via Vizaĝo. Benata estas tiu, kiu sin tutkore turnis al la Leviĝejo de Via Revelacio kaj la Fonto de Via inspiro. Benata estas tiu, kiu elspezis sur Via vojo, kion Vi estis donacinta al li pro Viaj malavaro kaj favoro. Benata estas tiu, kiu en sia korimpeta sopiro al Vi ĵetis for ĉion alian krom Vi. Benata estas tiu, kiu ĝuis konfidan komunon kun Vi kaj senigis sin je ĉiuj ligoj al iu ajn krom Vi.

Mi petegas Vin, ho mia Eternulo, je Tiu, Kiu estas Via Nomo, Kiu per la potenco de Via suvereneco kaj forto leviĝis super la horizonto de Sia malliberejo, ke Vi ordonu al ĉiuj tion, kio estas konvena al Vi kaj kio decas je Via plejalteco. Via potenco vere superas ĉion.

Bahá'u'lláh : La Plumo de la Plej Alta.

PREĜO 12

Ho mia Eternulo! Faru Vian belecon mia manĝaĵo kaj Vian ĉeeston mia trinkaĵo, kaj Vian plaĉon mia espero, kaj gloradon al Vi mia agado, kaj rememoron pri Vi mia akompananto, kaj la potencon de Via suvereneco mia helpo, kaj Vian restadejon mia hejmo, kaj mian vivejon la loko, kiun Vi sanktigis de la limoj metitaj al tiuj, kiuj kvazaŭ per vualo estas forfermitaj de Vi. Vi estas vere la Ĉiopova, la Plejglora, la Plejpotenca.

Bahá'u'lláh : La Amo de la Mondo.

PREĜO 13

Ho mia Sinjoro, mia Amato, mia Deziro! Konsolu min en mia soleco kaj akompanu min en mia ekzilo. Forigu mian ĉagrenon. Faru min fidela al Via beleco. Senigu min de ĉio krom Vi. Allogu min per la bonodoro de Via sankteco. Kunigu min en Via Regno kun tiuj, kiuj seniĝis de ĉio krom Vi kaj alstrebas servi ĉe Via sankta sojlo, pretaj labori por Via Afero. Ebligu al mi esti unu el Viaj servantinoj, kiu atingis Vian bonfavoron. Vere, Vi estas la Graca, la Malavara.

—*'Abdu'l-Bahá.*

PREĜO 14

Ho mia Dio! Ho mia Dio! Vere, mi alvokas Vin kaj preĝas antaŭ Via sojlo, petante Vin, ke ĉiuj Viaj benoj descendu sur ĉi tiujn animojn. Distingu ilin per Via favoro kaj Via vero.

Ho Eternulo! Unuigu kaj kunligu la korojn, akordigu ĉiujn animojn kaj ĝojigu la spiritojn per la signoj de Viaj sankteco kaj ununureco. Ho Eternulo! Faru ĉi tiujn vizaĝojn radiantaj per la lumo de Via unueco. Fortigu la lumbojn de Viaj servantoj por la servado al Via regno.

Ho Eternulo, Vi la posedanto de senlima kompato! Ho Dio de senkulpigo kaj pardonemo! Pardonu niajn pekojn, senkulpigu niajn malfortojn kaj igu nin turniĝi al la reĝejo de Via indulgo, alvokante la regnon de forto kaj potenco, humiliĝante ĉe Via sanktejo kaj submetiĝante antaŭ la gloro de Viaj evidentecoj.

Ho Sinjoro Dio! Faru nin ondoj de l' maro, floroj de l' ĝardeno, unuiĝintaj, unuanimaj per la donaco de Via amo. Ho Eternulo! Vastigu la brustojn per la signoj de Via ununureco kaj faru la tutan homaron steloj brilantaj el sur la sama alto de gloro, perfektaj fruktoj kreskantaj sur Via arbo de vivo.

Vere, Vi estas la Ĉiopova, la Mem-Ekzistanta, la Donanta, la Pardonanta, la Senkulpiganto, la Ĉioscia, la Ununura Kreanto.

—*'Abdu'l-Bahá.*

PREĜO 15

Ho Dio! Refreŝigu kaj ĝojigu mian spiriton. Purigu mian koron. Iluminu miajn fortojn. Mi metas ĉiujn miajn aferojn en Vian manon. Vi estas mia Gvidanto kaj Rifuĝejo. Mi ne plu estos malĝoja kaj ĉagrenita; mi estos feliĉa kaj ĝojplena. Ho Dio! Mi ne plu estos zorgoplena, nek mi permesas, ke afliktoj turmentu min. Mi ne plu fiksiĝos je la malagrablaj aferoj de la vivo.

Ho Dio! Vi estas plia amiko al mi ol mi estas al mi mem. Mi dediĉas min al Vi, ho Eternulo!

—*'Abdu'l-Bahá.*

PREĜO 16

Kiu ekas al vojaĝo ien por diskonigi la Kredon, tiu citu tiun ĉi preĝon tage kaj nokte dum siaj vojaĝoj tra fremdaj landoj.

Ho Dio, mia Dio! Vi vidas min ravita kaj altirata de Via glora reĝejo, flamigata per la fajro de Via amo inter la homaro, heroldo de Via regno en tiuj ĉi grandaj vastaj landoj, fortranĉita de ĉio alia krom Vi, fidanta al Vi, forlasinta ripozon kaj komforton, for de mia indiĝena hejmo, migranto en tiuj ĉi regionoj, fremdulo falinta surteren, humila antaŭ Via altega Sojlo, obeema al la ĉielo de Via ĉiopova gloro, peteganta al Vi en la mezo de la nokto kaj je tagekiĝo, alvokanta kaj alpreĝanta Vin matene kaj vespere por graceme helpi min servi Vian Aferon, disvastigi ĉien Viajn Instruojn kaj laŭdegi Vian Vorton tra la tutaj Oriento kaj Okcidento.

Ho, Eternulo! Fortigu mian lumbon, kapabligu min servi al Vi per pleja penado kaj ne forlasu min al mi mem, soleca kaj senhelpa en tiu ĉi forejo. Ho, Eternulo! Donacu al mi komunion kun Vi en mia forlasiteco kaj estu mia kunestanto en tiuj ĉi fremdaj landoj. Vere, Vi konfirmas kiun ajn Vi volas je tio, kion Vi deziras, kaj vere Vi estas la Ĉiopova, la Plejpotenca.

—*'Abdu'l-Bahá.*

PREĜO 17

Ho Dio, mia Dio!

